


La 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj



Libro por BET-ano

Panevėžys
6-14 julio 2019

Libro pri la tradicia esperantista aranĝo

Baltiaj Esperanto-Tagoj,

kiu en 2019 fariĝas 60-jara.

**Eldonita okaze de la 55-a BET en Litovio
sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio**

Libro por BET-ano



**Panevėžys
6–14 julio 2019**

BET-55 estas dediĉita al la centjariĝo de Litova Esperanto-Asocio

© Litova Esperanto-Asocio, 2019

Redaktoro:

Stano Marček,

Kompilintoj:

Stano Marček,

Povilas Jegorovas,

Aleksander Korĵenkov

Fontoj: La Balta Ondo:

<http://sezonoj.ru/bet55/>

Retejo de BET:

www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55

Enpaĝigo: Stano Marček

Korektoj: Utho Maier

Kovrilo © Vladimiras Beresniovos

Presita en Litovio

Leidinio bibliografinė informacija pateikiama
Lietuvos nacionalinės Martyno Mažvydo bibliotekos
Nacionalinės bibliografijos duomenų banke (NBDB).

ISBN 9955-609-95087-8-8

Enhavo

Salutmesaĝoj

Vytenis Povilas Andriukaitis, membro de Eŭropa Komisiono	8
Prof. Viktoras Pranckietis, Prezidanto de Litovia Sejmo	9
Rytis Račkauskas, la urbestro	10
Linas Linkevičius, ministro pri eksterlandaj aferoj	10
Mindaugas Kvietkauskas, Litovia Ministro pri Kulturo	11
Mark Fettes, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio	12
D-ro Seán Ó Riain, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio	13
Povilas Jegorovas, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio	14
Organiza komitato de BET-55	15
BET: Historia tabelo	16
Diagramo de BET-oj	17
Kial veni al Panevejo?	18
Koncize pri Litovio	22
Bazaj scioj pri la litova lingvo	24
Pri la litovaj lingvo kaj kulturo	30
Mapoj de Panevėžys	31

Historio de BET-oj

Historio de la unua BET kaj la 60-jara jubileo	33
ĈET-3 en Molėtai (1961)	37
BET-6 en Veisiejai (1964)	39
BET-9 en Vilno (1967)	41
BET-12 en Kretinga (1970)	43
BET-17 en Viekšniai (1976)	46
BET-20 apud Kaŭno (1983)	48
BET-23: Amase en malgranda urbeto (1986)	51
BET-26: La plej granda BET kun pli ol 600 partoprenantoj (1989)	54
La plej nekutima BET, aŭ SAT-kongreso en Litovio	56
BET-31 en Girionys (1995)	59
BET-34 en Veisiejai (1998)	60

BET-37 apud Kaŭno (2001)	62
BET-40 en Birštonas (2004)	64
BET-43 en Šiauliai: la plej granda BET ĉi-jarmile	66
BET-46 en Visaginas: la plej nova urbo de Litovio	67
BET-49 (2013): Interesaj kaj agrablaj tagoj en Utena	70
BET-52: Pli ol tricent verdstelanoj en la verda urbo	73
BET-informiloj	77
Himno de litoviaj BET-oj: „Al Litovio“	78
Pri nia BET-gazeto: Kial „Abelo“?	79
Programo de BET-55	80
Scienc-teknika programo de BET-55:	
Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb (resumo). Amri Wandel (biografio)	85
Magnetaj Steloj (resumo). Hans Michael Maitzen (biografio)	86
Historio de „Pi“ (resumo). Gravitaj ondoj (resumo). Alfred Heiligenbrunner (biografio)	87
Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj (resumo). Manfred Westermayer (biografio)	88
Lingvokulturologiaj temoj (resumo). Aleksandro Melnikov (biografio)	89
Prelegserio de Márkus Gábor (resumo). Márkus Gábor (biografio). Prelegserio pri mediprotektada kemio (resumo)	90
Orlando E. Raola (biografio)	91
Du prelegocikloj: religioj kaj sociologio de la Esperanto-movado (resumo)	92
Walter Ŝelazny (biografio). Kolapsologio por nia generacio (resumo)	93
Modernaj sociaj retoj kaj Esperanto (resumo). Dmitrij Ŝevĉenko (biografio)	94
Instruado dum BET-55	95
Intervjuo: Kelkaj demandoj al Stano Marček	96
Kleriga kaj eduka programo:	
Prof. Ilona Koutny. Yves Nevelsteen	98
Gong Xiaofeng. Lee Jungkee. Tatjana Auderskaja. Dmitrij Ŝevĉenko	99
Kultura programo de BET-55:	
Ensembloj de Panevėžys	100
Sepa kaj Asorti	101
Mikaelo Bronštejn	102

Kantos Amira Chun	103
Gafur Mirzabajev. Anna Striganova	104
Natalia Bertse. Koncerto ”Kantoj de nia juneco” kaj de „Sola kaj Kune“	105
Zuzanna Kornicka	106
Ekvinokso	107
Fransoazo instruos kaj koncertos. Kaŝi koncertos	108
Bauhausa arta stilo – mallonga periodo de 1919 ĝis 1933	109
Lingvo kaj kulturo: prelegociklo de Ilona Koutny en BET-55	110
Seminario de Pavla Dvořáková „Ĉu muziko povas kuraci?“.	
Pavla Dvořáková (biografieto)	111
Pri la kontribuontoj al la programo de BET-55:	
Aleksander Korĵenkov	112
Halina Gorecka. Bīruta Rozenfelde	113
Gražina Opulskienė	114
Lee Jungkee	115
Anne Jausions. Nina Pietuchowska	116
Gong Xiaofeng	117
Vytautas Šilas	118
Litova Esperanto-Asocio 100-jara	119
Esperantisto Aleksandras Dambrauskas	129
La plej nova periodo de Litova Esperanto-Asocio	142
Aliaj programeroj en BET-55	147
Laŭlanda statistiko de la aliĝintoj	148
Dum-BET-aj ekskursoj	149
Listo de la aliĝintoj	150

Salutmesaĝoj

Vytenis Povilas Andriukaitis Membro de Eŭropa Komisiono



Karaj gesamideanoj,

Mi estas granda amanto de Esperanto, ĝia fano, admiranto, amiko, propagandisto kaj subtenanto. Kaj ne nur. Mi komprenas historian kaj kulturen sencon, konserviĝeman valoron de ĉi tiu ekskluziva lingvo. Havante precipajn ligojn kun Litovio, ĝi estas ankoraŭ pli proksima por ni. Dum soveta tempo Esperanto ja estis formo de protesto kontraŭ dominado de la altrudata rusa lingvo. Pro tio ankaŭ mi, aktive partoprenante en rezista movado, ĉirkaŭ la jaro 1975 proponis paroli ne ruslingve, sed Esperante, ĉar tiu lingvo simbolis humanecon kaj demokration. Esperanton mi ellernis en mia

junaĝo, inspirita de ĝia fundamenta ideo – strebado al idealo de paca mondo, en kiu regus egalaj rajtoj kaj justeco.

Dum tempofluo Esperanto iĝis ponto inter homoj kaj popoloj, kaj tiu ponto helpas ekkoni diversecon de kulturoj. La Baltiaj Esperanto-Tagoj jam fariĝis tuteŭropa aranĝo kun multjara tradicio, ili kunvenigis amason da partoprenantoj el pli ol 30 landoj, diferencaj per siaj lingvoj, kulturoj, tradicioj. Tio ankoraŭfoje pruvas, kiom multe da komunaĵoj ni kunhavas: deziron ekkoni unuj la aliajn, komunikiĝi kaj kunlabori. Nin unuigas la lingvo, detruanta murojn kaj vaste malfermanta pordon al la mondo.

Mi salutas la organizantojn kaj partoprenantojn de la aranĝo, kiu gravas por Litovio, ankaŭ por la tuta Eŭropo.

Mi deziras al ĉiuj interesajn diskutojn, produktivan etoson kaj longedaŭrajn impresojn de restado en Litovio. Mi esperas, ke ĉio tio instigos vin ankoraŭ iam reveni en Litovion.

Vytenis Povilas Andriukaitis

Prof. Viktoras Pranckietis

Prezidanto de Litovia Sejmo



La internacia lingvo

Esperanto estas unika fenomeno en nia mondo. Ĝi estas lingvo de unueca homaro, la lingvo vivanta per la homaj penoj.

Senpera komunikado estas forto de Baltia regiono kaj de la tuta Eŭropo. Via komunumo sendube plivastigas limojn por kunlaboro de eŭropanoj en sferoj scienca, kultura kaj sociala.

Mi dankas Vin pro fortikigo de la komuneco.

Mi bondeziras firman paŝadon sur vojo de progreso kaj sukceson en Via agado!

Viktoras Pranckietis

S A L U T O

al la partoprenantoj de Baltiaj Esperanto-Tagoj

Mi salutas vin, kolektiĝintajn por la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Tio estas sencoplana solenado de la 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio. En Litovio la jaro 2020 estas proklamita kiel Jaro de Hebrea Historio, tial mi ne dubas, ke ni ofte mencios la aŭtoron de Esperanto Ludovikon Zamenhofon, ankaŭ liajn meritojn por Litovio kaj por la tutmonda socio.



LIETUVOS RESPUBLIKOS SEIMO
PIRMININKAS

SVEIKINIMAS

Baltijos esperantininkų dienu dalyviams

Sveikinu Jus, susirinkusius į 55-ąsias Baltijos esperantininkų dienas. Tai prasmingas Lietuvos esperantininkų sąjungos įkūrimo 100-mečio paminėjimas. 2020 m. Lietuvoje yra paskelbti Lietuvos žydų istorijos metais, tad neabejoju, jog ne kartą prisiminsime ir esperanto kalbos autoriaus Ludoviko Zamenhofo nuopelnus Lietuvai ir pasaulio visuomenei bei jo atminimą.

Tarptautinė esperanto kalba yra uniķalus mūsų pasaulio reiķkinys. Tai žmonių pastangomis gyvuojanti vieningos žmonijos kalba. Betarpiķumas yra Baltijos regiono ir visos Europos stiprybė. Jūsų bendruomenė neabejotinai plečia Europos šalų žmonių mokķlinio, kultūrinio ir socialinio bendradarbiavimo ribas.

Dėkoju Jums už bendruomeniķkumo stiprinimą.

Linkju Zengti pažangos kelu ir sėkmės Jūsų veikloje!

Seimo Pirmininkas

prof. Viktoras Pranckietis

2019 m. gegužės 4 d.
Vilnius



Saluto de la urbestro Rytis Račkauskas

Estimataj esperantistoj,

Mi salutas vin, venintajn al la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Mi ĝojas, ke ĉi-jare Vi renkontiĝas en nia urbo. Mi esperas, ke enhavoriĉe pasigita tempo ĉi tie havigos al Vi plej belajn emociojn kaj postlasos ĉarmajn rememorojn.

Agrablajn renkontiĝojn, serenan humoron kaj belegajn impresojn en Panevėžys!

Estime,

Rytis Račkauskas

Saluto de la ministro Linas Linkevičius

Estimataj,

Elkore mi salutas vin, kolektiĝintajn el la tuta mondo por partopreni en la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Litovio aprezas kaj alte taksas ĉi tiun amikan reton da senlacaj entuziasmuloj, kaj fieras pri siaj longedaŭraj ligoj kun la esperantista movado. La nuna jaro por Litova Esperanto-Asocio estas ekskluziva – ĝi festas centjariĝon de sia fondiĝo. Mi ĝojas, ke ĉi tiun impresan datrevenon ni povas festi kune.

La kreinto de Esperanto, la fama litova Ludoviko Lazaro Zamenhof, estis vera idealisto kaj viziulo, destininta por la lingvo Esperanto grandajn celojn. Laŭ li, ĉiuj homoj devus strebi al la plej alta celo, krei harmonian homaron: „Ni aspiras krei neŭtralan fundamenton, surbaze de kiu diversnaciaj homoj povus pace kaj frate interkomunikiĝi, ne altrudante al la aliaj siajn naciajn diferencojn“. Ĉi tiu Zamenhofa citaĵo ne perdis sian aktualecon, kaj strebado al paco, al interpopola kompreniĝo kaj komunikiĝo precipe gravas en la hodiaŭa mondo.

Permesu bondeziri al Vi enhavoriĉajn kaj inspirajn renkontiĝojn, ankaŭ agrablajn impresojn dum via gastado en Litovio.

Linas Linkevičius

Litovia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj



Saluto de la kulturministro Mindaugas Kvietkauskas

„Ĉiuj esperantistoj
estas iomete litovoj“,

– dum la Vilna Universala Kongreso de Esperanto deklaris tiama prezidanto de UEA Renato Corsetti, substrekante ligan inter ambaŭ lingvoj. Verŝajne ĉi tiu eldiro plej proksima estas por baltlandaj esperantistoj.

Do mi salutas ĉiujn partoprenantojn de Baltiaj Esperanto-Tagoj, kunvenintajn en Panevėžys. Esperanto estas lingvo, unuiganta samideanojn en la tuta mondo kaj prezentanta al ili unikan kaj universalan rimedon de komunikado. Kuniga ligilo inter ĉi tiu lingvo kaj Litovio estas Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Umberto Eco iam diris, ke la deveno kaj personeco de ĉi tiu homo sendube grave kontribuis al la ideo kaj sukceso de la nova lingvo.

Litova Esperanto-Asocio ĉi-jare festas sian centjariĝon, kaj min ĝojigas ĝia aktiva kaj multflanka agado: flegado de memoro pri Ludoviko Zamenhof, abundaj internaciaj projektoj, kiuj famigas nian landon, libroeldonado, edukado.

Kiel unu el la ĉefaj celoj de Esperanto, de lingvo ekzistanta jam 130 jarojn, oni povas nomi detruon de muroj inter nacioj, rasoj kaj diversaj spiritaj mondoj, ankaŭ stimulado de internacia kultura diskutado.

Mi deziras al vi ankaŭ estontece flegi kaj disvastigi spiriton de la lingvo, mi deziras enhavoriĉan kaj sencoplenan aranĝon, inspirajn kaj esperigajn ideojn!

Litovia Ministro pri Kulturo **Mindaugas Kvietkauskas**



Renato Corsetti
dum la 90-a UK 2005 en Vilno



Salutmesaĝo de la Prezidanto de UEA Mark Fettes

Pli ol duona jarcento da historio pretigis la vojon al la ĉi-jara BET – rimarkinda atingo, des pli, se ni konsideras la enormajn sociajn ŝanĝojn, kiujn travivis la baltiaj landoj en tiuj jardekoj.

Eĉ pli mirinda estas la organiza kaj kultura nivelo de la aranĝo, kiu perlaboris famon multe pli vastan, ol nur en sia regiono. Nu, tion vi jam scias, vi anoj de la 55-a BET, ĉar vi

saĝe rezervis semajnon de la eŭropa somero por trempĵi vin en la gaja kaj profunda esperantisteco de ĉi tiu mondoparto. Gratulon pro via elekto! Multajn el vi mi esperas revidi ĉe la posta Universala Kongreso en Lahtio, Finnlando – sed eĉ sen tio vi certigis al vi belan sperton.

Unu el la paradoksoj de Esperanto estas tio, ke ĝiaj kulturaj valoroj – kombino de lingva kreemo, internacia amikeco kaj mondoŝanĝa vizio – estas malfacile komunikeblaj al homoj, kiuj ne spertis ilin rekte mem. Tio substrekas la gravecon allogi al BET novajn lernantojn de Esperanto, kaj doni al tiuj novuloj subtenon, kuraĝigon, kaj multajn okazojn por ekzerci kaj plibonigi sian region de la lingvo. Tiuspeca agado tuŝas ĉiujn agadkampojn de UEA – Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, Kunordigo. Mi esperas, ke vi ne nur bonvenigos la novulojn, sed ankaŭ elkovos novajn iniciatojn por plimultigi ilin. Tiel vi kontribuos al niaj mondvastaj streboj renovigi la movadon kaj meti ĝin sur la vojon al kresko.

Mi deziras al vi ĉiuj ĝojplenajn semajnon en bela Litovio!

Mark Fettes

Prezidanto

Universala Esperanto-Asocio



Salutvortoj de D-ro Seán Ó Riain Prezidanto de EEU

Karaj gesamideanoj kaj geamikoj!

Kiel Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, estas por mi granda honoro sendi miajn elkorajn gratulojn al BET-55.

La ĉiujara BET estas inter la plej sukcesaj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo, kaj mi esperas, ke ĝi longe daŭros tiel. La litovoj estas pioniroj en la antaŭenigo de Esperanto – mi bone memoras la plezuron de mia partopreno en la tre sukcesa Universala Kongreso de Esperanto en Vilnius en 2005, kaj la sukcesa kaj noviga ĵurnalista kongreso en 2008.

Nuntempe Litovio povas aparte fieri, ĉar la sola membro de Eŭropa Komisiono, kiu parolas Esperanton¹, kaj kiu komprenas la lingvajn problemojn de Eŭropo, estas la Komisionano el Litovio, D-ro Vytenis Andriukaitis. En la opinio de EEU la plej grava tuja laboro estas pligrandigi la nombron de EU-Membroŝtatoj, kiuj oficiale agnoskas Esperanton kiel parton de la nacia nemateria kultura heredaĵo, kaj de la kultura heredaĵo de Eŭropo². Pollando oficiale donis tiun agnoskon en 2014, kaj Kroatio sukcesis fari same en februaro 2019. Kiu estos la tria lando, kiu sukcesos?

Akceptu mian varman dankon por via granda laboro por la lingva justeco kaj por Esperanto, kaj miajn elkorajn gratulojn kaj dezirojn por la sukcesa BET-55.

Amike

D-ro Seán Ó Riain
Prezidanto de EEU,
Eŭropa Esperanto-Unio

1) Laŭ plej freŝa informo, en <http://esperanto.kr/?p=5681>, la EU-parlamento nun havas 3 pliajn membrojn, regantajn Esperanton (slovenajn).

2) Intertempe jam la 3-a lando, Slovakio, agnoskis tiun kulturalan heredaĵon – ni do esperu pri aldona 4-a lando, kaj pliaj... (Rim. de la red.)

Saluto de Povilas Jegorovas, Prezidanto de LEA

Karaj partoprenantoj de BET-55!



Bonvenon al nia tradicia esperantista aranĝo, kiu ĉi-jare fariĝas jam 60-jara! Baltiaj Esperanto-Tagoj esatas unika

fenomeno en la internacia Esperanto-movado. Aperinte en 1959, danke al iniciato de tiutempaj junaj esperantistoj-studentoj kiel modesta renkontiĝo, ĝi tuj evoluis al amasa kaj tiutempe preskaŭ la sola esperantista aranĝo en la tuta tiutempa Sovetunio, kaj post la sendependiĝo de la baltiaj landoj ĝi ne nur konservis sian tradicion, sed laŭ geografio de la partoprenantoj etendiĝis tra la tuta Eŭropo kaj eĉ pli foren.

BET kiel historia fenomeno eltenis influon de la tempo kaj de esencaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, ĉar ĝi en si mem havas iaspecan internan forton, altirantan multajn homojn, kaj post esenca internaciigo ĝi ekhavis multajn novajn kolorojn kaj aspektojn.

La ĉi-jara BET elstaras ne nur pro la jubilea datreveno kaj pro la rekorda kvanto da partoprenantoj – preskaŭ 400 homoj el pli ol 30 landoj – sed ankaŭ pro la tre riĉa, interesa, diversflanka, streĉa kaj intensa programo, en kiu ĉiu povas trovi ion interesan por si.

Per BET ni ankaŭ mencias la 100-jariĝon de Litova Esperanto-Asocio.

Ĉi-jare ni renkontiĝas en Panevėžys – en la regiono, kie Esperanto kaj la bela ideo de la interpopola kunlaboro kaj amikeco ne estas fremda.

Litovio nur antaŭ preskaŭ 30 jaroj revenis al mondmapo de la egalrajtaj nacioj kaj ŝtatoj. Tamen Litovio havas longan historion, antikvan lingvon, unikan kulturon, belegan naturon. Mi esperas, ke partoprenantoj de BET-55 ĉion tion vidos kaj spertos senpere, kaj revenos hejmen pli riĉaj kulture kaj spirite.

Bonvenon al Litovio! Bonvenon al Panevėžys! Belegajn interesajn kaj utilajn tagojn!

Povilas Jegorovas

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Organiza komitato de BET-55

Povilas Jegorovas: prezidanto, kunordigo, ĝenerala gvidado, informado.

Sandra Jakštienė: la unua vicprezidanto de la organiza komitato, vicdirektorino de la urba municipa administracio de Panevėžys.

Vida Kulikauskienė: vicprezidanto de la organiza komitato, prezidantino de Esperanto-klubo “Revo” de Panevėžys.

Danutė Kriščiūnienė: vicprezidanto de la organiza komitato, vicprezidantino de Esperanto-klubo “Revo”.

Saulė Kairienė: gvidantino de administracio de la Fakultato pri Teknologioj kaj Entreprenado de Kaūna Teknologia Universitato.

Dalia Gaspariūnienė: fakestrino de la urba komunuma palaco de Panevėžys.

Vilma Bačelienė: direktorino de la urba turisma kaj informa centro de Panevėžys.

Irena Alijošiūtė: sekretario, financaj aferoj.

Aleksander Korĵenkov: informado pri BET-55.

Taesok Choe: retejo de BET-55.

Antanas Grincevičius: redaktoro de “Barello”.

Stano Marček: redaktoro de la gazeto *ABELO* de BET-55.

Arimantas Račkauskas: rektoro de la Somera Universitato.

Gražina Opulskienė: instruado de Esperanto.

Aloyzas Gudavičius: prelegserio pri la litovaj lingvo kaj kulturo.

Irena Jagminaitė: libroservo.

Antanas Visockas: ekskursoj.

Gražvydas Jurgelevičius: fotoservo.

Rita Valčiukaitė: registrado, informado.

Olga Strojewa: registrado, informado.

Asta Nastaravičiūtė: mastrumaj kaj teknikaj aferoj.

Vladimir Žuromskij: mastrumaj kaj teknikaj aferoj.

Legu pli en la novaĵretejo *La Balta Ondo*:
<http://sezonoj.ru/2018/11/bet-68/>



Dekanino

Daiva Žostautienė,
prezidanto de LEA
Povilas Jegorovas
kaj la prezidantino
de la Esperanto-klubo
„Revo“ **Vida Kulikauskienė**
post la subskribo de la
kontrakto pri kunlaboro.

BET: Historia tabelo

Dum la sovetia periodo Baltiaj Esperanto-Tagoj por la esperantistoj de USSR anstataŭis Universalajn Kongresojn de Esperanto, kiujn sovetianoj preskaŭ ne povis partopreni.

Komence la aranĝoj nomiĝis Ĉebaltaj Esperantistaj Tendaroj (ĈET), poste Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET) kaj fine Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). La plej unua ĈET okazis la 1–14 aŭg. 1959 en Baltezers (Latvio) kun nur 48 partoprenantoj. Ekde tiam ĈET/BET okazis laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio.

BET-oj ankaŭ iusence anstataŭis baltiajn Esperanto-asociojn, kiujn ne eblis fondi en Sovetio, kaj servis kiel organiza kaj kunlabora forumo por esperantistoj de la tiutempaj baltiaj respublikoj de Sovetunio.

BET-oj ne okazis en 1973 kaj dum 1979-1982, ĉar tiutempaj sovetiaj instancoj ne permesis organizi ilin. En 1992 en Litovio BET ne okazis, ĉar tiujare litoviaj esperantistoj gastigis la 65-an kongreson de SAT, tamen ĉi tiu kongreso enhavis ĉiujn ĉefajn programerojn de BET-oj, kaj eblas konstati, ke la tradicio ne estis rompita.

Necesas mencii, ke el BET-oj evoluis ankaŭ la famaj SEJT-oj (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj). SEJT-oj komencis sian vivon en Litovio. En 1967 BET-9 okazis en Vilno, kaj samtempe junuloj okazigis en la litovia urbeto Kaltanėnai la unuan junularan tendaron, kiu ricevis la titolon SEJT-9. BET tre rapide kreskis al tutsovetia aranĝo, kaj post la sendependiĝo de la tri baltiaj landoj ĝi iĝis internacia kongreso, kiun partoprenas esperantistoj el pluraj eŭropaj landoj.

Ĉi-apude estas la tabelo de BET-oj, preparita de Petras Čeliaskas. Ĝi antaŭ kelkaj jaroj aperis en *Litova Stelo*, kiun Čeliaskas redaktis, kaj nun ĝi reaperas en ĝisdatigita formo. La tabelo kaj la diagramo, pretigita


de Antanas Grincevičius, vidigas du ĉefajn tendencojn. Unue, BET-oj estis la plej amasaj dum la lastaj jaroj de Sovetunio, kiam ekde 1985 ĝis 1991 BET ĉiujare allogis pli ol 300 (de 350 ĝis 608) personojn. Al la unua BET, okazinta post la sendependiĝo de la tri baltiaj ŝtatoj (BET-29 en 1993 en Latvio) venis nur 50 partoprenantoj, kaj dum la postaj pli ol 20 jaroj la partoprenantaro neniam proksimiĝis al 350. Tio estas facile komprenebla, ĉar post la

Numero	Jaro	Loko	Lando	Partoprenantoj
ĈET-1	1959	Baltezers	Latvio	48
ĈET-2	1960	Kääriku	Estonio	107
ĈET-3	1961	Molėtai	Litovio	204
ĈET-4	1962	Drabeši	Latvio	238
BET-5	1963	Vārskā	Estonio	288
BET-6	1964	Veisiejai	Litovio	153
BET-7	1965	Saulaine	Latvio	171
BET-8	1966	Pärnu	Estonio	117
BET-9	1967	Vilnius	Litovio	337
BET-10	1968	Ruba	Latvio	194
BET-11	1969	Viljandi	Estonio	400
BET-12	1970	Kretinga	Litovio	316
BET-13	1971	Smiltene	Latvio	189
BET-14	1972	Häädemeeste	Estonio	170
BET-15	1974	Rīga	Latvio	102
BET-16	1975	Helme	Estonio	222
BET-17	1976	Viekšniai	Litovio	241
BET-18	1977	Rēzekne	Latvio	223
BET-19	1978	Kehra	Estonio	174
BET-20	1983	Noreikiškės	Litovio	358
BET-21	1984	Kuldīga	Latvio	299
BET-22	1985	Kose	Estonio	450
BET-23	1986	Smalininkai	Litovio	472
BET-24	1987	Saulaine	Latvio	406
BET-25	1988	Tallinn	Estonio	350
BET-26	1989	Noreikiškės	Litovio	608
BEK-27	1990	Jelgava	Latvio	435
BET-28	1991	Tartu	Estonio	422
SAT-65	1992	Noreikiškės	Litovio	452

BET-29	1993	Priekull	Latvio	50
BET-30	1994	Pärnu	Estonio	100
BET-31	1995	Girionys	Litovio	203
BET-32	1996	Jūrmala	Latvio	208
BET-33	1997	Haapsalu	Estonio	162
BET-34	1998	Veisiejai	Litovio	253
BET-35	1999	Liepāja	Latvio	163
BET-36	2000	Tallinn	Estonio	201
BET-37	2001	Noreikiškės	Litovio	303
BET-38	2002	Rīga	Latvio	182
BET-39	2003	Tartu	Estonio	76
BET-40	2004	Birštonas	Litovio	257
BET-41	2005	Rīga	Latvio	150
BET-42	2006	Kuresaare	Estonio	137
BET-43	2007	Šiauliai	Litovio	322
BET-44	2008	Ventspils	Latvio	151
BET-45	2009	Paikuse	Estonio	121
BET-46	2010	Visaginas	Litovio	185
BET-47	2011	Malpils	Latvio	115
BET-48	2012	Pala	Estonio	44
BET-49	2013	Utena	Litovio	216
BET-50	2014	Jūrmala	Latvio	172
BET-51	2015	Tallinn	Estonio	74
BET-52	2016	Birštonas	Litovio	334
BET-53	2017	Liepāja	Latvio	203
BET-54	2018	Pärnu	Estonio	70

disfalo de Sovetunio al BET-oj ne plu venas multaj esperantistoj el Ruslando kaj Ukrainio – esperantistoj el ĉi tiuj landoj preferas veni al UK-oj kaj IJK-oj, ne al BET-oj. Due, en la postsovetia periodo la plej amasaj estis tiuj BET-oj, kiuj okazis en Litovio (grize markitaj en la diagramo). Nur unu fojon (BET-46 en 2010) BET en Litovio havis malpli ol 200 partoprenantojn. Ankaŭ ĉi tiu tendenco estas klarigebla – la Esperanto-movado en Litovio estas pli amasa kaj pli vigla ol en Latvio kaj Estonio, kie dum la lastaj du jardekoj preskaŭ ne okazis instruado de Esperanto. Espereble pli detalan historion de BET-oj rakontos organizantoj de la unuaj BET-j, kaj en *La Balta Ondo* aperis ciklo de artikoloj pri la Litoviaj BET-oj ekde ĈET-3 en Molėtai ĝis BET-55 en Panevėžys. **Povilas Jegorovas**

Diagramo de BET-oj



En *La Balta Ondo* aperis la statistika tabelo, kiu montris la jarojn, lokojn kaj la nombrojn de la partoprenantoj en ĉiuj BET-oj. Surbaze de tiu tabelo Antanas Grinčevičius faris diagramon, kiu pli bone ol la tabelo vidigas la du ĉefajn tendencojn.

Kial veni al Panevejo?

Panevejo (litove: *Panevėžys*, pole: *Poniewież*, ruse: *Паневеж*) estas la urbo, en kiu Litova Esperanto-Asocio kaj la urba Esperanto-klubo “Revo” en 2019 organizas la tradician esperantistan kunestadon **Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET)**.

La proverbo asertas: bonokazoj aperas, sed ne ripetigas. Atentu do – ne nur pro BET endas veni en la urbon, situantan ĉe la bordoj de la rivero Nevėžis.

La urbo Panevejo, la kvina laŭ la loĝantaro de Litovio, situas mezvoje inter du ĉefurboj: la Litovia Vilno kaj la Latvia Rigo. En 2014 Panevejo estis la kultura ĉefurbo de Litovio, kaj specialan atenton oni dediĉis al konatigo de la urbanoj kun kulturoj de aliaj landoj (Ĉinio, Japanio, Francio, Danlando, Svedio, Italio, Germanio k. a.). Nun Panevejo esperas pri reciproka atento al urboj de aliaj landoj. Veturontoj al la UK en Lahtio, ne preterveturu senhalte!

La origino de la urbonomo *Panevėžys* estas klara: ĉar la urbo establiĝis ĉe la rivero Nevėžis, ĝi ricevis la adekvatan nomon: la prefikso *pa-* (apud) + *rivernomo* = loĝloko apud la rivero Nevėžis. Ĉi tiu 209-kilometra litova rivero estas la sepa rivero, laŭ sia longeco. La radikon de la *rivernomo* *vėž* oni derivas de la prahindeŭropa vorto *vaagh*, kiu signifas brui, muĝi. La negacia prefikso ne faras la signifon de la *rivernomo* nebrua: *ne-vėžis*.

Laŭlegende la Litovia Granda Duko Vytautas la Majesta, en 1414, survoje al Vilno, ĉi tie rimarkis paganan templon, sed arkivoj pri tio mutas. Dokumente la urboloko estis menciita nur la 7-an de septembro 1503 en la Donakto de la Litovia Granda Duko kaj Pollanda Reĝo Aleksandro. Laŭ ĝi la kampo apud la rivero Nevėžis estis transdonita al la paroĥestro de la urbeto Ramygala (24 km sude), devigante tiun konstrui ĉi tie preĝejon (ligna preĝejo estis konstruita en 1507). La paroĥestro ricevis la rajton fondi drinkejon kaj produkti medon, bieron kaj likvoron, konstrui banejon por la lokuloj. Tiel estiĝis la malnova Panevejo.

Kiel vera urbo Panevejo ekkreskis nur en 1873, kiam estis konstruita fervojo al la urbo Daugavpils (ruse: Dinaburg, poste Dvinsk), tra kiu jam iris la fervojo Peterburgo-Varsovio.

En la malnova Panevejo

En 1897 la urbo jam estis industriiĝinta – funkciis fabriketoj leda, bombona, alkohola, tabaka. Ĝi havis 12,9 mil loĝantojn; 50,47% el ili estis judoj; 19,58% poloj (fakte pollingvaj





litovoj); 12,74% rusoj; 12,13% litovoj; 1,67% germanoj. La Unua Mondmilito konsiderinde influis la nacian konsiston de la loĝantaro. En 1923 el 19,2 mil loĝantoj 53,87% estis litovoj; 36,03% judoj; 5,14% poloj; 3,33% rusoj; 0,57% germanoj. Dum la jaroj 1923-1926 multaj judoj migris al Palestino kaj Usono. En 1939 la loĝantaro kreskis ĝis 26,6 mil.

La evoluon de la urbo kaj la ŝanĝiĝon de la loĝantaro grave influis la sovetunia okupacio en 1940, reokupacio en 1944, naziaj kaj komunistaj reprezalioj, likvido de la sendependeco de Litovio. Multaj litovoj spertis ekzilon al profundaj regionoj de Sovetunio. Senkompata plago atingis la judan loĝantaron – la plimulto de la iamaj paneveĵaj judoj pereis kiel viktimoj de la kruela nazia holokaŭsto. Inter la pereintoj estis ankaŭ prezidanto de Paneveĵa Esperanto-Asocio Jakobo Kanas (1900-1941), esperantisto ekde 1922, instruisto de pluraj Esperanto-kursoj.

Post la Dua Mondmilito la duondetrinitaj urbaj entreprenoj estis rekonstruitaj, aperis kelkaj novaj grandaj industriaj entreprenoj.

Apud la urbo lokiĝis sovetuniaj armeaj bazoj. Alvenis multaj rusparolantoj. Nun en Paneveĵo, kiu havas preskaŭ 100 mil loĝantojn, litovoj faras 96,1% de la loĝantaro, rusoj 2,4%, ukrainoj 0,3%, poloj 0,2%. Judoj? En la urbo, iam duone juda, nun loĝas nur iom pli ol cent judoj.

La mondmilitaj detruoj kaj brulegoj pereigis multon el la memorinda pasinteco, tamen iom da malnovaj vizitindaĵoj kaj vidindaĵoj postrestis. La plej malnova konstruaĵo de la urbo datiĝas je 1614. Ĝi estas arkivo de terenoj kaj juĝejoj de la 17-a–18-a jarcentoj. Imponas la riĉa etnografia muzeo en la domo de la litova nobelo Moigys el la 19-a jarcento. Tie elstaras la kolekto de insektoj, la plej granda en Litovio. Atentindaĵ estas kelkaj funkciaj urbaj kirkoj; la ŝtonaj: katedralo de Reĝo Kristo (1929), la preĝejo de Sankta Triunuo (1803), la preĝejo de Sanktaj Apostoloj Petro kaj Paŭlo (1885); la lignaj: la rusortodoksa preĝejo (1892), la rusa malnovritana (rekonstruita en 1926), la luterana (1850). El ok antaŭmilitaj judaj sinagogoj postrestis nur unu – negranda renovigota ŝtona sinagogo, nefunkcia pro manko de preĝantoj.

En la urbo funkcias kelkaj teatroj. La plej atentinda estas la drama teatro Miltinis. Ĝin fondis en 1940 Juozas Miltinis (1907-1994), reĝisoro, kiu studis la teatran arton en Parizo. Dum la Sovetunia periodo liaj spektakloj iĝis eksterordinara kultura fenomeno (li spektakligis verkojn de Sofoklo, Ŝekspiro,





Borchert, Ĉeĥov, Dürrenmatt k. a.). La famo pri la spektakloj disvastiĝis. Por spekti ilin venis ekskursoj el la tuta Litovio kaj eĉ grupoj el Leningrado (Sankt-Peterburgo). Miltinis kreskigis multajn aktorojn, inter kiuj la plej elstara estis la drama kaj filma aktoro Donatas Banionis. Lia majstra ludo de Sovetunia spiono en la filmo Morta sezono (Мёртвый сезон, 1968) decidigis la estontan Ruslandan ŝtatestron Vladimir Putin elekti la sekuristan profesion (senkomente!).

Panevejo al multaj plaĉas pro la abundo de dekoraj kaj memorsignaj monumentoj. Antaŭ la teatro sidas la reĝisoro Juozas Miltinis (2007, skulptisto R. Midvikis); se vi bonvolos brilpoluri lian ŝuon, vi iĝos sukcesa homo. En la korto de la pup-kaleŝa teatro staras skulptaĵo de Hans Christian Andersen. Ĉe la teatro Menas (Arto) staras Donkiĥoto. En la orienta urboparto majestas la skulptaĵo “Kanto de libero”. La plej impona estas monumento de la urbofondinto – Litovia Granda Duko kaj Pollanda Reĝo Aleksandro sur la placo de Libereco (2003, skulptisto St. Kuzma).



Historie grava estas la monumento “Tristanta juda patrino” sur la loko de la iama juda tombejo (2009, skulptisto V. Tallat-Kelpša).

Al la partoprenantoj de BET oni ofertas kelkajn proksimajn ekskursojn. Oni proponos viziti la bienon en Bistrampolis. La bienon ekde la fino de la 17a jarcento regis la nobeloj Bistram. Ilia parenco, la nobelpremiita verkisto Henryk Sienkiewicz en la bieno verkis sian historian trilogion. La nuna duetaĝa bienpalaco estis finkonstruita en 1850.

Alia logaĵo, 20 km sude de la urbo, estas rezervejo de Eŭropaj bizonoj, fondita en 1969. Ilian vivon oni povas observi desur speciala alta observejo. Laŭvoje al la bizonejo, en la regiona parko de la urbeto Krekenava, oni povos grimpi sur la 30-metran observoturon, kaj de ties observa rondplaco oni povos ĝui la pejzaĝon ĉirkaŭ la rivero Nevėžis kaj la urbeton mem. Ĉi tiu belvidejo estis konstruita en 2014 danke al financa subteno de Eŭropa Unio.

Nur 4 km norde de Panevejo, en la apudurbo Piniava la kolektanto Klementas Sakalauskas (honora civitano de Panevejo) akumulis multe da teknikaj antikvaĵoj. En lia muzeo estas eksponataj malnovaj aŭtoj, terkulturaj maŝinoj, hejmaj iloj, muzikmaŝinoj, popolaj skulptaĵetoj ktp. La posedanto mem prizorgas kaj restarigas la eksponaĵojn, rakontas historiojn de ilia trovo.

Panevejo estas unu el la gravaj urboj en la Litovia Esperanto-movado. En la Zamenhofa





Adresaro de la unua milo da personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto (1889), enestas iu Z. R. Gandin el Panevejo. Pri li kaj pri kelkaj aliaj tiamaj Esperanto-izoluloj oni scias nenion plian.

Tamen por kunfundi Litovan Esperanto-Asociacion en 1919 venis tri aktivaj Paneveĵaj esperantistoj: J. Tajc, Base Portnaitė kaj prof. Ben-Ŝaĥar. Ili en 1922 kaj 1923 organizis kelkajn kursojn por gimnazioj, por poŝt-oficistoj kaj en 1923 kunfondis Paneveĵan Esperanto-Asociacion (PEA).

En 1924 prof. Ben Ŝaĥar adiaŭis la urbon, en 1925 forveturis al Palestino la prezidanto de PEA Josef Tajc (ĉu li kaj la israela esperantisto Josef Rabinoviĉ-Tajc estas la sama persono?).

La tempo permesis distingigi al nova Esperanto-generacio. Eniris la urban Esperanto-historion la prezidantoj de la urbaj Esperanto-organizaĵoj Jakobo Kanas, Juozas Kazlauskas kaj Telesforas Lukoševičius.

La urbo Panevejo estas ligita kun la eminenta litova esperantisto kaj elstara aganto



de la litova renaskiĝo, prelato Aleksandras Dambrauskas (1860–1938), la fondinto kaj la unua prezidanto de Litova Esperanto-Asocio. En 1888 li kiel kapelano komencis sian pastran karieron en la Paneveĵa porknaba reala gimnazio.

Honore al li en 1930 la strato ĉe la dekstra bordo de Nevėžis estis nomita Avenuo A. Jakŝtas-Dambrauskas. Nun la nomo estas kurtigita al Aleo A. Jakšto (indus restarigi la plenan nomon).

Ne ĉiuj Paneveĵaj stratoj havas logike motivitajn nomojn. Eble iu el la absurdaj stratoj (Konstruista, Kosmonaŭta, Projektista) povus akiri la nomon Esperanto? Kial ne?

Ni esperu, ke BET-55 instigos multajn urbanojn eklerni la internacian lingvon, kaj el tiu tutnova Esperanto-generacio ĝermu novaj elstaraj esperantistoj.

Vytautas Šilas



Koncize pri Litovio

Geografiaj koordinatoj: norde 56°28' da norda latitudo, sude 53°54' da norda latitudo; okcidente 20°56' da orienta longitudo, oriente 26°51' da orienta longitudo. La distanco inter la plej norda kaj la plej suda punktoj 276 km, inter la plej okcidenta kaj la plej orienta 373 km.



Areo de la ŝtato: 65 300 kvadrataj kilometroj.

Landlimoj: norde kun Latvio 588 km, oriente kaj sude kun Belorusio 677 km, sude kun Pollando 104 km, sudokcidente kun Rusio 255 km, okcidente 90 km da Baltmara bordo. Entute 1732 km.

Tereno: apudmara ebenaĵo, nur en orienta parto aperas montetoj; la plej alta monteto Juozapinė (293,6 m super la marnivelo); la plej longaj riveroj: Nemunas (937 km, en Litovio 475 km), Neris (510 km, en Litovio 234 km), Venta (343 km, en Litovio 161 km). Estas 2830 lagoj pli grandaj ol 0,5 ha. Arbaroj kovras 30,9 % da teritorio.

Klimato: Meza jara temperaturo + 6,1° C. Plej malvarma monato estas januaro (- 4,9° C), plej varma – julio (+17° C). Rekorda registrita frosto -43° C, rekorda varmego + 37° C. Averaĝa kvanto de precipitaĵo 680 mm jare. Pli multe da precipitaĵo falas en novembro - februaro.


Loĝantoj: 2 944 500 homoj (2014). Laŭ naciecoj litovoj konsistigas 84,1 %, poloj - 6,6 %, rusoj - 5,8 %, belorusoj - 1,2 %, aliaj - 2,3 %. Denseco de loĝantoj estas 45,1 homoj en km².



Gražina Opulskienė parolas pri vizitindaj lokoj kun rilato al Zamenhof en Litovio: www.youtube.com/watch?v=3ipEOFn_e4Q



Trakai estas historia urbeto kaj grava turisma allogaĵo apud Vilno: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Trakai>



Vivodaŭro: Averaĝa vivodaŭro en 2009 estis 74,9 jaroj (por viroj 69,98 jaroj, por virinoj 80,1 jaroj).

Klereco: 98,3 % da loĝantoj (10-jaraj kaj pli aĝaj) kapablas legi kaj skribi, 20 % havas superan klarecon.

Religio: plimulto da loĝantaro estas rom-katolikoj. Estas ankaŭ grandaj komunumoj de ortodoksuloj kaj protestantoj.

Ĉefurbo de la ŝtato: Vilnius (Vilno) kun 527 900 loĝantoj. Aliaj grandaj urboj estas: Kaunas (Kaŭno, 307 500), Klaipėda (158 900), Šiauliai 106 800), Panevėžys (97 600). Administra divido: 10 departementoj kaj 60 municipoj.



Ŝtata ordo: demokratia respubliko. La valida konstitucio, aprobita dum referendumo la 25-an de oktobro 1992. Gvidanto de la ŝtato – prezidento, elektata rekte de la civitanoj por 5 jaroj. Parlamento estas nomata Sejmo, ĝin konsistigas 141 membroj, elektataj por 4 jaroj.

Ŝtata lingvo estas la litova.

Ŝtata flago – trikoloro flava-verda-ruĝa, aprobita en 1918.

Ŝtata blazono: kavaliro sur blanka rajdĉevalo en ruĝa fono, ekde la 14-a jarcento. La blazono nomiĝas „Vytis“ (kavaliro defendanta kontraŭ atakantoj).



Ŝtata himno: „Nacia glorkanto“, verkita de Vincas Kudirka.

Ŝtataj festotagoj:

1-a de januaro – La Nova jaro; tago de litovia flago;

16-a de februaro – tago de refondo de Litovia Ŝtato (en 1918);

11-a de marto – tago de rekreo de la sendependeco (en 1990);

6-a de julio – tago de la ŝtato; kronado de Mindaugas (en 1253).

Vojoj: fervojoj – 1767 km, publikaj tervojoj – 82 911 km, akvovojoj – 800 km.

Nacia valuto: ĝis 2015-01-01 estis lido. Ekde tiu dato cirkulas la eŭropa valuto eŭro.

Tempo: Litovio apartenas al la dua hor-zono (Grenviĉa Meza Tempo + 2 horoj, aŭ Meza Eŭropa Tempo + 1 horo).

Bazaj scioj pri la litova lingvo

Alfabeto. Litova lingvo uzas modifitan latinan alfabeton el 32 literoj:

A a, Ȧ a, B b, C c, Ĉ ĉ, D d, E e, Ė e, Ė ė, È è, F f, G g, H h, I i, Į į, Y y, J j, K k, L l, M m, N n, O o, P p, R r, S s, Š š, T t, U u, Ū ū, V v, Z z, Ž ž.

Sonojn **f, h** kaj digramon **ch** [h] litova lingvo ne havas; tiuj literoj estas uzataj nur en fremdaj (internaciaj) vortoj, ekz. *fabrikas, filosofija, himnas, choras*.

Bazaj vokaloj **a, e, i, o, u** estas prononcataj kiel en Esperanto, nur vokalo **e** estas multe pli vasta, prononcata per vaste malfermita buŝo, kiel **a** en angla vorto *map* [mæp]. Litero **è** signifas malvastan sonon **e**, similan al germana *ä*, *eh* en vortoj *spät, mehr* aŭ al franca *é* en *café*.

Longajn vokalojn indikas literoj: **y** [i:], **ū** [u:]. Ili sonas simile al anglaj *see* [si:], *soon* [su:n] aŭ al germanaj *wie, Kuh*.

Nazaloj **ą, ę, į, ū** en antikveco sonis kiel *an, en, in, un*, sed nun estas prononcataj kiel simplaj **a, e, i, u**, nur iomete pli longaj. Ili servas ankaŭ kiel indikiloj de kazoj (singulara akuzativo kaj plurala genitivo).

Konsonantoj estas prononcataj kiel en Esperanto; **ĉ = ĉ, ŝ = ŝ, ž = ž**. Konsonantoj povas esti molaj kaj malmolaj. Malmolaj ili estas antaŭ vokaloj **a, q, o, u, y, ū**, ekz., *la, lo, lu, lū* kaj molaj – antaŭ **e, ę, è, i, į, y**, ekz. *le, lè, li, ly*. Tamen konsonantoj povas esti molaj ankaŭ antaŭ **a, o, u, ū**. Tiam antaŭ tiuj vokaloj estas skribata *ne prononcata litero i*, servanta kiel moliga signo: *la* [„la” kun malmola „l”], lia [„la” kun mola „l”]. Provu laŭte prononci pare: *na – nia, sa – sia, ŝa – ŝia, ka – kia...* (Pri la neprononcata **i** ĉi-sube ni avertos vin substrekante ĝin.)

Interese, ke vokaloj **e, è, i, y** moligas ne nur senpere antaŭan konsonanton, sed eĉ pli antaŭan, ekz. *alga* [alga’ kun malmola „l”], *Algis* [Al’gis kun mola „l”].

Diftongoj. Puraj diftongoj (nur el vokaloj) estas ses: **ai, au, ei, ui, ie, uo**. La unuaj kvar havas analogojn en Esperanto: *ai* [= aj], *au* [= aŭ], *ei* [= ej], *ui* [= uj]. Por *ie, uo* analogoj ne estas; ili estas prononcataj kiel *ie* (unu silabo), *uo*, ekzemple: *vienas* (vje’nas = unu), *duona* (dŭo’na = pano).

Kombinante vokalojn **a, e, i, u** kun **l, m, n, r** ni ricevas 16 duondiftongojn: *al, am, an, ar; el, em, en, er; il, im, in, ir; ul, um, un, ur*. Ankaŭ ili estas prononcataj kiel nedisigebla tuto en silabo.

Akcento. Litova lingvo ne havas konstantan akcenton kiel Esperanto aŭ la pola, la franca. Do litovoj mem sub influo de dialektoj ofte faras akcentajn erarojn.

En litova lingvo ekzistas trispeca akcento, pro tio la sama akcentita silabo, prononcita per diferenca tono, iam donas al la vorto tute alian signifon (kiel en la ĉina). La ekzemploj pli sube.

Mallongaj vokaloj estas indikataj per akcentosigno [˘] sur vokaloj **à, è, ì, ù**, ekzemple: *àš* (= mi), *kàs* (= kio, kiu), *kadà* (= kiam), *labà dienà* (= bonan tagon), *nè* (= ne), *iki* (= ĝis), *sveiki* (svejki’ = saluton), *tù* (= ci), *gardù* (= bonguste).

Longaj vokaloj estas elparolataj dumaniere: kun descenda (falanta) tono kaj kun ascenda (supreniranta) tono.

La descenda tono estas nomata *komençforta*, ĉar oni substrekas komencon de la silabo, post kio la tono subite malsupreniras. Tian akcenton indikas signo [˘]

sur vokaloj **á, é, í, ó** ekzemple: *káina* (kaj'na = prezo), *kéli* (= levi), *pilnas* (= plena), *vókas* (= koverta).

La ascenda tono nomiĝas *finforta*, en ĝi oni pli substrekas finon de la silabo. La finfortan tonon indikas signo [~] super vokaloj **á, í, ó, ĕ, ŷ** aŭ super konsonantoj en duondiftongoj **añ, eñ, iñ, uñ...**, ekzemple: *áĉiŭ* (a'ĉu = dankon), *lābas vākaras* (= bonan vesperon), *ikì pasimātymo* (= ĝis revido), *sudiĕ* (= adiaŭ), *laŭkas* (= kampo), *lañkas* (= arko).

Jen kelkaj ekzemploj, kiam prononca tono ŝanĝas signifon de la vorto: *mēs* (li jetos) – *mēs* (ni); *māno* (mia) – *māno* (li opinias); *kāltas* (ĉizilo) – *kaĭtas* (kulpa); *sviēstas* (butero) – *sviēstas* (jetita). Oni diras, ke fremdlingvanoj ne povas ĝuste elparoli vortojn *pilkas viŭkas* (griza lupoj); tio estas kvazaŭ litova ŝiboleto.

Substantivo havas gramatikan genron; ekz., *stālas* (tablo) estas virgenra, *dienā* (tago) – ingenra. Bedaŭrinde laŭ finaĵoj ne ĉiam eblas diveni, al kiu genro apartenas la vorto. Substantivaj finaĵoj **-as, -ys, -us, -uo** indikas viran genron (escepto: *sesuō* = fratino). Substantivoj kun finaĵoj **-a, -ĕ, -i** plejofte estas ingenraj; vortoj kun finaĵo **-is** povas esti virgenraj aŭ ingenraj. Neŭtra genro en litova lingvo ne ekzistas, sed estas sufiĉe multe da vortoj t.n. komungenraj; ili kvazaŭ hermafroditoj samtempe estas vir-genraj kaj ingenraj. Laŭ signifo ili ĉiuj havas negativan nuancon kaj taŭgas por insultoj, ekzemple: *dabitā* = dand(in)o, *kváiša* = stultul(in)o, *savimyla* = egoist(in)o... Ĉu temas pri viro aŭ virino, indikas genro de epiteto: *tikras kváiša* (vera sultulo), *tikrà kváiša* (vera stultulino).

Substantivoj havas 5 deklinaciojn kaj 7 kazojn: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo, lokativo, vokativo. Singulara akuzativo ĉiam finiĝas per nazala vokalo: **-a, -ĕ, -i, -u**. Ankaŭ plurala genitivo ĉiam havas finaĵon **-u**. Dum deklinaciado la

akcento iam restas konstanta, sed plej ofte saltadas en la vorto de unu loko al la alia, ekz.: *rankà* (= mano), *rañkos* (= de mano), *rañkai* (= al mano), *rañka* (= manon), *rankà* (= per mano), *rañkoje* (= en mano), *rañka* (= ho, mano!).

Estas kelkaj substantivoj, kiuj havas nur pluralan formon, eĉ kiam temas pri unu objekto, ekz.: *mētai* (= jaro), *dūrrys* (= pordo), *keĭnēs* (= pantalono), *marškiniaĭ* (= ĉemizo), *rōgēs* (= sledo), *dūjos* (= gaso), *rytaĭ* (= oriento)... Por tiaj substantivoj ekzistas specialaj numeraloj, ekz. oni devas diri ne *dù mētai* (= du jaroj), sed *dveji mētai*. Ŝajnas, ke tiu numeralo formo (*dveji, treji...*) poiomete jam foriras el uzado.

Antaŭ kelkdek jaroj ankoraŭ estis uzata dualo – deklinacia nombro por du objektoj; oni diris *dù vaikù* (= du infanoj), sed nun oni jam uzas pluralon: *dù vaikaĭ*.

Adjektivo. Ankaŭ adjektivoj havas gramatikan genron kaj devas esti akordigitaj kun substantivo laŭ genro, kazo kaj nombro. Sed ĉi tie estas pli facile diveni genron, ĉar genraj finaĵoj de adjektivoj estas konstantaj kaj regulaj: virgenraj havas finaĵojn **-as, -us, -is**, ingenraj respektive **-a, -i, -ĕ**, ekzemple: *gēras berniukas* (= bona knabo), *gerā mergáitē* (= bona knabino); *gražūs rýtas* (= bela mateno), *graži dienā* (= bela tago); *auksiniš šáukštas* (= ora kulero), *auksinē monetā* (= ora monero).

Adjektivoj havas ankaŭ neŭtran genron. Por kio ĝi, se ne ekzistas neŭtra genro de substantivoj? Neŭtraj adjektivoj estas uzataj en senpersonaj frazoj, do ili neniam estas epitetoj ĉe substantivoj:

Mán labaĭ gēra (= al mi estas tre bone);
Kaĭp ĉiā gražù! (= kiel bele estas ĉi tie!).

Do en Esperanton ili estas tradukindaj kiel adverboj *bone, bele*.

Adjektivoj havas 3 deklinaciojn (laŭ finaĵoj

-as, -a; -us, -i; -is, -ĉ). Samkiel substantivoj, singulara akuzativo rekonebla per finaĵoj -a, -e, -ĵ, -u, kaj plurala genitivo – per finaĵo -u.

Komparativo estas farata per sufikso **-ĉsnis, -ĉsnĉ:** *gerĉsnis, gerĉsnĉ* (= pli bona), *graĉĉsnis, graĉĉsnĉ* (= pli bela); superlativo – per sufikso **-iĉusias, -iĉusia:** *geriĉusias, geriĉusia* (= plej bona), *graĉiĉusias, graĉiĉusia* (= plej bela).

Kelkaj pronomoj:

ĉŝ mi; tŭ ci; ĵis li; ĵi ŝi;

mĉs ni; ĵŭs vi; ĵiĉ ili (*virgenra*); **ĵŭs ili** (*ingenra*);

kĉs kio, kiu; tĉs, tĉ tiu; kŭks, kŭkiĉ kia;
tŭks, tŭkiĉ tia; kuris, kuri kiu.

Verbo. Verba infinitivo ĉiam havas finaĵon **-ti:** *turĉti* (= havi); *mylĉti* (= ami), *norĉti* (= voli), *vĉlgyti* (= manĝi), *gĉrti* (= trinki). Infinitivo de reflektivaj verboj (ankaŭ de tiuj, kiuj direktas la agon al la aganto) finiĝas per **-tis:** *praŭstis* (= sin lavi), *siŭlytis* (= sin proponi), *linksmintis* (= amuziĝi). Verboj povas esprimi *daŭran* aŭ *finan* aspekton: *raŝyti* (= skribi) – *paraŝyti* (= finskribi); *skaityti* (= legi) – *pĉrskaityti* (= tralegi); *gĉrti* (= trinki) – *iŝgĉrti* (= eltrinki).

Verboj havas kvar simplajn tempojn: prezencon, unufojan preteriton, multfojan preteriton kaj futuron. Ni konjugaciu la verbon *bŭti* (= esti):

Prezenco

ĉŝ esŭ (mi estas)
tŭ esŭ (ci estas)
ĵis / ĵi yrĉ (li / ŝi ĝi estas)

mĉs ĉsam(e) (ni estas)
ĵŭs ĉsat(e) (vi estas)
ĵiĉ / ĵŭs yrĉ (ili estas)

Unufoja preterito

ĉŝ buvĉu (mi estis)
tŭ buvĉi (ci estis)
ĵis/ĵi buvo (li/ŝi/ĝi estis)

mĉs buvom(e) (ni estis)
ĵŭs buvot(e) (vi estis)
ĵiĉ / ĵŭs buvo (ili estis)

Multfoja preterito

ĉŝ bŭdavau (mi ofte estis)
tŭ bŭdavai (ci ofte estis)
ĵis/ĵi bŭdavo (li/ŝi/ĝi ofte estis)

mĉs bŭdavom(e) (ni ofte estis)
ĵŭs bŭdavot(e) (vi ofte estis)
ĵiĉ/ĵŭs bŭdavo (ili ofte estis)

Futuro

ĉŝ bŭsiu (mi estos)
tŭ bŭsi (ci estos)
ĵis / ĵi bŭs (li/ŝi/ĝi estos)

mĉs bŭsim(e) (ni estos)
ĵŭs bŭsit(e) (vi estos)
ĵiĉ / ĵŭs bŭs (ili estos)

Verboj havas tri konjugaciojn, sed ni ne enprofundiĝu en tiun ĝangalon. Krome, same kiel en Esperanto, verbo *būti* kun participoj konsistigas multajn kompleksajn tempojn. Ankoraŭ necesas substreki, ke participa sistemo preskaŭ koincidas kun tiu en Esperanto, do iuj eĉ opinias, ke L.Zamenhof prenis ĝin el la litova. Tiu aserto ne estas bazita, ĉar la aŭtoro de Esperanto ne sciis funde la litovan.

Jen la participoj:

skaitqs, skaitanti (= leganta)

skaitomas, skaitoma (= legata)

skaitqs, skaitĉiusi (= leginta)

skaitýtas, skaitýta (= legita)

skaitýdaveš, skaitýdavusi (= ofte leginta)

skaitýsiqs, skaitýsianti (= legonta)

skaitýsimas, skaitýsima (= legota)

Diference de Esperanto, pasivajn participojn havas ankaŭ netransitivaj verboj. Do litovoj diras: *sėdimà vietà* („sidata loko”, t.e. loko por sidado); *miegamàsis kamarýs* („dormata ĉambro”, t.e. ĉambro por dormado).

Diferencas ankaŭ uzado de refleksivaj verboj: se aganto aplikas la agon al si mem, por ĉiuj personoj estas uzata la refleksiva partikulo *s(i)*. Litovoj diras:

aš prausiúos(i) (mi lavas sin);

mėš prausiamės (ni lavas sin)

tù prausíes(i) (ci lavas sin);

jūs prausiatės (vi lavas sin)

jis/jì prausias(i) (li/ŝi/ĝi lavas sin);

jiė/jòš prausiasi (ili lavas sin)

Sub influo de la gepatra lingvo, litovaj esperantistoj faras analogajn erarojn dirante: *mì vizitís sian* (= mian) fraton; *vi iru en sian* (= vian) ĉambron; *ni amas sian* (= nian) patrujon.

Numeraloj:

Bazaj numeraloj 1 – 9 havas genrojn kaj specifajn formojn por pluralaj substantivoj. Kun 2 – 9 estas uzata plurala nominativo.

1 – *vienas nãmas* (= unu domo), *vienà dienà* (= unu tago); por pluralaj substantivoj – *vieneri mėtai* (= unu jaro), *vienerios dũrys* (= unu pordo);

2 – *dũ, dvi*; (*dvejì, dvėjos*);

3 – *trýs, trýs*; (*trejì, trėjos*);

4 – *keturi, kėturios*; (*ketveri, kėtverios*);

5 – *penki, peńkios*; (*penkeri, peńkerios*);

6 – *šeši, šėšios*; (*šešeri, šėšerios*);

7 – *septyni, septýnios*; (*septyneri, septýnerios*);

8 – *aštuoni, aštúonios*; (*aštuoneri, aštúonerios*);

9 – *devyni, devýnios*; (*devyneri, devýnerios*).

Numeraloj 10 – 20 jam ne havas genrojn nek 4 diversajn formojn, sed kun ili estas uzata plurala genitivo:

10 – *dėšimt mėtų* (= dek jaroj, laŭvorte „dek da jaroj”).

11 – *vieniúolika*, 12 – *dvýlika*,

13 – *trýlika*, 14 – *keturiólika*,

15 – *penkiólika*, 16 – *šešiólika*,

17 – *septyniólika*, 18 – *aštuoniólika*,

19 – *devyniólika*, 20 – *dvidešimt*.

Numeraloj 21 – 29, 31 – 39, 41 – 49, 51 – 59 ktp. ripetas la saman ordon, kiel tiuj 1 – 9, ĉar ili estas duvortaj kaj substantivon regas la lasta vorto de numeralo, do litovoj diras: *dvidešimt vienas nãmas* (dudek unu domo!); denove validas specifaj numeraloj por pluralaj substantivoj.

21 – *dvidešimt vienas / vienà / vieneri / vienerios*;

22 – *dvidešimt dũ / dvi / dvejì / dvėjos*; ...

30 – *trisdešimt*; 40 – *kėturiasdešimt*

50 – *peñkiasdešimt*, 60 – *šėšiasdešimt*;
70 – *septýniasdešimt*; 80 –
aštuoniasdešimt; 90 – *devýniasdešimt*;
100 – *šimtas*; 175 – *šimtas*
septýniasdešimt penki / *peñkios*;
200 – *dù šimtaĩ*; 203 – *dù šimtaĩ trýs*;
250 – *dù šimtaĩ peñkiasdešimt*;
300 – *trýs šimtaĩ*; 314 – *trýs šimtaĩ*
keturiólika; 1000 – *tūkstantis*...

Ordaj numeraloj, same kiel adjektivoj,
havas tri genrojn:

unua – *pirmas, pirmá, pìrma* (= unue);
unuaj – *pirmì, pirmos*;
dua – *añtras, antrá, añtra* (= due);
duaj – *antri, añtros*;
tria – *trėčias, trečià, trėčia* (= trie);
trij – *treti, trėčios*;
kvara – *ketvirtas, ketvirtà, ketvirta*;
kvaraj – *ketvirtì, ketvirtos*;
kvina – *peñktas, penktà, peñkta*;
kvinaj – *penkti, peñktos*;
sesa – *šėštas, šeštà, šėšta*;
sesaj – *šėšti, šėštos*;
sepa – *septiñtas, septintà, septiñta*;
sepaj – *septinti, septiñtos*...

El ordaj numeraloj estas faritaj nomoj
de semajnaj tagoj: lundo – *pirmádienis*
(el: *pirmà diena* = unua tago), mardo –
antrádienis (*antrà diena* = dua tago) ktp.

Adverboj. Agmanieron esprimantaj
adverboj estas derivataj el adjektivoj kaj havas
gradojn de komparado:

gėras (bona) – *geraĩ* (bone), *geriaũ* (pli
bone), *geriausiai* (plej bone);
blėgas (malbona) – *blogaĩ* (malbone),
blogiaũ (pli malbone), *blogiausiai* (plej
malbone);
gražus (bela) – *gražiaĩ* (bele), *gražiaũ* (pli
bele), *gražiausiai* (plej bele).

En litova lingvo ekzistas preskaŭ kompleta
sistemo de korelativoj, simila al tiu en
Esperanto (vidu la paĝon 330).

Prepozicioj postulas diversajn kazojn
depende de la senco, ekzemple *põ*:

genitivon: *põ mėnesio* (post monato),
põ lietaũs (post pluvo);

akuzativon: *põ dù óbuolius*
(po du pomojn);

instrumentalon: *põ stalù* (sub la tablo).

Prepozicioj en vortfarado estas uzataj kiel
prefiksoj.

Diversaj rimarkoj.

Litova lingvo uzas multajn diminutivojn
kaj karesvortojn, per sufiksoj farataj el propraj
nomoj, ekzemple:

Jõnas (Johano) – *Jõnis, Jonėlis, Jonũkas,*
Jonýtis...

Onà (Anna) – *Õnė, Ānė, Onėlė, Onùtė,*
Onýtė...

Precipe multajn sinonimojn kaj diminu-
tivojn havas la vorto *mótina* (patrino): *mótė,*
móčia, mamà, močiũtė, motùlė, motinėlė,
motinýtė, motùtė, motušė, mamėlė, mamýtė,
mamùtė, mamũžė...

En vortfarado abunde estas uzataj sufiksoj
kaj prefiksoj, sed ilia signifo ne estas tiel
strikte difinita, kiel en Esperanto. Ekzemple,
ideon de profesio aŭ okupiĝo (en Esperanto
-ist-) esprimas kelkaj sufiksoj:

mókyti (instrui) – *mókytojás* (instruisto),

mókytoja (instruistino);

siũti (kudri) – *siuvėjas* (kudristo, tajloro),

siuvėja (kudristino, tajlorino);

smũikas (violono) – *smũikininkas*

(violonisto), *smũikininkė* (violonistino);

vėžti (veturigi) – *vežikas* (veturigisto,

koĉero), *vežikė* (veturigistino, koĉerino);

dantis (dento) – *dantištas* (dentisto),

dantištė (dentistino).

Esperanta sufikso -il- en la litova havas eĉ
35 ekvivalentojn.

En frazo povas esti kelkaj neaj vortoj,
ekz.: *jis niekadà niėko nežino* (laŭvorte: li
neniam nenion ne scias, t.e. li neniam ion
scias). Tamen du vortetoj ne nuligas neadon:
lakštiñgala negãli nečiulbėti (najtingalo ne

povas ne kanti, t.e. ĝi devas kanti). Sendube ankaŭ litova lingvo uzas multajn internaciajn vortojn (*telefonas, autobûsas, poetas, fizika, programà, kompiûteris...*), tamen ĝi strebas krei ankaŭ proprajn terminojn: *lygiagretûs* (paralela), *ritinÿs* (cilindro), *spausdintûvas* (printilo) k.t.p. Lingvistoj batalas kontraŭ troa uzado de internaciismoj.

Litova lingvo asimilas proprajn nomojn, ĉar tion postulas strukturo de la lingvo – la vortoj devas esti deklinacieblaj, do ili akiras litovajn finaĵojn: *Ŝekspyras, Volteras, Dantè, Servantesas, Paryzius, Berlynas, Tokijas, Temzè, Dunojus...* Sed en gazetoj oni jam trovas miksitajn formojn, ekzemple *Bushas, Saddamas Huseinas*, kvankam devus esti *Buŝas, Sadamas Huseinas*. Tiaj formoj estas deklinacieblaj, ekz.: *Volteras, Voltero, Volterui, Voltera...*, *Bushas, Busho, Bushui, Busha*.

Petras Ĉeliauskas

Valora skatolo (recenzo)

Ĉeliauskas, Petras. *El mia Esperanta skatolo: Kolekto de tradukoj kaj artikoloj pri esperantologiaj kaj litovaj temoj*. — Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009. — 520 p.; 500 ekz.

La pli ol 500-paĝa volumo omaĝas la 80-jaran jubileon de Petras Ĉeliauskas, eminenta litova esperantisto. Kiel dekjarulo li eksciis pri Esperanto el porinfana revueto, sed li lernis ĝin nur en 1957, kaj ekde tiam partoprenas en la Esperanto-movado.

Ĉeliauskas multe tradukas el la litova lingvo. Lia unua traduko aperinta libroforme estas poemo *Homo* de la renoma litova poeto Eduardas Mieželaitis, kiun aperigis ŝtata eldonejo en 1986 en la nun nekredoble eldonkvanto 6000 ekzempleroj! La libron ornamas belaj lignogravuraĵoj. Alia grava traduko atendis sian aperigon preskaŭ du jardekojn. Temas pri verko escepte grava por la litovaj lingvo kaj literaturo. En 1859 episkopo kaj poeto


Antanas Baranauskas verkis la poemon *Arbaro* de Anykŝĉiai, por montri riĉecon de la litova lingvo. Ankaŭ por Ĉeliauskas estis defio pruvi per sia traduko la riĉecon de Esperanto. La libro aperis en 2003 kun belaj ilustraĵoj de Vladimirus Beresniovas.

Entute Ĉeliauskas esperantigis preskaŭ sesdekon da litovlingvaj poeziaĵoj de 24 poetoj, ankaŭ versaĵojn de belorusaj poetoj, fragmentojn el poemoj *Konrad Wallenrod* de Mickiewicz kaj *Kavaliro en tigra felo* de Rustaveli. En la volumo oni trovas unusolan tradukon el la rusa lingvo – de la konata *Konkluda versaĵo* de Sergej Jesenin, kies pli trafa traduko estas konata. Eble la traduko de Ĉeliauskas estis farita helpe de la litova traduko? Li tradukis ankaŭ kantotekstojn. Inter la prozaj tradukoj estas rakontoj, fabeloj kaj teatraĵoj. Sur tricento da paĝoj de la recenzata libro oni povas konatiĝi kun la traduka laboro de la jubileulo.

Regula preleganto en Baltiaj Esperanto-Tagoj, li publikigis multajn artikolojn en *Litova Stelo* pri esperantologio, historio de Esperanto en Litovio, ankaŭ pri la litovaj lingvo, literaturo, kulturo kaj historio, en kiuj estas sentebla tipe baltlanda vidpunkto al la historio. Ekde 1995, dum 11 jaroj Petras Ĉeliauskas redaktis la asocian organon *Litova Stelo*, ankaŭ ĉiutagajn gazetojn en BET-oj kaj SAT-kongreso, kiuj okazis en Litovio. Li verkis litovlingvan libron *Nuo Babelio iki Esperanto* pri la mondlingva problemo kaj kompilis *Bibliografion de Litoviaj Esperanto-eldonaĵoj 1890–2006*. Bedaŭrinde mankas en la nun prezentata volumo lia propra kompleta bibliografio, kvankam multaj indikoj troviĝas en la librofina biografia skizo.

Kvankam *El mia Esperanta skatolo* prezentas siaspecan rezulton de lia multjara aktivado, ni scias, ke Petras Ĉeliauskas daŭrigas sian verkadon kaj tradukadon. Ni deziras al li ĝian realigon per novaj libroj.

Halina Gorecka



Pri la litovaj lingvo kaj kulturo

Profesoro Aloyzas Gudavičius el Šiauliai (Litovio) en BET-55 gvidos kurson pri la litovaj lingvo kaj kulturo.

La kursanoj konatiĝos kun la fundamentoj de la litovaj fonetiko kaj gramatiko, povos ellerni bazajn litovajn vortojn kaj la plej oftajn ĉiutagajn esprimojn. Samtempe oni preparolos la plej gravajn trajtojn de la litovaj historio kaj kulturo.

Profesoro Gudavičius naskiĝis en 1940. Li doktoriĝis en 1970 kaj habilitiĝis en 1990. Dum 1991-97 li estis rektoro de Šiauliai-a Universitato, kaj dum 1998-2007 prezidanto de la universitata senato. Liaj ĉefaj lingvistikaj esplorkampoj estas semantiko kaj etnolingvistiko.

Pri tiuj temoj li publikigis multajn artikolojn en litovaj kaj eksterlandaj sciencaj eldonaĵoj, inkluzive de tri monografioj

Kompara semantiko de la litova kaj rusa lingvoj (1985, en la rusa),

Etnolingvistiko (2000, 2009, en la litova),

Kompara semantiko (2007, en la litova).

En 2012-14 prof. Aloyzas Gudavičius gvidis la sciencan projekton pri koncepta metaforologio, kies ĉefa rezulto estis vortaro de konceptaj metaforoj en publika diskurso (2014).

Ekde 1994 li estas organizanto de internaciaj konferencoj “Mondaspekto en la lingvo” kaj ĉefredaktoro de la scienca revuo *Filologija*. Nun li laboras kiel profesoro en la katedro pri fremdaj lingvoj, instruas kurson de etnolingvistiko kaj praktikan kurson de la pola lingvo. En 2012 li iĝis Honora Civitano de la urbo Šiauliai.



Aloyzas Gudavičius lernis Esperanton en la studenta aĝo kaj partoprenis en BET-oj kaj aliaj esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Dum pluraj jaroj li estis vizprezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Kelkfoje li gvidis kurson pri interlingvistiko en magistrigaj filologiaj studprogramoj.



En 2002 aperis lia litovlingva libro *Enkonduko en interlingvistikon* por studentoj kaj por pli vasta rondo de interesiĝantoj.


En 2005 li estis rektoro de Internacia Kongresa Universitato dum la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. En 2009 prof. Gudavičius ricevis la internacian premion *Academicus Ariste* pro interlingvistikaj meritoj.

Mapoj de Panevėžys

Panevėžys, en Esperanto Panevejo, estas urbo en la nordo de Litovio.

De 1995 ĝis 2010 ĝi estis la administra centro de la samnoma distrikto Panevejo. Dum 2007 la urbo havis 114 582 loĝantojn. La unuaj nocioj pri la setlejo el 1503 devenas de la dokumento de la reĝo de Pollando kaj Grandduko de Litovio Aleksandro Jogajlido, kvar jarojn poste ĝi estis paroĥejo. En 1792 la urbo Panevejo ricevis la urborajtojn.





Historio de la Unua BET kaj la 60-jara jubileo

En la baltiaj landoj – Estonio, Latvio kaj Litovio – ekde 1959 estas tradicio organizi Baltiajn Esperanto-Tagojn.

La nomo de la entrepreno dum jaroj iom estis ŝanĝita: Ĉebalta Studenta kaj Junulara Esperanto-Tendaro, Baltlanda Studenta kaj Junulara Esperanto-Tendaro, Baltia Esperanto-Tendaro, Baltia Esperanto-Kongreso, Baltiaj Esperanto-Tagoj. Nuntempe oni uzas la nomon Baltiaj Esperanto-Tagoj. Do, ĉi-jare pasis 50 jaroj post la unua BET. Pro malpermesoj de sovetiaj instancoj dum kelkaj jaroj BET ne estis organizita.

Somere 1958 en Rigo (Latvio) okazis Gestudenta Kantfesto de Baltiaj Sovetaj Respublikoj. Samokaze la studento Ervins Mozerts, gvidanto de Esperanto-rondeto en Latvia Ŝtata Universitato (LŜU) organizis „kunflugon“ de studentoj-esperantistoj el Baltio. La kunflugon partoprenis:

1. Ervins Mozerts (Latvio, abituriento de LŜU),
 2. Birute Kondrate (nun Rozenfelde, tiam studentino de LŜU, Riga),
 3. Viktors Livzenieks (studento de LŜU, Riga),
 4. Mart Vabar (studento de Tartua Universitato, Estonio),
 5. Zenonas Sabalys (studento de Kauna Politeknika Instituto, Litovio),
 6. Rimantas Purtulis (litova studento de Kieva Politeknika Instituto, Ukrainio),
 7. Vasilij Molebnij (studento de Kieva Politika Instituto, Ukrainio),
- kaj ankaŭ kelkaj aliaj esperantistoj el Riga.

Dum la kunflugo E. Mozerts proponis organizi Esperanto-tendarojn por gestudentoj kaj junularo de niaj baltiaj respublikoj. Nia



gestudenta kunflugo decidis, ke ĉiusomere, laŭvice en unu el niaj Baltiaj respublikoj (Latvio, Estonio kaj Litovio) oni organizu Esperanto-tendaron de gestudentoj kaj junularo. Por organizado oni elektis koordinajn delegitojn (Lembe Hallop – Estonio, Ervins Mozerts – Latvio, Zenonas Sabalys – Litovio). La unuan tendaron oni decidis organizi en Latvio. E. Mozerts finis la universitaton kaj forveturis al la urbo Cesis, por labori en muzika mezlernejo kiel instruisto de la angla. Estis lia unua laborjaro, li estis tre okupita kaj fore de Riga, finfine li jam printempe rifuzis mem organizi la tendaron kaj dum E-rondeta kunveno li petis kaj persvadis min organizi la tendaron, ĉar mi ankoraŭ estis studentino, kaj konstante loĝis en Riga. Kvankam mi estis studentino de la 5-a (lasta) kurso de Fizika Fakto en LŜU, sen sperto pri organizado de tendaroj, mi tamen konsentis, ĉar iu devis tion fari. Post tio mi lin nek vidis, nek aŭdis, ĝis la solena malfermo de la tendaro (E. Mozerts aktive kontribuis al organizado de pliaj BET-oj, li

estis ĉeforganizanto de multnombra BET en Drabeši, apud Cesis – Latvio).

Do, mi bezonis ne nur cerbumi, sed ankaŭ ion fari. Unue mi korespondis kun miaj geamikoj en Estonio kaj Litovio, studentino de Tartua Universitato Lembe Hallop (nun Laanest) kaj studento de Kaŭna Politeknika Instituto Zenonas Sabalys. Mi eksciis iliajn opiniojn, interkonsiliĝis pri nia tendaro, kia ĝi povus esti. Surloke helpantoj al mi mankis, gestudentoj havis printempan sesion kaj someran praktikon, tamen mi konsiliĝis iom kun Astra Kupre, ankaŭ studentino de nia universitato, sed baldaŭ ŝi havis studentan someran praktikon kaj forveturis for de Riga. Lokon por la tendaro mi elektis proksime de Riga apud la lago Baltezers. La loko estis bela, pinarbaro ĉirkaŭe, seka tero, herbejo, kanalo kaj lago. Apude estis somera ripoza tendaro por konstruistoj de Riga. Tie dum somero laboris nia esperantistino-studentino Anna Cimare, ŝi tie estis sporta instruktoro. Ŝi helpis al mi interkonsenti kun estroj ricevi permeson starigi niaj tendojn, uzi danclankon, boatojn, elektran lumon, tualetojn. Tiam mi decidis pri tempo de la tendaro kaj sendis informilojn al Estonio kaj Litovio: al Lembe por Estonio, al Zenonas kaj Edis (Emanuelis Dvarionas) el Kaunas por Litovio, al Romas Juškevičius – litova studento en Moskvo, ankoraŭ al kelkaj esperantistoj. La informilo tekstis jene:

Riga, 6/7/1959

Karaj gesamideanoj!

Ni decidis organizi la tendaron proksime de Riga ĉe la lago de la 1-a ĝis la 14-a de aŭgusto.

Ĉiuj partoprenantoj devas esti en Riga la 1-an de aŭgusto, kaj kunveni en ejo de filologia fako de la universitato, kiu siutas en Lenina strato 32. Poste ĉiuj kune veturos al la tendara loko. Se estos homoj, kiuj malfruiga, ili devas informi min, ke ni povus ilin renkonti poste.

Ĉiu partoprenanto devas preni kune ujojn por manĝado, t.e. supujon, kruĉon, tranĉilon, kuleron, ankaŭ litkovrilon, littukon ktp. Se iu scipovas muziki, prenu kune ankaŭ muzikilon. Fiŝkaptistoj povas preni fiŝkaptilojn.

Skribu al mi nomaron de la partoprenantoj kaj ankaŭ kiom da tendoj ili bezonas. Tion mi bezonas scii ĝis la 20-a de julio, por ke mi povu mendi tendojn.

Se vi havas mem tendon, prenu ĝin. Unu tendo dum tagnokto kostas 2,5 rublojn. En unu tendo povas kuŝi 3 homoj, por 15 noktoj unu homo devas pagi 13 rbl.

Ni konsentis fari komunan manĝadon. Dum tendara tempo ni organizos ankaŭ ekskursojn. La tendaro kostos por ĉiu persono proksimume 150-200 rublojn.

Sincere
Esperant-tendara
organiza komitato
Mia adreso...

Ankoraŭ printempe mi vizitis kunvenon de Riga Esperanto-Klubo, kaj informis tie pri la tendaro, tamen mi ricevis neniajn proponojn aŭ demandojn, estis nur malkredo, ke ĝi povus okazi, ĉar tio aspektis malserioze. Du semajnojn antaŭ la tendaro mi denove vizitis la klubon kaj informis klubanojn pri la loko kaj tempo, krome mi invitis ilin partopreni la malfermon de la tendaro kaj eĉ preni kune „korbeton“ – manĝaĵon kaj trinkaĵon por interkona vespero. Kaj nur nun anoj de Riga Esperanto-Klubo ekkredis, ke vere, en Latvio apud Riga, okazos la unua Esperanto-tendaro de niaj baltiaj respublikoj. Kaj tiam jam la plej maljunaj kaj malnovaj esperantistoj entuziasmiĝis kaj proponis al mi iamaniere helpi – renkonti alveturontojn, prepari bieron, limonadon, baki lardkuketojn kaj fari buterpanetojn por interkona vespero, akompani dum ekskursoj. Tamen estis kelkaj niaj esperantistoj, kiuj ektimis pri siaj altaj postenoj, pri Esperanto-movado, ĉar neniu sciis, kia reago povus esti flanke de sovetiaj,

komunismaj, partiaj instancoj. Ekzemple nia plej sperta kaj eminenta esperantisto Eduards Jaunvalks, kies ŝtata posteno en nia respublika Ministerio de Interkomunikado estis estro de personara fako, laŭ mia opinio ektimis, ĉar li restis tre serioza, silenta kaj eĉ ne veturis al la tendaro. Mi petis al sinjoro Nikolao Lapinš, kiu estis lektoro de nia universitato, helpi min transporti tendojn al la tendara loko. Kelkajn tagojn antaŭ la komenco ni ambaŭ portis 7 tendojn, luitajn de turisma bazo, ĉar aŭton nek mi nek li posedis.

Frumatene la 1-an de aŭgusto ni komencis renkonti alveturantojn el busa stacio, fervoja stacio kaj flughaveno de Riga. Ni ĉiuj estis tre ĝojaj, plenemociaj, ĉar tiam renkontiĝoj inter ni, esperantistoj, okazis ankoraŭ tre malofte. Plej ĝojaj estis malnovaj esperantistoj: Ĉaĉe, Arbergs, Gruike, Vētra, Grāvis, Ozola, Cins, ankaŭ mia patro Kondrats, Vebeliūnas, Varkauskas kaj aliaj. Ili rememoris Esperanto-renkontiĝojn antaŭ la milito kaj ankaŭ memoris la tempon, kiam pri Esperanto necesis silenti aŭ paroli kaŝe.

Kune kun la gastoj ni veturis al la tendara loko. Tie ni kune konstruis niajn tendojn, starigis foston por standardo, faris lokon por fajro kaj kuirejo. Tiam post somera praktiko alveturis Astra Kupre, kiu tiam al mi tre helpis en la tendaraj aferoj. Ni ĉiam kune zorgis pri ĉio, kaj, kiel poste al mi skribis Valter Toomsalu el Tallinn, ni „estis animoj de la tendaro“. Poste ni surloke elektis tendarestron Zenonas Sabalys, sed mi estis lia helpantino. Dum ekskursoj multe helpis N. Lapinš, li sentis sin respondeca kiel lektoro de LU.

Antaŭ la solena inaŭguro per sia skotero subite aperis ankaŭ Ervins Mozerts. Li, kiel ĉiam, estis tre energia, kaj tuj pretis gvidi la solenan inaŭguron. Mi tiam estis ne sufiĉe kuraĝa, kaj volonte prezentis al li tiun eblecon. Nian verdan Esperanto-standardon de la unua Baltlanda Tendaro hisis nia plej juna esperantisto el Riga, la 6-jaraĝa Aija Strautmane (malgranda Aija), kaj al ŝi helpis



La fama latva esperantistino, iniciatinto de la unua Balta Esperanta Tendaro Biruta Rozenfelde, vikle rakontas pri la unuaj dek BET-oj. Tre valoraj rememoroj pri la komenco de la soveta Esperanto-movado fare de la tiama kaj ĝisnuna elstara agantino, spekteblas jutube ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=PVXkROUPKGA>

nia lektoro de la universitato Nikolao Lapinš. Dum la inaŭguro parolis N. Lapinš, E. Mozerts, de Litovio Z. Sabalys kaj de Estonio E. Keskula. Aija deklamis. Poste ni aŭskultis per magnetofono solenan inaŭguron de la 44-a UK el Varsovio, kiu estis dediĉita al la 100-jara jubileo de Zamenhof. Poste komenciĝis interkona vespero ĉe fajro. La vetero estis belega, ni kantis, dancis, manĝis, trinkis kaj konversaciis apud fajro ĝis la mateno.

Partoprenantojn de la tendaro oni povas dividi en du partojn: veraj tendaranoj, kiuj noktumis en tendoj, kaj partoprenantoj – vizitantoj, kiuj noktumis en Riga, sed tage vizitis la tendaron kaj partoprenis en diversaj aranĝoj de la tendaro.

Veraj tendaranoj estis:

El Litovio:

1. Zenonas Sabalys , Kaŭna Politeknika instituto
2. Vytautas Aviža -II-
3. Riĉardas Karmaza -II-
4. Eleonora Vainoraitė -II-
5. Albinas Vebeliūnas -II-
6. Petras Varkauskas -II-
7. Eva Švarcaitė, Vilna Universitato



Biruta Rozenfelde

8. Leonas Petrauskas -II-
9. Romas Juškevičius, Kaunas (studento el Moskvo)

El Estonio:

1. Lembe Hallop (Laanest), Tartua Universitato
2. Endrik Kesküle, Rapla
3. Urmas Ra' ts, Tallinn
4. Linda Ra' ts -II-
5. Anni Kūbarsep -II-
6. A. La' ll -II-
7. Maimo Kristian -II-
8. Helle Lepiksoo (Merisalu) -II-
9. Inga Masing -II-
10. Valter Toomsalu -II-

El Latvio:

1. Biruta Kondrate (Rozenfelde) Latvia Universitato (Riga)

La lago Lielais Baltezers („granda blanka lago“) situas en Latvio, nordoriente de la nacia ĉefurbo Rigo. Borde de la lago, en esperantlingvaj tekstoj kutime simple mallongigita *Baltezers*, en somero 1959 okazis la unua el serio de la kvar Ĉebaltaj Studentaj Esperanto-tendaroj (ĈET), el kiuj poste evoluis la Baltia Esperanto-Tendaro kaj ankoraŭ poste la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). Ĝia ĉeforganizanto estis la tiutempa studentino Biruta Kondrate (nun Rozenfelde). La unuan tendaron partoprenis esperantistoj nur el tri sovietigitaj baltmaraj respublikoj – Litovio, Latvio kaj Estonio.

2. Astra Kupre -II-
3. Anna Cimare -II-
4. Nikolao Lapinš -II-
5. Ludvigs Kondrats, Riga -II-
6. Ervins Mozerts, Cesis -II-

El Rusio:

1. Sergej Sariĉev, Moskvo

Aliaj partoprenantoj – vizitantoj el Latvio:

Aija Strautmane, Aleksandrs Strautmanis, Gunta Strautmane, Otilija Vētra, Amalija Gruike, Mirdza Burgmeistere, Ints Čaĉe, Teodors Arbergs, Ilona Bermāne, Oskars Bauers, Dzintars, Cins, Z. Ozolnieks, Milbergs, Grāvis, P. Šmitmanis, Zile, Vika, Janis Andžans, Buklovskis, Garinš, Goldšteins, Tusedla Ozola, Haralds Lazdovskis.

Eble ĉeestis ankoraŭ kelkaj, sed mi ilin ne registris. Do, entute 50 partoprenantoj.

Dumtendare okazis ekskursoj al la urbo Riga, al Subĉiela Latvia Etnografia Muzeo en la urbo Jumala (marbordo de Riga Golfo), al la urbo Cesis, vizito de kunveno en Esperanto-klubo de Riga, ŝipekskurso tra la lago Baltezers. Dum la tuta tempo ni estis en freŝa aero, ni mem priservis nin, mem kuiris sur fajro manĝaĵojn laŭvice, estis komuna manĝado apud la fajro. Estis tre bona vetero, sunbrila, varma. Humoro en la tendaro estis tre amika, romantika, gaja por ĉiuj. Ni multon faris kune, helpis unu al alia.

Biruta Rozenfelde



ĈET-3 en Molėtai (1961)

La Organiza Komitato de BET-52 en Birštonas (Litovio) decidis aperiĝi en la novaĵretejo *La Balta Ondo* informojn pri ĉiuj BET-oj, kiuj okazis en Litovio. Jen kelkaj artikoloj kaj fotoj pri BET-oj en Litovio, kiuj aperis en Esperantaj kaj sovetaĵaj gazetoj.

Turisma tendaro en Molėtai

Al nia urbo por dek tagoj venis granda grupo de turistoj. Ĝi konsistas el 164 personoj. En ĉi tiu tendaro partoprenas reprezentantoj de Latva SSR, Estona SSR, Litova SSR kaj de aliaj gefrataj respublikoj. Venis turistoj eĉ el Moskvo, Leningrado, Rostov-na-Donu, Ĉeljabinsk, Taŝkent, el la regionoj de Kemerovo kaj Omsk.

Preskaŭ ĉiuj alvenintoj scipovas Esperanton, pro tio en la tendaro ne estas necesaj interpretistoj. Multaj homoj jam antaŭe partoprenis en turismaj vojaĝoj. La klajpedano Algirdas Petkūnas biciklis de Klaipėda ĝis Vladivostok. La plej juna turistino estas la okjara lernantino de la dua klaso, latvino Aija Strautmane. Ŝi jam la trian fojon partoprenas la tendaron.

Dum sia vizito en nia respubliko la turistoj konatiĝis kun la urboj Vilnius, Kaunas kaj Trakai. La turistoj tre ŝatas nian belan regionon. Viktor Gruško, docento de la Rostova Instituto pri konstruado, rakontas, ke li, veninta el brua granda industria urbo, en la ĉirkaŭaĵo de Molėtai trovas trankvilon kaj ripozon. La verkisto Ivan Sergejev el Moskvo (lia lernolibro de Esperanto estis eldonita ĉi-jare la 1-an de aŭgusto) diras, ke li estas ravita de nia regiono. La verkisto restos ĉi tie ankoraŭ por kelkaj tagoj post la tendaro.

En la tendaro partoprenas ankaŭ intelektuloj kiel Boris Sokolov

docento de la Agrikultura Mekanika Instituto de Ĉeljabinsk, Maks Aderkas, inĝeniero el Rostov-na-Donu, Lidija Suetova, instruistino de botaniko de la Moskva Universitato, Boris Tokarev, instruisto de la Moskva Forstkultura Instituto, Lamnel Bassin, respondeca sekretario de la revuo “Agrikulturo de Uzbekio”, eldonata en Taŝkent, profesoro Loja Janis, membro de la Latva Scienca Akademio kaj multaj aliaj.

Por tiuj tendaranoj, kiuj ne konas Esperanton, oni aranĝis kurson, kiun gvidas estona metodikisto Siitam.

Sendube post tiel bona ripozo en nia urbo la tendaranoj, reveninte al diversaj urboj de nia vasta Patrujo, ankoraŭ longe memoros malgrandan urbeton de Soveta Litovio – Molėtai.

A. Žagūnas

Fonto: *Tarybinii keliu* (Molėtai), la 9-an de aŭgusto 1961, №62 (1030), p. 3.
Tradukis el la litova Rita Valčiukaite



La litova grupo



Amika vespero de la turistoj

Neordinara koncerto okazis la pasintan jaŭdon en salono de la internulejo de Molėtai. Ne ĉiuj ĉeestantoj en la salono povis kompreni dum la amika vespero kantatajn kantojn kaj deklamatajn versojn, verŝajne kelkaj el ili la unuan fojon tiujn aŭdis. La adiaŭan koncerton aranĝis turistoj el diversaj lokoj de Sovetunio, kiuj tendumis en Molėtai. Ĉi tie estis homoj, kiuj scias aŭ lernas Esperanton, kaj la koncerto okazis en tiu ĉi lingvo. Krome, sur la scenejo sonis kantoj ankaŭ en la estona kaj aliaj lingvoj de soveta landoj.

En la komenco de la amika vespero al la ĉeestantoj pri historio de Esperanto rakontis docento Valantavičius el la Vilna Ŝtata Universitato V. Kapsukas. Poste dum la koncerto la aŭskultantoj tre varme akceptis kantadon kaj dancadon de studentoj el Talino, pli ol 70-jaraĝan turistinon el Rostov-na-Donu



kaj solkantadon de studentinoj el la Vilnia Ŝtata Pedagogia Instituto. Per forta aplaŭdo estis akceptita A. Strautmane, ok-jara turistino el Latvio, kiu deklamis versaĵon kaj kantis latvan popolan kanton. La klajpedano A. Petkūnas tre interese rakontis pri sia turisma vojaĝo de Klaipėda ĝis Vladivostok. En la fino de la koncerto ĉiuj ĉeestantoj kantis la himnon de demokratia junularo.

En klasĉambroj de la internulejo estis aranĝita ekspozicio de eldonaĵoj en Esperanto kaj aliaj ekspoziciaĵoj rilataj al tiu lingvo.

Fonto: *Tarybiniu keliu* (Molėtai), la 16-an de aŭgusto 1961. №64 (1032), p. 2.

Tradukis el la litova
Rita Valčiukaitė

Esperantista tendaro en Litovio

Esperantistoj-studentoj en ĉebaltaj respublikoj de Sovet-Unio organizas ĉiusomere tendarojn, kiuj jam fariĝas tradiciaj. En la jaro 1959 tia tendaro okazis en Latvio, en la jaro 1960 en Estonio kaj ĉi-jare en Litovio. Ĝi okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto en litova regiona urbo Molėtai. La ĉi-jara tendaro estis la plej granda; en ĝi partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj ne nur el ĉebaltaj respublikoj, sed venis samideanoj el preskaŭ tuta Sovet-Unio: Moskvo, Leningrado, Kiŝinevo, Rostovo-Don, Odeso, Ĉelabinsko, Kemerovo, Taŝkento. Inter ili estis multaj veteranoj de Esperanta movado.

Fonto: *Esperanto*, 1961, №10 (671), p. 179



BET-6 en Veisiejai (1964)

BET-6 okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1964 en Veisiejai, kun 153 partoprenantoj. En Veisiejai L. L. Zamenhof en 1885 komencis kuracistan praktikon. En diversaj dokumentoj ĝi estas citata kiel la loko, kie estis kreita Esperanto.

La VI-a Ĉebaltia Konferenco de esperantistoj

Tian grandan aron da nekonataj homoj vejsejanoj vidis antaŭ longa tempo. Ili multas – ĉirkaŭ 150. Ĉi tie, en la belega arbara kaj laga angulo de Dzūkija, sabate kunvenis partoprenantoj de la VI-a Ĉebaltia Esperantista Konferenco-Tendaro.

Krom reprezentantoj de la baltiaj respublikoj, – diras K. Puodenas, komitatano de la tendaro, ekonomiisto de la Vilna urbeŝtrara fako pri popola klerigado, – la aranĝon partoprenas gastoj ankaŭ el Rusia Federacia Respubliko, Moldavio, Ukrainio, Belarusio. La tendaron organizis la Vilna esperantista klubo „Juneco“. En Veisiejai esperantistoj konatiĝos kun la vivo de L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kun lia verkaro, ekzercos, eldonos murgazeton, organizos sportajn olimpiajn ludojn, ekskursos eksterube.

Vyt. Rimavičius

Tradukis el la litova Rita Valčiukaite



Sovetunio

Ducent personoj el la tuta Sovetunio partoprenis Esperanto-tendaron komence de aŭgusto en Vejsejaj (Litovujo), urbeto, kie en 1885 komencis d-ro Zamenhof sian kuracistan karieron. Okaze de la renkontiĝo du stratoj ricevis nomon de d-ro Zamenhof aŭ de Esperanto. (Oni petas sendi gratulojn al prez. Petrauskas, D-ro Zamenhof gatve 10).

Fonto: *Esperanto*, 1964, №10 (707), p. 174.

Esperantistoj finis tendarumi

Ĉebalta Esperanto-Tendaro*. Ĉi tiu nomo estas jam bone konata de vejsejanoj: ja la partoprenantoj de la tendaro kunvenis en ilia urbo, la urbo, kie finkreis la lingvon Esperanto ties aŭtoro L. Zamenhof. Krom reprezentantoj de la baltaj respublikoj abundis ankaŭ gastoj el aliaj respublikoj – Rusia Federacio, Ukrainio, Moldavio, Bjelarusio. La plej fora gasto estis juna instruisto de geografio St. Kotljarov el Mejĉureĉensk (Kemerova regiono en Siberio).



Kiel rapide forpasis la tagoj! Komuna matena gimnastiko, laboro de apartaj sekcioj, sportaj konkursoj, diversaj prelegoj, artagadaj vesperoj – jena, ĝeneraltrajte, estis la programo de la tendaro. Funkciis biblioteko de Esperanto-literaturo kaj ekspozicio. Oni prelegis pri problemoj de nuntempa genetiko, pri K. Donelaitis, pri romanidaj elementoj en la lingvo Esperanto, pri porpacaj metodoj de prof. Ĉaĥotin.

En la tendaro regis spirito de granda interpopola amikeco: amike kaj sincere interkomunikiĝis lernantino de la kvara klaso el Pasvalys Zinaida Kličnikova, docento de la Moskva universitato Boris Tokarev, ŝoforo el Volgogrado Pilučenko, merita litova kuracisto Markas Robinzonas – la sekretario de la tendara partia grupo.

Inter la esperantistoj tre popularas turismo. Multaj partoprenantoj venis al la tendaro petveture. Petveturadon uzos ankaŭ posttendare 22 esperantistoj el diversaj lokoj de Sovetunio. Ilin tra Karpatio gvidos Valdas Banaitis (prezidanto de la Esperanto-klubo “Amikeco”). Ĉirkaŭ 20 personoj vojaĝos tra



Statuo de Zamenhof en Veisiejai, starigita en 1998

la baltaj respublikoj.

Ni ricevis multajn gratulojn el diversaj lokoj de Sovetunio kaj eĉ el eksterlando (Hungario kaj Germanio). Tre ĝojigis nin la gratulletero de la sovetunia delegitaro, partopreninta la 49-an Universalan Kongreson en Hago. Des pli, ke en ĝi estis Stepan, la patro de la kosmonaŭto Titov kaj reprezentanto de nia respubliko docento A. Vaitilavičius.

La sesa Ĉebalta Esperanto-Tendaro finis sian laboron. Ĉiuj disiris. Kelkaj amikoj venos al la unua esperantista tendaro en la Altaja Montaro apud Barnaul. Ili venigos tien niajn gratulojn.

Vytautas Ŝilas

studento de la Vilna Universitato Kapsukas,

prezidanto de la Esperanto-klubo “Juneco”

Tradukis el la litova Vytautas Ŝilas

Fonto: *Darbo vėliava (Lazdija)*,

la 15-an de aŭgusto 1964, №97 (1983).

* En la publikigita teksto malaperis ĉi tiu frazo. Sen ĝi la enkonduko fariĝis nekomprenebla. Ankaŭ la originala titolo estis Ĉebalta Esperanto-Tendaro. (V. Ŝ.)



Vytautas Ŝilas kaj Markas Robinzonas salutis la organizantinon de BET-6 – Biruta Kondrate (nun Rozenfelde).



Zamenhof-domo en Veisiejai

BET-9 en Vilno (1967)

BET-9 okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1967 en Vilno, la ĉefurbo de Litovia SSR. Samtempe en Kaltanėnai (Švenčionysa distrikto, Litovia SSR) okazis samtitola tendaro, kiu transformiĝis al SEJT-9. La teksto pri BET-9 aperis sen subskribo en la samizdata bulteno *Unuiĝo*.

Revuo de laboro de la 9-a Baltlanda Esperanto-Tendaro en urbo Vilnius 1.-10.8.1967

(Legita dum la ferma kunsido la 10-an de aŭgusto 1967, redaktita kun konsidero de rimarkoj, faritaj dum ĝi.)

La 9-a BET prezentas grandan eventon en la soveta esperantista movado. Kvankam tradicia laŭ sia titolo kaj vicnumero, ĝi akiris tute novan aspekton kompare kun la estintaj tendaroj, anstataŭ provinco ĝi okazas en la ĉefurbo de Soveta Litovio, anstataŭ tendoj kaj provincaj lernejoj ĝi havas ejon en unu el la plej imponaj kulturpalacoj de la respubliko. Unuan fojon en la historio de la sovetlandaj Esperanto-tendaroj, eĉ en la historio de la tuta sovetlanda esperantista movado post la internacia kongreso en Leningrado en la jaro 1926, ni renkontiĝas dum ĝi kun granda nombro de eksterlandaj gesamideanoj. Laŭ nombro de partoprenantoj ĝi estas ankaŭ la plej impona el ĉiuj okazintaj sovetlandaj tendaroj. En ĝi partoprenis 432 personoj: 101 eksterlandanoj kaj 331 sovetianoj, ne enkalkulante kelkdekojn da gastoj, venintaj por kelkaj tagoj, kaj vilnanojn, vizitintajn la tendaron nur epizode.

La tendaron oficiale salutis reprezentantoj de registaraj, sociaj kaj sciencaj organizaĵoj, pri ĝi vaste

informis gazetaro kaj radio. Ni ne dubas, ke la IX-a BET havos grandan influon por esperantista movado ne nur en Litovio, sed ankaŭ en la tuta Sovetlando.

Ni devas konstati grandan meriton de la prezidanto de la prepara Komisiono Antanas Poška, kiu kun helpo de kelkaj aliaj vilnusiaj samideanoj trovis novan, ĝis nun ne praktikitan vojon por inviti eksterlandanojn al nia lando. Tiu vojo estas pli simpla kaj pli malmultekosta ol la ĝisnunaj, kaj ĝi faciligos la internaciajn kontaktojn, se ĝi eniros en la konstantan praktikon. Ne al ĉiuj eksterlandaj amikoj ĝi helpis atingi nian tendaron, sed tamen ni povis bonvenigi konsiderindan nombron, nome: 71 el Hungario, 15 el Pollando, 8 el Bulgario, 4 el Jugoslavio, 2 el Germana DR, 1 el Finnlando.

La tendara programo enhavis tradiciajn punktojn pri prelegoj de somera universitato, libera tribunon, organizaj demandoj, sekcia laboro, arta agado, oratora konkurso, kursoj de la lingvo, ekskursoj tra la urbo kaj ekster la urbo.



En la somera universitato estis tralegitaj entute 25 prelegoj, plejparte (16) pri esperantologiaj demandoj. Parto de la prelegoj estis destinita por historiaj temoj, lige kun la 50-jara jubileo de la Oktobra Revolucio.

Precipe ni devas mencii la kolektivajn prelegon pri esperantistoj en la revolucia movado. Ni nur bedaŭras, ke la promesitaj kontribuoj de niaj eksterlandaj amikoj laŭ tiu temo ne estis efektiviĝitaj. Nur malgrandan parton de la universitata programo okupis sciencopopularaj prelegoj. Estis ankaŭ temoj, ne aktualaj por la plejmulto de la aŭskultantoj, ekzemple tiu pri la urbo Kaunas. Similaj temoj devus esti evitotaj en programo de la sekvontaj SU. Aliaj temoj, ekzemple pri vojaĝimpresoj, kvankam interesaj, ne havas sciencajn karakterojn, kaj devus esti prezentataj ne en la kadro de SU.

La libera tribuno kaj la speciale antaŭviditaj kunvenoj por organizaj demandoj ne estis eluzitaj por pritrakto de tiuj ĉi demandoj en tia grado, kian postulas ilia graveco.

El la multaj sekcioj, antaŭviditaj en la programo, kunsidojn havis la medicina, pedagoga, tradukista kaj literatura. Ateisma sekcio ne estis organizita, tamen pri tiu temo okazis kontribuo de k-do K. Valaŝinas en SU.

La kaŭzo de nesufiĉa aktiveco en la sekcia laboro kaj pritrakto de esperantista movado estis manko de iniciato de la tendaranoj kaj pasiveco de la elektita estraro de la tendaro. La prepara komisiono ne povis ĉion movigi en deca amplekso, parte pro tio, ke kelkaj ĝiaj anoj devis labori en siaj oficejoj. Fortoj de lokaj esperantistoj estis disigitaj per samtempa organizo de alia tendaro en provinco de Litovio.

Partoprenantoj de la sekvontaj tendaroj devus konscii, ke ili ĉiuj estas mastroj, sed ne gastoj, kaj ĉiuj devas labori por sukcesa efektiviĝo de la celoj de la tendaroj. Nur la prepara komisiono, nur la lokaj samideanoj

ne povas perfekte gvidi la komplikan mekanismon de la tendaro. En la antaŭaj tendaroj la plej grandan ŝarĝon de la laboro transprenadis de la preparkomisiono la elektita estraro, kaj tio devus esti ĉiama tradicio.

Ni esprimas sinceran dankon por niaj hungaraj amikoj, precipe al la gvidantoj de Esperanto-klubo en Debrecen L. Toth kaj D. Szilágyi, kiuj organizis ne nur tiel multnombrajn venon de ĝiaj anoj, sed ankaŭ tre altnivelan artan programon. Ankaŭ ni devas mencii penojn de latvaj, estonaj kaj litovaj gesamideanoj en organizo de naciaj artaj programoj. Bedaŭrinde la antaŭviditaj artaj vesperoj de aliaj nacioj ne okazis. Ni devus strebi al pli alta nivelo de nia arta programo, precipe kiam ni agas sub okuloj de la ĝenerala publiko.

En la oratora konkurso laŭ la temo “Problemo de patroj kaj filoj en Esperantujo” partoprenis 12 personoj, inter ili 3 eksterlandanoj. La unua loko estis aljuĝita al s-ino W. Włodarczyk (Varsovio), la dua – al J. Tamošiunas (Vilnius), la tria – al J. Ojalo (Tallinn), la kvara – al L. Sobanskiĵ (Ŝalĉininkai).

Dum la tendaraj tagoj en Respublika Biblioteko funkciis riĉa ekspozicio de Esperanta literaturo. Ĝin vizitis pli ol 1500 personoj. Por ĝia aranĝo multe kaj sindone laboris s-ano J. Petrusis.

Ni esperas, ke la nova tradicio – partopreno de eksterlandaj amikoj – komencita en ĉi tiu tendaro, estos daŭrigota. Ni transdonas la stafeton por aranĝi la 10-an BET al niaj amikoj en Latvio.

La baltlandaj Esperanto-tendaroj devas esti komunaj por ĉiuj esperantistoj, por ĉiuj aĝoj. Junularaj kaj aliaj specialaj Esperanto-tendaroj devus okazi dum alia tempo, por ne malhelpi viziti la komunajn, ĝeneralajn tendarojn.

V. Kalvaitis

BET-12 en Kretinga (1970)

La 12-a BET okazis de la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1970 en Kretinga. La tekstoj pri BET-12 aperis en “Horizonto de Soveta Litovio”, en kiu ne povis manki mencioj pri Lenin (100 jaroj de la naskiĝo) kaj pri la Dua Mondmilito (25 jaroj de la fino), kutime nomata en Sovetunio “Granda Patruja Milito”.

Kolektiĝo

Kalendaro montras 31.7.1970. Estas bela kaj varma mezsomera tago, sunbrila kaj preskaŭ senventa. Sur stratoj de okcidentlitovia urbo Kretinga oni pli kaj pli ofte povas renkonti per verdstela brustsigno ornamitajn homojn: lernantojn, studentojn kaj aĝajn homojn. Nun ili ĉiuj alveturis por partopreni la 12-an Baltian Esperanto-Tendaron, kiun esperantistoj aranĝas tradicie ĉiujare laŭvice en tri baltiaj respublikoj. Tamen la tendarojn partoprenas ordinare ne nur litovoj, latvoj kaj estonoj, sed ankaŭ multnombraj iliaj gastoj el aliaj frataj sovetaj respublikoj.

Ĉi-jare la nombro de partoprenantoj de la tendaro atingis 319. Pli grandnombre la tendaron partoprenas, kompreneble, litovoj, efektivaj mastroj kaj aranĝantoj de tiu ĉi tendaro. Ilia nombro estas 129, el Estonio venis 64 esperantistoj, el Ukrainio – 48, el Rusio – 44. El aliaj respublikoj estas malpli da partoprenantoj. La plej malproksimaj gastoj estas el Novosibirsk, Omsk, Kazahio, Dagestano, subtropika urbo Batumi.

Estas notinde, ke pli ol 50% de la tendaranoj estis reprezentantoj de Esperanto-junularo, kvankam samtempe kiel BET-12 okazis en Baŝkirio Tutsoveta Junulara Esperanto-Tendaro. Antaŭtagmeze de la 1-a de aŭgusto okazis

ekskurso tra la urbo Kretinga. La ekskurson gvidis Sofia Rakiene, loka esperantistino-instruistino. Ŝi kondukis la tendaranojn tra sia hejmurbo, konatigante ĉion vidindan. Precipe kortuŝis la partoprenantojn memortabulo ĉe angulo de la stratoj Vilnius kaj Polejajkin. Polejajkin estis patrujmilita heroo, kiu perdis sian vivon, defendante la urbon Kretinga. Sub la memortabulo estas fiksita breteto, sur kiu staris florpoto kun ruĝaj begonioj.

Unua tago

Malfermo de BET-12 okazis la 1-an de aŭgusto je la 17-a horo en salono de la Agrikultura Teknikumo, kies ejoj estis en dispono de la tendaranoj. La salono estis plenplena de la tendaranoj. En la prezidantaro okupis lokojn reprezentantoj de 10 sovetaj respublikoj. Izabelė Ožiūnienė, ĉefaranĝintino de la tendaro, akcentis en siaj malfermaj vortoj diversajn jubileojn de la jaro 1970, ĉefe la jubileon de Lenin. Docento A. Vaitilavičius, prezidanto de Vilnusia Esperanto-klubo,



substrekiis du gravajn eventojn en esperantista vivo en la jaro 1970: en Litovio kaj Estonio okazis seminarioj de Esperanto por profesiaj instruistoj. Ambaŭ seminarioj estis aranĝitaj de institutoj por perfektigo de instruistoj.

La tendaron salutis G. Žulpaitė, sekretario de Kretinga Distrikta Partia Komitato, kaj S. Stropus, reprezentanto de Distrikta Kleriga Fakoj, kiu finis siajn salutajn vortojn per esperantlingva slogano: “Per Esperanto por paco kaj amikeco!”

En la salonon marŝis 12 reprezentantoj de junpioniroj, gvidataj de trumpetisto. Ĉiu el ili diris al la partoprenantoj de la tendaro unu salutan frazon, ĝenerale esprimantan, ke neniam estu plu milito.

Sekvis salutparoloj de reprezentantoj de diverslokaj esperantistoj, kiuj ĉefe akcentis, ke ni devas instrui Esperanton precipe al junularo, kiu portos antaŭen flamantan torĉon de la internacia lingvo. Ni devas agi kuraĝe kaj prudente, nur tiam ni atingos nian celon. Ĉiuj parolantoj deziras al la ĉeestantoj fruktadonan laboron, multajn sukcesojn.

Je la 19-a horo okazis mitingo ĉe monumento, starigita je memoro de viktimoj de la patrujmilito. S. Rakienė detale rakontis pri interrilatoj kaj korespondado de lokaj gelnantoj kun parencoj de la defendantoj de Kretinga, falintaj dum la milito. Nacivestitaj lernantoj prezentis parolĥore “Buĥnvaldan Sonorilon”.



Vespere prezentis al la tendaranoj tre belan koncerton loka amatora miksa koruso kaj dancgrupo. La koruso prezentis siajn kantojn en la litova lingvo, sed titolojn de la kantoj, iliajn aŭtorojn, komponistojn kaj mallongan enhavon anoncis al la spektantoj esperantlingve korusanino S. Rakienė, kiu diris, interalie, ke ŝi esperas esperantigi la tutan koruson. La XII-a Baltia Esperanto-Tendaro komencis sian dektagan laboron.

Laboro kaj ĝojo

Unu el la plej gravaj aranĝoj de la tendaro estis Somera Universitato, kiun gvidis prof. J. Dagys el Vilnius.

Ĉiutage okazis Esperanto-lecionoj por komencantoj, gvidataj de samideanoj Mandrik kaj Lukoševičius, kaj daŭriga kurso, gvidata de A. Rogov kaj V. Nočovkin. La daŭrigan kurson partoprenis 55 personoj: 20 el ili ekzameniĝis ĉe tendara ekzamena komisiono kaj ricevis atestojn pri instrukapablo.

Dum la tendaro okazis multaj fakaj kunvenoj, kiel tiuj de instruistoj, veteranoj, medicinistoj, ĵurnalistoj literaturistoj kaj naturamikoj. Kolektiĝis esperantistoj de apartaj respublikoj. Okazis libera tribunalo kaj literatura vespero. Dum la lasta prezentis siajn originalajn kaj tradukitajn poemojn kaj prozaĵojn N. Andrianova (Kiev), B. Kärt (Tallinn), E. Lippe (Riga), H. Branzburg (Luga), I. Tamošiūnienė (Vilnius) kaj aliaj.

Tre varme akceptis la tendaranoj teatraĵeton de Amatora Pupteatro el Panevežys (Panevejis) “Tri porkidoj”, kie eĉ porkidoj kaj lupoj parolis en Esperanto.

Okazis apartaj amatoraj koncertoj de estonoj, litovoj, latvoj kaj eksterbaltlandaj esperantistoj. Precipe bona estis koncerto de latvaj esperantistoj, kie plejparton de numeroj prezentis blindaj esperantistoj el Riga. La lasta koncerto kaj kelkaj elektitaj numeroj el antaŭaj koncertoj estis prezentitaj al loĝantaro de Kretinga.

Ekskursoj

Krom la ekskurso tra la urbo Kretinga estis aranĝitaj ankaŭ aliaj ekskursoj. La plej interesa el ili estis ekskurso al la terokolo Neringa, situanta sur duoninsulo, laŭ sia aspekto longa kaj mallarĝa, simila al falĉilo. Tiun ekskurson partoprenis pli ol 100 personoj, al kies dispono estis tri aŭtobusoj. La duoninsulo apartiĝas de la kontinento per golfo, kaj estas alligita al la kontinento per sia suda fino, troviĝanta en Kaliningrada Provinco. La ekskursaaŭtobusoj estis veturigitaj al la duoninsulo per pramo.

Sekvis ekskursoj al la du marbordaj urboj. Palanga – urbo de ripozejoj, sanatorioj, floraroj kaj plaĝoj kun blanka mola sablo. Klaipėda – havena kaj industria urbo. Ĉi tie en Urba Kulturpalaco Esperanto-klubo havas propran oficejon kun tri ĉambroj.

Kaj la lasta ekskurso – laŭ vojoj de bataloj de patrujmilito. Estis vizititaj du eksterurbaj muzeoj: iama koncentrejo por politikaj prizonuloj kaj komunaj tomboj de mortigitaj.

Lasta tago

Solena fermo de la tendaro okazis la 10-an de aŭgusto. Estis prezentita statistiko pri la tendaro. G. Grozmani legis projekton de rezolucio pri la tendaro. Krom atingoj estis notitaj ankaŭ negativaj flankoj. Kiel unu el ĉefaj mankoj estis substrekita, ke en la tendaro oni multe aŭdis diversajn naciajn lingvojn. Estas propono en estontaj tendaroj enkonduki devigan lernadon de Esperanto por ĉiuj tendaranoj en diversgradaj kursoj.

I. Bril (Ĥarkov) estis kortuŝita pri prezentadoj de infanoj, tamen li esprimis kritikon, ke en la tendaro ne estis organizita laboro kun infanoj.

A. Kilk (Tallinn) parolis, ke malmultaj tendaranoj prenis sur sin iajn organizajn taskojn, ankaŭ la estraro ne dividis inter tendaranoj taskojn.

A. Vaitilavičius (Vilnius) opiniis, ke ni devas pli bone prepari niajn artajn programerojn, ni devas plialtigi nian lingvan nivelon, ĉar unu el plej gravaj celoj de tendaroj estas praktikado de Esperanto.

A. Rogov (Ĥmelnickij) proponas, ke oni ne aranĝu Baltiajn Tendarojn samtempe kun tiuj de junularo, ĉar junularo volus en ĝenerala tendaro raportari pri sia agado.

A. Rogov diskonis atestojn al ekzameniĝintoj. V. Nočovkin ĝojas, ke la unuan fojon dum la historio de la tendaroj okazis ekzamenoj, sed aldonas, ke necesas aktivigi junularon.

La ferma kunveno finiĝis per transdono de la tendara standardo al reprezentanto de Latvio, kie okazos la sekvonta tendaro.

Komenciĝas disveturo. Ĝis reveno sekvontjare!

B. Kärt

Somera Universitato

La programo de Somera Universitato konsistis el 22 prelegoj, kiuj estis aŭskultitaj dum 6 kunsidoj de la 3-a ĝis la 8-a de aŭgusto inter 9.30 kaj 12.00 h. Por prelego estis destinitaj 30 minutoj.

Laŭ temaro la programo konsistis el jenaj branĉoj: 1. Lingvaj demandoj. Estis 7 prelegoj. 2. Historio de popoloj kaj de Esperanto movado – 5 prelegoj. 3. Literaturo. Tiu fako havis prelegon de N. Andrianova pri unu forgesita Esperanta kanto “Kremla sonorado” de Sándor Szathmári (hungara revoluciulo). 4. Populara scienco. Tiu fako havis 6 prelegojn. Lektoroj venis el jenaj respublikoj: Litovio 4, Estonio 1, Ukrainio 2, Rusa Federacio 9. Kvanto de aŭskultantoj ŝancelis inter 12 kaj 75, meza kvanto 42. Tio estas relative malmulte, konsiderante, ke la tendaron partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj.

Prof. J. Dagys

Rektoro de la Universitato

Horizonto de Soveta Litovio, 1970, №1.

BET-17 en Vieکشniai (1976)

En 1976, malgraŭ grandaj organizaj problemoj, BET-17 estis organizita de la 30-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto en la urbeto Vieکشniai, 17 km sud-oriente de Mažeikiai.

La riska BET-17 (Rememoroj pri la organizado)

Dum Zamenhof-Tagoj 1975 en Kaunas grupeto da E-aktivuloj preparolis organizadon de BET-17, kiu en 1976 devis okazi en Litovio. Antaŭ tri jaroj (en 1973) la vica BET ne povis okazi en Litovio, ĉar oficialuloj ne donis la permeson. Estis klare, ke ankaŭ nun la permeso ne estos ricevita. Tamen Esperanto ja ne estas oficiale malpermesita. Tial grupeto, kiun eniris Telesforas Lukoševičius, Albinas Vebeliūnas kaj mi, decidis proprariske komenci la organizadon de BET sen oficiala permeso.

Komence de la jaro 1976 A. Vebeliūnas kaj mi komencis serĉi lokon por la tendaro. Ni estis en Tytuvėnai, Šeduva, eĉ Žemaičių Naumiestis, sed vane. Finfine ni trafis al Vieکشniai, Nord-Litovia urbeto, kaj tie tre afabla direktoro de profesia lernejo konsentis akcepti la tendaron. Restis prizorgi nutradon de la tendaranoj – necesis ricevi permeson por pligrandigita kvanto da nutraj-produktoj.

Ankaŭ ĉi tiu problemoj kun la lokaj komercaj entreprenoj estis facile solvita.

Pli poste T. Lukoševičius, veninta en Vieکشniai, faris oficialan skriban kontrakton, kiun la direktoro de la lernejo konfirmis per sigelo. T. Lukoševičius estis akceptita ĉe la distrikta partia sekretario, kaj tiu promesis ne nur subtenon, sed ankaŭ prelegon por tendaranoj. (Restas ne klare, ĉu la sekretario malatente legis la direktivon ne subteni esperantistojn, aŭ tute ne legis ĝin.)

La malfermo de BET-17 devis okazi la 31-an de julio. Kiam ĝis tiu dato restis kelkaj tagoj, mi kun kelkaj klubanoj el Klaipėda venis al Vieکشniai por ordigi la lokon. La direktoro de la lernejo donis la ŝlosilojn de komunloĝejoj kaj granda salono. Baldaŭ venis ankaŭ T. Lukoševičius. Ĉio iris glate. Tamen la 30-an de julio alkuris al mi la sekretario de la lernejo kaj diris, ke la direktoro bezonas ĉiujn ŝlosilojn. Mi konsterniĝis, ĉar antaŭ unu horo mi estis ricevinta telegramon, ke grupo da moskvaj esperantistoj jam forveturis kaj estos en Vieکشniai ĉi-nokte. Ni kun la ŝlosiloj rapidis al la direktoro kaj tie ni eksciis, ke la Centra Partia Komitato en Vilnius malpermesis la tendaron. Ni sukcesis konvinki la direktoron, ke venintoj el Moskvo povos unu nokton pasigi en Vieکشniai. Telesforas kaj mi decidis sendi telegramon al A. Vaitilavičius en Vilnius. Baldaŭ venis lia respondo, ke “Centra Komitato diskutas, kion fari”. Tiu ruza telegramo suficis, la direktoro



redonis la ŝlosilojn, tamen avertis, ke morgaŭ venos reprezentanto de la registaro, kiu definitive decidus pri la sorto de la tendaro.

Tiutempe la nombro de la venintaj esperantistoj kreskis. Estis nia feliĉo, ke el 241 tendaranoj 20 estis membroj de la komunista partio, inter ili ankaŭ profesoro S. Podkaminer, veterano de la milito. Li kunvokis partianojn – kiamaniere kontraŭstari malpermeson de la tendaro.

La 31-an de julio al Vieĉŝniai venis prezidanto de respublika komitato de profesiaj lernejoj V. Morkūnas, kun akompanantoj el la ŝtata sekureco. Li renkontiĝis kun la partianoj, gvidataj de S. Podkaminer, sed iliaj argumentoj ne donis rezulton. Tiam la partianoj minacis, ke ili plendos antaŭ la Centra Komitato en Moskvo pro senbaza dispelo de la tendaro. Tio efikis – V. Morkūnas permesis malfermi la tendaron, sed post kvin tagoj ĝi devas finiĝi. Tio kontentigis nin, kaj posttagmeze BET-17 estis malfermita, kompreneble, sen partopreno de oficialuloj. Subulo de V. Morkūnas restis en Vieĉŝniai kaj kaŝe observis nian programon. Sekvontage mi venis al li kaj proponis malkaŝe partopreni en ĉiuj niaj programeroj. Li konsentis, kaj poste esprimis sian miron pri la ordo kaj disciplinemo de la tendaranoj, kiuj plenumis ĉiujn postulojn de la organizantoj. La postulo fini la tendaron post kvin tagoj estis forgesita, aŭ estis donita adekvata direktivo, do ni tendumadis ĉiujn planitajn dek tagojn. Tamen mi kaj Telesforas ĉie, eĉ en la urbeto, sentis sin atente observataj.

Ĉar estis malpermesite pendigi ekstere ian ajn ŝildon pri BET, ni decidis alimaniere manifestiĝi en la urbeto. Dum la Dua Mondmilito en 1944 apud Vieĉŝniai distingiĝis du sovetiaj militistoj, postmorte ricevintaj la titolon “Heroo de Sovetio”. Estis decidite meti florkronon ĉe ilia monumento – ja neniu povis malpermesi tion... Kaj vere – kiam vicoj da esperantistoj kun florkrono

eliris surstraten, milico haltigis la trafikon kaj eskortis nin tra la urbeto ĝis la monumento mem. Ĉe la monumento parolis profesoro S. Podkaminer kaj aliaj, ne preterlasante la ŝancon mencii ankaŭ la ideojn de esperantismo.

Venis la ferma tago, kaj post la lasta vespermanĝo komenciĝis la adiaŭo. Ni senpage ricevis kamionojn, kiuj veturigis la partoprenintojn al fervoja stacio. Sur lerneja korto svarmis agentoj de la ŝtata sekureco – ili ankoraŭ atendis: eble okazos ia eksceso. Sed nenio okazis, ĉiuj partoprenintoj estis akompanitaj kun kantoj. Ni kun Telesforas ekspiris pli facile.

Estis interkonsentite: se pli poste iu estos vokita en partian komitaton, tien iros Telesforas kaj konfesos, ke li estis la ĉefa organizanto, „ĉar mi estis persona non grata“ – estinta politika prizonulo kaj ekzilito, pasiginta preskaŭ naŭ jarojn en Siberio (Komio)*. Mi estis agrable mirigita pri lia konsento kaj elkore dankis lin.

Ni ne eraris: post kelka tempo Telesforas estis vokita en partian komitaton, riproĉata kaj minacata, sed li kuraĝe sin defendis kaj evitis grandan punon – li nur estis eksigita el la agrikultura lernejo. Poste li ekloĝis en Panevėžys kaj daŭrigis aktivan la E-agadon. Ankaŭ la direktoro de la profesia lernejo en Vieĉŝniai ricevis partian punon pro la politika miopeco. Min oni ne tuŝis, tamen mi ne ricevis permeson veturi eksterlanden, kvankam kelkfoje mi havis invitojn al UK-oj.

Kaj finfine la statistiko: en BET-17 partoprenis 100 rusoj, 51 litovoj, 27 estonoj, 20 latvoj, 16 ukrainoj, 8 hungaroj, 16 de aliaj 9 naciecoj, entute el 41 urboj de la tiam a Sovetio.

Viktoras Baniulaitis

Fonto: *Litova stelo*, 1999, №3 (127), p 5–8.

* Komio estas ne en Siberio, sed en la eŭropa parto de Ruslando.

BET-20 apud Kaŭno (1983)

Post BET-18 en Latvio (1977) kaj BET-19 en Estonio (1978), la 20-a BET devis okazi en Litovio en 1979, sed oni ne permesis organizadon de BET en 1979, 1980, 1981 kaj 1982. BET-20 povis okazi nur de la 1-a ĝis la 10-a de julio 1983 en Noreikiškės, apudurbo de Kaŭno.

La 20-a Tendaro de Esperantistoj de Baltaj Landoj

De la 1-a ĝis la 10-a de julio 1983 en Noreikiškės [*Norejkiškes*] apud Kaŭno okazis la 20-a tendaro de esperantistoj de baltaj respublikoj. La devizo de la tendaro estis „Por paco kaj amikeco inter popoloj!“ Ĝin organizis Litovia Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), celante ne nur profundigon de la lingvoscio, sed ankaŭ plifortigon de la ideologia kaj politika rolo de Esperanto. Tia direkto de la tendaro konvenas al nia tempo, kiam la Esperanto-movado akiris novajn formojn kaj novan enhavon.

La tendaron partoprenis 307 reprezentantoj de 13 nacioj el 10 sovetiaj respublikoj. La organiza komitato de la tendaro (vicprezidanto de Litovia filio de ASE P. Jegorovas, membro de Klaipėda Esperanto-klubo V. Baniulaitis, prezidanto de Kaŭna Esperanto-klubo E. Laiconas kaj aliaj) faris grandan laboron.

La organizan komitaton efike helpis la Respublika Konsilantaro de Sindikatoj, Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, Centra Komitato de Lenina Komunista Junularunio (Komsomolo) de Litovio, Rektora Administracio de Litova Agrikultura Akademio (kiu gastame akceptis partoprenintojn de la tendaro) – ili ĉiuj aktive aliĝis al plena efektivigo de la planita programo.

La ceremonion de la malfermo de la tendaro partoprenis la prezidanto de Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando R. Petrauskas, provizora rektoro de Litova Agrikultura Akademio P. Bėčiūs, membro de la estraro de ASE kaj funkciulo de Komitato de Junularaj Organizaĵoj de Sovetunio V. Verigin, funkciuloj de Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, reprezentantoj de Leningrada, Ukrainia, Latvia kaj Estonia filioj de ASE, prezidantoj de urbaj Esperanto-kluboj el Kujbiševo, Odeso, Tbiliso kaj aliaj.

Konforme al la programo de la tendaro estis organizitaj kelkaj amasaj politikaj aranĝoj. Unuavice estas notinda la pacdefenda mitingo la 6-an de julio, kiun ĉeestis ĉiuj partoprenantoj de la tendaro. Inter la parolintoj menciindas: docento V. Ĥromov



(Talino), inĝeniero V. Titov (Leningrado), instruistinoj E. Anosova (Seversk, Donecka regiono), T. Vaŝjanina (Ĉuvaŝio), M. Vaŝĉinina (Strij, Lvova regiono), Leningrada poeto M. Denisov, membro de la estraro de ASE J. Ojalo (Talino), kamarado M. Cuckiridze (Tbiliso). La mitingo finiĝis per komuna voĉdono, uzante specialajn bultenojn „Mi voĉdonas por paco“, kaj certe ĝi estis ideologie kaj politike altnivela.

En la tendaro estis aranĝita vespero dediĉita al la 30-jariĝo de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Dum la vespero membro de la Internacia Komitato de MEM, prezidanto de Litovia Filio de ASE, docento de Vilna Ŝtata Universitato L. Skūpas, prelegis pri la historio, taskoj kaj rezultoj de la movado. Ankaŭ interese pasis renkontiĝo kun partoprenintoj de la Granda Patria Milito: ili prezentis siajn rememorojn, aparte pri la Leningrada Blokado, substrekante la gravecon de gardado kaj plifortigo de paco. Fine de la renkontiĝo estis prezentitaj du filmoj, sonigitaj en Esperanto: “Viva Lenin” kaj “La tutpopola heroaĵo”. Ankaŭ menciindas la kvizo “Kion Vi scias pri la Soveta Litovio?” kiun partoprenis 90 personoj. En la komplika kvizo venkis V. Titov kaj J. Ojalo.

Al la tendaranoj estis prezentitaj diversaj prelegoj. Membro de la societo “Scio” A. Gulbinskienė prezentis prelegon “Karl Marx kaj la hodiaŭa mondo”, membro de la sama societo I. Korotkov prezentis prelegon “Batalo de la Komunista Partio de Soveta Unio kaj de la Sovetia Registaro por paco kaj senarmigo”, J. Ŝitov el Lvovo – prelegon “Historia graveco de la 2a Kongreso de Ruslanda Socialdemokrata Laborista Partio”, V. Verigin – prelegon “La internacia jaro de komunikado”.

Dum la tendaro funkciis somera universitato. En la tri fakoj de la universitato (lingvistika, literatura kaj sciencteknika) estis prezentitaj 40 prelegoj: 13 lingvistikaj, 9

literaturesploraj, 13 sciencteknikaj kaj 5 pri ĝeneralaj sciencaj temoj. La prelegojn ĉeestis ĉirkaŭ 160 aŭskultantoj. Inter la plej interesaj prelegoj menciindas „Pri la semantika signifo de refleksiva verbo en la franca kaj litova lingvoj kaj en Esperanto“ (L. Skūpas), „Idiomajoj en Esperanto“ (G. Noreikaitė), „Modernismo de la franca teatro de la dudeka jarcento“ (N. Korĵenevskaja, Ufa), „Pri litovaj kuracaj herboj“ (A. Inokaitienė).

Por la partoprenantoj estis aranĝitaj kursoj por perfektigo de Esperanto-scioj. Entute laboris ok grupoj, kiujn gvidis spertaj pedagogoj (doc. A. Kerner, V. Cvetkova kaj aliaj). 66 instruistoj partoprenis du seminariojn, kie estis diskutataj problemoj de metodoj de la lingvoinstruado kaj preparolita la neceso de eldono de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj, pri atestado de instruistoj ktp.

Tre gravaj estis tri seminarioj por estraranoj de Esperanto-klubo. Prezidantino de Ukraina filio de ASE, E. Majburova, tre interese rakontis pri la agado de Esperanto-klubo de la respubliko. E. Majburova substrekis gravecon de ideologia laboro en la kluboj, lige kun la efektivigo de la rezolucioj de la junia (1983) plenkunsido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Soveta Unio; ŝi kritikis la klubojn, kiuj praktikas nur distran aŭ turisman agadojn, rakontis pri la respublika seminario de klubprezidantoj kaj la seminario por Esperanto-instruistoj. J. Ojalo rakontis pri la agado de estoniaj kluboj, pri la lerneja



konkurso ktp. Partoprenantoj de la seminarioj eksciis pri agado de la Esperanto-klubo en Vilno, Kaŭno, Kujbiŝevo kaj kelkaj aliaj urboj, pri la sabataj ordigoj de la teritorio, kiujn aranĝis moskvaj Esperanto-volontuloj, pri partopreno de leningradaj esperantistoj en marŝo por la paco, pri ciklo de publikaj prelegoj „Rolo de Esperanto en la batalo por paco“, prezentita en Kujbiŝevo, pri la internacia ekspozicio de infanaj desegnaĵoj, kiun aranĝis Esperanto-klubo de Pasvalys (Litovio). Estis interesaj raportoj pri internacia edukado (Kurŝenai, Lvovo, Panevežys, Samarkando k. a.), pri temaj vesperaranĝoj, dediĉitaj al diversaj landoj, pri internaciaj rilatoj, pri la ĝemeliĝoj de Esperanto-klubo de diversaj landoj: Minska Esperanto-klubo kun Potsdama Esperanto-klubo (GDR), Kieva Esperanto-klubo kun Esperanto-klubo en Kioto (Japanio), Klaipėda Esperanto-klubo kun Debrecena Esperanto-klubo (Hungara Popola Respubliko), ktp.

Estis aranĝitaj tri seminarioj por tradukistoj. Ilin gvidis la verkistino N. Andrianova (Ukrainio) kaj la instruisto P. Čeliaskas (Litovio). La partoprenantoj diskutis la malfacilaĵojn de tradukado, la problemon de eldono de literaturo en Esperanto en soveta respublikoj (krom Estonio, kie la eldonado estis sufiĉe bone organizita).

Ankaŭ la kultura programo estis sufiĉe riĉenhava. Ĉiuvespere okazis koncertoj. Estis aranĝitaj konkursoj de politika kanto kaj arta legado. Interesaj programoj estis prezentitaj dum vesperoj de Ruslando, Ukrainio, Litovio.



En la solena inaŭguro parolas Talis Bercis el Rigo

Precipe menciindas la alta nivelo de Ivova amatora grupo (Ukrainio) kaj de la grupo el Klaipėda Esperanto-klubo (Litovio). Tre interesa estis la teatraĵo „La ŝlosilo de abismo“ (de Krzysztof Gruszczyński) en Esperanto, kiun prezentis amatora grupo el Panevežisa Esperanto-klubo (ĝin reĝisoris profesia aktoro de Panevežisa drama teatro). Post la koncertoj estis bruligataj lignofajroj de amikeco, la junularo kantis kaj dancis. Dum ekskurso en Kaŭno la tendaranoj vizitis la muzeon de la 9-a fortikaĵo – la estinta koncentrejo, kie hitleranoj mortigis milojn da senkulpaj homoj.

La ceremonion de la fermo ĉeestis sekretario de la respublika konsilantaro de sindikatoj R. Baltrušaitis. La plej aktivaj esperantistoj (lokaj kaj gastantaj) ricevis memordonacetojn. La tendaro pruvis la neceson de tiaj renkontiĝoj en estonteco. Ili ne nur prezentas eblecon por profundigi la lingvoscion, sed ili estas ankaŭ lernejoj de ideologia-politika kaj organiza agado, ili helpas eduki sovetajn esperantistojn en la spirito de soveta patriotismo kaj proleta internaciismo, kaj kontribuas al aktivigo de la agado de Esperanto-klubo.

La stafeto de la tendaro estis transdonita al esperantistoj de Latvia SSR.

L. Skŭpas

membro de la Internacia Komitato de MEM
prezidanto de Litovia filio de ASE

Fonto: *Informa bulteno de ASE*
(Moskvo), 1983, №8-9.

Tradukis el la rusa Inita Tamošiūniene



Grupo el Armenio

BET-23: Amase en malgranda urbeto (1986)

La sepa Litovia BET, laŭvice la 23-a, okazis de la 10-a ĝis la 20-a de julio 1986 en la urbeto Smalininkai (12 km okcidente de Jurbarkas) kun rekorde multaj 472 partoprenantoj (estas notinde, ke tiutempe en la urbo estis nur ĉ. 800 konstantaj loĝantoj). Ĝi estis la antaŭlasta BET en la Litovia SSR.

La 23-a Baltia

Esperanto en nia lando pli kaj pli populariĝas. Tial ne hazarde la tradicia 23-a Baltia Esperantista Tendaro, okazinta inter la 10-a kaj la 20-a de julio 1986 en Smalininkai (Litovio), atingis rekordan nombron de la partoprenantoj – 472. Ne nur el la ĉebaltaj respublikoj – estis gastoj ankaŭ el 9 aliaj uniaj respublikoj. Eĉ reprezentantoj de Kamĉatko, Magadano kaj Vladivostoko. Absoluta plimulto inter la partoprenantaro – junularo. Renkonte al la 100-jariĝo de Esperanto tio precipe ĝojigas.

La jaro 1986 estis neordinara, riĉa de diversaj mondscale gravaj eventoj. Ĝi estis la jaro de la historia 27-a kongreso de Komunista Partio de Sovetunio, UN proklamis ĝin Internacia Jaro de Paco. Por esperantistoj 1986 estis la lasta antaŭjubilea jaro. Tiuj ĉi tri akcentoj konstante estis sentataj dum la 23-a BET. La tendaro estis dediĉita al tiuj tri eventoj.

La programo de la tendaro estis tradicia, tamen ĉi-jare kiel neniam antaŭe riĉa kaj streĉa. Soci-politikaj aranĝoj, prelegoj de somera universitato, perfektigaj kaj paroligaj kursoj de Esperanto, seminarioj de klubestroj kaj aktivuloj, abunda kultura programo, viktoriaj*, konkursoj. Okazis kelkdeko da diversaj aranĝoj.

La solenan malfermon de la tendaro partoprenis prezidanto de Litovia Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj R. Petrauskas, prezidanto de junularaj organizaĵoj de Litovia SSR V. Zinkevičius kaj la unua sekretario de distrikta komsomola komitato de Jurbarkas A. Puškoriūtė. La venintojn gratulis kaj bondeziris sukcesan laboron kaj enhavoriĉan ripozon sekretario de distrikta partia komitato de Jurbarkas D. Rapševičienė. Atentostreĉa estis prelego de docento en Vilniusa* Supera Partia Lernejo P. Beniušis „La 27-a kongreso de KPSU pri la nuntempa ideologia batalo“.

En mitingo, dediĉita al Internacia Jaro de Paco, unu post la alia parolis, kantis, deklamis reprezentantoj de diversaj respublikoj kaj urboj, ili kondamnis la agreseman politikon de Vaŝingtono kaj „stelajn militojn“, postulis liberon al Nelson Mandela, solidariĝis kun heroa popolo de Nikaragvio. Sloganoj,



plakatoj, vortoj. Precipe ĉiujn kortuŝis parolo de kuracisto-radiologo el Minsk V. Prjaĥin, kiu partoprenis likvidon de postsekvoj de la ĉernobila kcidento. Al la mitingo venis gastinta tiutempe en Jurbarkas moskvano, vicprezidanto de Konsilio de Militveteranoj de la 39-a Armeo, partopreninto en liberigbataloj de la distrikto Jurbarkas Gennadij Kalaĉov. Li parolis pri la liberigaj bataloj apud Jurbarkas, interesiĝis pri laboro de la tendaro, vizitis tombejojn de soldatoj en Smalininkai kaj Jurbarkas, metis florojn. Inter la tendaranoj estis kelkaj grizharaj veteranoj de la Granda Patrolanda Milito*. Omaĝe al ili okazis speciala aranĝo-renkontiĝo. Parolis la estono J. Ojalo, gasto el Daugavpils L. Gorelovskij, veterano el Gomelj M. Mandrik kaj aliaj.

La 14-a de julio estis labortago por tendaranoj. Ne malhelpis ĝin eĉ eta pluvo. En apartaj grupoj esperantistoj laboris en kampo de sovĥozo-teknikumo de Smalininkai, sarkis terpomojn, helpis al konstruistoj, ordigis teritorion. La perlaborita mono estis fordonita al la fonduso de helpo por Ĉernobil. Al la sama konto estis transdonita monsumo, aldone kolektita de la tendaranoj.

La tradicia somera universitato, krom plenkunsidoj, laboris en tri sekcioj: interlingvistika kaj esperantologia, medicina kaj ĝeneraltema. Oni aŭskultis pli ol 50 prelegojn kaj raportojn. Menciindaj estas tiu de minskano V. Prjaĥin “Sovetiaj kuracistoj kontraŭ nuklea milito”, tiu de moskvano B. Tokarev

“Lenin pri lingvoj”, prelegoj de tallinnano J. Ojalo pri originala literaturo en Esperanto, prelegoj de moskvano S. Kuznecov pri interlingvistiko kaj esperantologio, prelego de vilniusano A. Vaitilavičius pri psikologiaj trajtoj de esperantisto.

Funkciis 9 perfektigaj kaj paroligaj grupoj de Esperanto. La ekzamenon trapasis 90 tendaranoj. La instruistoj – spertaj pedagogoj O. Kopistjanska (Lvov), T. Auderskaja (Odesa), V. Virŝila (Panevežys), I. Kulakov (Voronej) kaj aliaj – ĉiutage po tri horojn pacience klarigis al la kursanoj karakteron de la lingvo Esperanto.

Multaj diskutindaj demandoj akumuliĝis por klubestroj, kiuj en la tendaro estis ĉirkaŭ 60, kaj aktivuloj de Esperanto-movado. Okazis ses iliaj kunsidoj. Oni interŝanĝis agadsperton, konsiliĝis pri agado renkonte al la 100-jara jubileo, pri perfektigo de kluba agado, pri evoluo de sobraj kaj sanaj vivtradicioj.

Dum la lastaj jaroj en la lando kaj la respubliko komenciĝas pli vasta eldonado de literaturo en Esperanto, dediĉita al nia kaj eksterlanda leganto. Aperis bezono de kvalifikitaj tradukistoj. Tial dumtendare por tiu ĉi agadsfero estis dediĉita ankaŭ sufiĉe multe da tempo – 50-60 interesiĝantoj pri tradukado de beletra kaj soci-politika literaturo al Esperanto profundigis siajn sciojn kaj majstrecon en speciala seminario.

Kiel kutime, multan atenton havis metodiko de la instruado, plialtigo de instruista kvalifiko – por tio



estis dediĉitaj kvar programaj okupiĝoj.

Estis aranĝitaj du „viktorinoj“. En la unua – “Kion Vi scias pri Soveta Litovio?” – plej bone sin montris moskvano V. Ĥmelinskij kaj dagestanano A. Junusov. La dua viktorino kontrolis la klercon pri historio de la movado, lige kun la proksimiĝanta 100-jara jubileo. Ĉi tie gajnis estonino A. Laur, moskvanoj kaj leningradanoj. La unuan fojon dum BET estis organizita forumo de esperantistoj – al demandoj de partoprenantoj respondis gvidantoj de ASE kaj ties respublikaj filioj. La aranĝo estis interesa kaj havis grandan sukceson.

Aparta vespero estis dediĉita por demonstrado de filmoj kaj diapozitivaj. Ni vidis filmojn sonigitajn en Esperanto – „Lecionoj de historio“, „La popoloj deziras pacon“, „La viva akvo de Litovio“ kaj ankaŭ amatorajn filmojn pri la antaŭaj tendaroj. Esperantistoj el Vladivostoko venigis kolorajn lumbildojn pri la tragedio de Hiroŝimo kaj Nagasaki, donacitajn de japanaj esperantistoj. Neniu povis resti indiferenta, spektante tiujn terurajn bildojn.

Kultura programo de la tendaro estis abunda kaj interesa. Ĉiu vespero estis dediĉita al amatoraj koncertoj de esperantistoj el apartaj respublikoj. Precipe restis en memoro la ensemblo de antikva kanto „Eterna muziko“ el Leningrado, speciale veninta por koncerti en Smalininkai, gajninto de diversaj konkursoj ensemblo de internacia kanto „Inspiro“ sub la gvido de V. Soroka el Kieva provinco. Sendube, plej bone sin montris ukrainaj* esperantistoj, kiuj preparis vere interesan, diversflankan kaj humoran koncerton. Atenton kaptis ankaŭ kantado de minskano V. Viĥarev. Laŭdinda estas amatora koncerto de la klubo el la litovia urbo Panevėžys. Latvajn popolajn kantojn en Esperanto bonege plenumis ensemblo sub gvido de A. Pumpure el Liepaja. Gaje pasis klubo de gajaj kaj spritaj, vespero de

poezio kaj humuro. La programo, preparita de esperantistoj el la urbo Jelec de Lipecka provinco, estis bazo de la vespero de politika kanto. Al loĝantoj de la urbo kaj distrikto Jurbarkas la tendaranoj montris sian komunan koncerton.

Multajn gajajn momentojn prezentis al niaj gastoj ekskursoj tra la urbo kaj distrikto Jurbarkas kaj al kasteloj apud la rivero Nemunas.

La tendaro komenciĝis per interkona vespero, finiĝis per adiaŭa vespero. Estis organizita sporta programo por junularo – ludoj de korbopilko, retpilko, konkurso de ŝako kun loka teamo de Smalininkai. La lokaj ŝakistoj estis pli fortaj. Krom tio funkciis diversaj ekspozicioj, butikoj de esperantaĵoj, riĉa libroservo, instruado de kantoj. Dum vesperoj longe lumis tendara fajro, sonis kantoj kaj dancmuziko.

La tendaro sendube havis grandan impulson por esperantista agado en nia respubliko, kie nun estas 39 kluboj kaj rondetoj. Absoluta plejmulto de la tendaranoj laŭ speciala demandilo taksis la tendaron tre bone.

Tre rapide pasis la dek tendaraj tagoj. Jen venis la solena fermo. Sumiĝas rezultoj de la tendara laboro, estas enmanigitaj donacoj al la plej aktivaj partoprenantoj. Sonas sinceraj dankvortoj al ĉiuj kontribuintoj en aranĝo de tiu ĉi vere interesa kaj grava tendaro. Solenan fermon partoprenis sekretario de la distrikta partia komitato Jurbarkas D. Rapševičienė.

Ĝis revido en la 24-a Baltia Esperantista Tendaro en Latvio!

Fonto: *Horizonto de Soveta Litovio*, 1986, №10, p. 57-60

Notoj: Vilniuso: Vilno. Viktorino: Kvizo.

Granda Patrolanda Milito: Ĉi tiel oni nomas la militon de USSR kontraŭ la invadintaj armeoj de la nazia Germanio kaj ties aliancanoj (22 jun 1941 – 9 maj 1945) kadre de la Dua Mondmilito. Ukrainjo: Ukrainio.

La plej granda BET kun pli ol 600 partoprenantoj (1989)

Enkonduko de la ĉeforganizinto

La 26-a BET, okazinta en aŭgusto 1989 en Noreikiškės apud Kaŭno, per kelkaj siaj trajtoj estis tre grava, tial ĝi bezonas apartan enkondukon. Unue, ĝi estis la lasta BET dum la sovetia periodo en Litovio. Due, ĝi estis la plej granda en la historio de BET-oj – ĝin partoprenis 608 esperantistoj. Trie, ĝi estis vere internacia, ĉar krom sovetianoj ĝin partoprenis esperantistoj el Bulgario, GDR, FRG, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj Belgio. Post la disfalo de Sovetunio la partoprenantaro de BET-oj draste falis pro aperintaj limoj, bezonataj vizoj, signifa altiĝo de prezoj k.s. Nur post kelkaj jaroj la kvanto de esperantistoj dum BET-oj rekreskis.

La jaro 1989 estis tre maltrankvila jaro, plena da multaj gravegaj kaj skuaj historiaj politikaj eventoj en tiutempaj baltiaj respublikoj de Sovetunio. Proksimiĝis sendependiĝo de Litovio. Ĉiutage kreskis kaj forte evoluis naciliberiga movado en Litovio. Proksimiĝis disfalo de Sovetunio. Tia situacio, kompreneble, ne povis ne tuŝi esperantistojn. Fine de 1988 en la 24-a restariga kongreso de Litova Esperanto-Asocio estis likvidita Litovia Filio de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj) kaj estis restarigita la memstara Litova Esperanto-Asocio, funkciinta inter 1919 kaj 1940. Tiamanere Litova Esperanto-Asocio rompis la subiĝajn rilatojn kun ASE kaj komencis kunlaborajn rilatojn kun ASE kiel kun egalrajta asocio de la najbara lando. En la 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brighton (Britio) somere de

1989 la komitato de UEA kuraĝe akceptis kiel aliĝintajn landajn asociojn Litovan Esperanto-Asocion kaj Latvian Esperanto-Asocion, kvankam tiutempe Litovio kaj Latvio ankoraŭ ne estis sendependaj landoj.

Eventuale pro tio pri la 26-a BET, malgraŭ ĝia elstareco, ni ne trovis multajn publikaĵojn en la tiutempa gazetaro. Ni trovis nur unu mallongan artikoleon en loka litova gazeto kaj iom pli longan artikolon en latva porjunulara gazeto. *Horizonto de Soveta Litovio* ne plu aperadis, ankaŭ *Litovio hodiaŭ*, kiu estis sovetieca propagandilo, ĉesis ekzisti. *Litova stelo* ankoraŭ ne estis restarigita. Pro la streĉitaj rilatoj inter ASE kaj Litova Esperanto-Asocio jam ne eblis kaj ne estis deziro uzi la tribunon de „Informa bulteno de ASE“. Sendube devis aperi eble eĉ multaj publikaĵoj pri BET-26 en loka gazetaro de tiutempa vastega Sovetunio, sed nun trovi ilin estas tre malfacila kaj temporaba afero.

Povilas Jegorovas

Esperantistoj en Noreikiškės

Ĉirkaŭ 600 esperantistoj el 11 sovetuniaj respublikoj kaj ankaŭ el GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Bulgario, Belgio kaj FRG renkontiĝis en la 26-a Baltia Tendaro. En diversaj sekcioj kaj seminarioj estis traktitaj aktualaj demandoj de la movado, oni parolis pri medicinaj kaj ideologiaj, sciencaj kaj teknikaj, sociaj demandoj. Ankaŭ estis enhavoriĉa kultura programo. Koncertis koruso de bulgaraj esperantistoj, spektaklon en Esperanto ludis pupteatro de Panevėžys.

Dum la tendaro estis eldonata bulteno, en kiu kune kun esperantistaj problemoj estis prezentita la socia vivo de nia respubliko.

T. Ž.

Fonto: *Tėviškės žinios* (Distrikta gazeto de Kaunas), 29 aŭg 1989, №104.

Tradukis el la litova Povilas Jegorovas

Esperantista forumo en Kaŭnas

Ekde la 11-a ĝis la 20-a de aŭgusto en Kaŭno okazis BET-26 (Baltia Esperanto-Tendaro). La unuan fojon ĝin partoprenis 60 eksterlandaj esperantistoj el sep landoj. La partoprenantoj venis el 131 urboj de USSR kaj el 28 eksterlandaj urboj.

De la tribuno sonis opinio, ke tiajn forumojn oni ne plu konsideru tendaroj, sed kongresoj. Do – ne BET, sed BEK? Por la vasta komunumo de esperantistoj pordojn gastame malfermis Litovia Agrikultura Akademio, kiu disponigis al la organizantoj de la aranĝo studentajn komunloĝejojn, manĝejojn, bufedojn, salonojn, ankaŭ teknikon por demonstrado, aŭdioaparataron kaj eĉ busojn por veturigi partoprenantojn al manĝejoj kaj ekskursoj. Ambicie! Nun ni devas pensi, kiel tian aranĝon realigi ĉe ni. Antaŭ du jaroj ni sukcese aranĝis ĝin surbaze de la teknikumo en Saulaine kun 406 partoprenantoj. Sekvontjare denove estos nia vico... Ĉu al simila ago pretas nia LAA aŭ alia altlernejo? Eble teknikumo, novkonstruita mezlernejo kaj baltia eksperimenta stacio de maŝinoj en Priekuļi? Sed eble ankoraŭ iu alia en alia loko? Karaj mastroj, vian komplezemon volonte akceptus Latvia Esperanto-Asocio! Ĝi fondiĝis surbaze de la Latvia Filio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj fine de la pasinta jaro iĝis sendependa unuo. Ankaŭ la Esperanto-asocioj de Litovio kaj Estonio fine de la pasinta jaro deklaris sian suverenecon. Tial

kun daŭraj aplaŭdoj estis akceptita informo de P. Jegorovas – delegito de la Universala Kongreso de Esperanto – ke la Litovia kaj Latvia asocioj estas akceptitaj kiel membroj de Universala Esperanto Asocio.

Dum ĉiuj tagoj de la tendaro okazis intensa laboro en sekcioj. En la grupo de komencantoj grandan amon kaj respekton akiris la pollanda esperantistino Ewa Bondar, kiu montris elstaran talenton, instruante laŭ tiel nomata Cseh-metodo. Sukcese laboris grupoj de paroliga perfektigo, sekcio de tradukantoj kaj Somera Universitato. Lecionojn prezentis altnivelaj instruistoj, profesoroj kaj kandidatoj de sciencoj. La unuan fojon por la plejmulto de la partoprenantoj estis ebleco partopreni Diservon en Esperanto. Elĉerpajn respondojn al ĉiuj demandoj dum speciale organizita renkontiĝo donis E. Klumbys – reprezentanto de la estraro de „Sajūdis“, deputito de la Supera Soveto de USSR.

La lingvo Esperanto estas kaj restas fenomeno. Esperantistoj ĝin lernas ĉeeste kaj koresponde. Unufoje semajne ili kolektiĝas en siaj kluboj. Ĉiumonate okazas iu granda aranĝo, internaciaj korespondadoj kaj turismaj interŝanĝoj. Nun eblas aboni periodaĵojn kaj dum la lastaj tri jaroj akiri literaturon en Esperanto. Tio ligas kaj tenas kune la entuziasmulojn. Ĉi-aŭtune rekomenciĝos ĉeestaj kaj korespondaj kursoj. Se vi ekinteresiĝas – sekvu reklamon!

Jāzeps Šlars

Tradukis el la latva Margarita Želve
Fonto: *Padomju Jaunatne*, 12 sep 1989.



La plej nekutima BET, aŭ SAT-kongreso en Litovio

Laŭ la kutima land-ordo de la Baltiaj Esperanto-Tagoj, post la 28-a BET, okazinta en 1991 en Tartu (Estonio), la 29-a BET devus okazi en Litovio. Tamen ankoraŭ en 1990 Litova Esperanto-Asocio (LEA) ricevis de SAT proponon gastigi en 1992 la 65-an Kongreson de SAT. Estus ege malfacile aŭ tute neeble okazigi en Litovio du grandajn internaciajn aranĝojn en la sama jaro. LEA do decidis kunigi tiujn du aranĝojn kaj en la programo de la 65-a kongreso de SAT konservi laŭeble ĉiujn tradiciajn programerojn de BET. Kaj tio estis realigita. Ankaŭ la partoprenantaro de la 65-a kongreso de SAT estis esence BET-a. Tial oni povas konkludi, ke reale la tradicio de BET-oj daŭris kaj ne estis rompita, kvankam la 29-a BET okazis nur en 1993 en Priekuli (Latvio). Pro tio la 65-a kongreso de SAT ĉiam aperas en la statistiko de BET-oj kaj ankaŭ en nia serio pri la Litoviaj BET-oj.

65-a Kongreso de SAT

Okazis en urbeto de Litova Agrikultura Akademio apud la urbo Kaunas la 5-an –15-an de aŭgusto 1992. La Akademio disponigis al la kongresanoj sufiĉe da vastaj aŭditorioj, apude situantaj studentajn hejmojn por loĝado, studentajn manĝejojn kun relative bonaj pladoj por relative malalta prezo. Ŝatantoj de komforto loĝis en hoteloj de Kaunas.

Al la Kongreso aliĝis 617 personoj, venis 452, 165 personojn detenis diversaj kaŭzoj,

plej verŝajne psikologiaj – la timo de supozata nestabila situacio en la lando, antaŭnelonge akirinta sendependecon, ankoraŭ kun multaj garnizonoj de la soveta armeo. Certe, la timon spertis pleje okcidentanoj. Tamen, kiuj venis, estis ĝojigitaj per malaltaj por ili prezoj: „Per tri markoj aŭ dek frankoj oni povis en restoracion inviti kaj duope bone kaj abunde festeni”, – skribis pri siaj impresoj en Kaunas la kongresano Vilhelmo Lutermano (supozeble Wilhelm Luthermann el Germanio) en la septembra (9-a) numero de „Sennaciulo“. Certe neniu ian malagrablajon spertis pro la supozata nestabileco.

Kontraŭe, al kongresanoj el la najbaraj landoj, precipe el la tute antaŭnelonge estintaj kun Litovio en la sama kaldrono, nomita Sovetunio, la prezoj kaj baroj estis pli malfacile venkeblaj. Ekzemple el Ukrainio (verŝajne ankaŭ el aliaj ekssovietiaj respublikoj) oni ne rajtis sendi perpoŝte aliĝkotizon. Ĝin oni „kontrabandis“ helpe de personoj, veturantaj al Litovio, eĉ ne esperantistoj. Malgraŭ tio el Ukrainio venis 57 personoj, el Rusia Federacio 109, Tatarstano 2, Kazahŝtano 1, Belorusio 12, Latvio 14, Estonio 7. Certe la plej facila aliĝo estis por

**Fragmento el la komuna foto
(Sendis Gražina Opulskienė)**



litovoj, tamen da ili (registritaj) estis relative malmulte – nur 100. El okcidentanoj rekordis francoj – da ili per aŭtobuso kaj aliaj rimedoj venis 38. Laŭvice ni menciis Svedion – 10, Germanion – 8, Nederlando – 8. Interesan buntan prezentas aliaj landoj, „sendintaj“ nur po 1 ĝis 5 delegitojn: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥio-Slovakio, Ĉinio, Hindio, Hispanio, Hungario, Kroatio, Portugalio, Svislando, Usono. Entute estis reprezentitaj 28 landoj el 4 kontinentoj.

La ĉiutaga kongresa gazeto „Kongresvoĉo“, redaktata de Petras Čeliauskas, donis precizan laŭprocentan statistikon de la kongresanoj laŭ sekso (virinoj, kiel ĉie, dominis), laŭ aĝo (superis 25-50-jaruloj), laŭ profesio (superis oficistoj}. Bedaŭrinde mankas sciigoj, kian profesion okupis membroj de SAT. Tiun demandon iom nebule tuŝas ankaŭ la estimata Vilhelmo: „la plej granda parto de la alvenintoj ne venis pro SAT kaj ties celoj, sed simple por renkontiĝi en Esperanta etoso“. Li bedaŭras ankaŭ malabundan partoprenon en ĝeneralaj kunvenoj de SAT. Da ili laŭ la programo estis kvin, krom kunsidoj de diversaj sekcioj: pacista, naturista, amikeca reto, sindikatista, liberecana, liberpensula, landa komitato. Kunvenoj kaj prelegoj de vegetaranoj, medicinistoj, diplomatoj, literaturistoj, historiistoj, politikistoj, etnistoj kaj iuj aliaj okazis supozeble ekster programo de SAT mem. Preskaŭ ĉiutage okazis prelegoj pri ekologio, inter ili tiaj specifaj kiel „Vera kaj falsa ekologio“ de Gilbert R. Ledon el

Brazilo, „Ekologia pasportado de transporto“ de Tatjana Bočkova el Moskvo.

El la ĉiuvesperaj koncertoj kaj teatraĵoj ni emfazis tiun de la revivigita centjara Sankt-Peterburga societo „Espero“, kies violonistino 12-jara Tatjana Kojevotova estis tondre aplaudata. Ŝi estas invitita por perfektigi al muzika lernejo en Strasburgo. El la sama rusa urbo nin ravis solisto Djalil Begiŝev per italaj kantoj kaj la ensemblo „Prima“ per religiaj kantoj sub gvidado de esperantistino Jelena Petrenko. Precipe litovojn surprizis interpreto de poezio de Eduardas Mieželaitis en teatra prezentado „Virino – kvar bildoj“ de polo Jerzy Fornal kaj en „Ponto“ de kroatio Vida Jerman. Pupteatro el Ternopil prezentis „Bonan tagon, tigro“, grupo el Slavjansk (ambaŭ el Ukrainio) – „Historio kun metranpaĵo“ (la francdevena vorto „metranpaĵo“, transprenita el la rusa lingvo, signifas laboriston de presejo, en Esperanto – enpaĝigisto, paĝopreparisto. A.V.). Litovoj ne nur prezentis siajn kantojn, eĉ instruis ilin. Estis instruata ankaŭ la litova lingvo. Komuna diversnacia koncerto de kongresanoj okazis lastan jaŭdon, la 13-an de aŭgusto.

La kongresanoj konatiĝis ne nur kun Kaunas – la ĉefurbo de Esperanto en Litovio, sed ĝuis tuttagajn ekskursojn ankaŭ al la politika nuntempa ĉefurbo Vilnius kaj la antikva ĉefurbo Trakai, al la subĉiela etnografia muzeo Rumšiškės kun aŭtentikaj vilaĝoj el diversaj regionoj de Litovio, la perŝipan sur la rivero Nemunas al la Kurŝa Terlango. Ĉiutage funkciis perfektigaj kaj paroligaj kursoj, okazis kelkaj prelegoj pri metodiko de instruado.

La malfermo estis multe pli impona ol la fermo. Dum la inaŭgura himno staris en la prezido (atentu la foton) administranto de Kaunas-a distrikto Povilas Vengeliauskas, prezidanto de Kaunas-a distrikto Vidmantas

En la solena malfermo, la kongreson salutas nia rusa peranto, kamarado Leo Vulfoviĉ



Vitkauskas, urbestro de Kaunas esperantisto Arimantas Račkauskas, la ĉefa organizanto de la Kongreso, vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, vicprezidanto de Supera Konsilio de Litova Respubliko Kazimieras Motieka, prezidanto de LEA Algimantas Laurynas Skūpas, ĝenerala sekretario de SAT Krešimir Barković, membroj de la Plenumkomitato de SAT: Guy Cavalier kaj Jacques Banner.

En la Deklaracio, plene presita en „Kongresvoĉo“ №11 kaj en „Sennaciulo“ №9, la kongreso alvokas ĉiujn landojn observi homrajtojn sendepende de nacieco kaj al solidareco kun laboruloj de ekssocialismaj landoj, trafintaj en malbonajn kondiĉojn dum transiro al merkatekonomio.

La Kongreso estis vaste kaj detale lumigita en televido, radio kaj gazetaro de Litovio, precipe dank' al la energia organizanto de la Kongreso Povilas Jegorovas. La redakcion [de *Litova Stelo*] atingis 14 gazetoj kun priskriboj de la kongreso, inter ili tiel prestiĝaj kaj popularaj kiel la ŝtata „Lietuvos aidas“, la ĉefurbaj „Respublika“, „Vakarinės Naujienos“, „Gimtasis Kraštas“, ne menciante tiujn de Kaunas mem. Longajn raportojn presis ankaŭ gazetoj de relative malproksimaj lokoj, ekz. en Klaipėda kaj Pasvalys.

Adomas Vaitilavičius

Fonto: *Litova Stelo*, 1992, №4, p. 5-8.

La supran materialon kompilis kaj redaktis Povilas Jegorovas kaj Aleksander Korĵenkov.



Slavjanskanoj tuj post la koncerto

Du komentoj

Nikolao Gudskov:

Jes, mi memoras la kongreson – ĝi estis, eble, la plej brila internacia Esperanto-aranĝo (inkluzive UK-ojn!), en kiuj mi partoprenis – reale estis kunigo de karakteroj kaj de la SAT-kongresoj, kaj de la „neŭtralaj“ kun sinergia rezulto. Nu, ankaŭ la epoko estis entuziasmigaj pri ĉio, ankaŭ por perspektivoj de Esperanto, kiu donis al la partoprenantoj aldonan vervon. En la raporto ne estis menciitaj pluraj interesaj aferoj (duonnokta kafejo, kelkaj interesaj artistoj...), sed ĝenerale mi kun granda nostalgio rememoras la aranĝon... kiel ĉiujn aliajn el la unua duono de la 1990-aj, la plej optimisma kaj movade aktiva periodo.

Nikolao

Gražina:

Dum multaj jaroj post tiu kongreso, partoprenante en SAT kongresoj, mi aŭdis belajn rememorojn de SAT-anoj pri la kongreso, kie ili estis riĉuloj pro malaltaj prezoj, kie ili perdis kelkajn kilogramojn pro nekutimaj al ili porcioj de tamen bongusta manĝo, kaj kie precipe imponis ilin „soveta“ maniero pasigi noktojn ĉe la fajro kun gitaro kaj kantoj. „Ni havis nenion krom teo kaj tamen la etoso kaj sento ĉe tiu lignofajro estis bonega“ – rakontis al mi tiama ĝenerala sekretario de SAT K. Barkoviĉ.

Estas la kongreso, kiu plej bone restas ĉizita en mia memoro, ja estis mia unua kongreso post Esperanto-kurso. Nun, post tiom da jaroj en Esperantujo, mi konscias, ke mi estis tre bonŝanca trafi bonege organizitan kongreson, kie cirkonstancoj kaj fremdlandaj kongresanoj devigis min ekde la unua minuto paroli Esperanton. Tie mi renkontis miajn plej karajn Esperantajn amikojn, kun kiuj la amikeco daŭras ĝis nun. Post 10 tagoj en tiu etoso mi revenis hejmen jam vere konvinkita esperantistino, kiu sufiĉe flue parolas la lingvon.

BET-31 en Girionys (1995)

La 31-a BET, okazinta la 8-16-an de julio 1995 apud Kaŭno kun 203 partoprenantoj, estis negranda kompare kun la tri antaŭaj Litoviaj BET-oj (358 partoprenantoj en BET-20, 1983; 472 partoprenantoj en BET-23, 1986; 608 partoprenantoj en BET-26, 1989) kaj kun la 65-a Kongreso de SAT (452 partoprenantoj, 1992), kaj ĝi unufoje ne havis gravan programkontribuon de esperantistoj el Ruslando kaj Ukrainio.

Sed danke al la Litoviaj kaj alilandaj instruistoj, prelegantoj kaj artistoj la programo estis ne malpli riĉa kaj interesa ol antaŭe. La suba artikolo el Litova Stelo koncize prezentas la 31an BET. La artikolon akompanas la rezolucio, akceptita fine de BET-31

BET-31 pasis sukcese

Ducent tri samideanoj el dek ses landoj kunvenis por pasigi kelkajn tagojn en Esperanta medio. La tradicia, jam 31-a BET okazis de la 8-a ĝis la 16-a de julio en Girionys, en Arbarista Lernejo, situanta surborde de Kaunasa Maro, 17 km sudoriente de la urbo. Plej multe da homoj venis el Litovio (153) kaj Latvio (26); po tri el Estonio, Ĉinio, Germanio, Pollando; po du el Brazilo kaj Rusio; po unu el Belorusio, Britio, Ĉeĥio, Danio, Italio, Norvegio, Svedio, Svislando. Dek ok estis geknaboj ĝis 10-jara aĝo. La programo de BET-oj jam fariĝis tradicia. En Somera Universitato prelegis: Kirsten-Tove Thuro (Danio) pri „La nova mondbildo de Martinus“; Margarete Bettmann (Germanio) – „Tempa trakto“, pri spuro de utera periodo sur homa spino; Telesforas Lukoševičius (Litovio) pri litova Esperanta literaturo; Povilas Stašys (Litovio) pri „Kolektado kaj Esperanto“; Valdas Banaitis (Litovio) parolis pri „Fremdlingva edukado kaj Eŭropa regiona integriĝo“. Paroligajn kaj

perfektigajn kursojn gvidis Aristophio Alves (Brazilo) kaj Aldis Bušs (Latvio). Organiziloj kun infanoj afable konsentis Monika Bilnik (Pollando). Dezirantoj povis konatiĝi kun la historio kaj karaktero de la litova lingvo (gvidis Petras Čeliauskas). Krome kunvenadis kaj siajn problemojn pridiskutis instruistoj de Esperanto, tradukistoj, klubestroj kaj aktivuloj, medicinistoj. Ĉiutage aperadis dupaĝa informilo „BETulo“ (red. P. Čeliauskas). Estis organizitaj ekspozicietoj de pentraĵoj kaj man-faritaĵoj (A. Šidlauskienė, I. Jaloveckytė, B. Šermienė, O. Jarušaitienė), funkciis libroservo (V. Tumėnas), estis vendataj insignoj kaj aliaj esperantaĵoj.

Dimanĉe en Kaunasa preĝejo de karmelanoj okazis Sankta Meso en Esperanto. Merkrede la partoprenantoj povis ekskursi tra Kaunas kaj al muzeo de popola vivmaniero (skanseno) en Rumšiškės, kiun ili atingis per ŝipo. Okazis ankaŭ ekskurso tra la loka parko, kiu okupas 210 hektarojn, kaj en ĝi kreskas ĉ. 350 specioj da arboj. Vespere okazadis artaj prezentiĝoj: kantis konata litova kantisto Valentinas Čepkus, Esperanta koruso el Panevėžys, gvidata de Monika Vasiliauskienė. Komponisto Mieczyslaw Litwinski kaj aktorino Gabija Vileniškienė prezentis sintezan vesperon de muziko kaj poezio. Kaunasaj Esperanto-kluboj montris spektakleton “Kreo de homo”.

BET-34 en Veisiejai (1998)

De la 17-a ĝis la 24-a de julio 1998 en Agrikultura Lernejo de Veisiejai gastis kaj laboris 253 esperantistoj el 14 landoj, partoprenantoj en la 34-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

La partoprenantoj estis: el Litovio – 157, el Pollando – 56, el Finnlando – 13, el Latvio – 9, el Estonio – 5, el Svedio – 3, el Belorusio – 3, el Aŭstralio, Britio, Danio, Francio, Germanio, Nederlando, Ukrainio – po 1. Kiel kutime, dominis virinoj (64 procentoj).

Laŭ la aĝo la statistiko estas jena: junuloj ĝis 18 jaroj: el Litovio 22, el eksterlandoj 7, entute 29; 19-25-jaruloj: el Litovio 24, el eksterlandoj 8, entute 32; 26-60-jaruloj: el Litovio 94, el eksterlandoj 44, entute 138; pli ol 60-jaraĝaj: el Litovio 17, el eksterlandoj 37, entute 54.

La programo estis tradicia: diversnivela E-kursoj (ilin gvidis Trevor Steele, Nina Pietuchowska, Danuta Kowalska kaj Monika Bilnik); somera universitato; seminarioj por klubestroj kaj por E-instruistoj; debatoj pri situacio de E-movado; ekskursoj al Druskininkai kaj Liškiava; spektado de filmoj; koncertoj de vilaĝa kapelo el Lazdijai kaj de esperantistoj el Panevėžys; spektaklo Sigutė de Kaunasa junulara E-klubo; ekspozicio de florkomponaĵoj de Algimantas Raižys. Okazis ankaŭ katolika meso kaj ekumena diservo. La partoprenantoj

vizitis lokan muzeeton, kie estas ankaŭ anguleto, dediĉita al L. Zamenhof. La partoprenantoj ĉiutage senpage ricevadis informilon *Laga Ondo*.

Tamen la ĉefa evento sendube estis inaŭguro de nova monumento al la kreinto de Esperanto. La iniciatintoj de la monumento estis pastro Pranas Gavėnas kaj Alfonsas Vitkauskas el la regiona centro Alytus. La buston de Ludoviko Zamenhof el granito ĉizis skulptisto Julius Narušis. La inaŭguro, kiu okazis la 22-an de julio en urba parko, honoris nepo de la aŭtoro de Esperanto L. Zaleski-Zamenhof, veninta el Parizo. Lia parolado estas publikigita aparte. Salut-mesaĝon sendis ŝtata prezidento de Litovio. En la inaŭguro partoprenis oficialaj reprezentantoj de distrikta kaj loka administracio, du parlamentanoj, multaj loĝantoj de Veisiejai. Ĉe la nova monumento oni metis florojn...

Surskribo en la litova kaj en Esperanto tekstas:

*Kreinto de Esperanto
Ludoviko Zamenhof
en 1885 verkis en Veisiejai
unuan lernolibron de la Internacia Lingvo.*

Sur la flankaj platoj de la piedestalo oni povas tralegi en ambaŭ lingvoj citaĵon el parolo de L. Zamenhof en Londono dum Universala Kongreso en 1907, kie li mencias Litovion:

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj



songoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro...

La monumento en la urbeto, kie Zamenhof iam loĝis, dece kompletigos liston de ZEO-j en la tuta mondo.

Alvoko de la partoprenantoj al Klerigministerioj de Estonio, Latvio, Litovio



La internacia kunlaboro tutmonde kaj en baltiaj landoj konstante pliintensiĝas. Nuntempe en lernejoj de baltiaj respublikoj gelernantoj devas lerni kelkajn lingvojn. Lernado de la dua nacia fremda lingvo estas granda ŝarĝo por lernantoj, ankaŭ por niaj ŝtatoj.

Ni proponas solvon, kiu permesas ŝpari monon kaj donas eblecon pli bone ellerni gepatrajn lingvojn kaj aliajn pli necesajn studobjektojn. Jam pli ol 110 jarojn en la mondo sukcese funkcias neŭtrala internacia lingvo Esperanto, agnoskata kaj rekomendata de Unesko. Logika gramatiko, klara fonetiko kaj konstanta loko de akcento en vortoj ebligas multfoje pli rapide ĝin ellerni ol naciajn lingvojn. Ĝi estas ankaŭ fleksebla kaj esprimriĉa. Ĉiujare okazas tutmondaj kongresoj de esperantistoj, kie miloj da diversnaciaj partoprenantoj interkomuniĝas sen interpretistoj. Uzado de Esperanto pli kaj

pli disvastiĝas en la mondo. Pri tio atestas ankaŭ riĉaj paĝoj en Interneto.

Instruado de Esperanto en baltiaj landoj plivastiĝas. Ekzemple, oni fakultative instruas Esperanton en Litovio: en universitatoj de Klaipėda kaj Ŝiauliai. Kiel elekteblan studobjekton oni lernas Esperanton en Pedagogia lernejo de Marijampolė, en 37-a lernejo de Kaunas. Kiel elektitan lingvon oni studas ĝin en Latvio: en Ekonomika kaj Kultura Altlernejo en Riga kaj aliloke.

En 1997 direktorino de Kleriga departemento de Litovia Klerigministerio jam subskribis dokumenton, laŭ kiu estas oficiale permesita instruado de Esperanto en litoviaj lernejoj kiel libere elektita studobjekto kun deviga vizitado de lecionoj.

Ni afable petas Klerigministeriojn de Estonio, Latvia kaj Litovia Respublikoj rekomendi instruadon de Esperanto kiel de la dua libere elektita fremda lingvo en niaj ŝtatoj. Ni opinias, ke tio efektive kaj praktike plifortigos kunlaboradon inter niaj popoloj.

Je la nomo de partoprenantoj de la koncernaj Esperanto-Asocioj:

Prezidanto de Estona Asocio de Esperanto
Aŭgusto Kilk
Prezidanto de Latva Esperanto-Asocio
Alida Zigmunde
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio
Povilas Jegorovas
La 23-an de julio 1998



BET-37 apud Kaŭno (2001)

Litova Agrikultura Universitato apud Kaunas jam kelkfoje disponigis siajn ejojn por kunvenoj de esperantistoj. Ĉi-jare de la 7-a ĝis la 15-a de julio ĉi tie okazis la 37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Por pasigi semajnon en amika etoso, por praktiki la lingvon, por konatiĝi kun la urbo kaj Litovio, kolektiĝis 303 samideanoj el 18 landoj.

Post kelk-jara interrompo ni denove ekvidis esperantistojn el Rusio, Ukrainio, Belorusio, inter ili estis veteranoj de iamaj BET-oj kaj SEJT-oj – M. Bronštejn, A. Gonĉarov, A. Belov, M. Lineckij – kiuj pliriĉigis la programon per siaj kontribuaĵoj.

La programo de BET-oj fariĝis jam tradicia kaj iomete similas al tiu de Universalaj Esperanto-Kongresoj: prelegoj en Somera Universitato, diversnivelaĵoj kursoj de la lingvo internacia, seminarioj por E-instruistoj kaj aktivuloj, ekskursoj, distraj vesperoj. Krome okazis diservoj en la universitata kapelo, dum kiu Esperante kantis infana koruso gvidata de L. Katilienė. Interesiĝantoj povis konatiĝi kun la litova lingvo, ĝiaj historio kaj literaturo.

En la Somera Universitato prelegis M. Bronštejn („Postnikov kaj Zamenhof – aventuristo kaj idealisto“, „Josif Brodskij – poeto de la jarcento“, „A. Puŝkin – vivo, poezio, tradukoj“). A. Gonĉarov („Fascina riĉiĝo de E-pensokosmo“, „Biokampo de

la homoj kaj ties influo al la ĉirkaŭaĵo“, „Instruado de Esperanto en la moderna tempo“, „E-klubo – degenero aŭ nova vidpunkto“, „E-movado el la vidpunkto de la sistemteorio“), J. Petrovskaja („Popola verkisto Jakub Kolas“), N. Caragea („Fama infanlibro – interesa aŭtoro“), V. Banaitis („Idealismo sur la sojlo de Eŭropa Unio“), J. Parzyszek („Ŝapiro – gvidanto de Esperanto-movado en Bjalistoko“, „La bazaj reguloj de merkato. Ĉu ni apliku ilin en E-agado“), E. Karczewska („Esperanto-mono kaj medaloj“), L. Filipova („Ĉeĥio kaj ĉeĥa E-movado“), K. Tove Thuro („Ĉu reklamo aŭ informado pri Esperanto“, „Signifo de la laboro de Martinus al la homaro kaj mondpaco“), Z. Garbaravičienė („Ajurveda“), V. Batijevski („Mineralo ŝungito por la sano“), I. Enghart („Praktika mikologio – mirindaĵo de Indonezio“), V. Matuzevičienė („Pri sana vivmaniero“), S. Staišiūnaitė („Yumeiho-terapio“), W. Posthuma („La organizo de Lingva Festivalo“).

Precipe necesas mencii varian, abundan kaj profesinivelan artan programon, kiu estis merito de Aida Čižikaitė: ŝi sukcesis venigi sur scenejon konatajn kolektivojn. Post la



oficiala inaŭguro la Ĉambra Orkestro de Kaunas, gvidata de la fama dirigento Pavel Berman, majstre plenumis Seksteton por kordaj instrumentoj de P. I. Ĉajkovskij (Opus 40), konsistantan el kvar partoj.

Por la BET-anoj koncertis la virina ensemblo Elegija

kaj infana dancgrupo Sūkuryrs, la blovorkestro Ažuolynas, la koruso de Vytautas-preĝejo kaj grupo de popolaj dancistoj Ainiāi, la folkloro ensemblo Žaisa, la grupo Asortī el Vīsinas, infana estrado DND; pupteatro prezentis esperantlingve la spektaklon “La ora ovo”. En la programo partoprenis ankaŭ polaj kaj ukrainaj esperantistoj. Post la fermo la aktorino B. Prekevičiūtė deklamis tradukojn de litova poezio, kantis la solistino O. Matusevičiūtė.

Por la partoprenantoj estis organizitaj senpagaj ekskursoj tra la urbo Kaunas kaj al la fama arkitektura ensemblo de Pažaislis-monaĥejo. Dum la tuttaga ekskurso estis vizitita Parko de Grūtas kaj la urbeto Veisiejai, kie en 1885 loĝis L. Zamenhof.

Albinas Pečelis

Fonto: *Litova Stelo*, 2001, №4.

La 37-an fojon en Baltio

Tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-37) okazis la 7–15-an de julio en Litovio. Por pasigi unu semajnon en amika etoso kaj praktiki nian lingvon venis 303 esperantistoj el 18 landoj. En ĉirkaŭaĵo de Kaunas ili povis ne nur ĝui la belan veteron, sed ankaŭ partopreni abundan programon de la aranĝo.

Dum la solena inaŭguro de BET-37 post enkondukaj vortoj de la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, estis tralegitaj salutmesaĝoj de Valdas Adamkus, prezidento de Litovio, kaj de L. C. Zaleski-Zamenhof. Saluti ankaŭ reprezentantoj de landoj, kaj poste sekvis la koncerto de la Ĉambra Orkestro de Kaunas, gvidata de Pavel Berman.

Ĉiumatene dezirantoj komune kuradis kaj naĝis en la apuda artefarita lageto. Post la matenmanĝo eksterlandanoj povis konatiĝi kun la litova lingvo. Por lernemuloj funkciis paroligaj kaj perfektiga kursoj. La somera universitato estis riĉa je diverstemaj prelegoj. Gastoj kaj lokaj esperantistoj prelegis pri la E-movado, literaturo, sana vivmaniero ktp.



Biruta Rozenfelde (Latvio), Povilas Jegorovas (Litovio) kaj August Kilk (Estonio)

Se iu trovis prelegojn neinteresaj, li/ŝi povis spekti videofilmojn, viziti la libroservon aŭ „krokodilejon“, kie troviĝis gaja kolekto da krokodiloj kaj aliaj ekspoziciaĵoj.

Ĉiuvespere okazis prezentado de popolaj metioj (ceramiko, ligna skulptoarto, teksaĵoj ktp.), diversaj koncertoj, instruado de balaj dancoj kaj diskotekoj. La pupteatro speciale por BET-37 preparis spektaklon en Esperanto laŭ litova popola fabelo *La Ora Ovo*.

Dikredantoj povis partopreni en loka kapelo la katolikan meson kaj Ekumenan Diservon. La infanoj havis proprajn programerojn. La etoson varmigis aŭkcio kaj diversaj ludoj, kiujn prezentis gastoj el Ukrainio, Ruslando kaj Germanio. Ĉiutage aperis informilo *BETago*.

Dezirantoj ekskursi vizitis la malnovan urboparton de Kaunas kaj monaĥejon Pažaislis, kaj ili havis tuttagan ekskurson al la parko Grėtas apud Druskininkai, kie estas kolektitaj kaj starigitaj 70 diversaj monumentoj de sovetaĵ „idoloj“. Survoje oni vizitis la urbeton Veisiejai, kie Ludoviko Zamenhof loĝis kaj kie estas monumento al li.

BET-37 finiĝis, sed al la Organiza Komitato daŭre venas kaj kritiko kaj dankvortoj. La unua helpas rimarki erarojn kaj mankojn en nia laboro, kaj la dua ĝojigas niajn korojn.

Rita Valčiukaitė

Fonto: *La Ondo de Esperanto*, №2001, 8-9.

BET-40 en Birŝtonas (2004)

La 10-18-an de julio 2004 en la litova banurbo Birŝtonas, apud ĉefa litovia rivero Nemunas, okazis vicaj jubileaj someraj tradiciaj la 40-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiujn organizis Litova Esperanto-Asocio.

Por pasigi semajnon en amika etoso, por praktiki la lingvon, por konatiĝi kun la urbo kaj Litovio, kolektiĝis 303 samideanoj el 18 landoj.

Tiuj ĉi tagoj okazas laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio ekde 1959. Estis kelkaj jaroj, kiam BET ne okazis. En BET-40 partoprenis 257 registritaj esperantistoj el 17 landoj, sed efektive la aranĝon entute partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj, ĉar multaj litovaj esperantistoj venis nur por ambaŭ semajnfinoj kaj oficiale ne aliĝis al BET. Krome, estis kelkaj dekoj da aliĝintoj, kiuj reale ne venis (interalie, el Francio, Ganao, Islando k.a.).

Al la aranĝo salutmesaĝojn sendis tiutempa provizora prezidento de Litovio Arturas Paulauskas, prezidanto de UEA Renato Corsetti, ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, nepo de Ludoviko Zamenhof Ludoviko Zaleski-Zamenhof. En la solena

inaŭguro de la kongreso partoprenis kaj parolis vicurbestro de Birŝtonas Juozas Aleksandravicius, parlamentano kaj esperantisto Stasys Kruzinauskas, en la solena fermo de la aranĝo partoprenis kaj parolis urbestro de Birŝtonas Antanas Zenkevičius.

Ĉiutage aperis kvarpaĝa grandformata gazeto „Meandro“, kiun redaktis Petras Celiauskas kaj Choe Taesok. Entute aperis 7 numeroj.

Programo de la aranĝo estis kutima – eblis aŭskulti multajn prelegojn en Somera Universitato, enkadre de la aranĝo okazis diplomiga seminario de IEI, gvidata de Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos, ankaŭ okazis vica Balta Esperanto-Forumo, gvidata de Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka.

Oni povis aŭskulti kelkajn prelegojn pri la tradukita literaturo en Esperanto, estis tri grupoj de diversnivela Esperanto-kursoj, kiujn gvidis Sabina Trenner, Ewa Bondar,



Nina Pietuchowska. Petras Celiauskas ĉiutage prelegis pri litovaj lingvo kaj literaturo, estis prezentita nova libro de Sezonoj „Ĉeriza ĝardeno“, okazis seminario pri problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tre riĉa estis kultura programo de la aranĝo.

Ĉiuvespere okazis koncertoj de diversaj litovaj ensembloj, latva vespero, nacia kaj internacia vesperoj, estis aranĝita sankta Meso en Esperanto en loka katolika preĝejo, estis organizita ankaŭ ekumena diservo, okazis tre interesa tuttaga ekskurso per ŝipo al etnografia subĉiela muzeo en Rumsiskes, dum la tuta semajno funkciis riĉa libroservo, okazis kvizo pri Esperanto-movado, instruado de kantoj, kelkaj ekspozicioj (filatela ekspozicio de Marius Dyglys, fotoekspozicioj de Andrzej Sochacki kaj Ilona Ejsmont), renkontiĝo kun legantoj de „Litova stelo“, oni povis spekti kelkajn videofilmojn en Esperanto, okazis poezia vespero.

Ĉiumatene eblis gimnastiki laŭ joga-maniero, ĉiuvespere eblis distri sin en dancsalono, estis prezentitaj litovaj popolaj metioj, funkciis fotoservo.

Pri la aranĝo vaste informis litova respublika kaj loka gazetaro, radioj, televido, novaĵagentejoj, retgazetoj. Estis filmitaj multaj aranĝoj por kvin regionaj litovaj televido, tiuj ĉi materialoj ankoraŭ aperos.

Al la gazetaro, radioj, televido, novaĵagentejoj antaŭ BET-40 estis dissendita ampleksa informo pri la aranĝo, multaj ĝin uzis. Fine de la aranĝo Litova Esperanto-Asocio donacis al urba publika biblioteko ĉirkaŭ 100 librojn en litova lingvo kaj en Esperanto, tio estis anoncita dum la solena fermo de BET-40, post la fermo urbestro de Birŝtonas en biblioteko akceptis la donacon, ceremonio estis filmita de televido kaj estos montrota estonte.

Dum la registriĝo ĉiu partoprenanto ricevis tre riĉan sakon (programo de BET-40, speciala leterpapero, speciala koverto, speciala



notlibreto, libreto pri Birŝtonas en Esperanto, broŝuro kun tekstoj de litovaj kantoj, broŝuro kun tekstoj por katolika diservo, turisma kolora eldonaĵo „Litovio. Jarmilo en Eŭropa centro“, turisma kolora eldonaĵo „Vilnius. Neforgesebla harmonio kaj ĉarmo“, Unua Bulteno de la 90-a UK en Vilnius en 2005, aliĝilo al UK en Vilnius, informa folieto de La Ondo de Esperanto, invito al BET-40). Estis farita speciala metala insigno de BET-40. Fine de la aranĝo ĉiu ricevis Adresaron de partoprenantoj de BET-40. Estis farita komuna foto de la partoprenantoj de BET-40.

Litova Esperanto-Asocio pro diversflanka helpo al BET-40 dankas al municipo de urbo Birŝtonas, al sanatorio „Versme“, kultura centro de Birŝtonas, sakrala muzeo de Birŝtonas, administracio de sportista komunloĝejo, katolika komunumo de la urbo. Speciala danko al litovaj esperantistoj, kiuj multe laboris por sukcesigo de BET-40, kaj multaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj esence kontribuis al programo de BET-40 per diversaj eroj.

Pli detale pri BET-40 eblas legi en la retejo de Litova Esperanto-Asocio <http://www.esperanto.lt> (informiloj unua kaj dua, aliĝilo, litovlingva teksto por gazetaro, ĉiutaga programo de BET-40, ĉiuj sep numeroj de la gazeto „Meandro“, multaj fotoj k.s.).

Organizan komitatato de BET-40 gvidis Povilas Jegorovas.

Povilas Jegorovas

BET-43 en Šiauliai: la plej granda BET ĉi-jarmile



Povilas Jegorovas malfermas la 43-an BET-on

La 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en la nordlitovia urbo Šiauliai, kun 322 partoprenantoj el 18 landoj, iĝis la plej amasa BET en tiu ĉi jardeko (jarcento kaj jarmilo).

BET-43 pasis de la 14-a ĝis la 22-a de julio 2007 en modernaj ejoj de la fakultato de sociaj sciencoj de la urba universitato. Esperantistoj senpage uzis teknikaĵojn, inkluzive de pluraj komputiloj kun retaliro.

La urbaj aŭtoritatoj montris grandan interesiĝon kaj helpemon. La urbestro Genadijus Mikšys faris malferman paroladon; li ankaŭ akceptis tridekon da diverslandaj esperantistoj en la urbodomo. Sed en gastamo lin superis la dekano, d-ro Teodoras Tamošiūnas, kiu abunde regalis ĉiujn partoprenantojn. La urbaj turisma kaj informa oficejoj helpis per eldono de gvidlibro en Esperanto, disponigo de materialo, preparo de ekskursoj. Subteno al la kultura programo ebligis fari ĝin varia kaj riĉa.

BET-43 iĝis grava ankaŭ landskale, kaj la prezidanto de la litovia parlamento Viktoras Muntianas en sia salutmesaĝo emfazis, ke „agado de esperantistoj donas signifan impulson al la reciproka kompreno kaj kunlaboro de la popoloj“. Kun dudeko da prelegoj funkciis Somera Universitato,

kies programon Osmo Buller salutmesaĝe konstatis supera al la Internacia Kongresa Universitato en Jokohamo. Dunivelaj kursoj kun kvar instruistoj en bona etoso progresigis lernemulojn. Al la 80-jariĝo de la movado en Šiauliai estis dediĉita la libro *Ruto levis Esperon*, lanĉita en BET. Alia librolanĉo prezentis la longe atenditan reeldonon de *La Mastro de l' Ringoj* de Tolkien. Streĉa konkurado okazis en la literatura kvizo de *La Ondo de Esperanto*, en kiu venkis Petras Čeliauskas. Li ĉiutage enkondukis alilandanojn en la litovajn lingvon, literaturon kaj kulturon. Post longa paŭzo reokazis la belarta konkurso Muzo. Ĉiutage sub la redaktado de Choe Taesok aperis *Sagisto*, kies titolo aludas la simbolon de la urbo.

Populareco de ekskursoj eĉ iom damaĝis la programon, dezertiginte la ejojn. Esperantistoj svarmis ne nur en la universitato, sed ankaŭ en kafejoj en la urbocentra promenstrato. Gražina Opulskienė konstatis tion kaj eksterplane persvadis pli ol kvindekon da diverslandaj esperantistoj kune pasigi vesperon en subĉiela gastejo, kie vigla muziko ne dancigis nur lamulojn. La sukceso de BET-43 estas rezulto de longa preparlaboro, al kiu kontribuis la prezidanto de la landa asocio Povilas Jegorovas kaj multaj litoviaj aktivuloj, precipe, honora civitano de Šiauliai Zenonas Sabalyš kaj la sekretario de LitEA Jūratė Pupšaitė.

Halina Gorecka



BET-46 en Visaginas: la plej nova urbo de Litovio

Interkomunika kaj kleriga aranĝo

La 27-an de junio, rande de la orientnorda urbo Visaginas, en la urba Profesia Studcentro pri Teknologioj kaj Entreprenado, okazis solena inaŭguro de la 46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. La 3-an de julio pasis ties fermo. Kio estis BET? Stranga estas la demando, ĉu ne? Oni diras – ĝi estas aranĝo. Aranĝoj ekzistas diversaj. Kiu, se pli precize? BET, precipe la litovaj BET-oj laŭ sia programo imitas Universalajn Kongresojn. Ĉu BET estas kongreso, almenaŭ kongreseto? La vicprezidanto de UEA Claude Nourmont, partopreninta nian BET-on, diris kategorie: „Ne, BET ne estas kongreso!“ Povas esti, ke aliaj partoprenintoj de BET havas aliajn respondojn. Elektro inter diversaj aranĝoj ja estas granda: lingvofoiro, seminario, konferenco, festo, festivalo, universitato, praktikejo, tendaro, somerumado ktp. La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller en sia gratula mesaĝo al BET-anoj imagis BET-on fenomeno (eksterordinara?), aranĝo kun eduka valoro. Ĉu BET estas edukejo? Kio finfine estas BET? Respondi la demandon povos finlege ankaŭ la legantoj.



Lingva lernejo kaj Somera Universitato

En la programo de BET estis Esperanto-kursoj (komencaj kaj konversacia), konatiga kurso pri litova lingvo kaj litova kulturo (prelegis Petras Čeliauskas), vesperumoj, ekskursoj kaj Somera Universitato. Dominis Somera Universitato kun pli ol 20 prelegoj. Prelegis 13 lektoroj. Eĉ po kvar prelegojn legis Mikaelo Bronštejn kaj la duopo Peter Baláz kun Jevgenij Gaus. La plej grandan intereson elvokis la didaktaj prelegoj de la retuma duopo Peter kaj Jevgenij pri komputumaj temoj. Same la historiaj prelegoj de Aleksander Korĵenkov „L. L. Zamenhof en Grodno“ kaj de M. Bronštejn „Zamenhof kaj Postnikov“. Ĝenerale, la lekcionoj estis bone vizitataj – la aŭditorioj ĉiam estis plenplenaj. Rektoris la Someran Universitaton estrarano de Litova Esperanto-Asocio, doktoro pri teknikaj sciencoj, docento Arimantas Raĉkauskas. Ĉiumatene (krom merkredo, la ekskursataĝo) okazis lecionoj en ĉiunivelaj Esperanto-kursoj. La komencantojn instruis litova instruista teamo Stanislova Adomauskienė, Stanislava Sobanska kaj, kiel ĉiam, Gražina

Opulskienė. Dum kelkaj tagoj instruis ankaŭ Stano Marček (li ankaŭ prelegis pri metodiko de kursgvidado). La konversacian kurson por progresantoj gvidis Svetlana Smetanina. Ŝajnus (naive!), ke ĉiuj venis al BET por

La 46-a BET okazis en la profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado de Visaginas.



partopreni aŭ eniri la movadon, por praktiki, por maksimume utiligi Esperanton. Tamen, kiel ĉiujare, venis ankaŭ eternaj komencantoj – tiuj, kiuj de jaro al jaro ne progresas en alproprigo de la internacia lingvo. Tiujn oni admonis – krokodilu mallaŭte!

Ekskursoj

La 30-a de junio (merkredo), same kiel dum UK-oj, estis ekskursita tago. Pli ol 45 BET-anoj partoprenis la busan ekskurson tra superba nacia parko „Aukštaitija“ (poloj aparte ekskursis aŭte por vidi vidindaĵojn de norda Litovio). La busanoj unue vizitis muzeon pri abelbredado en Stripeikiai. Tie estas prezentitaj multaj specoj da abelujoj de la plej malnovaj ĝis nunaj – modernaj. Unu funkcianta abelujo estis en ligna skulptaĵo de Bubilas (antikva litova abela kaj miela dio). Kelkaj esperantistoj aĉetis produktojn de abeloj – ĉefe mielon, peĉon kaj polenon.

Sekvis aŭtenta rivera muelejo ĉe la vilaĝo Ginučiai kaj la turisma centro Palūšė kun preĝejo, konstruita en la jaro 1570 nur pere de hakilo kaj segilo kaj eĉ sen unu najlo. Poste banado ĉe cigno en apuda lago Lūšiai. Revenvoje al Visaginas oni vizitis kafejon-muzeon „Romnesa“ en la vilaĝo Strigailiškiiai, kie estas produktataj, eksponataj kaj vendataj tradiciaj litovaj branĉkukoj, litove nomataj „šakotis“.

Vendrede kelkaj grupoj de esperantistoj ekskursis al la proksima fermita nuklea centralo. Verdire, la centralo povis funkcii ankoraŭ dum 10-15 jaroj, sed EU starigis la eniran kondiĉon por akcepto de Litovio – fermi la centralon jam ĝis la jaro 2010. La centralo estis definitive fermita la 31-an de decembro 2009 kaj tie nun okazas dismuntaj laboroj (grandan parton de la bezonata elektro produktas modernigita hejtelektrejo, plian elektron Litovio aĉetas ĉe Rusio).

Ekspromptaĵoj

Ne ĉiuj antaŭviditaj distraj programeroj de BET okazis. Neatendite mortis eksprezidento de Litovio M. Brazauskas, kaj estis deklarita tritaga funebro. Dum unu el la vesperoj V. Ŝilas okazigis diskutadon pri problemoj en Esperantujo. Alian vesperon lerte “savis” Mikaelo Bronštejn. Anstataŭ antaŭvidita koncerto li proponis kvizon kaj oni interese pasigis la vesperon. Komence Mikaelo rakontis pri iam populara en Rusio televida ludo kiu nomiĝas “Kio? Kie? Kiam?”. Poste sekvis liaj demandoj kaj tiu, kiu opiniis scii la respondon devis levi la manon kaj diri ĝin. Se la respondo ne estis taŭga tiam alia homo povis respondi. Tiu, kiu prezentis plej multe da trafaj respondoj ricevis ĉefan premion. La demandoj estis diversaj: pri Esperanto kaj Zamenhof, pri historio, pri religio, pri literaturo, eĉ pri diamantoj.

En la kadro de BET okazis kunveno de TEĴA kaj arta konkurso MUZO. La anoncita arta konkurso „MUZO“ ne okazis en antaŭplanita maniero. La libervola organizaĵo Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio havas 110 membrojn en 38 landoj. Partoprenis en BET dek, sed en tiea ĵurnalista kunveno nur 6 el ili. Sekve, pritrakto de internaj, teknikaj aferoj de TEĴA estis superflua.

Ĝenerala sekretario de TEĴA Vytautas Ŝilas (Litovio, Vilno) prezentis historion de TEĴA, kiu komenciĝis jam en 1946, kaj kiu havis



„Sanktaj Petroj kaj Paŭloj“

eĉ kvin reorganizojn. La lasta komenciĝis dum la Tutmonda Kongreso de Ĵurnalistoj-Esperantistoj en Vilno (2008) kaj finiĝis en 2009 dum la UK en Roterdamo. La organizaĵo kiel jura persono estas registrita en Vilno (2009). Laŭ la statuto ĝi rajtas kaj povas agi en tre multaj sferoj. Pri eblaj ontaj aktivecoj de TEĴA parolis redaktoro de la revuo „Esperanto“ Stano Marček, vicprezidanto de UEA Claude Normont, unu el la gvidantoj de la fama retejo E@I Peter Baláž, latva aktivulo Aivars Kalniņš, litova pedagogo Algimantas Piliponis. La resuma konkludo estis: aktiva TEĴA povus multe kontribui la komunan aspiron pri diskonigo de Esperanto. Por informiĝi pri TEĴA venis 19 BET-anoj. Sekve pri ĵurnalista agado interesiĝas sufiĉe multaj.

La Arĝenta Gruo

La arĝenta gruo estas emblemo de la urbo Visaginas. „La arĝenta gruo” estis la titolo de ĉiutaga informilo redaktata de d-ro Vilius Šidlauskas, estrarano de Litova E-Asocio. La kvarpaĝa ilustrita informilo (kun koloraj fotoj!) venadis el presejo diligente ĉiumatene dum la matenmanĝa horo. Ĝi prezentis gratulon de la Alta reprezentanto de la 46aj Baltiaj E-Tagoj la urbestro de Visaginas Vytautas Račkauskas, publikigis mesaĝojn de Probal Dasgupta, prezidanto de UEA kaj de Osmo Buller, Ĝenerala direktoro de UEA. En ĉiu numero de „La arĝenta gruo” aperadis aktuala precizigita tagordo de BET, raportetoj



kaj impresajoj de BET-anoj pri la okazintaj aranĝoj. Ilustre el la informilo ni represas verkajeton de D. Manionienė kaj A. Plerpienė „Taga anekdoto“: «Tri komencantinoj el la litova urbo Panevėžys ekvidis en la programo de BET-46 informon pri la kunveno de TEĴA kaj ne sciante signifon de tiu mallongigo kaj ne rimarkinte supersignon sur la litero “J” ili legis la vorton TEĴA kiel “teja” kaj supozis, ke okazos kunveno ĉe teo. Ili plibeligiĝis, prenis iomete da dolĉaĵoj kaj rapidis en la kunvenon. En la salono ili ekvidis lektoron Vytautas Šilas ĉe komputilo kaj seriozvizaĝajn aŭskultantojn... Dum mallonga tempo la komencantinoj komprenis, ke ĉi tie okazas kunveno de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Do, iliaj sukeraĵoj kaj dolĉaĵoj restis en sakoj...»

Aperis entute sep numeroj de la ĉiutaga informilo „La arĝenta gruo”. Ili ĉiuj estas elŝuteblaj ĉe retejo de Litova Eesperanto-asocio www.esperanto.lt.

Fota galerio

Vi foliumas fotojn pri iu Esperanto-aranĝo kaj „rememoroj aperas pri la tagoj pasintaj“. La okazon por refreŝigi memoron prezentas bonega fotisto el Belgio Mikaelo Cwik (Michael@Cwik-online.net). Li jam iom ordigis siajn fotomemoraĵojn kaj proponas 201 bildojn de BET-46 en Visaginas, kiuj prezentiĝas post la klicko al la sekva adreso: <http://gallery.me.com/cwikbe#100252>; <http://gallery.me.com/cwikbe#10023> kaj <http://barelo.blogspot.com/> – Tie sub la rubriko „Fotoj“ maldekstre de la komputila ekrano estas lokitaj eĉ kvin blokoj da fotoj (de Joanna Filipowicz, Mikaelo Bronštejn, Paŭlo Branko, Michael Cwik kaj ankaŭ de la ruslingva retejo en Visaginas). Poste tie aperos ankaŭ pliaj fotoj. En „Barelo“ estas trovebla ankaŭ ĝeneraliga artikolo pri BET-46.

Vytautas Šilas
redaktoro de *Litova Stelo*, 2010, №4.

BET-49 (2013): Interesaj kaj agrablaj tagoj en Utena

La 49-a BET estis mia kvara BET en la moderna (postsovetia) epoko. Laŭ ĉiuj aspektoj, kiuj gravas al mi, la 49-a BET, okazinta de la 6-a ĝis la 14-a de julio 2013 en Utena, estis la plej bona. Ĉu ideala? Probable jes!

La urbo Utena situas en la nord-orienta parto de Litovio. Sed, havante iom pli ol 750 jarojn, ĝi havas nur kelkajn malnovajn konstruaĵojn el la 19-a jarcento. Sed la ĉirkaŭa naturo kun river(et)oj kaj multnombraj lagoj allogas ŝatantojn de ekologia turismo. Utena kun ĉ. 30 mil loĝantoj estas tre ĉarma, trankvila, bone prizorgita urbo.

La urbaj gvidantoj (ni konatiĝis kun la urbestro kaj vicurbestro dum BET) sukcesis konservi ĉe transiro al la libermerkata ekonomio la ĉefajn entreprenojn de Utena. La plej gravaj estas la bierproduktejo „Utenos alus“ kien iris du ekskursoj (unu kun gustumado de kvin bierspecoj) kaj la trikotaja fabriko „Utenos trikotažas“, kies firmaan vendejon kun favoraj prezoj multaj vizitis aĉetociele. Ili kaj aliaj entreprenoj grave kontribuas al la urba buĝeto. Danke al tio Utena havas multajn allogaĵojn, urbajn skulptaĵojn, fontanojn, florbedojn, bonajn

vojojn por aŭtoj kaj vojetojn por piedirantoj kaj biciklantoj, kajojn ktp.

Ĉe la malfermo de BET-49 bonvenige parolis la urbestro de Utena Alvydas Katinas. Sian saluton al la partoprenantoj sendis la prezidanto de Sejmo, la Litovia parlamento, Vydas Gedvilas.

Nia kongresejo estis la kolegio de Utena, kies oportunaj ejoj, provizitaj per komputiloj kaj projekciiloj, perfekte taŭgis por ĉiuj eroj; estis libere uzebla komputila ĉambro kun konstanta ret-alio, ankaŭ sendrata. La koncerta programo okazis en la granda salono de la muzika lernejo, en la urba kulturcentro kaj sur la subĉiela scenejo ĉe la lago Dauniškis.

Aparte riĉa estis la folkloro programo. Kutime oni organizas unu nacian vesperon, sed dum la 49-a BET estis kvar vesperaj programoj, en kiuj ni konatiĝis kun la lokaj kantoj, muziko kaj dancoj. Gaje



kaj vigle pasis koncerto-diskoteko kun la blovensemblo Indrajaja.

En sia salutmesaĝo la prezidanto de UEA Probal Dasgupta emfazis, ke la Baltiaj Esperanto-Tagoj estas unu el la gravaj eventoj sur la esperantista kalendaro, kaj deziris al ĝi longan kaj buntan vivon. BET estas kiel malgranda UK, kaj UEA nature donas al ĝi sian aŭspicion. Kaj la programo de la 49-aj Tagoj konfirmis tion. Memorante pri la dumviva lernado, kiu estas nuntempe tre populara en Eŭropa Unio (ankaŭ esperantistoj sukcesas ricevi monon por tiaspecaj projektoj), en BET funkciis divers-tipaj kaj divers-nivelaj kursoj, gvidataj de elstaraj instruantoj: Stano Marček, Svetlana Smetanina kaj Miĥail Lineckij.

Novaĝo de ĉi tiu BET estis du kursoj. La kvarprelega ciklo de tradukisto, eseisto, historiisto Petras Čeliasuskas temis pri „Kelkaj faktoj pri la litovaj lingvo kaj kulturo“. La litova lingvo estas la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo, prezenton de ĝiaj kuriozaĵoj sekvis nemalofte rideksplodoj de la aŭskultantoj.

La ruslanda ĵurnalistoj kaj esploristoj Aleksander Korĵenkov per kvin prelegoj prezentis la ĉefajn etapojn de la historio de Esperanto kaj senvualigis kelkajn historiajn misterojn.

La Somera Universitato proponis por la klerigema publiko nekredeble abundan 30-eran sortimenton de prelegoj kaj prezentoj. Oni serĉis respondojn, ekzemple, pri kio

okazas en Skotlando kun Ed Robertson, el kio konsistas niaj manĝaĵoj kun Tõnu Hirsik, konatiĝis kun la vivo, agado kaj verkado de Ludmila Jevsejeva (Margarita Želve) kaj Pulgis Andriušis (Gražina Opulskienė). La eldonejoj Sezonoj kaj Impeto prezentiĝis, sonlibrojn en Esperanto konigis Stano Marček, pri diversaj retaj projektoj, interalie sociaj retoj, parolis Dima Ševĉenko. Anna Striganova ekspoziciigis propramane faritajn pupojn kaj parolis pri „Fabelaj mondoj“.

Pri la plej juna ĉefurbo Astana rakontis kaj bildojn montris la subskribinto de ĉi tiu artikolo. Mikaelo Bronŝtejn kontribuis al la programo prelege kaj koncerte.

Cetere, la oferto de la esperantista arta programo estis varia kaj riĉa. Koncertis Asorti, Solotronik, Mikaelo Bronŝtejn, Nataša Bertse kaj Miĥail Povorin. Emanuele Rovere (Manŭel) kantis ankaŭ por la urbanoj en la subĉiela koncertejo ĉe la lago Dauniškis. Sume dek du koncertoj esperantistaj kaj folkloraj en la ĝenerala (ne arta festivalo) esperantista kongreseto estas maloftaĵo, eble eĉ unikaĵo.

Kelkfoje dum BET eblis spekti admirindajn unuhorajn prezentadojn de lum-muzika fontano, vera allogaĵo por turistoj kaj lokanoj.

Ĉiutage aperis *Heroldo de Utena*, la riĉe ilustrita gazeto de BET-49, prizorgita de Vytautas Šilas. Cetere, partoprenis pluraj esperantistaj ĵurnalistoj, inkluzive de la prezidanto de TEĴA Audrys Antanaitis, kiu gvidis neformalan TEĴA-kunvenon en la





apudkongresa kafejo Žarija, kie dum la BET-a semajno oni ĉiam povis aŭdi esperantistojn, kiuj babilis Zamenhof-lingve kaj krokodile.

Ankaŭ per la nepra ekskursita tago, merkredo, BET similas al UK-oj. Ankaŭ ĉi-foje Antanas Vysockas modele planis kaj efektivigis la tuttagan ekskurson en la lagregiono de la orienta Aŭkštajtio. Unue la ekskursantoj venis al la muzeo de ceramiko en Leliūnai, kie nin bonvenigis la „reĝo de potistoj“ Vytautas Valiušis, fondinta la klerigan centron kun muzeo en 2001. Ĉirkaŭ 700 eroj troviĝas en la muzeo, ne nur ceramikaj potoj, teleroj, tasoj, kruĉoj kaj fajfiloj, sed ankaŭ ĉiutagaj objektoj de kamparanoj, por variigi la ekspozicion. La mastro evoluigas la ceramikan arton, organizante renkontiĝojn por kolegoj, instruante al junuloj kaj infanoj. Ĉio ĉi estas ebla en la iama duetaĝa lernejo kun korto.

En la ekskursita itinero troviĝis la biendomo de la familio Tyzenhaus, interesa ekspozicio de la popola ligna skulptisto Lioginas Šepka, kies naiva arto kaj malfacila vivo neniun lasis indiferenta. En Rokiškis estis vizitita la novgotika preĝejo de Sankta Mateo. Ni ĉirkaŭiris la plej aĝan kaj dikan en Litovio kverkon, kies aĝon oni taksas ĉ. 1500 jaroj.

En Zarasai esperantistoj uzis kuriozan promenradon por atingi la lagobordon kaj ĉirkaŭrigardi. La akvomuelejo Šlyninka aĝas 300 jarojn kaj enloĝas ĝin petolemaj diabloj, historiojn pri ili konigis la muelisto, kiu

montris la procedon de muelado kaj baptis nin per faruno. Poste venis vico por gustumi la muelejan specialaĵon – sekalajn flanojn, bakitajn laŭ malnovaj receptoj. Bone gustis ankaŭ pano kaj kvaso. Laste estis promeno per ŝipoj sur la lago Alaušas, kun fiŝsupo sur eta insulo (al- kaj debordiĝo okazis gaje). Nepre menciindas bonega interpretado dum la tuta ekskurso kiun faris Gražina Opulskienė.

Ĉe la urbestra akcepto pro ekferiado de la urbestro, sesdekon da esperantistoj en la kafejo Abubonvenigis la vicurbestro Vidmantas Valinčius. En neformalaj paroloj li rakontis pri la laboro de la urbestro, kiu malavare subtenis la organizadon de BET-49, pri la projekto lagregiono (kune kun Latvio kaj Bjelorusio) subtenita de Eŭropa Unio, ankaŭ pri sia hobbio – vojaĝoj kaj konatiĝo kun novaj lokoj, ja li estas eksa instruisto pri historio. Ne mankis bongustaj manĝaĵoj, trinkaĵoj, gitaro kaj kantado.

216 efektivaj partoprenantoj el dudeko da landoj travivis interesajn kaj agrablajn tagojn en la urbo Utena, flegante daŭran amikecon, konatiĝante kun la lokaj folkloro kaj historio, perfektigante en Somera Universitato, promenante kaj kantante, ĝuante agrablan veteron, kiu estis nek tro malvarma nek varmega – ideala por laboro kaj ripozo, eĉ pluvo prokrastiĝis ĝis la ferma tago. Dankon al la organizantoj – Povilas Jegorovas kaj la teamo de helpantoj, dankon al la kursgvidantoj, prelegantoj, artistoj, kaj al la partoprenantoj!

Halina Gorecka

La Ondo de Esperanto, 2013, №8–9.



BET-52: Pli ol tricent verdstelanoj en la verda urbo

La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazis de la 2-a ĝis la 10-a de julio 2016 en la Litovia kuracurbo Birŝtonas, ĉe la rivero Nemano. Pro ĉirkaŭantaj pin-arbaroj eĉ nuraj promenoj kaj profunda spirado estas bonefikaj por la sano.

Ĉi tiu negranda urbo estis invadita de pli ol tricent verdlingvanoj, venintaj el trideko da landoj; kien ajn oni iris, ĉie eblis renkonti esperantistojn – ĉe la longa kajo de Nemano aŭ sur la monteto apud ĝi, en kafejo, bierejo aŭ vendejo, ĉe minaralakva trinkejo kaj en la parko – dum deko da tagoj Esperanto sonis ĉie en la urbo. Tamen esperantistoj ne estis la sola internacia grupo – samtempe en Birŝtonas okazis internacia balonkonkurso, kaj oni ĝue spektis aernavigadon de buntaj balonoj, kaj kelkaj kuraĝuloj eluzis la eblecon leviĝi al la ĉielo kaj ricevi diplomon.

Antaŭ dek du jaroj ĉi tie jam okazis BET-40. Estis interese pasi tra urbaj stratoj kaj trovi konatajn lokojn. Jen la eksa episkopa domo, kie estas organizita gastejo. Jen la placo, ĉe kiu estis populara bierejo – ha, la bierejo ne plu ekzistas. Agrable surprizis nove faritaj vojoj kaj trotuaroj. Plimultiĝis floroj kaj skulptaĵoj. En la parko multas sportaj placetoj. Jen bela banurbo destinata por ĝui la vivon, resaniĝi kaj refortiĝi.

La Tagoj estas nomataj Baltiaj pro la laŭvica okazigo en Estonio, Latvio kaj Litovio. Programe la 52-a BET estis tute internacia, kun forta domino de la kontribuoj el Litovio, Ruslando kaj Pollando. Verŝajne esperantistoj el Latvio kaj Estonio ŝparis siajn fortojn por siaj propraj BET-oj en 2017 kaj 2018.

Oni foje komparas BET kun Universala Kongreso, ĉar la Litoviaj BET-oj kultivas la tradiciajn UK-erojn, kiel Somera Universitato, diversnivelaĵ kursoj de Esperanto, ekskursoj, artaj aranĝoj k.s. Sed kontraste al UK-oj, kie okazas pagataj lingvokursoj, la tuta diversnivela instruado dum BET estas tute senkosta por la partoprenantoj. Ĉiutage spertaj instruantoj realigis por ĉiu nivelo po du sesiojn daŭrantaj sume tri horojn. Stano Marček (Slovakio), Aida Čižikaitė (Litovio), Nina Pietuchowska (Pollando), Mikaelo Lineckij (Ukrainio) kaj tri ruslandanoj (Irina Gončarova, Svetlana Smetanina kaj Abdurahman Junusov) gvidis diversaĝulojn





al lingva perfektigo, sub la kunordigado de Gražina Opulskienė.

Per la prelegaro de profesoro Aloyzas Gudavičius sciemuloj konatiĝis kun la litovaj lingvo, kulturo kaj historio. Sian kurson „Esperanto en interkultura komunikado“ prezentis profesorino Ilona Koutny el la Poznana Universitato Adam Mickiewicz (Pollando). Profesoro Walter Ŝelazny el la Bjalistoka Universitato faris ciklon pri bazaj elementoj de judaismo, kiu estas grava por kompreni la iniciatoron de Esperanto.

La klerigan programon kompletigis pluraj apartaj prelegoj pri variaj temoj, iuj rilatis al la fenomeno Esperanto, aliaj al ĝeneralaj temoj, kiel kosmo kaj astronomio, kulturo de Pakistano kaj Nepalo, rilatoj inter homo kaj besto, defendaj konstruaĵoj de la 19-a jarcento, fabeloj kaj historiaj eventoj ktp. Oni ne nur multe instruis, sed ankaŭ raportis pri modernaj eblecoj lerni ĉe Duolingo, distancaj kaj retaj kursoj, pri loko de Esperanto en



societa epoko. Sed Esperanto utilas ne nur al esperantistoj. Tion trafe pruvis Maria Pokrzywnicka, konigante sperton de la Etnografia muzeo en Toruń (Pollando).

Esperanto restas tradici-libra fenomeno, kvankam elektronikaj libroj jam penetris ĝian merkaton, pri kio rakontis Dmitrij Ŝevĉenko. Apartajn prezentojn havis la eldonejo Impeto, la krimromano *La aventuroj de Ŝerloko Holms*o, *Historio de la Esperanta Literaturo*. Funkciis riĉa libroservo de LitEA.

Preskaŭ ĉiu esperantista renkontiĝo povas envii la riĉecon de la realigita kultura programo. Jerzy Dobrzyński, profesoro de la Varsovia Muzika Universitato, multe aplaŭdata de danka publiko, pianludis verkojn de Fryderyk Chopin. Bone kongruis al la humoro ankaŭ la famega polonezo *Adiaŭo al patrujo* de Ogiński, ege ŝatata en Ruslando, virtuoze plenumita de la majstro.

Pliparto de la arta programo okazis en la malnova distrejo Kurhaus, tipa por





kuracurboj, kie same bone eblas okazigi koncerton aŭ balon. En la urba kulturcentro koncertis por la BET-anoj lokaj folkloraj ensembloj Lendrūnas kaj Raskila. La altnivela plenumo de kantoj, muziko kaj dancoj, interesaj instrumentoj kaj belaj naciaj kostumoj ravis la internacian publikon.

Koncertis ankaŭ JoMo, Sepa kaj Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa kaj kelkaj „gitarkantistoj“. Duaktora Teatro Verda Banano kun Saŝa Pilipović kaj Georgo Handzlik prezentis modernan historion *La kredito*.

Same kiel en UK, ankaŭ en BET estas ekskursita tago, kiam neniu alia programero okazas. La tuttaga ekskurso ebligis ekkoni la plej belajn bienpalacojn de la etnografia regiono Sūduva.

Krome duontaga ekskurso ŝipe veturigis la partoprenantojn al Kaŭno, kaj pieda ekskurso konigis interesajn de Birŝtonas. Grupo da frandemuloj vizitis produktojn de medo „Lietuviŝkas Midus“ en Stakliŝkės



kaj gustumis ĉi tiun tradician litovan drinkaĵon. La modela organizado de Antanas Visockas havis unusolan mankon – li ne sukcesis antaŭmendi pli trafan veteron. Post la unuaj (tro)varmegaj tagoj venis pluveta kaj malvarmeta vetero, eble tipa por loko, kiun ĉirkaŭiras granda rivero kaj arbaroj, vastiĝantaj ĉiudirekten.

Ne ĉiu UK havas tiom altan „Altan Protektanton“ kiel la 52-a BET – la ĉefministro de Litovia Respubliko Algirdas Butkevičius en sia salutmesaĝo akcentis i. a., ke la ideo de Zamenhof „restas aktuala ankaŭ en la nuntempa vivo“.

Ankaŭ atento de oficialuloj de la urbo estas grava atesto pri serioza rialto al niaj lingvo kaj komunumo. En la solena malfermo parolis la urbestro Nijolė Dirginčienė, kiu bondeziris, ke oni „enhavoriĉe pasigu la tempon, uzu sanigajn servojn kaj distraĵojn da aktiva ripozo“. En la urbestra akcepto la rolon de mastro plenumis la vicurbestro.



La ĉiutaga plenkolora gazeto *Balenido*, redaktata de Stano Marček (entute aperis ok kajeroj kvarpaĝaj), informis pri la taga programo, donis detalajn informojn pri personoj kaj aranĝoj, aperigis fotojn kaj raport(et)ojn. La partoprenantoj laŭdis senprecedencan informan agadon por BET en la novaĵretejo *La Balta Ondo*, kie regule aperis abunda materialo.

Por la unua fojo en la moderna historio de BET okazis granda kvizo, kiun lerte gvidis la nesuperebla kvizmajstro Marian Zdankowski el Pollando. Partoprenis deko da konkursemuloj el diversaj landoj, kiuj dum unu horo devis solvi 16 kvizojn po 10 demandoj en ĉiu, do entute ili devis trovi respondojn por 160 demandoj! La plej sukcesa kvizano Wolfgang Loose el Germanio solvis duonon da taskoj. La plej sukcesaj kvizanoj ricevis diplomojn, librojn kaj (por la unua fojo en BET!) monpremiojn. La publiko aktive partoprenis la kvizon kaj la plej aktiva spektanto Svetlana Smetanina (Ruslando) – ankaŭ ricevis monpremion; aliaj aktivaj geesperantistoj dum kvizo ricevis diplomojn kaj librojn.

Ekster la oficiala programo okazis celebrado de la 25-jariĝo de *La Ondo de Esperanto*. En hejmeca etoso de la kafejo Banginuko vaiŝes la eldonanto, redaktoro, perantoj kaj redakcianoj rememoris la kvaronarcentan vojon de ĉi tiu internacia magazino. Estis farita grava anonco – *La Ondo* ekde 2017 aperos nur elektronike.

Esperantistoj partoprenis en la litova ŝtata festo – Tago de la Ŝtato, de kelkaj jaroj festata la 6-an de julio je la 21-a horo, samtempe en diversaj lokoj de la mondo, kie litovoj loĝas. En la parko de Vytautas kolektiĝis urbanoj kaj gastoj de Birŝtonas, por kune kanti la litovan himnon. Estis aranĝita partopreno de

esperantistoj kaj internacia grupo kantis la Nacian Glorkanton en Esperanto.

Ĉu ĉio estis tiom perfekta, kiom mi priskribas? Vere, la organiza teamo laboris modele kaj faris sian plejblon, ke la partoprenantoj ĝuu la aranĝon – interesa programo por ĉiuj gustoj estis garantiita. La sola problemo estis tio, ke la kunvenejoj kaj tranoktejoj situis en kelkaj disaj konstruaĵoj. Esperanto-kursoj funkciis en la urba gimnazio, kiu, cetere, ebligis senpagan uzadon de sia komputila klaso kun la reto. Prelegoj okazis en diversaj konstruaĵoj, bonŝance la programo antaŭvidis 15-minutajn paŭzojn, dum kiuj eblis iri de unu loko al la alia. Parto da BET-anoj loĝis sur la transa bordo de Nemano kaj devis uzi pramon, kiun luis kaj pagis la organizantoj.

En la lastaj jaroj oni notas la malkreskon de intereso al la Universalaj Kongresoj, kies partoprenantaro ŝrumpas. La Litoviaj BET-oj estas amasaj kaj, kiel montris la 52- a, en ili amase partoprenas nealbianoj. BET-52 estis iusence rekorda – post la malapero de Sovetunio neniam tiel multaj personoj aliĝis al BET (334) kaj partoprenis (322, inter ili pluraj nealiĝintaj litovianoj) en ĝi. Oni ŝerce demandas: ĉu UK malkreskos ĝis la nivelo de BET, aŭ BET daŭre kreskos al la nivelo de UK?

Halina Gorecka

Pliaj informoj pri BET-52 kaj pri BET-oj ĝenerale estas legeblaj en la retejoj

<http://sezonoj.ru/2016/06/bet-52/> kaj

<http://sezonoj.ru/tag/baltiaj-esperanto-tagoj/>



BET-informiloj

Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET) siatempe estis mini-kongresoj de Esperanto en Sovetio. Okazante laŭvice en tri Baltaj Respublikoj, ili kunvenigis centojn da gesamideanoj el la tuta Esperanta landego.

Kiam mildiĝis la kontrolo kaj plifaciligis aliro al multobliga tekniko, aperis la ebleco eldoni ĉiutagajn tendarajn gazetojn. La nomo por la informilo estis elektata tiel, ke ĝi asociu kun la loko, kie BET okazis. Ekzemple, *BETulo* asociis kun betulo, ĉar BET okazis en lernejo de arbaristoj; *LAGA ONDO* memorigis pri la lagoj, kiuj ĉirkaŭas la urbeton Veisiejai; *MEANDRO* – pri meandroj de Nemano apud Birŝtonas; *BALENIDO* ornamas blazonon de Birŝtonas k.s. Tiuj ĉiutagaj gazetoj bone respiegulas programon, etoson de la renkontiĝoj kaj statistikon de la partoprenintoj.

Jen listo de ĉiuj BET-informiloj, memorigantaj amikajn kunflugojn de samideanoj en Litovio.

BET-folio, informilo de BET-26 (Noreikiškės, 1989). Aperis 7 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliaskas, eldonkvanto 500 ekz.

Kongresvoĉo, ĉiutaga informilo de la 65-a SAT-Kongreso, okazinta en Kaŭno (1992). [Tiuĵare aparta BET ne okazis.] Aperis 11 kvarpaĝaj n-roj (formato A5). Red. P. Čeliaskas, eldonkvanto 500 ekz.

BETulo, informilo de BET-31 (Girionys, 1995). Aperis 7 dupaĝaj n-roj (A4), red. P.

Čeliaskas, eldonkvanto 200 ekz.

Laga Ondo, informilo de BET-34 (Veisiejai, 1998). Aperis 7 dupaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliaskas, eldonkvanto 300 ekz.

BETago, informilo de BET-37 (Noreikiškės, 2001). Aperis 8 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliaskas, eldonkvanto 300 ekz.

Meandro, informilo de BET-40 (Birŝtonas, 2004). Aperis 7 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. P. Čeliaskas, eldonkvanto 300 ekz.

Sagisto, informilo de BET-43 (Šiauliai, 2007). Aperis 7 kvarpaĝaj n-roj (A4), red. Choe Taesok, eldonkvanto 400 ekz.

La Arĝenta Gruo, informilo de BET-46 (Visaginas, 2010). Aperis 7 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. V. Šidlauskas, eldonkvanto 200 ekz.

Heroldo de Utena, informilo de BET-49 (Utena, 2013). Aperis 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. V. Šilas, eldonkvanto 200 ekz.

Balenido, informilo de BET-52 (Birŝtonas, 2016). Aperis 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. S. Marček, eldonkvanto 350 ekz.

Abelo, informilo de BET-55 (Panevėžys, 2019). Aperos 8 kvarpaĝaj koloraj n-roj (A4), red. S. Marček, eldonkvanto 400 ekz.



Al Litovio

La unuan fojon la kanto „Al Litovio“, verkita de Mikaelo Bronŝtejn, sonis en BET-49 en Utena. Dum BET-52 en Birŝtonas ĝi sonis kelkfoje kaj fariĝis iaspeca himno de Litoviaj BET-oj. Jen estas vortoj kaj notoj de tiu kanto.



1. Dor-mas lo - gaj la - goj en sin' ar - ba - ra ka-re - sa - ta de
frin - ga kant'. Jen la spa - co pa - ca, la te - ro ka - ra por ri -
po - zo de la va - gant'. A - mi - ki - no mi - a kaj a - ma - ti - no -
mi ri pe - tas al vi sen vant', ha - vis mi fe - li - ĉon en vi - a
si - no - La - bas va - ka - ras, Lie - tu - va! La - bas va - ka - ras, la - bas
va - ka - ras, la - bas va - ka - ras, Lie - tu - va!

2. Mi flavbeka ĉe la unua veno
kaptis sencon de via ĉarm',
Kaj en koro mia lokigis beno -
milda ero de l' tera varm'.

La vagado daŭras dum kruroj fortas,
sed post mia dumviva vag'
la ripozo paca kun vi komfortas -
Labas vakaras, Lietuva!

3. Dentorad' horloĝa protestas grince -
en la junon ne eblas ven',
sed memoro mia plu montras vin, se
gardas vin mi ĉe mia en'.

Impetigas min la laŭzita spiro,
kaj denove kun juna vant'
vortojn simplajn kantas mi kun admiro:
Labas vakaras, Lietuva!

Kial Abeloo?

Ni ĉiuj konas laboreman insekton abelon, kiu por homoj kolektas dolĉan mielon. Sed niaj gastoj povas ne scii, ke en Litovio la abelo estas tre estimata insekto. En litova folkloro ekzistas centoj da proverboj pri abeloj kaj ilia laboremo. En la litova lingvo la vorto *mirti* (= morti) estas uzata nur parolante pri homoj kaj abeloj; por aliaj vivaj estaĵoj ekzistas aliaj vortoj kun malestima nuanco mortaĉi. Ankoraŭ indas diri, ke la litova vorto *biĉiulis* (= bona amiko) devenas de *bitė* (= abelo). En pasinteco la vorto *biĉiulis* signifis fidindan homon, kun kiu oni prizorgis komunajn abelsvarmojn; hodiaŭ biĉiulis – simple bona, proksima amiko.

Por informilo de Paneveĵa BET ni elektis la nomon ABELO ankoraŭ pro unu kialo. Ĉi tie loĝis fama verkistino Gabrielė Petkeviĉaitė (1861-1943), konata laŭ pseŭdonimo Bitė (= Abelo). Ŝi agis por virinaj rajtoj, en 1922 estis elektita al Fonda Sejmo (litova parlamento).



En Paneveĵo funkcias ŝia memor-muzeo, ŝian nomon havas la ĉefa distrikta biblioteko.

Ankaŭ ni agu a-b-e-l-e dum BET-55!

Petras Ĉeliauskas

Saluton karaj BET-anoj!

Kiel en ĉiuj Baltiaj Esperanto-Tagoj, ankaŭ dum BET-55 en Paneveĵys aperos via ĉiutaga gazeto, ĉi-jare kun la nomo

Abelo (la klarigo supre). Vi trovos en ĝi aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-

55, fotojn k.s. Ĝia enhavo dependos ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem. Bonvolu raportii pri viaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu viajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo (Abelujo ☺), aŭ sendu ilin rete al:

stano.marcek@gmail.com

Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj. Ĉiukaze bonvenon al Paneveĵys, kaj ĝuu la 55-an BET-on!

Stano Marček,
via redaktoro



Informilo de Baltaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Paneveĵys, Litovio

Abelo

Dimaŝo, la 7-a de julio 2019



N-ro 1

Salutmesaĝo de Vytenis Pivilas ANDRIUKAITIS, Membro de Eŭropa Komisiono



Karaj gesamideanoj,
Mi estas granda amanto de Esperanto, ĝia fano, admiranto, amiko, propagandisto kaj subtenanto. Kaj

Programo

La 5-a de julio (vendredo)
10.00 – 22.00 Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (en universitata konstruaĵo, Nemuno str. 33)

La 6-a de julio (sabato)
09.00 – 22.00 Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (samloko)

13.00 – 14.00 Tagmanĝo (memstare)
18.00 – 19.00 Vespermanĝo (memstare)
19.30 – 20.00 Komuna organizita kunveno de BET-anoj (Ĉefsalono)
20.00 – 21.00 Koncerto ne Natalia BERTSE k.a. (Ĉefsalono)

La 7-a de julio (dimaŝo)
07.00 – 08.00 Matenmanĝo – la unua alterno. En kafejo de sciencia kaj teknologia parko.

Programo de BET-55



La 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55) okazos la de la 6-a ĝis la 14-a de julio 2019 en la urbo Panevėžys, Litovio.

La 5-an de julio (vendredo)

10.00–22.00: Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj – en la universitata konstruaĵo (Nemuno str. 33).

La 6-an de julio (sabato)

9.00–22.00: Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj (samloke).

13.00–14.00: Tagmanĝo (memstare).

18.00–19.00: Vespermanĝo (memstare).

19.30–20.00: Komuna organiza kunveno de la BET-anoj – en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo (Nemuno str. 33).

20.00–21.00: Koncerto de Natalia Bertse "Kantoj de nia juneco" k. a. (samloke).

La 7-an de julio (dimanĉo)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno. En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko (J. Žemgulio str. 46).

8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno (samloke).

9.00–10.00: Organizaj kunvenoj de la gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj, de la gvidantoj kaj prelegantoj de la Somera universitato, de la gvidantoj kaj prelegantoj de SUS-36 de AIS, de la gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj – en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo (Nemuno str. 33).

10.00–11.00: Malfermo de la Somera universitato. La unua prelego el la prelegociklo de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (la

lokon vidu en la gazeto de BET-55).

10.00–11.00: Inaŭguro de la SUS-36 de AIS. La unua prelego de prof. Amri Wandel el la triprelega kurso „Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb“

(la lokon vidu en la gazeto de BET-55).

10.00–11.00: Prelegserio de d-ro Gábor Márkus „Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?“: la unua prelego “De animala ekzisto ĝis diiĝo” (la lokon vidu en la gazeto de BET-55).

10.00–12.00: La unuaj lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (la lokojn kaj gvidantojn vidu en la gazeto de BET-55).

11.00–12.00: Prelegociklo „Lingvo kaj kulturo“ de prof. Ilona Koutny. La unua prelego „Interkultura komunikado kaj Esperanto“ (la lokon vidu en la gazeto de BET-55).

11.00–12.00: Prelegserio de Yves Nevelsteen kadre de SUS-36 „Oftaj eraroj kaj novaj vortoj en Esperanto“.

11.00–12.00: Prelegserio de prof. Walter Ŝelazny pri religioj: la unua prelego (la lokon vidu en la gazeto de BET-55).

12.30–13.30: Tagmanĝo – la unua alterno. En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko (J. Žemgulio str. 46).

13.30–14.30: Tagmanĝo – la dua alterno (samloke).

15.00–16.00: Solena inaŭguro de BET-55. En la urba Komunuma centro (Kranto str. 28).

16.00–17.00: Urba koncerto por la partoprenantoj de BET-55 (samloke).

17.00–18.00: Eventuala akcepto por la

partoprenantoj de BET-55 (samloke).

18.30–19.30: Vespermanĝo – la unua alterno. En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko (J. Žemgulio str. 46).

19.30–20.30: Vespermanĝo – la dua alterno (samloke).

21.00–22.00: Koncerto de la grupo „Sepa kaj Asorti“ – en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo (Nemuno str. 33).

La 8-an de julio (lundo)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno.

8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno.

10.00–11.00: Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio.

10.00–11.00: Prelego de prof. Amri Wandel pri spacteleskopoj.

10.00–11.00: Prelego de d-ro Gábor Márkus „La plej gravaj historiaj eventoj kaj iliaj lingvaj sekvoj“.

10.00–12.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

11.00–12.00: Prelego de prof. Ilona Koutny „Mondo, vortprovizo kaj vortaro“.

11.00–12.00: Prelego de Yves Nevelsteen „Bitlibroj kaj bitgazetoj en Esperanto“

11.00–12.00: Prelegserio de prof. Walter Želazny pri religioj: la dua prelego.

11.00–12.00: Prelego de Lee Jungkee „Kien Azia Esperanto-movado iras“.

12.30–13.30: Tagmanĝo – la unua alterno.

13.30–14.30: Tagmanĝo – la dua alterno.

15.00–16.00: Prelegserio de d-ro Orlando Raola pri media kemio: la unua prelego „Ĝenerala enkonduko al medioprotekta kemio“.

15.00–16.00: Prelego de Anna Striganova „Lingvo de fabeloj. Fabeloj pri amo“.

15.00–16.00: Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Instruado de Esperanto en ĉinaj

universitatoj kaj lernejoj“.

15.00–16.00: Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja.

15.00–16.00: Lanĉo de la nova eldono de “Baza Literatura Krestomatio”, kuneldonita de “Sezonoj” kaj Litova Esperanto-Asocio. Prezentas Halina Gorecka, Povilas Jegorovas kaj Aleksander Korĵenkov. (La libro aĉeteblas je speciala promocio prezo).

16.00–17.00: Prelego de prof. Aleksandr Melnikov “Pri Esperantaj vortoj – kun humuro kaj serioze”.

16.00–17.00: Prelego de Dima Ŝevĉenko “De ‘Progreso’ al ‘Impeto’: kiel estiĝis la Esperanto-eldonejo?”

16.00–17.00: Prelegociklo de prof. Walter Želazny pri sociologio de la Esperanto-movado: la unua prelego.

16.00–17.00: Koncerto de Gafur Mirzabajev.

17.30–18.30: Vespermanĝo – la unua alterno.

18.30–19.30: Vespermanĝo – la dua alterno.

20.00–21.00: Koncerto de Kaŝi.

La 9-an de julio (mardo)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno.

8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno.

10.00–11.00: Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio.

10.00–11.00: Prelego de prof. Amri Wandel pri spacteleskopoj.

10.00–11.00: Prelego de d-ro Gabor Markus „Enmigrado en Eŭropon kaj la Eŭropa dilemo“.

10.00–12.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

11.00–12.00: Prelego de prof. Ilona Koutny „Esperantlingva bildo de la mondo“.

11.00–12.00: Prelego de Yves Nevelsteen

„200 + Esperantaj marknomoj en Benelukso“.

11.00–12.00: Prelegserio de prof. Walter Ŝelazny pri religioj: la tria prelego.

11.00–12.00: Prelego de Vytautas Ŝilas „La unua periodo de Litova Esperanto-Asocio“.

11.00–12.00: Kvizo „Kiu estas sur la ekrano?“ Gvidas Halina Gorecka kaj Aleksander Korŝenkov.

12.30–13.30: Tagmanĝo – la unua alterno.

13.30–14.30: Tagmanĝo – la dua alterno.

15.00–16.00: Prelego de d-ro Orlando Raola „Kemio kaj mediprotektado en la hidrosfero“.

15.00–16.00: Prelego de Anna Striganova „Fabela Antagonisto aŭ iom pri ŝato al malbonaj herooj“.

15.00–16.00: Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Kapablo de transkultura komunikado kaj Esperanto-instruado/lernado“.

15.00–17.00: Seminario de Pavla Dvořáková „Ĉu muziko povas kuraci?“.

16.00–17.00: Prelego de prof. Aleksandr Melnikov „Leksikaj novismoj kaj neologismoj: *anatem* aŭ *od?*“

16.00–17.00: Prelego de Dima Ŝevĉenko „La Reta Revuo. Kio ĝi estas?“

16.00–17.00: Prelegciklo de prof. Walter Ŝelazny pri sociologio de la Esperanto-movado: la dua prelego.

16.00–17.00: Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja.

16.00–17.00: Koncerto de Kaŝi kaj Halina Kuropatnicka-Salamon.

17.30–18.30: Vespermanĝo – la unua alterno.

18.30–19.30: Vespermanĝo – la dua alterno.

20.00–21.00: Koncerto de Amira Chun. En la urba komunuma centro (Krantó str. 28. Salono de Aranĝoj).

La 10-an de julio (merkredo)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno.

8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno.

9.00–18.00: Tuttaga ekskurso.

12.30–13.30: Tagmanĝo (por restintoj en BET-ejo).

18.30–19.30: Vespermanĝo.

20.00–21.00: Koncerto de Jogailė Ĉojutė. En la urba komunuma centro (Krantó str. 28. Salono de Aranĝoj).

La 11-an de julio (ĵaŭdo)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno.

8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno.

10.00–11.00: Prelego de prof. Aloyzas Gudaviĉius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio.

10.00–11.00: Prelego de Anna Striganova „Fabeloj de nescienca vidpunkto aŭ fabeloj por romantikuloj. Ĉu heroo malvenkas?“

10.00–11.00: Prelego de d-ro Gábor Márkus „La spertoj de mia indramang-metoda lingvoinstruado“.

10.00–11.00: Prelego de Alfred Heiligenbrunner „Historio de Pi“.

10.00–12.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

11.00–12.00: Prelego de prof. Ilona Koutny „Ĉu facila lingvo facile lerneblas?“

11.00–12.00: Prelego de d-ro Manfred Westermayer „Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj“.

11.00–12.00: Prelegserio de prof. Walter Ŝelazny pri religioj: la kvara prelego.

11.00–12.00: TEĴA: kunveno de ĵurnalistoj (por ĉiuj). Gvidas Alfred Schubert.

11.00–12.00: Kvizo „Kio? Kie? Kiam?“ Gvidas Damir Kurbangaleev.

12.30–13.30: Tagmanĝo – la unua alterno.

13.30–14.30: Tagmanĝo – la dua alterno.

15.00–16.00: Prelego de d-ro Orlando Raola „Kemio kaj mediprotektado en la terkruŝto“.

15.00–16.00: Prelego de Anna Striganova „Harry Harrison. Unu el la plej romantikaj kialoj lerni Esperanton“.

15.00–16.00: Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Konciza historio de Esperanto-movado en Ĉinio“.

15.00–16.00: Aŭtora horo kun Mikaelo Bronŝtejn.

15.00–15.30: Spektakleto de la urba infanĝardeno „Puriĉna“ laŭ la slovena popola fabelo „Paŝtisteto“.

16.00–17.00: Prelego de prof. Aleksandr Melnikov „Kiel artefarita lingvo kvazaŭetnon kreis“.

16.00–17.00: Prelego de Dima Ŝevĉenko „Modernaj sociaj retoj kaj Esperanto“: la unua parto.

16.00–17.00: Prelegciklo de prof. Walter Ŝelazny pri sociologio de la Esperanto-movado: la tria prelego.

16.00–17.00: Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja.

16.00–17.00: Violonkoncerto de Fransoazo.

17.30–18.30: Vespermanĝo – la unua alterno.

18.30–19.30: Vespermanĝo – la dua alterno.

20.00–21.00: Koncerto de Mikaelo Bronŝtejn.

La 12-an de julio (vendredo)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno.

8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno.

10.00–11.00: Prelego de prof. Aloyzas Gudaviĉius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio.

10.00–11.00: Prelego de Anna Striganova „Fantazio kaj fantastiko“: la unua parto.

10.00–11.00: Prelego de d-ro Gábor Márkus „La Espero“.

10.00–11.00: Prelego de Heidi Goes „Pri Esperanto-movado en Indonezio, Singapuro kaj Malajzio“.

10.00–12.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.

11.00–12.00: Prelego de prof. Ilona Koutny „Universitata instruado de Esperanto: ĉu lukso, ĉu prestiĝo?“

11.00–12.00: Prelego de Mikaelo Bronŝtejn „SEJM legendara“.

11.00–12.00: Prelegserio de prof. Walter Ŝelazny pri religioj: la kvina prelego.

11.00–12.00: Prelego de Danka Leyk „Pri psikologio de la amo“: la unua parto.

12.30–13.30: Tagmanĝo – la unua alterno.

13.30–14.30: Tagmanĝo – la dua alterno.

15.00–16.00: Prelego de d-ro Orlando Raola „Kemio kaj mediprotektado en la biosfero“.

15.00–16.00: Prelego de Anna Striganova „Fantazio kaj fantastiko“: la dua parto.

15.00–16.00: Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Kiel efike atingi kapablojn de Esperanto-instruantoj“.

15.00–16.00: Prelego de Danka Leyk „Pri psikologio de la amo“: la dua parto.

16.00–17.00: Prelego de prof. Aleksandr Melnikov „Lingva personeco de tipa Esperanto-kulturano“.

16.00–17.00: Prelego de Dima Ŝevĉenko „Modernaj sociaj retoj kaj Esperanto“: la dua parto.

16.00–17.00: Prelego de Peter Kühnel „Baŭhaŭsa arta stilo – mallonga periodo de 1919 ĝis 1933“.

16.00–17.00: Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja.

16.00–17.00: Koncerto de Zuzanna Kornicka.

17.30–18.30: Vespermanĝo – la unua alterno.
18.30–19.30: Vespermanĝo – la dua alterno.
20.00–21.00: Koncerto de la muzika grupo „Ekvinokso”.

La 13-an de julio (sabato)

7.00–8.00: Matenmanĝo – la unua alterno.
8.00–9.00: Matenmanĝo – la dua alterno.
10.00–11.00: Prelego de d-ro Gábor Márkus „Stelo super la Han-rivero“.
10.00–11.00: Prelego de d-ro Orlando Raola „Energio kaj klimato cele al daŭripova evoluo“.
10.00–11.00: Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Koncize pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio“.
10.00–12.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj.
11.00–12.00: Pupista horo de Anna Striganova.
11.00–12.00: Prelego de Robert Kamiński „Zamenhofaj Esperanto-objektoj“.
11.00–12.00: Prelego de d-ro Hans Michael Maitzen “Magnetaj Steloj”.
12.30–13.30: Tagmanĝo – la unua alterno.
13.30–14.30: Tagmanĝo – la dua alterno.
15.00–16.00: Prelego de Alfred Heiligenbrunner „Gravitaj Ondoj“.

15.00–16.00: Prelego de Tatjana Auderskaja „Libera artisto“ (pri Nikolaj Blajkov).
15.00–16.00: Prelego de Marco Teani „Kiel nia civilizo povas fali: kolapsologio por nia generacio“.
16.30–17.30: Solena fermo de BET-55.
18.00–19.00: Vespermanĝo – la unua alterno.
19.00–20.00: Vespermanĝo – la dua alterno.
20.30–21.30: Adiaŭa vespero kaj koncerto.

La 14-an de julio (dimanĉo)

7.00–9.00: Matenmanĝo.
9.00–18.00: Disveturo.

La definitiva programo aperos en la ĉiutaga gazeto de BET-55 „Abelo“.

Krome okazos jenaj aferoj:

- 1. Du duontagaj ekskursoj anoncotaj** komence de BET-55.
- 2. Fabela ekspozicio** de Anna Striganova, ekspozicio de Robert Kamiński pri ZEOJ kaj eventuale aliaj ekspozicioj.
- 3. Ĉiutage aperos la gazeto de BET-55** “Abelo”. Redaktoro Stano Marček (*stano.marcek@gmail.com*). Bonvolu kunlabori kun li.
- 4. Ĉiutage funkcios riĉa libroservo.**
- 5. Laŭbezone okazos aliaj anticipe neplanitaj aranĝoj.** Sekvu anoncojn en la gazeto de BET-55.
- 6. Eventuale okazos ankaŭ Diservo.**

La organiza komitato laŭbezone rajtas ŝanĝi la programon. La ŝanĝoj, precizigoj, informoj pri salonoj k.s. aperos en la ĉiutaga gazeto de BET-55 *Abelo*.

Pliaj aktualaj informoj pri BET-55 estas troveblaj en niaj retejoj <http://sezonoj.ru/bet55/> kaj <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55>

Kliknitajn povojn doproki Adobe Flash Player

• Anoncoj • Novajĵoj • Aranĝoj • Dokumentoj • Fotoalbumo • Librovizitilo • Korespondi

Google

Baltiaj Esperanto-Tagoj 55
 2019 julio 06-14, Panevėžys, Litovio | Retajligilo
 Facebook-grupo de LiEA | Facebook-grupo de BET-55

titolo	daŭro	tempo	skribinto
Kiel atingi kvantadogojn de Litva Kolegio el BET-55	LEA	2019/06/28 08	
Kiel atingi BET-55-an?	LEA	2019/06/15 228	
Kiel atingi BET-55-an per aso el Kuzmas, Vilenius kaj Riĝa	LEA	2019/06/28 59	
Kiel atingi Komunuman palacon (koncertojn)	LEA	2019/06/21 96	
Memoro dum BET-55	LEA	2019/06/21 173	
La 2a infocentilo pri BET-55	LEA	2019/06/15 286	
Listo de prezintoj kaj teknikaj informoj antaŭ BET-55 an	LEA	2019/06/05 279	
BET-55: la provizora programo	LEA	2019/05/20 428	
Ekskurso post BET-55 UK en Labeto an	LEA	2018/11/15 468	
Per asento de retaj aligintoj al BET-55 an	LEA	2018/12/12 599	
Fadilulo pri BET-55 an	LEA	2018/06/28 664	
Trupa informacia apse 55-ajna Baltioj esperantistoj direkto	LEA	2018/06/28 640	
Informa Bulburo de BET-55 kaj Aligintoj an	LEA	2018/04/21 1694	
Listo de la aligintoj an	LEA	2018/04/18 6858	
Bazaj sciigoj pri litova lingvo	LEA	2018/04/18 305	
Koncertaj faktoj pri la nuna Litovio	LEA	2018/04/18 261	

AIS studad-sesio en Baltio

En julio 2019 Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) denove okazos kadre de granda internacia kunveno.

Post la sukcesa SUS35, kadre de la 85-a Itala Kongreso en San Marino, la sekva SUS36 okazos dum la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55) en Panevėžys, Litovio.

En 2017, post kvin-jara paŭzo, AIS rekomencis regule organizi sian plej altnivelan kunvenon. SUS34 okazis en Varsovio, kaj kiel menciite, SUS35 en San Marino, kaj SUS36 okazos en Litovio.

Unuafoje AIS-sesio estos parto de BET, kaj la AIS-kursoj aperos en la oficiala programo de BET. Simile al la AIS-IKU-inaŭguro dum la UK, okazos inaŭguro de SUS, kun

specimenaj reklamaj gustumoj pri la kursoj, okazontaj dum la cetera semajno.

Por SUS36 estas antaŭdataj kursoj kun po tri-kvar prelegoj. Fine de ĉiu kurso estos ebleco ekzameniĝi kaj ricevi AIS-ateston. Eblas sendi kurso-proponojn al informo@ais-sanmarino.org. Krom kursoj estas bonvenaj ankaŭ proponoj de ordinaraj prelegoj pri variaj sciencaj temoj.

Pliajn informojn pri AIS kaj SUS eblas trovi en <http://www.ais-sanmarino.org/>

Amri Wandel

Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb (resumo)

Du jardekojn post la sendo de la unua spacteleskopo Hubble, en 2019 NASA sendos ĝian heredanton, la multe pli grandan spacteleskopon James Webb. La teleskopo Hubble kaptis kelkajn el la plej belaj astronomiaj fotoj, kaj faris amason da gravaj malkovroj. James Webb havos diametron de 6 metroj (kompare kun 2.5 m de Hubble) kaj flugos en orbito ĉirkaŭ la suno, tre for de la tero, dum Hubble ĉirkaŭis la Teron en orbito je alteco de 600 km. En la prelego ni aŭdos kial estas bezonataj teleskopoj en la spaco, kaj kial ili superas multege pli grandajn teleskopojn lokitajn surtere. Ni aŭdos pri aliaj spacteleskopoj, kiuj estis konstruitaj sekve de Hubble, en diversaj ondolongoj kaj por diversaj celoj, kaj kiujn novajn esplorojn ebligas James Webb.



Amri Wandel (biografio)

Amri Wandel, kiu gvidos la universitatan sesion de AIS en Panevėžys, estas profesoro pri astrofiziko en la Hebrea Universitato de Jerusalemo. Li estas internacie konata esploristo pri nigraj truoj kaj astrobiologio. Profesoro Wandel estas prezidanto de la Israela Asocio pri Astrobiologio (ILASOL)

kaj membro de la Internacia Astronomia Unio (IAU). Li estas populara preleganto kaj lekciisto pri astrofiziko kaj astrobiologio, kiujn li instruas en la Universitato de Jerusalemo dum dudek jaroj, ĝis nun al pli ol 2500 studentoj.

En Esperantujo Amri Wandel estas prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino (AIS) kaj de Esperanto-Ligo en Israelo, membro de la Akademio de Esperanto (ekde 1992), kunordiganto de Internacia Kongresa Universitato (IKU). Li estis prezidanto de TEJO kaj plurfoje estrarano de UEA. Amri Wandel verkis kaj redaktis plurajn sciencajn librojn, inter ili estas ok IKU-libroj kaj la libro *La Kosmo kaj Ni* (premiita kiel la plej bona scienca libro, en 2001 kaj 2018).

Magnetaj Steloj (resumo)

En la jaro 1947 la usona astronomo Horace Babcock aplikis sian Zeeman-analizilon al la stelo 78 Virginis, kaj trovis displitiĝon de la absorblinioj en ties spektro. Tio estis do la unua mezuro de forta tutgloba magnetkampo en stelo. Ankaŭ en aliaj steloj de la sama temperatura regiono (surface 10 mil gradoj) li trovis tiajn magnetkampojn kun la sama forto, do tipe kelkmil Gaussoj. Tiuj magnetaj steloj estis malkovritaj jam en 1897 de la Harvarda astronomo Antonia Maury, kiu trovis spektrajn apartaĵojn en ili, pro kio ŝi nomis ilin pekuliaraj. Elstara eco de tiuj steloj, kiuj konsistigas ĝis 10 elcentojn de la stelaro samtemperatura, estas ilia perioda variado, kaj de la magnetkampo kaj de spektraj linioj kaj de ilia lumo. Kaj plej stranga estas la nekoincido de la rotacia akso de tiuj steloj kun la magnetakso, sen iu ajn prefero de la angulo inter ambaŭ. Krome tiuj pekuliaraj kaj magnetaj steloj rotacias signife pli malrapide ol normalaj steloj, kaj apenaŭ aperas inter ili duoblaj sistemoj.

La prelego prezentos la evoluon de fotometria sistemo, kiun la aŭtoro starigis por statistike progresi rilate la aperon de tiuj „strangaj“ steloj en nia Galaksio, sed eĉ ankaŭ en la najbara galaksio, la Granda Magelana Nubo.

Hans Michael Maitzen

Hans Michael Maitzen (biografio)

Hans Michael Maitzen estas aŭstria astronomo. Li naskiĝis en Graz la 28-an de marto 1943. Klasikan gimnazion li tie finis per abiturienta ekzameno en 1961 kaj studis en la Universitato de Graz astronomion, matematikon kaj fizikon. En astronomio li akiris doktorecon Dr. phil. en 1967.

De 1964 ĝis 1968 li estis asistanto en la sunobservatorio Kanzelhöhe, ligita al Astronomia Instituto de Universitato de Graz. De 1969 ĝis 1976 li estis scienca asistanto en Astronomia Instituto de la novfondita Ruhr-Universitato Bochum, Germanio. En 1976 li iĝis membro de Astronomia Instituto



de la Universitato de Vieno, docentiĝis en 1980 kaj fariĝis eksterordinara universitata profesoro en 1989. Unu el liaj kernaj agadoj, krom sciencaj esplorado kaj instruado, estis kampanjo por la membriĝo de Aŭstrio en Eŭropa Suda Observatorio (ESO), kiu realiĝis en 2008, kiam Maitzen emeritiĝis. Maitzen estas profesoro de AIS San Marino, ano de la senato kaj la prezidanto de 2012 ĝis 2015, nun vicprezidanto.

Li eklernis Esperanton en 1961 kaj fariĝis internacie aktiva esperantisto, 1968-1969 prezidanto de TEJO. En 1987 li organizis internacian scienca simpozion „Esperanto centjara“ en la Universitato de Vieno.

Maitzen estas ĉefrepresentanto de UEA en la Viena sidejo de UN ekde ties fondiĝo en 1979. En la UK 2013 en Rejkjaviko li tial kaj pro aliaj aktivadoj estis honorigita per la Diplomo pri Elstara Agado de UEA.

Historio de „Pi“ (resumo)

Cirkloj, elipsoj, sferoj, elipsoidoj, konusoj: en ĉiu ronda objekto aperas tiu rimarkinda nombro 3,14..., kiun ni nomas π (Pi). Krom en geometrio, ankaŭ en statistiko, en nombroteorio, en analizo ĝi aperas. Kion ni scias pri ĝi? Kion sciis niaj antaŭuloj? Ĉu nun ĉiuj ciferoj de Pi estas konataj? Kie troviĝas via naskiĝdato en ĝi? Tiu prezentado donas unuan superrigardon.

Alfred Heiligenbrunner

Gravitaj ondoj (resumo)

En la jaro 2016, la 11-an de februaro, oni anoncis, ke finfine estis rekte detektitaj gravitaj ondoj. Pasis pli ol 100 jaroj post tio, ke Einstein publicis la ideon, ke ankaŭ graviteco ne povas efiki pli rapide ol luma

rapideco. (Kepler kaj Newton ankoraŭ opiniis, ke graviteco tuj efikas.) Sed ankaŭ Einstein mem ne estis tutcerta, ĉu gravitaj ondoj vere ekzistas. Ne klaris, ĉu la matematiko de la teorio pri relativeco vere respegulas la naturon. Estis penseble, ke la matematiko estis ne perfekta kaj nur tial la gravitaj ondoj aperas en la kalkulado.

Se ili ekzistus, Einstein opiniis, ili verŝajne neniam estus mezureblaj, ĉar ili estas tiom malfortaj.

Tiu prezentado volas montri la fenomenon de gravitaj ondoj, per kia delikata maŝino ili estis detektitaj, kiujn eventojn oni malkovris ekde 2015, kiuj aliaj ideoj aperis por atesti gravitajn ondojn.

Alfred Heiligenbrunner (biografio)

Alfred Heiligenbrunner naskiĝis en la jaro 1963 en Aŭstrio. Li studis matematikon en Linz en la 1980-aj jaroj, enprofundiĝinte en statistikon kaj algebron.

Ekde 1991 li laboris en diversaj kompanioj kiel softvar-kreanto (programisto). Li loĝas kun sia kato proksime de Vieno, Aŭstrio. Esperanto aperis en lia vivo ekde 1985.



La fervojista grupo de Esperantistoj en Linz afable ofertis senkostajn kursojn kaj kunvenojn.

Ekde 2017 li apartenas al la estraro de Aŭstria Esperanto-Federacio. Momente li estas prezidanto de AEF.

Li ŝatas vortludojn, ankaŭ en Esperanto. Speciala tipo de vortludoj estas kontraŭknavoj, kie oni intermiksas la komencajn literojn de du vortoj. Ekzemple rano - seĝo, sano - reĝo.

Lia hejmpaĝo entenas inter alie: • paĝon por serĉi rimvortojn: http://ah9.at/esp_rim_2012 • liston de kontraŭknavoj: http://ah9.at/kk_bazo_2_x_2_27_fmt2.html • formularon por mem serĉi kontraŭknavojn: <http://ah9.at/schuettel/?lang=eo&w=ond>

(Ekzemplaj kontraŭknavoj:

*Ni pri gravita ondo miras,
dum daŭre ĝi tra mondo iras.*

Aŭ:

*Ne miru pri deco de Pi,
ĝi estas ja peco de Di'.)*

Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj (resumo)


Pri tio mi prelegis en 2012, okaze de la EEU-kongreso en Maribor.

Intertempe ĉie eblas legi pri poluitaj bordoj de riveretoj, riveroj kaj lagoj – tie oni vidas la plastaĵojn.

En ĉiu maro ekzistas kirlo, kie tia rubo kolektiĝas en gigantaj areoj – videbla en la surfaco.

Ne nur je la surfaco, sed ankaŭ pli profunde troviĝas plastaj ruboj. Birdoj, fiŝoj, malgrandaj organismoj, sed ankaŭ mamuloj manĝas rekte tian predon. Multaj mortas pro plena stomako, kiu malhelpas plian manĝon, aliaj estas kaptitaj de perditaj retoj, ŝnuregoj aŭ ringoj. Krome temas pri nevidebla danĝero pro tia rubaĵo.


Manfred Westermayer



Manfred Westermayer (biografio)

D-ro Manfred Westermayer naskiĝis en 1947 kaj loĝas kun sia edzino en Gundelfingen, Germanio. 3 gefiloj kaj 5 genepoj zorgas pri pensado super la propra vivo. Kemiisto, laboris pri spektroskopio de molekuloj. Interesiĝas pri naturo kaj la postsekvoj de kemio. Kunfondis la Verdan Partion en Germanio kaj ekde 1991 estas sekretario de la Asocio de Esperantistaj Verduloj, AVE, kunlaboranta fakasocio de UEA, kiu informas Verdajn Partiojn pri Esperanto kaj esperantistaron pri tiaj partioj.

Retejo de AVE: verduloj.org



Lingvokulturologiaj temoj (resumo)

Aleksandro Melnikov, la konata interlingvisto, profesoro, verkisto, tre konata Esperanto-pedagogo, esperantologo, prelegos en BET-55 pri lingvokulturologiaj temoj, traktitaj en liaj disertacioj:

1. Pri Esperantaj vortoj – kun humuro kaj serioze.
2. Leksikaj novismoj kaj neologismoj: anatemi aŭ odi?
3. Kiel artefarita lingvo kvazaŭetnon kreis.
4. Lingva personeco de tipa Esperanto-kulturano.

Aleksandro Melnikov (biografio)

D-ro hab., emerita profesoro Aleksandro S. Melnikov naskiĝis en 1951 kaj esperantistiĝis en 1965. Membro de Akademio de Esperanto, laŭreato de la premio je la nomo de akademiano Paul Ariste (pro kontribuo al interlingvistiko), plurjara kunlaboranto de Interlingvistikaj Studoj ĉe Poznana Universitato (UAM).

Melnikov diplomiĝis pri kemio ĉe Rostova Ŝtata Universitato kaj instruis fizikon, kemion, biologion. Por defendi disertacion pri Esperanto li bezonis lingvistikan diplomon kaj ricevis kvalifikon de instruisto pri la angla



lingvo. En 1990 li verkis sian doktoran verkon (en la Sovetia / Rusia sistemo – kandidatan) pri teorioj rilataj al la strukturo kaj funkcioj de internacia planlingvo. En 2004 sekvis la unua en Rusio habilitacia disertacio (Rusi-sisteme – doktora) pri tio, kio ebligas al Esperanto krei, konservi kaj transdoni kulturaĵojn, kio karakterizas lingvan personecon de tipa Esperanto-kulturano, kiel naskiĝas esperantonimoj, kiujn rimedojn Esperanto havas por estetikeco kaj emocieco de tekstoj ktp.

Post 1996 ĝis la emeritiĝo en 2012 Aleksandro laboris kiel docento, poste profesoro kaj fremdlingv-katedra estro de teknika universitato. Aŭtoris centon da sciencaj, popularigaj kaj aliaj artikoloj kaj dekon da libroj en la rusa kaj Esperanto.

Dum jardekoj Melnikov aktivas en la Esperanto-movado: klubestro en Rostov-na-Donu (kvinon da jaroj eĉ profesia), SEJM-prezidanto, ĉefdelegito de UEA en Sovetio, la Rusia Esperantisto de la Jaro (2004).

Ekde 1968 Aleksandro instruis Esperanton en diversaj landoj, interalie, dum la Bergena UK, kadre de la projekto Indiĝenaj Dialogoj en Nederlando, en NASK (Usono), Barlastono (Britio) k.a.

Melnikov prelegis aŭ prelegvojaĝis en dekoj da landoj: de Japanio ĝis Hispanio, de Islando ĝis Aŭstralio.



Prelegserio de Márkus Gábor (resumo)

Dum BET-55 en Panevėžys d-ro Márkus Gábor prezentos prelegserion, en kiu li traktos jenajn temojn:

1. De animala ekzisto ĝis diĝo
2. La plej gravaj historiaj eventoj kaj iliaj lingvaj sekvoj
3. La nuntempa enmigrado en Eŭropon kaj la Eŭropa dilemo
4. La spertoj de la indramang-metoda lingvoinstruado
5. La ŝancoj, ke Esperanto fariĝu internacie akceptita komuna lingvo en la mondo

Márkus Gábor (biografio)

D-ro Márkus Gábor naskiĝis en 1948 en Hungario. Li finis la studprogramon de la Budapeŝta Ekonomika Universitato en 1972 en la kampo de planado kaj matematiko kaj poste instruis matematikon en la sama universitato (ankaŭ por multnombraj vjetnamaj studentoj). En 1982 li ricevis stipendion de la japana entrepreno Verda Stelo por studi en Nanzan-Universitato en Nagoya. Post sukcesa fino de la studprogramo li doktoriĝis pri la analizo de la japana ekonomia evoluo.

En la 1990-aj jaroj li estis strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizaĵo, la Nacia Petrola Korporacio. Por konatiĝi kun la internacie uzataj plej modernaj entrepreno-direktaj metodoj, en 1993 li sukcese finis studprogramon en Bostono (Usono). Kiam Hungario kaj aliaj orient-eŭropaj landoj decidis aliĝi al Eŭropa Unio, li gvidis la Hungarian parlamentan kontrol-revizian organizon. Post la emeritiĝo li laboras kiel prezidanto de la Eŭrazia Kultura Centro



kaj instruas Esperanton en Azio, precipe en Tajlando kaj Koreio. D-ro Márkus verkis pli ol 150 fakajn studojn en diversaj lingvoj.

En du sinsekvaj trijaraj oficperiodoj ekde 2013 li reprezentas Hungarian Esperanto-Asocien en la komitato de UEA. En Esperanto li verkis la librojn *Ruĝa suno kaj verda stelo* (2011), kiu aperis ankaŭ hungare kaj japane, *Trans la Flava Maro* (2012), *Esperanto-Kurso por koreoj* (Du volumoj, 2014), *Sudorientaj vojaĝoj* (2014), *Koreio, la kongreslando* (2016). Kelkaj el liaj libroj aperis ankaŭ ĉine, hungare, japane kaj koree.

Libroj de d-ro Márkus: <http://esperantofre.com/mondo/mglibroj.htm>

Prelegserio pri mediprotektada kemio (resumo)

Kadre de BET-55 Orlando E. Raola liveros prelegserion (6 prelegoj) pri mediprotektada kemio, derivitaj el kurso, kiun li komencis instrui en la angla en la Universitato de Kalifornio Santa Barbara en 2005, kaj poste prezentis en pluraj eroj kadre de lia instruado de analiza kemio en Santa Rosa Junior College.

La temoj de la prelegoj:

1. Ĝenerala enkonduko al mediprotektada kemio. Kemio kaj mediprotektado en la atmosfero.

2. Kemio kaj mediprotektado en la hidrosfero.
3. Kemio kaj mediprotektado en la terkrusto.
4. Kemio kaj mediprotektado en la biosfero.
5. Energio kaj klimato cele al daŭripova evoluo.

La prelegoj estos memstaraj, la partoprenontoj povos elekti laŭvole, sed Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino agnoskis la tuton kiel kurson de SUS-36 kadre de BET-55, tiel ke AIS liveros atestilojn al tiuj, kiuj ĉeestos ĉiujn sesiojn kaj sukcese trapasos simplan ekzamenon je la fino.

Orlando E. Raola (biografio)

Orlando E. Raola naskiĝis en Havano, Kubo, en 1955. Li studis kemion (diplomiĝis en 1978) kaj juron (diplomiĝis en 1986) en la Universitato de Havano. Li laboris en metalurgia industrio kaj en esplorinstituto pri materialoj. En 1994 li elmigris al Usono, kie li akiris magistran diplomon ĉe Kalifornia Ŝtata Universitato (1999) kaj doktoran diplomon (Ph. D. en kemio, Universitato de Kalifornio, Santa Barbara, 2005).

Lia subfako estas analiza kemio, kun speciala emfazo je analizo de specimenoj rilataj al mediprotektado kaj al evoluigo de novaj materialoj. Ekde la doktoriĝo li estas profesoro pri kemio ĉe Santa Rosa Junior College, universitato por la unuaj du jaroj de supera studado, en Santa Rosa, Kalifornio, Usono. Li loĝas en la urbo Larkspur (Norda Kalifornio), kun la edzino Elsa Torres kaj plenkreska filo Abel.

Esperanton li eklernis en 1984 pro elreviĝo je la ebleco lerni multajn fremdajn lingvojn. Li tion celis por sukcese komunikiĝi kun homoj de diversaj etnoj kaj kulturoj. Li akiris fluecon en la lingvo ĉirkaŭ 1987, kaj tuj ekaktivis en la nacia kaj monda movadoj. Li ankaŭ instruis la lingvon diversnivele.



En 1990-1994 li laboris profesie por Esperanto kadre de la Fremdlingva Eldonejo Jose Marti en Havano. Kunfondinto en 1988 de la Esperanto-elsendoj de Radio Havano Kubo, li estis redaktoro kaj parolisto tie dum ses jaroj.

Post la elmigro al Usono li daŭrigis sian poresperantan agadon seninterrompe. Elektita al la Estraro de la landa asocio unue, kaj poste kiel predizanto de la landa asocio Esperanto-USA dum 2011-17. Membro de Akademio de Esperanto ekde 2016, kie li estras la fakon pri Faka Lingvo. Komitatano de UEA ekde 2013. En 2017 li volontulis dum du monatoj en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

Lia scienca agado en Esperanto inkluzivas la aktivan partoprenon en la Internaciaj Kongresaj Univesitatoj, kie li jam prelegis ses fojojn, Sciencan Kafejon, unufoje, kaj la organizan laboron por la Esperantologiaj Konferencoj dum la lastaj kvin jaroj. Li ankaŭ prelegis multfoje en la naciaj kongresoj de Esperanto en Kubo, Usono kaj Meksiko. Li verkis artikolojn, eseojn kaj recenzojn. Okaze de la unua oficiala laŭleĝa vizito de usonaj esperantistoj al Kubo, li kunordigis kaj partoprenis en la filmo *Trans la Florida markolo*. Lia traduka laboro etendiĝas ankaŭ al beletro, libroforme aperis lia traduko de *Nia Ameriko* de Jose Marti. Ankoraŭ nepublikigita

restas lia traduko de romano de la elstara kuba verkisto Alejo Carpentier. Orlando estas ofta vojaĝanto tra la mondo, jen pro profesiaj devoj, jen por Esperanta agado.

Ambaŭkaze, li ĉiam kontaktas la lokajn esperantistojn en la vizitataj urboj kaj mondopartoj, kaj estis gasto de pluraj lokaj kluboj kaj Esperantaj institucioj en Kanado, Brazilo, Argentino, Urugvajo, Japanio, Germanio, Britio, Belgio, Finnlando, Pollando, Hispanio, Rusio, Aŭstralio kaj aliaj landoj.

Du prelegocikloj: religioj kaj sociologio de la Esperanto-movado (resumo)

Walter Ŝelazny prezentos dum BET-55 du prelegociklojn: pri religioj kaj pri la sociologio de la Esperanto-movado.

I. Kio estas religio(j)

1. Antropologiaj kaj sociologiaj difinoj de religio. Sistematiko de religioj en la mondo laŭ kompreno de la koncepto de Dio:

a) religioj de Abrahamo: judaismo, kristanismo, islamo, b) religioj hinduismaj, c) religioj sen Dio: konfuceanismo, ŝintoismo, budhismo (?), d) religioj de indianoj antaŭkolumbaj, e) religioj „primitivaj“, f) religioj de Libroj, g) religioj sen Libroj.

2. Scienco kaj religio. Kosmologio en religioj: ĉu kosmo havas komencon kaj finon, ĉu ĝi estas eterna, ĉu naskiĝas kaj mortas, ĉu denove renaskiĝas kaj mortas. Kosmologiaj konsekvencoj por la homa vivo: morto kiel fino de la vivo aŭ morto kiel vojo al (la) eterno. Reviviĝo. Animo, vojoj de animo, reenkarниĝo.

3. La plej gravaj eventoj en Abrahamaj religioj: de la kohena judaismo al la rabena

judaismo; de la judaismo de Kristo al judeo-kristanismo. Influo de la helena civilizo je la juda. Saŭlo fariĝas Paŭlo. Naskiĝo de kristanismo. Mahometo riparas ĝisnunajn erarvojojn de judaismo kaj kristanismo. Naskiĝo de islamo. Religiaj institucioj. Profetoj, kohenoj, rabenoj, sacerdotoj, pastroj, presbiteroj, imamoj, ŝamanoj.

4. Religio kiel juro (judaismo kohena, islamo). Religioj kiel moralaj indikoj: judaismo rabena, kristanismo, budhismo... Premio pro la morala vivo en la ĉielo. Plej sanktaj moralaj valoroj de religio(j) laŭ diversaj sistemoj, ofte kontraŭdiraj: aborto, mortpuno, divorco, transplantado, korpaj punoj, homoseksualismo, drogoj, eŭtanazio, incesto, vegetarismo, koŝereco, rilato al bestoj, „seksaj deviacioj“, in vitro, memmortigo, rilato al ateismo ktp.

5. Noaismo kaj Hilelismo. La ĉielarko kiel la eterna interligo inter Dio, kiu diras al Noa dum la fino de la diluvo: „montriĝos la arko en la nubo“ kaj „Mi rememoros Mian interligon, kiu ekzistas inter Mi kaj vi kaj ĉiu viva ekzistaĵo el ĉiu karno, kaj la akvo ne fariĝos plu diluvo...“ (Genezo 9:14 k 15).

Estas strange, ke Zamenhof neniam menciis Noaismon kiel la interligon de Dio kun la tuta homaro. Noa (naŭa generacio post Adamo kaj Eva) ne estas ankoraŭ judo. Do, kiun religion konfesis Zamenhof?

II. Sociologio de la Esperanto-movado

Problemario:

Strukturo de la Esperanto-socio.

Kiu fariĝas esperantisto, restas eterna psikologia sekreto. Vaneco de varbado.

Milionoj komencas lerni Esperanton, ellernas kelkaj.

Vivo de esperantisto daŭras kelkajn jarojn, nur kelkaj restas esperantistoj dum la tuta vivo.

Esperanto ĉiam ekzistas apud la „vera“ vivo.

Esperantistoj ne sukcesas organizi sin en la politika socio.

Esperantistoj estas „normalaj“, kvankam jam en 1968 P. G. Forster rimarkis, ke esperantistoj kreas devian grupon kompare kun la brita populacio, kvankam oni ne povas nomi ĝin „malsana“. Ĝi estas iom *cranky* (labila).

Mitoj pri Esperanto. Organiza vivo.

Laŭ T. Carlevaro: Esperanto disvastiĝis en esperantistaj diskut-kluboj. Kaj ĝi restas en tiuj kluboj. Tiu estas vera senelirejo.

„Malamikoj“ de Esperanto. Neŭtraleco. Interna ideo.

Kion signifas fina venko? Ĉu Esperanto iam venkos?

Kial homo estas esperantisto?

Esperanto kiel alternativa vivo.

Ĉefaj bibliografiaj indikoj:

Carlevaro, Tazio (1999): *Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?* Hans Dubois, Bellinzona.

Forster, Peter (1982): *The Esperanto Movement*. Mouton Publ. The Hague-Paris-New York.

Galor, Zbigniew; Pietiläinen, Jukka (2015): *UEA en konscio de esperantistoj*. Kava-Pech, Dobřichovice.

Walter Żelazny (biografio)

naskiĝis en 1950 en Rzeszów (Pollando). Li estas sociologo kaj okupiĝas pri etnismo, kultura antropologio, socilingvistiko kaj zamenhofologio, pri kiuj li publikigis kelkajn sciencajn librojn kaj plurajn studojn en la lingvoj pola, franca kaj Esperanto. Nun li estas profesoro pri sociaj sciencoj de la Bjalistoka Universitato kaj estro de la katedro pri kultura antropologio.



Esperantisto ekde 1968, Żelazny estis estrarano de TEJO (1976-77), vicprezidanto de la legenda Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK, 1979-1981) kaj la unua Konsulo de la Esperanta Civito (2001-2006). Unu el la plej signifaj intelektuloj en la Esperanto-komunumo, en BET-55 en Panevėžys li prezentos du prelegociklojn: pri religioj kaj pri la sociologio de la Esperanto-movado.

Kolapsologio por nia generacio (resumo)

Mallonga priskribo de la prelego **Kiel nia civilizo povas fali; kolapsologio por nia generacio** de Marco Teani:

Enkonduko – Kial elekti ĉi tiun temon ?

Unue ĝi estas vere nuntempe aktuala subjekto; nur dum la lasta jaro dekoj da libroj, artikoloj, radio- kaj televid-elsendoj (de la ĉefo de la franca registraro kaj lia ministro de la medio, inter alie) aperis en Francio kaj multaj retpaĝaroj pritraktas tiun objekton.

En la tuta Eŭropo, homoj, ĉefe junuloj, protestas kaj manifestacias, por ke registaro serioze okupiĝu pri la risko, ke baldaŭ la tero ne plu estos taŭga por la vivo de la homaro.

Due, la Esperanto-movado ne estas aparta ‘raso’, kiu ne suferas pri la aktualaj problemoj

sed ĝi povas rigardi al ili pere de internacia taksado.

Mi ne estas spertulo, nur scivolemulo de tiu fako, kiu faris scienstudojn: mi klopodas montri la sciencan kaj historian vidpunktojn.

1 - Senlima kresko en limigita planedo: la signo de la malsano, la senbrida kresko de ĉio sur limigita planedo.

2 - Antaŭdiristoj: la komuniĝo al la Roma Klubo en 1972 kaj pra-antaŭvidistoj

3 - Aldona problemo: la tuttera varmiĝo.

4 - Sistemaj kaj kompleksaj interplektaĵoj: pluraj riskoj kaj multaj danĝeroj: la monda ekonomio, la resurs-manko, la energiproduktado, la potenceg-nacioj, konflikto, la disvastigo de epidemioj, la teknologiaj disfaloj ktp.

5 - Plena civiliz-kolapso: Ĉu eblas? Ĉu denove? Ĉu baldaŭ? Kiam?

Modernaj sociaj retoj kaj Esperanto (resumo)

Dmitrij Ŝevĉenko prelegos en SUS pri retoj, en 2-prelega kurso. Nuntempe la plej popularaj sociaj retoj jam estas ne nur simple gravaj fontoj de la informoj kaj rimedoj de la interhoma komunikado, sed ofte la plej kernaj en tiuj ĉi sferoj. Tiaj kompanioj, kiel Google,



Facebook kaj multaj aliaj, estas internaciaj kaj unuavide provizas per ĉiuj bezonataj rimedoj tiujn uzantojn, kiuj volas komuniki mondscale, ricevi sendependajn informojn aŭ novaĵojn rekte el la „unuaj manoj“ ktp. Tamen esplorindas, kiom bone tio funkcias praktike, ekzemple, por la tra la mondo disemita Esperanto-komunumo aŭ por la aliaj internaciaj komunumoj. Dum la prezento ni sur la ekzemploj analizos algoritmojn, teknologiojn kaj politikon de tiuj ĉi servoj, kiuj ne ĉiam sekvas la deklaritajn sloganojn, kaj la celoj foje ne kongruas kun tio, kion oni atendas de ili.

Dmitrij Ŝevĉenko (Biografio)

Dmitrij Ŝevĉenko estas denaska esperantisto, universitata instruisto kaj eldonisto. En 2010 ĉe la katedro de amaskomunikiloj de RUDN (Esperante – Rusia Universitato de Amikeco de Popoloj) li sukcese defendis magistran disertacion pri la temo „Periodaĵoj en Esperanto kiel rimedo de internacia komunikado“.

Li instruas en RUDN interretajn teknologiojn, kaj prelegas pri la sociaj retoj.


Krome li okupiĝas pri post-universitataj studoj pri komunikado en Esperanto, partoprenas multajn sciencajn konferencojn, kie li prelegas pri Esperanto-komunikado kaj Esperanto-jurnalismo, aŭtoras priesperantajn artikolojn en la ruslingvaj sciencaj revuoj. Ĝenerala direktoro de Esperanto-eldonejo „Impeto“, aŭtoro de kelkaj libroj, membro de AIS, UEA kaj estrarano de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, preleganto de Internacia Vintra Universitato (IVU).

Kune kun Anna Striganova en 2014 li lanĉis universitatan kurson de Esperanto kaj ekde aprilo de 2017 ili estas kunredaktoroj de la oficiala organo de UEA – revuo *Esperanto*.

Instruado dum BET-55

En 55-a BET ĉiutage, krom ekskursa tago, okazos lecionoj de Esperanto. Kursoj okazos matene inter 9.00 kaj 12.00 horoj. Eblos elekti inter 4 niveloj kaj 6 geinstruistoj. Ni antaŭvidas tiajn nivelojn:

1. Veraj komencantoj lernu en la nivelo A1. Ili lernu kun la fama kaj ŝatata instruisto Stano Marček de Slovakio, kiu instruos per la tre konata „Esperanto per rekta metodo“.



2. Komencantoj, kiuj jam iom lernis Esperanton, scias la ofte uzatajn vortojn, kapablas kunmeti simplajn frazojn kaj komprenas simplajn tekstojn, elektu la nivelon B1. Kun ili laboros fidela instruistino de litovaj BET-oj Nina Pietuchowska de Pollando kaj ĵurnalistino, aktivulo Abdurahman Junusov de Dagestano, kiu estas sperta instru-isto kaj aŭtoro de lernolibro „Esperanto? Estas facile! Lernolibro de Esperanto por rusoj.“



3. Progresantoj, kiuj jam povas elturniĝi en la ĉiutaga konversacio, sed sentas mankon de vortoj kaj volas praktiki lingvon, estas atendataj en

la nivelo B2. Ilin pli progresigos du spertaj instruistinoj, francinoj, ambaŭ novulinoj en BET: Anna Jousions kaj Françoise Noireau.



Svetlana Smetanina el Rusio.

Se vi dubas en kia nivelo vi devus esti, bonvolu serĉi sur la anonctabulo „Memtaksilon“ kaj tio helpas al vi decidi.

Ĉiuj kursanoj post la fino de la kurso ricevos la atestilon.

La instruan programon gvidos Gražina Opulskienė, kiu en la decembra kongreso de Litova Esperanto-Asocio estis elektita kiel vicprezidanto de LEA.

Gražina Opulskienė



Kelkaj demandoj al Stano Marček

La revuo *Esperanto* aperigis jenan intervjuon kun Stano Marček okaze „de la 40-a jubileo“ koncerne liajn lernolibrojn.

Revuo Esperanto: Via lernolibro Esperanto per rekta metodo festas „jubileon“.

S.M.: Jes – ĝi aperis en 40 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, tajvana, Esperanta, greka, nederlanda, irlanda, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, norvega, luksemburga, hungara, serba, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajlanda, armena, islanda, indonezia, turka, hinda, bulgara, latina, araba kaj latva (intertempe aperis la kurda kaj la taĝika tradukoj, rim. de la red.).

Revuo Esperanto: Kial vi decidis verki ĝin?

S.M.: Siatempo mi gvidis kursojn de Esperanto en mia urba kulturdomo. Neniu el la trovitaj lernolibroj de Esperanto, en la tiama Ĉeĥoslovakio, ŝajnis al mi konvena. Pro tio mi decidis kompili propran materialon.

Mi komencis studi psikologion de fremdlingva instruado kaj metodikon de Esperanto-instruado. Tio konfirmis mian supozon, ke la plej efika vojo por instrui fremdan lingvon estas la tiel nomata „rekta metodo“, do la metodo, per kiu niaj gepatroj instruis al ni la gepatran lingvon :-). Instrui pensi en la lingvo, ne traduki!

Revuo Esperanto: Ni petas diri ion pli pri la metodo.

S.M.: Mia riĉe ilustrita lernolibro (la bildojn desegnis mia filino Linda) baziĝas sur rekta, tiel nomata indukta metodo: konkludi el konkretaj faktoj ĝeneralan leĝon, laŭ kiu la lernantoj – helpe de bildoj kaj analogio –



subkonscie ricevas la klarigojn de la novaj elementoj kaj poste – en tekstoj kaj ekzercoj – re-renkontas kaj ekzercas ilin ĝis alproprigo.

Post la rektmetoda leciono venas (en la naciaj eldonoj) la sekcio Gramatiko, en kiu nacilingvaj klarigoj firmigas la jam intuicie komprenitan materialon.

La lernolibra vortprovizo respektas la oficialan ofteco-liston (*Baza Radikaro Oficiala, Aktoj de la Akademio II*), kiun la Akademio de Esperanto rekomendas por ĉiuj lernolibroj de Esperanto. Ĝi ĉerpas la 750 pleje uzatajn vortelementojn (morfemojn) – komence la plej ofte uzatajn ktp. – kaj garantias, ke la lernanto unue lernu la plej ofte uzatajn kaj bezonatajn vortelementojn, por povi interkompreniĝi en la plej oftaj situacioj de la ĉiutaga vivo.

Revuo Esperanto: Kiel kaj kial naskiĝis tiom da „gefratoj“?

S.M.: La lernolibro unue aperis en la slovak lingvo. Sekvis la internacia eldono, sen nacilingvaj klarigoj (pura rekta metodo).

Mia pola amiko Stašek Mandrak proponis traduki la slovak version al la pola. Mi tradukis por li ĉiujn nacilingvajn tekstojn en Esperanton, kaj li tradukis ilin al la pola.


Tio inspiris ankaŭ alilandajn instruistojn traduki la lernolibron al siaj lingvoj. Jen kelkaj el ili: Rob Moerbeek kun sia teamo, Roy McCoy, Ionel Oneț, Imrė Szabó, Luigia Oberrauch, Bronislav Ĉupin, Liu Haitao, Aoyama Tooru, Lee Jungkee, Georgo Dermatis, Seán Ó Riain, Arne Casper-Mortensen, Karine Arakeljan, Tereza Kapista, Indrė kaj Dalia Pileckienė, Karl-Gustaf Gustafsson, Iliia Dewi, Hallgrímur Sæmundsson, Vasil Kadifeli, Aniruddha Banahatti, Max Kašparů, Bernhard Schwaiger, Birute Rosenfelde, Lê Thị Thiên Thu, Mariana Genčeva, Marija Jerković, Josip Pleadin, Mihai Trifoi, Rudolf Fischer, Peter Zilvar, Ulrich Matthias, Umberto Broccatelli, Haazel Green, Birgitta Anevik, Janine Dumoulin, Anne Karin Bondhus, Zsófia Kóródy, H. Hussein, Šler Kerimi Kani, Firdaus, Šukurov...
Mi elkore dankas al ili!

Revuo Esperanto: Ĉu la lernolibron akompanas ankaŭ ia metodika materialo?

S.M.: Jes: *Instruaj bildoj por rektmetoda instruado* (por la instruistoj, 500 kartonaj folioj A5 en du kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron – ankaŭ sur KD, por projekcii la bildojn); KD *Modela elparolo* en mp3 – voĉlegitaj Esperantaj tekstoj + la lernolibro en diversaj lingvoj en pdf, por komputila uzo; *Pekseso Esperanto* (12 volumoj kun 288 bildoj el la lernolibro), *Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto*, 16 KD *Fabeloj de Andersen* kaj 8 KD *Fabeloj de la fratoj Grimm*; 107 *Krucenigmoj en Esperanto*; KD *Kantoj por kursoj*; DVD *Aŭdo-vida konversacia kurso por progresantoj*; DVD-oj kun sonlibroj (*Neĝa Blovado* de Puŝkin, *La Stranga Butiko* kaj *Verdkata Testamento* de Schwartz); senpage elŝutebla *Apo* (aplikajo) *Esperantokurso per rekta metodo por telefonoj* (<http://iei.fontoj.net/apo>). Vidu pli ĉe la UEA-libroservo (134 titoloj) ĉe <https://edukado.net/komunumo/forumo?f=55>; <http://verkoj.com/lauteme/>

lerniloj/stano-marcek/, aŭ skribu al la aŭtoro: *stano.marcek@gmail.com*

Revuo *Esperanto*
Decembro 2017



Kleriga kaj eduka programo

En 55-a BET okazos klerigaj kaj edukaj programoj. Jen kelkaj prelegantoj kaj resumoj de iliaj prelegoj:

Prof. Ilona Koutny

prezentos sub la titolo „Lingvo kaj kulturo“ ciklon el kvar prelegoj pri lingvo, kulturo kaj instruado en interaga maniero kun diskutoj:



1. Interkultura komunikado kaj Esperanto prezentos problemojn de interkultura komunikado kaj Esperanton kiel ponton inter diversaj kulturoj, serĉos elementojn de komunaj normoj lingvaj kaj kondutaj, komparas la rolon de Esperanto en interkultura komunikado, kun tiu de la angla.

2. Mondo, vortoprovizo kaj vortaro esploros kiel la mondo esprimiĝas en la vortoprovizo kaj kiel tiu plej bone metebblas en vortaron, uzante la ekzemplon de la propraj laŭtemaj vortaretoj (*Angla-Esperanta-Hungara Etvortaro pri Lernado kaj Laboro, Homa vivo kaj loĝado, Lingvo kaj Komunikado*). La unua havas ankaŭ litovan version kaj la tria germanan-Esperantan-polan version.)

3. Esperantlingva bildo de la mondo levos la demandon pri la rilato inter lingvo kaj pensado, ĉu esperantistoj havas similan lingvan bildon de la mondo, kaj surbaze de esploro provas doni interesajn respondojn.

4. Ĉu facila lingvo facile lerneblas? analizos Esperanton el la vidpunkto de lingva komplekseco ĝenerale kaj kompare kun la gepatra lingvo de la lernanto, ankaŭ ĝian rolon en la lingva konsciigo kaj lernfaciligo por aliaj lingvoj.

Ĉi tiu kurso okazos kadre de la 36-a Studadserio de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj).

Krome Ilona Koutny prelegos en Panevėžys pri la temo “Universitata instruado de Esperanto: ĉu lukso, ĉu prestiĝo?”

Yves Nevelsteen

faros tri prelegojn, kiujn li mem jene prezentas:

1) Oftaj eraroj kaj novaj vortoj en Esperanto. Yves

Nevelsteen ekde 2007 okupiĝas pri komputilaj vortoj en Esperanto kaj sekvas la evoluojn, provlegante tradukojn de komputilaj programoj, retejoj, aplikajoj ktp. Li ankaŭ regule mem tradukas, ekzemple Facebook al Esperanto. Tiel ĉi ekestis la dokumento „Atentigoj pri tradukado“, en kiu aperas krom oftaj eraroj ankaŭ novaj tendencoj en la lingvouzo.

2) Bitlibroj kaj bitgazetoj en Esperanto.

„Eksterrete“ estas projekto de Yves Nevelsteen, per kiu li celas prezenti interretajn indaĵojn. *Volumo 2* de lia verko temas pri bitlibroj kaj bitgazetoj. Yves klarigos, per kiuj aparatoj oni povas legi ilin kaj kie trovi legindaĵojn – ofte senpage.

3) 200+ Esperantaj markonomoj en

Benelukso. Pli ol 200 beneluksaj firmaoj kaj asocioj konscie uzas nomon en Esperanto. Temas ekzemple pri Amikaro, Flegado, Hejmen, Infano, Konsilo, Pacoŝako, Ripozo, Ŝanĝo, Trovi Solvon kaj Viro Modo. Yves



Nevelsteen faris studon pri la temo kaj kompilis libron 120-paĝan, en kiu aperas krom la konfirmitaj ankaŭ 300 ne-konfirmitaj nomoj. Li komencis per nederlandlingva eldono, ĉar la celo estas fari projekton per la verko; firmaoj kaj asocioj kiuj uzas nomon en Esperanto estu niaj ambasadoroj! Estas fascine, kial kaj kiel multaj homoj nuntempe elektas nomon en Esperanto por sia agado. Vi ekscios ĉion dum la prelego de Yves.

Gong Xiaofeng

prelegos pri kvin temoj:

1. Instruado de Esperanto en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj.
2. Kapabligo de transkultura komunikado kaj Esperanto-instruado/lernado (diferenco de kelkaj esprimoj inter okcidentaj landoj kaj Ĉinio)
3. Konciza historio de Esperanto-movado en Ĉinio.
4. Kiel efike altigi kapablojn de Esperanto-instruantoj.
5. Koncize pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio.




Lee Jungkee

prelegos pri la temo “**Kien Azia Esperanto-Movado iras?**” Azio havas 60% de la loĝantaro de la mondo, kaj pro tio la respondeco de azianoj estas granda ankaŭ en Esperantujo. Sed azianoj konsistigas nur 17% de la tuta membraro de UEA. Tio signifas, ke nombre la forto de Azio estas ne tiom grande influhava en Esperantujo. Li analizos la nunajn problemojn de Azio en la tutmonda Esperantujo kaj prezentos sugestojn por la Esperanto-Movado en Azio.



Tatjana Auderskaja

okazigos **intelektajn ludojn** en kvar unuhoraj sesioj. Ŝi ankaŭ prezentos prelegon „**Libera artisto**“ pri Nikolaj Blajkov, skulptisto kaj esperantisto, eventuale ankaŭ pri aliaj temoj.



Dmitrij Ŝevĉenko

prelegos pri jenaj temoj:

De Progreso al Impeto: kiel estiĝis la Esperanto-eldonejo?
Eldonejo „Impeto“ (<http://impeto.trovu.com>)

jam la 27-an jaron seninterrompe aperigas librojn en kaj pri Esperanto. Ekde 1992 ĝi sukcesis eldoni amason da diverspecaj libroj en Esperanto, lernolibroj kaj vortaroj. Dum la prelego Dima Ŝevĉenko kun Anna Striganova rakontos pri la historio de la eldonejo, ĝia agado, prezentos novajn librojn kaj malkovros planojn por la proksima tempo.

La Reta Revuo. Kio ĝi estas? En 2017 estis lanĉita la retejo de la revuo *Esperanto*. Laŭkoncepte ĝi estas multe pli ol simpla retejo de la revuo, kie aperas informoj pri la periodaĵo, kelkaj artikoloj kaj eĉsubtleblaj numeroj por varbi abonantojn ktp. Temas pri projekto de plenalora reta amaskomunikilo, kiun UEA ĝis nun ankoraŭ ne havis, kiu iĝis paralela, sed ne egala al la tradicia revuo, aperanta papere kaj PDF-forme. En ĝi aperas artikoloj, antaŭe aperintaj en la paperforma versio. Nuntempe okazas aktiva laboro por evoluigi specialajn rubrikojn, kiel *Monda Kulturo* kaj *Beletra Rubriko* kaj kelkajn aliajn.



Kultura programo de BET-55

Urbaj artaj kolektivoj kaj ankaŭ famaj litovaj kaj eksterlandaj Esperantaj artistoj kaj ensembloj kontribuos al la kultura programo de BET-55.

Ensembloj de Panevėžys

Post la inaŭguro de BET-55 al la partoprenantoj faros koncerton urbaj kulturaj kolektivoj.



Miksita koruso „Čiūto“ – gvidantino Dalia Gaspariūnienė.



Vokala ensemblo „Smiltelė“ – gvidantino Dalia Gaspariūnienė.



Popola dancensemblo „Verdenė“ de pliaĝuloj – gvidanto Vytautas Murauskas.



Popola dancensemblo „Linas“ – gvidantino Zita Rimkuvienė.



Kapelo de popola muziko „Nevėžis“ – gvidanto Vytautas Rutkauskas.

Sepa kaj Asorti

Partoprenantoj de BET-55 povos ĝui elstaran kulturalan programon en Esperanto, kadre de kiu koncertos ankaŭ la konata esperantista muzika grupo Sepa kaj Asorti el la Litovia urbo Visaginas.

Ĉi tiu muzika grupo fondiĝis kiel Asorti en la jaro 1982. Ĝi estas tripersona familia grupo: Edvardas Piščikas, Edgaras Piščikas kaj Elena Piščikienė. La grupo prezentiĝas profesie dum grandaj internaciaj muzikaj festivaloj, motorbiciklaj festoj, foiroj, naciaj festoj, urbofestoj, Universalaj Esperanto-Kongresoj ktp. Muziko de Sepa kaj Asorti sonis en televidaj programoj, ekzemple „Eurovision“, „X-Faktor“, „Du minutoj da gloro“ kaj aliaj. Ĝi kantas en la stiloj kontrea, blusa, folka kaj roka en la lingvoj rusa, litova, angla kaj Esperanto. Ekde sia fondiĝo Sepa kaj Asorti popularigas Esperanton tutmonde por neesperanta publiko pere de grandaj koncertoj por vasta publiko.

Asorti estas ofta koncertanto dum esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en Litovio kaj en pluraj landoj. Unuafoje ĝi kantis en Esperanto en Muzo-92 en Litovio. Sekvis Esperanto-koncertoj en Pollando (1993), Belorusio (1993), Hungario (1994), Germanio (trifoje 1995), Belgio (turneo en 1995), Finnlando (UK en 1995) kaj dekoj da koncertoj dum la sekvintaj dudek jaroj. Ekzemple en 2015 Sepa kaj Asorti prezentiĝis



en la internacia renkontiĝo „Elloke-Tutmondon“ en Verceli (Italio, marto 2015), Internacia Junulara Festivalo en Brusson (Italio, aprilo 2015), Filmfestivalo en Ĉinio (aprilo 2015), Germana Esperanto-Kongreso en Hameln (majo), SES en Martin (julio), UK en Lillo (julio), IJK en Wiesbaden (Germanio, aŭgusto) kaj en Arkones en Poznano (Pollando, septembro).

La grupo eldonis ok muzikajn albumojn en Esperanto: *Se povus mi* (1994), *Ni denove renkontiĝos* (1995), *Edgar + Asorti* (1995), *Lernejaj amikoj* (2005), *Kantu kune* (2007), *Verda Hejmo* (2009), *Espero* (2013), *Teo kaj amo – koloroj de l' mondo* (2015).



Mikaelo Bronŝtejn

Mikaelo (Moissej Caleviĉ) Bronŝtejn naskiĝis la 7-an de julio 1949 en Ĥmelnickij, Ukrainio, kaj esperantistiĝis en 1962 samloke. Loĝas en Tiĥvin, Rusio. Profesio(j): Inĝeniero pri min-elekto, ĵurnalisto, E-instruista kvalifiko: C-dipomo de internacia KER-ekzameno, Italio, 2010. La gepatraj lingvoj: jida, rusa, ukraina. Studitaj fremdaj lingvoj: angla kaj franca.

Esperanto-aktivecoj:

- En junaĝo aktivis en la Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM);
- Ekde 1964 instruas Esperanton en diversaj niveloj kaj diverslande;
- Verkas kaj tradukas – prozon, poezion, kantojn. Estas eldonitaj 22 originalaj verkoj, i.a. 4 romanoj, 7 poemoj, krome noveloj, fabeloj, eseoj. Estas registritaj 6 originalaj kompaktdiskoj. Kelkaj verkoj estas tradukitaj kaj eldonitaj en la rusa, franca, sveda, angla, korea, japana, itala kaj pola lingvoj;
- Ekde 1993 prelegvojaĝis en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, en Usono kaj en Koreio; Esperanto-honorigoj:
- Premio Antoni Grabovski – 2004



- Honorfolio de UEA – 2008
- Titolo „Libro de la jaro“ de Esperanto-PEN – 2010
- OSIEK-premio – 2012

Prelego de Mikaelo Bronŝtejn (resumo)

SEJM legendara (60-90 min)

Sovetia Esperantista Junulara Movado, la neformala organizaĵo, estis fondita en Soveta Unio en 1965 kaj dum 13 jaroj sukcese agis kaj evoluis, malgraŭ neglekto aŭ eĉ kontraŭstaro de ŝtataj instancoj. Mikaelo Bronŝtejn, kiu aktivis en SEJM ekde la antaŭfonda periodo ĝis la dissolvo de la organizaĵo, alfrontis diversajn situaciojn – dolorigajn, nervostreĉajn, ridindajn, travivitajn kun varma kaj sincera subteno de la geamikoj el pli ol 50 junularaj Esperanto-kluboj de Sovetio. La okazintaĵoj de tiu epoko certe estas interesaj ne nur de la historia vidpunkto. Kun tia konvinko Mikaelo verkis originale konstruitan rememor-libron „Legendoj pri SEJM“, kiu estis reeldonita trifoje (1992, 1997, 2005) kaj ĝis nun estas vaste legata en Esperantujo. La prelego, bazita sur tiu libro, enhavas ankaŭ laŭtemajn kantojn kaj poemojn de la aŭtoro.

Plenigu l' korojn je muzik'...

La barda kanta kulturo, maturiĝinta en Sovetunio dum la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento, ludis gravan rolon en la evoluo de liberpensemo de la sovetia junularo, estante forta alternativo por la oficiala sensuka kantaro. Populareco de la plej elstaraj bardoj restas grandega ĝis nun, multajn kantojn, naskiĝintajn antaŭ duonjarcento, ŝatas kaj kantas nuntempaj gejunuloj.

La koncerto celas konigi al la esperantistaro la kreon de la barda kantaro. En la programo sonas kurtaj informoj pri la famaj kantaŭtoroj, kiel Bulat Okuĝava, Vladimir Visockij, Jurij Vizbor, Sergej Nikitin, Miĥail Anĉarov k.a. – akompane de ties plej konataj kantoj.

La kantotekstojn esperantigis Mikaelo Bronŝtejn. Muzikan gitararanĝon efektivigis Sergeo Straŝnenko.

Mikaelo Bronŝtejn – horo kun aŭtoro

Dum la renkontiĝo kun ŝatantoj de liaj verkoj la aŭtoro rakontos pri la freŝeldonitaj libroj kaj pri la kreaĵoj, respondos al eventualaj demandoj kaj regalos la aŭskultantojn per kelkaj novaj kantoj.



Kantos Amira Chun

Kyung Ok „Amira“ Chun estas profesia kantistino, kiu kantas poeziajn kantojn de Koreio. Ŝi studis klasikan muzikon en universitato kaj kantis ankaŭ kantojn, kiuj estas popolaj, ĵazaj kaj tradici-muzikaj. Kelkaj ŝiaj kanto-kompakdiskoj prezentas ŝian talenton. La temoj de ŝiaj kantoj estas homamo, naturo kaj vivo. La kantoj ne estas rapid-ritmaj kaj iliaj melodioj estas lirikaĵoj, tial ŝiaj kantoj varmigas la korojn de la aŭskultantoj kaj vekas rememorojn. Aparte ŝi interesiĝas pri sociaj problemoj. Sopirante reunuiĝon de la du Koreioj, ŝi kantis plurajn kantojn pri tiu temo.

Amira Chun eklernis Esperanton antaŭ du jaroj, kaj nun ŝi mem instruas Esperanto-kantojn en Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK). Krome ŝi estas ĥorestro de pluraj korusoj.

En BET-55 ŝi prezentos tradician dancon kaj kanton de Koreio, kaj kantas diversajn popolajn kantojn, sola aŭ kun ĉeestantoj. Inter ŝiaj kantoj estos, interalie, „La Vojo“ laŭ la poemo de Zamenhof, „Al Litovio“ (jubilea kanto por la sendependiĝo de Litovio), litova kanto „Mara donis vivon“ kaj „Kisu min multe“. Krome estos prezentitaj la koreaj kantoj „Verda Arirang“, „Koloroj de la vento“ kaj ŝiaj propraj kantoj. En Panevejo ŝi koncertos kun la konata litovia muzikgrupo Asorti.

Gafur Mirzabajev

Koncerton dum BET-55 faros ankaŭ Gafur Mirzabajev. Jen lia sinprezento:

Mi esperantistiĝis ekde 1991. En tiu jaro mi partoprenis en BET-28 en Tartu kaj gajnis unuan lokon kun la medalo por la kantado kaj rakontado. Kaj tiun jaron en oktobro mi denove partoprenis „MUZO-91“ en Vilniuso kaj denove gajnis la unuan lokon por la originala melodio.

Mi mem estas profesia kantisto kaj aktoro. Komence mi kantis tradukitajn E-kantojn de diversaj popoloj kaj poste mi mem ekkomponis originalajn melodiojn por la originalaj E-versaĵoj. Inter ili estas „Kavaliro“ de J. Kriss, „Stranga danco“, „Amika rondo“ de J. Baghy, „Ebrio“ de W. Auld, „Benita vojaĝo“ de I. Vazov ktp.



Mi partoprenis UK-ojn en Suda Koreio en 1994, en Finnlando en 1995 kaj Unuan Azian Kongreson en Ŝanhajo (Ĉinio), en kiuj mi plezure prezentis miajn E-kantojn dum la kulturaj programoj. Poste pro manko de libera tempo (en tiuj jaroj mi laboris kiel ĉefredaktoro en la Ŝtata Teleradiokompanio kaj multe gastroladis kaj prezentis kelkajn programojn) dum 22 jaroj mi tute ne okupiĝis pri Esperanto. Kaj pasintjare mi ĉi tie fondis nian Landan Asocion UzEA, kaj nuntempe mi estas prezidanto de la asocio.

Krom tio mi tradukis uzbekajn popolajn proverbojn kaj kompilis vortaron kaj lernolibron por la uzbekaj gelearnantoj.

Gafur Mirzabajev

Anna Striganova

En BET-55 Anna Striganova prezentos kadre de la 36-a Studadserio de AIS sian prelegociklon pri fabeloj, kaj aranĝos ekspozicion „Fabelaj mondoj“.

Anna Striganova naskiĝis en 1987 en Moskvo, kaj esperantistiĝis en 2008. Ŝi estas magistro pri filologio, laboras ĉe filologia fakultato de Rusia Universitato de Amikeco de Popoloj (RUDN), okupiĝas pri esploroj de literaturo, mitoj kaj fabeloj, estas aŭtoro de pluraj sciencaj artikoloj kaj preparas por defendi sian doktoran disertacion.





Anna verkas ankaŭ beletron en la rusa kaj en Esperanto. Kelkaj ŝiaj libroj trafis furorlistojn de la Libroservo de UEA.

Ekde aprilo 2017 ŝi estas kunredaktoro de la revuo *Esperanto*. Anna Striganova ofte prelegas en Esperanto kaj en la rusa dum sciencaj konferencoj kaj kongresoj, Esperanto-renkontiĝoj kaj Lingvaj Festivaloj.

Kune kun Dmitrij Ŝevĉenko nun ŝi gvidas universitatan kurson de Esperanto kaj aktive kunlaboras en la Esperanto-eldonejo Impeto.

Natalia Bertse

Sabate vespere je 20:00 havos dum BET-55 koncerton Natalia Bertse. Jen ŝia priskribo de ŝia Esperanto-agado: Mi aperis en Esperantujo en 1976, en la Tihvina tendaro. Ĉar tiam mi



tute ne konis Esperanto-kantojn, mi kantis ĉe la fajro en la franca lingvo.

Post unu jaro komenciĝis mia vera ekzisto kiel Esperanto-kantisto. De tiu tempo mi partoprenis amasojn da renkontiĝoj, tendaroj, kongresoj ktp. Ĉiam kun la gitaro, ĉiam kantanta. Mi plenumis ŝtatan ekzamenon pri Esperanto ĉe Tartua universitato, do mi dum multaj jaroj ankaŭ instruis Esperanton.

Post la translokiĝo al Svedio mi eĉ laboris kiel instruisto en Karlskoga Popola Altlernejo kaj instruis Esperanton. Krom tio mi gvidas konversacian rondon dum ĉiujara somera Esperanto-kurso en Svedio. Interalie, kelkaj miaj lernantoj el Ĉebaltio estas nun tre aktivaj esperantistoj, ekz. Tonu el Estonio (li estas nun prezidanto de Estona Esperanto-Asocio), Alice Medinja el Latvio kaj kelkaj aliaj. Mi koncertis dum la E-kongresoj en Gotenburgo kaj en Florenco. Ĝis nun mi kantas kaj instruas novajn kaj malnovajn Esperanto-kantojn al ĉiuj, kiuj deziras.

Koncerto „Sola kaj Kune“

Jogailė Ĉojūtė kaj Sung Min-woo sukcese montris sian muzikan kunlaboron jam en Seulo (2017) kaj Poznano (2018), kaj denove prezentos sin en Panevėžys.

Jogailė Ĉojūtė estas juna, 17-jaraĝa kantistino-modelino. Ŝi naskiĝis en esperantista familio: la patro estas koreo kaj la patrino estas litovino. Ŝi frekventis muzikan lernejon dum 10 jaroj kaj lernis klasikan kaj popularan kantadojn.

Ŝi kantis tri-foje en la litova televido por la plej prestiĝa kantkonkurso „Dainų dainelė“ (Kanteto de la Kantoj) inter la litovaj lernantoj kaj junuloj. Ŝi gajnis premiojn en pluraj internaciaj kaj enlandaj lernejanaj kantkonkursoj. Ŝi kantis plurfoje la litovan himnon en internaciaj sportaj matĉoj.

En Esperantujo ŝi kantis „Tempo pasos nur“ dum la muzika paŭzo de la inaŭguro de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, akompanate de la korea muzika trupo „MAJU“. Ŝi kantis kun la korea ensemblo dum la koncerto „Pacon Kune“ en ARKONES 2018. Tiu sukcesa prezentado estigis novan projekton de kunlaboro por koncerti en BET-55 sub la incitito kaj muzikaranĝado de SUNG Min-woo (Kune).

Sung Min-woo estas korea muzikisto. De la infaneco li interesiĝis pri korea tradicia muziko kaj finis mezlernejon kaj supermezlernejon pri korea tradicia muziko. Li studis muzikan komponadon en la universitato Hanyang en Seulo. Li ludas diversajn koreajn muzikajn instrumentojn, precipe degumon (*daegeum*, korean longan bambuan transversan fluton).

Li gajnis premiojn en pluraj konkursoj pri korea tradicia muziko. Li faris multajn koncertojn sola, aŭ kun muzikaj trupoj en kaj ekster Koreio. Li kunfondis muzikan trupon „MAJU“, kiu koncertis en la 102-a Universala Kongreso en Seulo kaj en la 103-a Universala Kongreso en Lisbono.

Dum la koncerto de BET-55 Jogailé kaj Min-woo prezentos precipe koreajn kantojn, tradukitajn al Esperanto, kiuj estas tre popularaj en koreaj filmoj aŭ televidaj dramserioj, vaste spektataj tra la mondo. La kantojn muzikaranĝis Min-woo kun unika tono por koreaj tradiciaj muzikiloj. Ili prezentos ankaŭ litovan kaj internacian

kantojn. Estas ebleco, ke 2-3 pliaj koreaj muzikistoj aliĝos al la koncerto.

Vi havos la ŝancon ĝui harmonion inter koreaj tradiciaj instrumentoj kaj modernaj kantoj. Bonvolu ĉesti ankaŭ por kuraĝigi ilian pluan kunlaboron por la muzika rondo de Esperantujo.

Videoj: <https://youtu.be/4D4VNBEFUFg>: Kie dormas vent‘; <https://youtu.be/Bp656icmf0I>: Tempo pasos nur.

Zuzanna Kornicka

Zuzanna Natalia Kornicka naskiĝis (laŭ ies asertoj tuje kun gitaro) en Poznano (Pollando), kie ŝi ankaŭ laboras profesie en la telefonkompanio PLAY. Ŝi studis juron kaj administradon.

Jam dum liceaj jaroj ŝi forte interesiĝis pri muziko kaj kantis en paroĥa koruso, kiu ankaŭ turneis en Italio kaj Germanio. Lerninte Esperanton en Internacia Studumo en Bydgoszcz ŝi ekde 1996 ĉiujare kantas kun gitaro dum Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES en Poznano.

Krom tio en 2000 ŝi kantis dum ekumena meso en Cavallino (Italio) kaj en 2001 koncertis en Herzberg am Harz (Germanio). Dum 2008 ŝi koncertis en la 60-a Internacia Fervojista Kongreso en Poznano, dum Esperantaj Tagoj de Krakovo, Internacia Medicina Kongreso en Krakovo kaj Pola Esperanto-Kongreso en Lodzo. En 2016 ŝi koncertis en Bjalistokaj Zamenhofaj Tagoj kaj en 2017 aprile en Berlino (Germanio) dum Zamenhof-Omaĝo, maje en la 36-a Pola Esperanto-Kongreso en Bjalystok kaj novembre denove en Berlin dum Zamenhof-Festo.

En sia repertuaro ŝi havas verkojn de pop-muziko, bluso, folk-muziko, religiaj aŭ revoluciaj kantoj, tradukitaj ĉefe fare de sia patro kaj Zbigniew Galor, laŭ kies instigo kaj





financa helpo ŝi eldonis sian kompakt-diskon „Malsato de Espero”.

Ekvinokso

La partoprenantoj de BET-55 povos ĝui ĉiutagan artan programon de litoviaj kaj alilandaj artistoj, inter kiuj estos la ruslanda muzika grupo Ekvinokso.

La unuan fojon la kantogrupo (ankoraŭ ne Ekvinokso) koncertis en januaro 1991, kadre de la landa esperantista kongreso en Moskvo. Tiam la grupon partoprenis Andreo Obrezkov, Valerij Vorobjov (Ivanovo) kaj Jolla Gogoleva (Niĵnij Novgorod). Sian nomon Ekvinokso la grupo ricevis en 1994, dum la arta festivalo EoLA (Esperanto Lingvo Arta) laŭ la titolo de unu el la unuaj kantoj de la grupo. La nomon proponis Grigorij Arosev, bona amiko de la grupanoj.

De tiam ĝis 2000 la grupon en diversaj periodoj konsistigis, krom A. Obrezkov kaj V. Vorobjov, ankaŭ Aleksandro Kurnosov kaj Maria Koĉetkova, tiam ambaŭ el Ivanovo. Krom enlandajn Esperanto-aranĝojn Ekvinokso partoprenis du IJK-ojn (1995, 2004) kaj la festivalon KEF-98 en Svedio.

Ekvinoksanoj iamaj (M. Koĉetkova), aktualaj (A. Obrezkov kaj V. Vorobjov) kaj estontaj (E. Sokolova kaj A. Osokin) en 2001-03 partoprenis la registradon de la

KD-kompleto *Oraj Kantoj*. Post 2001 la grupanoj disveturis en diversajn partojn de Ruslando kaj koncertis individue kaj po du-triope en diversaj Esperanto-aranĝoj.

En 2014 dum Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj aperis la kantotriopo Stranga triO (A. Obrezkov, E. Sokolova, A. Osokin). Ĝi preparis la grundon por la nuna konsisto de Ekvinokso. La kernaj ekvinoksanoj A. Obrezkov kaj V. Vorobjov denove renkontiĝis en 2017 kaj, unuiĝinte kun Evelina Sokolova (Krasnojarsko) kaj Aleksandro Osokin (Sankt-Peterburgo) preparis la koncertan programon kaj prezentis ĝin dum REToj (Rusiaj Esperanto-Tagoj) en 2017 kaj 2018.

La repertuaron de la grupo konsistigas originalaj kantoj, komponataj de A. Obrezkov kaj V. Vorobjov al la tekstoj de O. Obuĥov, A. Obrezkov, V. Vorobjov kaj kelkaj aliaj. La grupo uzas akustikajn instrumentojn – gitarojn, lipharmonikon, fluton kaj aliajn.

En Ekvinokso nun aktivas kvin personoj:

Andreo Obrezkov, altlerneja instruisto de la angla lingvo. Li memstare lernis ludi muzikajn instrumentojn (gitaro, fluto, lipharmoniko), tre riĉa homo, kiu havas tri filojn kaj jam unu nepinon. Loĝas en Ivanovo.

Valerij Vorobjov, profesia turisto-biciklisto, brila gitaristo; li estas eĉ pli riĉa, ĉar li havas du filinojn kaj kvin genepojn. La ĉefa muzik-aranĝisto de la grupo. Loĝas en Ivanovo.

Evelina Sokolova naskiĝis en Vilno. En la infanaĝo ŝi transloĝiĝis en la Siberian urbon



Krasnojarsko. Ŝi finis muzikan kolecion pri teorio de muziko. Pli ol 20 jarojn ŝi laboras kiel korusa artisto en Krasnojarska Opera Teatro. En Esperantujo ŝi koncertis sole kaj en kelkaj ensembloj.

Aleksandro Osokin dum ses jaroj kantis en koruso de teologia seminario en Zaokskij. Li lernis korusan dirigentadon, daŭre interesiĝas pri muziko kaj ĉiam pretas kunkanti. Laboras en ŝtata muzika teatro en Sankt-Peterburgo.


Oleg Obuĥov estas la aŭtoro de la plej unuaj tekstoj, plenumataj de la grupo. En la 1980-aj jaroj li studis en la universitato en Ivanovo, kie li konatiĝis kun Andreo Obrezkov. Tiam komenciĝis ilia arta kunlaboro. Nuntempe li loĝas en la urbo Apatity, Murmanska regiono.

Kelkaj videoj kun Ekvinokso estas spekteblaj kaj aŭskulteblaj en Jutubo.

Fransoazo instruos kaj koncertos

Françoise Noireau, konata en Esperantujo kiel Fransoazo, naskiĝis en 1963 en Parizo kaj studis en la fama liceo Henri IV kaj en la Instruista Lernejo. Ŝi laboris kiel instruistino ĝis 2011, kiam pro drastaj ŝanĝoj en la Francia eduksistemo ŝi „frupensiĝis“, kaj nun laboras kiel sendependa psikoterapiistino por infanoj kaj instruistino de popol-violono. Antaŭ 20 jaroj ŝi eklernis violonadon kaj de tiam ŝi ofte violonas en baloj kaj aliaj festoj.

Fransoazo eklernis Esperanton aŭtodidakte en 1990, loĝante en Briancono, ĉe la sudaj Alpoj. Post kelkaj jaroj ŝi, ŝia edzo kaj tri iliaj infanoj jam interparolis Esperante en la hejmo. Ŝi estis gvidantino en Internaciaj Infanaj Kongresetoj en Montpellier (1998) kaj Zagrebo (2001), instruis Esperanton, verkis artikolojn kaj koncertis en pluraj esperantistaj renkontiĝoj, al kiuj foje venas ankaŭ ŝiaj familianoj. Nun Fransoazo volontulas kiel



instruistino de Esperanto en Ĉeboksaro, la ĉefurbo de Respubliko Ĉuvaŝio en Ruslando.

Kadre de la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos la 6.-14. de julio en Panevėžys, Fransoazo prezentos violonkoncerton kaj gvidos paroligan kurson.

Kaŝi koncertos

Kiel kutime en la Litoviaj BET-oj, ankaŭ en la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Panevėžys, la partoprenantoj povos ĝui ĉiutagan artan programon de litoviaj kaj alilandaj artistoj, inter kiuj estos ankaŭ Kaŝi.

Kaŝi estas la artista nomo de Carsten Schnathorst – blinda muzikisto, komponisto kaj kantisto el Hamburgo. Li ludas la pianon kaj kantas en la grupo „The Living Music Box“, sed ankaŭ en solkoncertoj. Kutime Kaŝi komponas en la angla lingvo, sed en 2013 li komencis komponi ankaŭ en Esperanto.

En 2014 li unuafoje koncertis en Esperantujo: tio okazis en Somera Esperanto-Studado (Slovakio); sekvis pliaj koncertoj en kongresoj kaj renkontiĝoj en Germanio kaj alilande, inkluzive de la 101-a Universala Kongreso en Nitro (Slovakio).

En Varsovio kaj Vroclavo (Pollando) li kantis kun Ĝojo. En siaj koncertoj li kutime kantas Esperante, angle kaj hispane. En 2018 aperis lia unua albumo kun la titolo „Rememorante“.



En Panevėžys Kaši koncertos kun kanzonoj propraj kaj internacie konataj. Aŭskultu kaj spektu lian kanzonon „Amu min!“: <https://www.youtube.com/watch?v=KRzVXVX8wf4>

Baŭhaŭsa arta stilo - mallonga periodo de 1919 ĝis 1933

Mi prilumas rapide la antaŭajn artepokojn (klasikismo, secesia stilo, dadaismo) kaj la politikan/socian/ekonomian situacion dum kaj post la 1a mondmilito. (Naŭzo pro milito, socialismo, virinaj rajtoj, emancipiĝo, fino de imperiestraj reĝimoj, ekesto de respublikojen Eŭropo), poste monda ekonomia krizo.

La novaj ideoj de racieco kaj modernismo kune kun la teoriaj bazoj konkretiĝis en 1919 en la fondiĝo de Baŭhaŭso (mi ankoraŭ ne trovis pli bonan tradukon). Direktoro: la arkitekto Walter Gropius. Translokiĝo de la institucio de Weimar al Dessau.

La nova – iom utopia ideo – estas revolucia kaj ŝanĝas la pensmanieron – ankaŭ post la fermo kaj malpermeso en 1933 flanke de la nazioj.

En la lernejo por arto kaj dezajno, kiu kunigas metion kaj arton kaj teknikon – oni lernas sub tiu unuiga koncepto jenajn metiojn: pentradon, skulptadon, dezajnon, arkitekturon, filmfaradon, fotografion, tekstilornamadon,

ceramikon, teatron kaj instalaĵojn. La kreiva inspira movado flegis bonajn kontaktojn kaj interŝanĝojn kun eksterlando (ekz. Nederlando, Britio, Francio, Budapesto, Moskvo k.a.).

Por nomi nur kelkajn el la artistoj: Josef kaj Anni Albers, Wassily Kandinsky, Paul Klee, Oskar Schlemmer, Gunta Stölzl, Marianne Brandt, Ludwig Mies van der Rohe, Marcel Breuer, Moholy-Nagy, Lyonel Feininger kaj aliaj.

La Baŭhaŭs-skolo kun siaj avangardaj ideoj pri plena libereco de la arta esprimebleco, en kombino kun funkcio kaj estetiko, esence ŝanĝas la antaŭan metio-edukan sistemon de la imperiestra regno.

La ĉefa akcento de mia prelego prezentas la tipan arkitekturon kun elstarigo de horizontalaj strukturelementoj, „rondaj“ anguloj, malmulta aŭ neniu ornamo, grafikaj klaraj strukturoj, „formo sekvas funkcion“, ŝparado de kostoj, bona arkitekturo por veriĉaj homoj ktp.

La temo ĉi-jare estas tute aktuala, ĉar Baŭhaŭs estis precize antaŭ 100 jaroj fondita.

Se vi deziras mian mallongan biografion, jen: 1947-06-05 mi naskiĝis en Hamburgo/ Germanio. Denaska Esperanto-parolanto.



Peter Kühnel

En 1964 – kunfondinto de Hamburga Esperanto-Junulara Klubo. 1964 – Cschkurso dum UK en Hago. 1964/65 – instruo de Esperanto en mia gimnazio „Johanneum“ kaj en junulara domo „Stintfang“. En 1967 – abiturienta ekzameno. 1967/68 – deviga armea servo. 1968-74 – studado al konstruata inĝeniero en Teknika Universitato Berlino, diplomita inĝeniero. 1974-86 – konstrua inĝeniero kaj gvidisto de strato-konstruoj en privataj firmaoj, ankaŭ pri trajnaj vojoj, akvaj vojoj kaj pri parkoj kaj ĝardenoj. 1986-2012 – planisto de stratoj, infrastrukturo kaj urboplanado en la Senato de Berlino, planado kaj konstruado de piedvojoj kaj biciklaj stratoj ĝis aŭtoŝoseo; trafikaj sistemoj. 1995 – ĝis hodiaŭ: fondinto kaj estro de komunitala registrita asocio „Esperanto-Haus Michendorf e.V.“ 2001-07 – docento por Esperanto en Teknika Universitato Berlin. 2004-10 prezidanto de Esperanto-Ligo Berlin.

Peter Kühnel

Lingvo kaj kulturo: prelegociklo de Ilona Koutny en BET-55

Ilona Koutny naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, sed ekde 1997 ŝi vivas en Pollando. Ŝi diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, poste doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato kaj habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano.

Esperanto estas parto de ŝia profesia kaj privata vivo ekde jardekoj. Lingvoj, komunikado kaj matematiko interesis ŝin dekomence, tial ŝi lernis kelkajn lingvojn kaj longe okupiĝis pri komputa lingvistiko.

Ŝi instruis Esperanton dum jardeko ĉe la Esperanto-fako de Eötvös-Universitato, kiel posteulo de profesoro Szerdahelyi, krome



aplikatan kaj komputan lingvistikon. Nun ŝi estas profesoro en UAM kaj estras la Ugro-Finnan Katedron.

Ŝi fondis en 1997 kaj gvidas ankaŭ la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn ĉe UAM, kie ŝi prelegadas pri internacia kaj interkultura komunikado, Esperantaj lingvistiko kaj metodiko.

Ilona Koutny okupiĝas ankaŭ pri la rilatoj inter lingvo kaj kulturo, pragmatiko kaj leksikografio. Membro de Akademio de Esperanto (1998-2016), profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Ŝi prelegis pri fakaj temoj en diversaj konferencoj kaj gvidis kursojn (ekzemple ĉe la usona NASK); verkis artikolojn en diversaj lingvoj, pretigis kelkajn vortarojn (*Hungara-Esperanta Meza Vortaro* kun I. Szerdahelyi, trilingvajn laŭtemajn etvortarojn).

Pli detala biografio kaj listo de la publikaĵoj estas en la retejo de la Studoj (<http://interl.amu.edu.pl>), en la libro *Nia diligenta kolegaro* kaj en la revuo *Esperanto* (2019, №1).

En BET-55 prof. Ilona Koutny prezentos sub la titolo „Lingvo kaj kulturo“ ciklon el kvar prelegoj pri lingvo, kulturo kaj instruado en interaga maniero, kun diskutoj.



Seminario de Pavla Dvořáková „Ĉu muziko povas kuraci?“

Ĉu muziko vere povas kuraci? Kaj se jes, kiaspeca? Kion ĉion eblas kuraci? Kaj kion fakte signifas kuraci – ĉu pli bone farti, seniĝi de doloro, aŭ eble ion alian kaj pli tutecan?

Kian kvalifikon kaj kapablojn necesas havi? Ĉu sono povas ankaŭ damaĝi? – En tiu ĉi seminario mi volus skize enkonduki vin en la problemaron – eĉ se ni, kiel kutime, trovos eble pli da demandoj ol da respondoj, aŭ se estos je unu demando pli ol unu „vera“ respondo.

Precipe mi volus prezenti kelkajn el miaj ĝisnunaj spertoj el la muzikoterapia praktiko kaj elprovi mallonge kun vi plurajn teknikojn aŭ alirojn, kiujn povos realigi por si ĉiu sen neceso de aparta muzika aŭ alia faka trejnado.

Mi prezentos al vi por aŭskulto kelkajn terapie interesajn instrumentojn. Kaj ni koncentriĝos precipe pri malfermo de nia

voĉo, kiu estas nia plej granda trezoro, kaj pri uzo de nia korpo. Mi tuŝos ankaŭ fenomenon de la tiel nomata natura agordigo en $a1=432$ Hz. (Rim. de la red: aŭskultu ekz. „Karnavalo de bestoj“, ludatan de Pavla Dvořáková: <https://soundcloud.com/pa-la-la-sabla/camille-saint-sa-ns-le-cygn>., aŭ legu pri ŝi en Vikipedio.

Venu ĉiuj esploremaĵoj interesitoj. Eĉ se pro tempomanko ĉio estos nura gustumo, eble vi forportos el la seminario inspiron kaj instigon por plu serĉadi kaj praktike eksperimenti.

Pavla Dvořáková (biografieto)

Pavla Dvořáková (naskiĝis en 1966) origine studis socian informsciencan kaj biblioteksciencan (kun specialiĝo pri aplikita lingvistiko) kaj sekve ankaŭ naturajn kaj muzikajn terapiojn kaj jungecan astrologion.

Pri muzikoterapio ŝi i.a. longdaŭre volontulis en infanhejmo. Esperantistiĝis en 1977 kaj ekde 1983 vaste aktivis en Esperanto-movado. Okupiĝas ĉefe pri organizado kaj dokumentado de aranĝoj, klerigado, redaktado de retejoj, Vikipedio, sonregistraĵoj kaj kantado. En 2008-2016 estrarano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, plursfere okupiĝis ankaŭ pri Esperanto-Muzeo en Svitavy, precipe pri pretigo de fizikaj kaj virtualaj ekspozicioj kaj pri programo de pluraj muzeaj aranĝoj.



Pri la kontribuontoj al la programo de BET-55

Aleksander Korĵenkov

(Корженков, 1958) estas Ruslanda inĝeniero (dipl. 1980), ekde 1991 redaktoro kaj eldonisto. Esperantisto ekde 1976, li aktivis en ĉiuj niveloj (loke, regione, lande, internacie, fakte kaj kulture), i.a. kiel komitatano de UEA (1995-2004), estrarano (1992-2001, 2008-11) kaj vicprezidanto (1992-95) de TEĴA, vicprezidanto de Ruslanda Esperanto-Asocio (1992-94), prezidanto de Rusia Esperantista Unio (1995-97).

En 1984 Korĵenkov lanĉis kaj ekredaktis la legendan (kaj leg-endan) samizdatan kulturalan almanakon “Sezonoj” (1984-90); ekde 1991 li redaktas la ĉiumonatan gazeton “La Ondo de Esperanto” (297 numeroj aperis). Li verkis kaj tradukis multajn librojn kaj pli ol mil artikolojn, eseojn, recenzojn, beletrajn tradukojn k.a., kiuj aperis en pluraj Esperantaj gazetoj.

Aleksander Korĵenkov eldonis kun sia edzino Halina Gorecka 121 librojn en/pri Esperanto, inter kiuj estas ankaŭ liaj propraj libroj originalaj kaj tradukitaj, interalie, „Historio de Esperanto“ (2005), „Homarano“ (2009, 2011) kaj “Nia Diligenta Kolegario” (kun H. Gorecka, 2018). Lia biografia skizo „Zamenhof“ (Esperanta eld., 2010) aperis ankaŭ angle, ĉeĥe, itale, portugale kaj slovake.

Dum longa tempo li okupiĝas pri bibliografio kaj historio de Esperanto; pri ĉi tiuj kaj aliaj temoj li pli ol centfoje prelegis



en pluraj landoj. Aleksander Korĵenkov estas gastprofesoro pri la historio de Esperanto en la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano. En 2008 li kun Halina Gorecka kunfondis la podkaston „Radio Esperanto“ (ĝis nun aperis 50 sonprogramoj), kaj en 2010 lanĉis kaj ĝis nun redaktas la novaĵretejon “La Balta Ondo” (pli ol 1900 publikaĵoj aperis).

En 2009 A. Korĵenkov estis proklamita la Esperantisto de la Jaro, kaj en 2010 li kaj Halina Gorecka ricevis la Esperanto-kulturpremion de la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen, kiu estas la plej prestiĝa premio en Esperantujo.

En la 55-a BET Aleksander Korĵenkov kune kun Halina Gorecka gvidos la kvizon „Kiu estas sur la ekranon“, kaj prezentos la ĵus aperintan kvaran eldonon de „Baza Literatura Krestomatiko“.

Halina Gorecka

(Горецкая, 1959) estas Ruslanda matematikisto (dipl. 1982), ekde 1991 eldonisto. Lerninte Esperanton en 1979, ŝi multe aktivis en la movado, i.a. kiel delegito de UEA kaj peranto de UEA por Ruslando, membro de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA, gvidanto de esperantistaj societoj en Uralo kaj Kaliningrado, kaj direktoro de Kolektiva Esperanto-Biblioteko, ekde ties fondo ĝis la ĉeso (1982-1998). Dum dudek jaroj ŝi estis sekretario de la premio „Esperantisto de la Jaro“, ekde ĝia lanĉo en 1998 ĝis 2017.

En la 1980-aj jaroj Halina Gorecka estis redaktoro de la samizdata informilo „Ekzakte“ kaj de la gazeto „Ruslanda Esperantisto“ (1991-2002). Ŝi kontribuis artikolojn, eseojn, recenzojn al ĉi tiuj gazetoj, ankaŭ al „Sezonoj“, „Hungara Vivo“, „Esperanto“, „Literatura Foiro“, „La Ondo de Esperanto“ kaj aliaj. Ekde 1991 ĝis nun ŝi estas posedanto kaj eldonanto de „La Ondo de Esperanto“. Kun sia edzo Aleksander Korĵenkov ŝi kunaŭtoris la librojn „Esperanto en Ruslando“ (2000) kaj „Nia Diligenta Kolegaro“ (2018).



En 2008 ŝi kun Aleksander Korĵenkov kunfondis la podkaston „Radio Esperanto“, en kiu ŝi gvidas la nemovadan rubrikon „Okcidente de Ruslando“.

Halina Gorecka estas laŭreato de la premio de la soci-kultura revuo „Spegulo“ (2008). En 2010 ŝi kaj Aleksander Korĵenkov ricevis la prestiĝan Esperanto-kulturpremion de la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen.

Halina Gorecka estas aktiva en la pacianta movado, i.a. kiel vic-prezidanto de la ruslanda socia organizaĵo de renmalsanuloj.

En la 55-a BET Halina Gorecka, kune kun Aleksander Korĵenkov, gvidos la kvizon „Kiu estas sur la ekranon“ kaj prezentos la ĵus aperintan kvaran eldonon de „Baza Literatura Krestomatiko“.

Bīruta Rozenfelde

Bīruta Rozenfelde (1933) estas latva esperantistino. Ŝi pasigis 7 jarojn de sia vivo en la Amura Provinco de Soveta Unio (kiu fakte estas la samo kiel Amura Provinco de Rusio), ĉar ŝia familio tien estis deportita.

Ŝi interesiĝis pri Esperanto tra sia patro, kiu mem estis aktiva esperantisto.

Post la reveno al Latvio en la jaro 1956 ŝi sekvis Esperanto-kurson kaj fariĝis movada aktivulino. Bīruta Rozenfelde organizis en la jaro 1959 la unuan Baltian Esperanto-Tendaron (BET, intertempe portanta la nomon Baltiaj Esperanto-Tagoj). Daŭre ŝi aktive partoprenas en la organizado de tiu evento.

En la jaro 1993 Bīruta Rozenfelde faris prelego- kaj kanto-vojaĝon tra Finnlando. Ŝi partoprenis en multnombraj Universalaj Kongresoj kaj reprezentis la Latvian Esperanto-Asocion de 1995 ĝis 2010 kiel komitatano A. Ŝi estas gvidantino de la Esperanto-klubo ĉe la Latva Societo de Rigo kaj vicprezidantino de Latvia Esperanto-Asocio.



La 20-an de julio 2013 la komitato de UEA, dum sia unua sesio dum la 98-a UK de Esperanto en Rejkjaviko, elektis ŝin kune kun Hallgrímur Sæmundsson kaj Roland Lindblom kiel honoran membron de Universala Esperanto-Asocio.

Gražina Opulskienė

En BET-55 estos organizita plurnivela instruado de Esperanto kun kompetentaj instruistoj. La instruon programon gvidos Gražina Opulskienė, kiu en la decembra kongreso de Litova Esperanto-Asocio estis elektita kiel vicprezidanto de LEA. Jen ŝia sinprezento:

Mi naskiĝis en la jaro 1958 en la urbo Mažeikiai en Litovio, kaj tie mi plu loĝas. Mi estas bibliotekistino en la gimnazia biblioteko kaj instruas Esperanton kiel nedevigan kurson al 14-19-jaraj junuloj.

La unuan fojon mi aŭdis pri Esperanto kiam mi estis 13-jara lernantino, ĉar mia samklasanino lernis la internacian lingvon en iu rondeto. La ideo de komuna lingvo por la homaro fascinis min, sed reale mi eklernis la lingvon nur en 1989. Mi sekvis kurson ĉe la instruistino Elena Kuzminskytė. Post la kurso mi skribis kelkajn leterojn,

serĉante korespondamikojn, sed ne daŭrigis la lernadon.

En 1992 en Kaŭno okazis la 65-a SAT-kongreso, kaj tiu kongreso esperantigis min. Bonega etoso, multaj kontaktoj kun eksterlandanoj, atento de spertaj esperantistoj, interese ga kurso de la Cseh-instruistino Ewa Bondar – ĉio „finbakis“ min, kaj ekde tiu jaro mi konsideras min esperantistino.

Poste mi partoprenis en pli ol dek sinsekvaj SAT-kongresoj, ĉefe danke al mia aŭstria „kongrespatro“ Max Hollinger, kiu ne nur daŭre instigis min esti aktiva esperantistino, sed ankaŭ grave kontribuis, ke mi povu ĉeesti Esperantajn aranĝojn. Mi jam delonge estas SAT-perantino por Litovio kaj apartenas al la redakta skipo de „Sennaciulo“.

En 1999 mi akiris diplomon de Cseh-instruistino kaj mi sentas dankemon al Ewa Bondar kaj Atilio Orellana Rojas pro la instruado, al Nora Caragea kaj Max Hollinger pro la financa subteno kaj kuraĝigo.

Ekde 1994 mi instruas Esperanton en gimnazio, kaj ekde 2000 mi instruas ankaŭ en aliaj landoj, dum esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Tiel en mia listo jam estas Kroatio, Japanio, Latvio, Aŭstralio, Francio, Novzelando, Italio, Hispanio kaj Finnlando.





Gražina Opulskienė kun sia gimnazia Esperanto-klaso 2018/19

Pli ol instrui plaĉas al mi prelegi. Mi dufoje faris prelegvojaĝojn tra kluboj de Francio, prelegis en Germanio, Belgio, Luksemburgio, Japanio, Hispanio, Skotlando, Nederlando, Novzelando, Finnlando kaj, kompreneble, en Litovio. Kiam eblas, mi partoprenas en Universalaj Kongresoj, ILEI-konferencoj, kaj dum multaj jaroj mi kunlaboris kaj ĝuis Internaciajn Festivalojn en Germanio.

La tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas por mi „deviga memlekto“, kiam ili okazas en Litovio, kaj mi ĝojas helpeti al kolegoj -instruistoj kaj zorgi pri diversaj taskoj en la organiza teamo.

Por mi Esperanto estas okupo, kiu valoras investadon de tempo kaj mono, ĉar ĝi donas al mi eblecon ekkoni la mondon per miaj propraj okuloj kaj sentoj. Eĉ pli gravas, ke danke al Esperanto mi renkontas multegajn tre interesajn homojn.

Lee Jungkee

Lee Jungkee naskiĝis en 1953 en la urbo Taegu, Koreio (suda). En la universitato Youngnam li studis publikan administradon, poste li studis planologion (studo pri planado) en superuniversitato (1979–1981).

Lee Jungkee esperantistiĝis en 1971 kaj multe aktivis por kaj per Esperanto, interalie



kiel komitatano de UEA (1991-), prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (2001-2004), prezidanto (2008-2010) kaj honora prezidanto (2010-) de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-movado) kaj estrarano de UEA ekde 2013.

En 1991 Lee Jungkee fondis Seulan Esperanto-Kulturcentron (SEK) en Seulo (<http://esperanto.kr/>) kaj dum 27 jaroj li gvidis tie 318 kursojn de Esperanto – kaj krome instruis Esperanton kiel docento en la universitato Kyunghee. Li jam 104-foje partoprenis en la Esperanto-eventoj ekster Koreio, inkluzive de 20 Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Lee Jungkee verkis kaj tradukis kelkajn Esperanto-librojn. En 2002 li ricevis la premion Degučĉi.

En BET-55 Lee Jungkee prelegos pri la temo „Kien Azia Esperanto-Movado iras?“

Azio havas 60% de la loĝantaro de la mondo, kaj pro tio la respondeco de azianoj estas granda ankaŭ en Esperantujo. Sed azianoj konsistigas nur 17% de la tuta membraro de UEA. Tio signifas, ke nombre la

forto de Azio estas ne tiom forte influhava en Esperantujo. Li analizos la nunajn problemojn de Azio en la tutmonda Esperantujo kaj prezentos sugestojn por la Esperanto-Movado en Azio.

Anne Jausions

Anne Jausions (prononcu An Ĵosjon) estas francino. Ŝi studis en universitato la francan filologion kaj poste instruis la francajn lingvon kaj literaturon en pluraj entreprenoj kaj lernejoj en Alĝerio kaj Francio. Ŝi specialiĝis pri instruado al surduloj, interalie en la kastelo de Vincennes apud Parizo, en la pariza instituto Saint-Jacques kaj en la universitato de Saint-Denis, kie tiam estis instruata ankaŭ Esperanto, kiun ŝi eklernis.

Ŝi instruis Esperanton en la sidejoj de SAT kaj SAT-Amikaro en Parizo, kaj multajn jarojn en la sidejo de la asocio *Espéranto-France* en Parizo, ankaŭ en la kulturcentroj Greziljono kaj Kvinpetalo kaj en multaj esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj.

En 2000 Anne aliĝis al OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) kaj dum kelkaj jaroj estis vicprezidanto kaj

prezidanto de OSIEK kaj kunorganizanto de Internaciaj Esperanto-Konferencoj en pluraj landoj de Eŭropo kaj en Ĉinio. En 2008 ŝi sukcese finis la trijarajn Interlingvistikajn Studojn en la universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando) kaj defendis sian diplomlaboraĵon „La plej oftaj malfacilaĵoj de franclingvaj Esperanto-parolantoj“.

Ekde 2008 Anne Jausions estas membro de FEI (Franca Esperanto-Instituto), kie ŝi renovigis la prezentadon kaj la enhavon de la ekzameno. Ŝi verkas artikolojn kaj recenzojn por *La Gazeto* (OSIEK), *Le Monde de l'Espéranto* (Espéranto-France) kaj aliaj gazetoj, ofte pri literaturo. Ŝi estas membro de la internacia komisiono pri elektado de la Esperantisto de la Jaro. Ankaŭ ŝia edzo Claude estas esperantisto kaj instruanto de Esperanto.

Anne Jausions en BET-55 okupiĝos pri instruado de Esperanto.

Nina Pietuchowska

Nina Pietuchowska estas pola esperantistino, loĝanta en Bjalistoko. Naskiĝinte en la vilaĝo Ostaszewo, provinco Podlaĥio, ŝi diplomiĝis en la Bjalistoka Filio de la Universitato de Varsovio pri fiziko kaj kemio, kaj poste laboris kiel instruistino de fiziko kaj kemio en lernejoj de Bjalistoko.

Ŝi membriĝis en la Asocio de Polaj Instruistoj. Ŝi ankaŭ estas membro de „Polskie Towarzystwo Turystyczno-Krajoznawcze“ (PTTK, aŭ Pola Turisma Asocio) kaj de la Bjalistoka Asocio de Esperantistoj.

Plurajn jarojn ŝi aktivis kiel kursestrino en la internacia lingvolerna renkontiĝo Somera Esperanto-Studado (SES), kie ŝi ankaŭ prelegas interalie pri pioniraj personoj el la historio de Esperanto, kiel ekzemple Edward Sapir, Andreo Cseh, Jean Forge (verkista nomo de Jan Fethke). Nina Pietuchowska estas edziniĝinta kaj havas du infanojn.





Nun ŝi estas pensiulino kaj de multaj jaroj instruas Esperanton i.a. en Pollando, Germanio, Italio, Francio, Slovakio, Latvio kaj Litovio.

Bonvolu veni en ŝian kurseton, certe ion novan vi lernos kaj ne enuos!

Gong Xiaofeng

Gong Xiaofeng, konata en Esperantujo kiel Arko, naskiĝis en 1962, diplomiĝis pri kemio, poste doktoriĝis pri nutra scienco kaj laboras kiel profesoro pri media scienco kaj inĝenierado. Ŝi eksciis pri Esperanto en ĵurnalo, kaj eklernis ĝin en 1980. Baldaŭ ŝi mem instruis Esperanton, interalie kiel nedevigan kurson dum kelkaj jaroj ĉe Nanchanga Universitato. En 2006-2007 ŝi laboris kaj esploris kiel vizitanta profesoro en Universitato Cardiff, Britio. Ŝi aliĝis al loka Esperanto-klubo kaj aktive partoprenis ne nur lokajn E-aktivadojn, sed ankaŭ Britan Esperanto-kongreson kaj Skotlandan Esperanto-kongreson. Ŝi partoprenis la 50-an Internacian Semajnon (IS) en Germanio, dum kiu ŝi sukcese trapasis la ekzamenon pri

lingva kapableco, organizitan de Germana Esperanto-Instituto. Post tio ŝi faris Esperanto-vojaĝon en Francio, Germanio, Svislando, Nederlando kaj Belgio, kaj multe praktikis la lingvon. Reveninte al Ĉinio ŝi tuj komencis instrui Esperanton en sia Universitato, ĝis nun sume pli ol 500 studentoj lernis Esperanton. Ŝi helpis siajn gestudentojn fondi Esperanto-asociacion en Universitato de Nanĉang en la jaro 2011, kie nun estas pli ol 50 membroj. Ŝi ne nur instruas Esperanton al la studentoj, sed ankaŭ gvidis ilin partopreni seminariojn kaj diversajn trejnkursojn en Kantono, en Hajnano, en Tianjin ktp. En la jaro 2008 ŝi klopodis por restarigi la Ĉinan Sekcion de ILEI, kaj de tiam ILEI-CN kreskas rapide. Ŝi ĉeforganizis seriojn da seminarioj pri Esperanto-instruado kaj trejn-kursaron en diversaj urboj, ekzemple: ILEI-seminariojn en Lushan (2009), Taiyuan (2010), Tianjin (2011), Kunming (2012), Changzhou (2014); tri sesiojn de ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) en Tianjin (2011), Kunming (2012) kaj Quanzhou (2016); tri Vintrajn Esperanto-Kursarojn kaj kelkajn KER-ekzamenojn. Kiel prezidanto de Jiangxi-a Esperanto-Asocio, ŝi organizis kvin sesiojn de Lushan-forumoj de Esperanto (2008-14).

Gong Xiaofeng estis vicprezidanto de ILEI (2013-18) kaj prezidanto de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (2009-18).



Vytautas Šilas

naskiĝis la 29-an de junio 1937 en Šiauliai (Litovio) kaj ekde 1948 li loĝas en Vilno.

Dum pluraj jardekoj li laboris kiel inĝeniero en radiouzino, kaj samtempe okupiĝis pri la problemaro de tiel nomata „Eta Litovio“, precipe pri Kaliningrada (Kenigsberga) Regiono, gvidis ekskursojn, preparis samizdatajn (= ekstercenzurajn) eldonaĵojn, prezidis komisionon de la nacia movado *Sajūdis* pri problemoj de etnecido, genocido kaj kultura heredaĵo de Eta Litovio, kiu poste transformiĝis al konsilio pri aferoj de Eta Litovio, ĝis nun gvidata de li.

Šilas eklernis Esperanton en 1956 kaj daŭrigis la lernadon en la armeo. Post la armeo li aktiviĝis kiel instruisto kaj organizanto, kaj en julio 1961 fondis en Vilno la Esperanto-klubon Juneco, kiu aktivas ankaŭ nun. Li kunorganizis kelkajn BET-ojn kaj lanĉis du popularajn Esperanto-aranĝojn: Boatadon, kiu okazas ekde 1967 ĝis nun, kaj la artkonkurson Muzo (1969-97).

Šilas estis prezidanto kaj sekretario de SEJM; ekde 2008 li estas ĝenerala sekretario de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.

Li kunlaboris en Esperanto-gazetaro, precipe en samizdataj Sovetuniaj gazetoj, kaj estis iniciatinto kaj redaktoro de la SEJM-informiloj *Kio*, *Kie*, *Kiam* (KKK, 1973-74) kaj *Kurte* (1976-79).



Foto: Stasio Paškevičiaus ©

De 2006 ĝis 2010 li redaktis la dumonatan revuon *Litova Stelo*. Nun li aktive kunlaboras en *La Ondo de Esperanto*.

Vytautas Šilas esperantigis plurajn litovajn kantojn kaj verkis originalajn kantotekstojn, (kun)preparis du Esperanto-kantarojn (1967, 1972), iniciatis kaj organizis eldonadon de du sondiskoj en Esperanto (1962, 1972), verkis ruslingvan lernolibron de Esperanto por radioamatoroj (1977) kaj lernolibron *Lernu Esperanton* (2005). En 2017 aperis lia litovlingva monografio pri Zamenhof kaj Litovio.

En la 55-a BET Vytautas Šilas prelegos pri la unua periodo de la agado de Litova Esperanto-Asocio, al kies centjariĝo estas dediĉita BET-55.

(Legu sur la sekvaj paĝoj.)

Povilas Jegorovas
Aleksander Korĵenkov

Litova Esperanto-Asocio

100-jara

La genezo kaj stariĝo de Litova Esperanto-Asocio


La komencaj 20 jaroj de la 100-jara LEA

Disvastiĝo de la internacia lingvo Esperanto estas rezulto de komuna agado de ĉiuj esperantistoj, kiun direktas individuoj. Estas tiel tra la tuta mondo. La organizita Esperanto-movado sur la litova teritorio aperis sojle de la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Junie 1892 en Vilno (litove – Vilnius) fondiĝis Vilna Esperanto-Klubo (poste Esperanto-Societo), nur finjare 1909 en la urbo Kaŭno (litove – Kaunas) estis registrita Kovna Esperanto-Societo (ĝi ekagis en 1910). Fakte temis pri apero de organizita rusa Esperanto-movado sur la litova teritorio. La societoj per Esperanto popularigis nur la rusan, sed ne litovan kulturon, ja en la societoj dominis rusparolantoj (litovoj malplimultis). Estis nenio mirinda – la litova lingvo tiam

estis forpuŝita ne nur el la oficiala publika, sed eĉ de la preĝeja spaco, kie dominis propolaj ekleziuloj. Ne nur la eldonadon, eĉ la posedon de litovlingvaj eldonaĵoj la rusaj funkciuloj konsideris krimo kaj severe punis! La ĉefa zorgo de litovaj kleruloj estis batali por rajtoj de la gepatra lingvo. La porlitova Esperanto-lernolibro fare de la katolika pastro A. Dambrauskas (tiam ekzilita al Ustjujna, Novgoroda gubernio) estis eldonita ekster la rusa imperio – en la ĉefurbo de Litovio Minora Tilžė (germane: Tilsit; Orienta Prusio). Eldonita somere de 1890 ĝi estis kontrobande transportata al la litova teritorio, kiun regis Rusa imperio. Estis do la unua kaj,



La antaŭmilita Kaŭno



versajne, sola nelegala Esperanto-lernolibro en la mondo, ĉu?


La situacio por litovoj ĝenerale, kaj por disvastiĝo de Esperanto inter litovoj komencis pliboniĝi nur post kiam en majo 1904 estis nuligita la cara edikto pri malpermeso de litovlingvaj eldonaĵoj. La dua eldono de la lernolibro, aperinta en 1908 (sen demandi la aŭtoron!) iris tra Litovio jam kiel legalaĵo, kaj estis la signo, ke tiam pli multaj litovoj ekinteresiĝis pri la vere internacia lingvo.

La 1-a Mondmilito radikale ŝanĝis la enlandan situacion. Ĝi skuis la Ruslandan Imperion kaj ĉesigis iaman Esperanto-agadon en Litovio. Kiam en 1915 la germana armeo invadis Litovion, el Litovio al profundo de Ruslando estis evakuitaj pli ol 300 mil civitanoj. Inter ili estis ankaŭ esperantistoj (ĉefe la rusparolantoj).

Post kiam la Germana Imperio estis malgajnanta la militon, fiaskis la Ruslanda kaj Aŭstro-Hungara imperioj, sur ties aneksitaj teritorioj komenciĝis formiĝo de naciaj ŝtatoj

(la ĉeĥa, la pola, la hungara, la slovena, la kartvela k.a.). La naciaj kaj socian aktivecon, samkiel printempajn ĝermojn post longdaŭra vintro, elmontris leviĝanta litova popolo. Jam la 16-an de februaro 1918 ĝia Litova Konsilio (litove: *Lietuvos taryba*) per la Akto de Litova Sendependeco deklaris restarigon de la litova ŝtato kun la antikva ĉefurbo Vilno. Germanio, kies armeo ankoraŭ postrestis en Litovo, tamen nur finoktobre 1918 agnoskis la Akton. Septembre 1918 aperis la unua artikolo „Esperanto pri nia lando“, titolita „Pri Litovujo“. Estis pli ol dupaĝa artikolo en la revuo *Esperanto* (n-ro 217/218, p. 2). Jam la unua alineo garantiis la objektecon. Mi citas: „Litovujo, aperinta sur la politika horizonto, ne estas nova lando, kiel ŝajnas. Kiel sendependa lando ĝi fondiĝis en la 18-a jarcento kaj nur en 1795 estis aneksita de Rusio. Ĝia teritorio okupas la guberniojn de Kovno, Vilno, Vitebsk, Suvalki, parton de la Grodna, distriktojn de Novogrudek, Nesviež“. La aŭtoro, kiu estis ne litovo, sed bulgaro, esperantisto Ivan Krestanof, konkludis: „La historio de Litovujo, samkiel la ĝenerala demokratia evoluo, donas al ĝi la rajton refariĝi sendependa ŝtato“.

Por percepti la kondiĉojn, en kiuj postmilitite ekagis litovaj esperantistoj, ni rememoru la ĝeneralan enlandan situacion de la jaroj 1919 kaj 1920. La unua litova registaro en la ruinigita kaj elĉerpita lando ekfunkciis




nur ekde la 11-a de novembro (en Vilno). La regulan litovan armeon ĝi establis la 23-an de novembro (komence nur unu 150-soldatan duonarmitan volontulan regimenton). La nova armeo devis tuj dece rezisti al triobla plago. Jam mezdecembre Litovion invadis la bolŝevika Ruĝa Armeo, kiu okupis la nordorientan teritorion kaj la ĉefurbon Vilno. Nur finaŭguste 1919 litovoj sukcesis definitive forpuŝi Ruĝan Armeon el Litovio. Julie 1919 la nordan Litovion el latva teritorio rabire invadis progermana armeo de kolonelo Bermont (formita el rusaj blankgvardianoj kaj armeanoj de kapitulaciita Germanio). Mezdecembre la bermontanoj estis definitive forpoŝitaj el okupita litova teritorio. Aprile 1919 la sudorientan Litovion invadis pola armeo kaj okupis la ĉefurbon Vilno. Nur finnovembre 1920 la penetrado de poloj estis definitive ĉesigita (pro interveno de Francio, Litovio devis rezigni de provoj tute forpuŝi la polajn okupantojn). La eterna litova ĉefurbo Vilno, sekve, restis sub la pola jugo

(ĝis oktobro 1939). La urbo Kaŭno iĝis la provizora ĉefurbo de Litovio.

Jen en tia batalanta kaj leviĝanta Litovio ĝermis la litova Esperanto-movado. Finmarte 1919 la socia kaj politika taggazeto *Lietuva* (n-ro 60, p. 2) sciigis: „Grupo de kaŭnaj esperantistoj pretas revivigi la antaŭmilitan Kaŭnan Esperantistan Societon (estis: Kovna Esperanto-societo) kaj organizi kurson de la lingvo Esperanto“. La volantoj por kontribuo en la revivigo kaj organizo de la instruado devis interrilati kun la verkinto de la Esperanto-lernolibro kaj vortaro (*Tarptautinès Esperanto kalbos kalbamokslis ir žodynas*, 1919, Kovno) Juozas Mačernis. Maje la sama gazeto sciigis, ke la 15-an de majo en la urbodoma salono pri la internacia lingvo Esperanto prelegis Povilas Medemas (en 1918, 1919 kaj ĉiam en Esperanto-literaturo: Paul v. Medem) kaj prelato Aleksandras Dambrauskas (en tiama Esperanto-literaturo Aleksandro Dombrovski, litova pseŭdonimo: Adomas Jakŝtas). Ĝi sciigis, ke la kurso de



Paŭlo von Medem



Prelato Aleksandras Dambrauskas

Esperanto komenciĝos la 20-an de majo en la ŝtata litova gimnazio ĉe Laisvės Alėja 55 (ekde 1923 „Aušros“ gimnazio).

La 6-an de julio 1919 en la Kaŭna Urbodomo okazis reviviga kunveno de Kaŭna Esperanto-societo, kiel ĝerma signo de naskiĝinta litova Esperanto-movado. Kial en la urbodomo? Ĝi estis laborloko de Paŭlo von Medem, kiu tiam estis membro de la kvarmembra Prezidio de Kaŭna Urba Konsilio. Pri la revivigo de litova esperantista agado informis la julia numero la revuo *Esperanto* (n-ro 7, p. 11) kiu sciigis, ke s-ro P. von Medem, helpata de J. Maĉernis, revivigis Esperanto-vivon en Kovno, okazas Esperanto-kurso kun 30 personoj“. Samkiel antaŭmilite, la prezidanto de KES restis P. Medemas kaj vicprezidanto A. Dambrauskas. La unuan estraron de la litova KES eniris J. Maĉernis (sekretario), A. Opulskis (kasisto kaj libristo). La sidejo kaj kunveno de KES iĝis la loĝejo de P. Medemas, str. Smėlių 12 (nun str. Griunvaldo 18).

En la decembra numero de 1921 de la taggazeto *Lietuva* (N-ro 275, pĝ. 3) aperis informo, ke ekde la 6-a de decembro ĉiumonate la unuan kaj trian mardon je 8-10 horo vespere en sidejo de Kaŭna Esperanto-societo okazos membrokunvenoj por ekzercado en Esperanto. Laŭ rememoroj de esperantisto-jurnalisto P. Andriušis la kunvena programo konsistis el prelegoj, interparoloj,



revuoj de Esperanto-literaturo, eĉ koncertoj de ĉambra muziko. Ĉiu kunveno komenciĝis per kantado de la esperantista himno *La Espero*. La kunvenejon de KES dum kelkaj jaroj vizitis pli ol 170 enregistritaj esperantistoj!

Laŭ mia peto la aktiva kaŭna esperantistino Danutė Statkuvienė en Kaŭna Arkivo kaj Kaŭna Registra Centro trovis dokumentojn, kiuj helpis al ŝi identigi la domon, kie loĝis la geedzoj Medemoj, kaj dum sep jaroj kunvenadis esperantistoj (ne nur kaŭnanoj).

Ekde la jaro 1903 la geedzoj loĝis en 7 ĉambroj de la dua etaĝo (laŭ brita kalkulo – la unua), ankoraŭ unu ĉambro estis destinita por KES. Post la jaro 1930 la strato Smėlių ricevis la nomon Griunvaldo. Estas nun la domo Grunvaldo str. N-ro 18 / Gedimino str. N-ro 2 (proksime de la vendejega Akropolis). Sur la stratvando de la domo nun pendas memortabulo por generalo S. Žukauskas (la forpelinto de bolŝevika Ruĝa armeo), premiero E. Galvanauskas kaj diplomato V. Čarneckis, kiuj diversjare loĝis en la sama domo.

La loĝejo de P. Medemas estis ne nur sidejo de Kaŭna Esperanto-Societo, sed ankaŭ fondoloko de Litova Esperanto-Asocio (LEA). Tie la 20-an de aŭgusto 1919 okazis la fonda kunveno de LEA. La kunvenon partoprenis: el Kaŭno – A. Dambrauskas, P. Medemas, E. Janickienė, Teresa Zilbernik-Kociniė (la fratino de Klara Zamenhof), Anna Izakson, A. Opulskis kaj S. Tījūnaitis, ankaŭ J. Maĉernis; el urbo Panevėžys – J. Tajc, Basė Portnaitė, prof. Ben-Šachar; el urbo Biržai – L. Alseika, de ie ankaŭ B. Braude. Entute pli ol 20 personoj. Estis elektita jena estraro de LEA: la prezidanto – A. Dambrauskas, sekretario – J. Maĉernis, kasisto P. Medemas, A. Klimas (librovendisto), membro – A. Opulskis.

La 10-an de decembro 1919 Litova Esperanto-Asocio (post kiam la estraro finpretigis la Regularon), estis oficiale enregistrita per la kaŭna urba kaj distrikta

estro K. Sklėrius (la registra n-ro 9). La sidejo de LEA estis deklarita en la loĝejo de P. Medemas. Tiam la organizaĵon administre ekgvidis P. Medemas mem. Aŭguste 1921 li kun ĵurnalisto Adolfas Klimas partoprenis la 13-an UK en Prago. P. Medemas, kiel rajtigita reprezentanto de litova registaro je nomo de Litova Ministro pri Financoj, Komerco kaj Industrio, oficiale gratulis la kongreson.

Pri la kongreso kaj siaj kontaktoj kun ĉefaj financistoj kaj komercistoj li publikigis la artikolon „Ĉeĥoslovakio kaj Litovio“ en la ĉapitro „Financoj, komerco, industrio“ de la taggazeto *Lietuva* (P. Medemas, N-ro 262, 1921 nov. 20, pĝ. 3).

Cetere, post la raporto pri sia estado en Ĉeĥoslovakio al ministro Ernestas Galvanauskas (loĝinta en la sama domo Smėlių str. N-ro 12!) P. Medemas esploris la eblon pri financa subteno al la eldonota revuo *Litova Stelo*.

Laŭ la taggazeto *Lietuva* (n-ro 278, 10.12. 1921, p. 3), la 27-an de novembro en Kaŭno okazis ĝenerala kunveno de LEA (kun gastoj – preskaŭ 100-persona). Prezidis ĝin S. Tijiŭnaitis. Pri laborado de LEA raportis la prezidanto prelato A. Dambrauskas. Li sciigis, ke estas fonditaj filioj de LEA en la urboj Ŝiauliai, Jonava, Dotnuva kaj Siesikai. Pri agado de KEA raportis P. Medemas (dum la jaro 1920 la vendeja fako de KES disvendis 2700 Esperanto-lernolibrojn, 2900 vortarojn kaj 2500 „Ekzercarojn de Zamenhof“). La ĝenerala kunveno decidis eldonadi en Esperanto periodaĵon pri Litovio.

Ricevinte la registaran subvencion kaj kontrakte kun Litova Telegrafa Agentejo ELTA ekde januaro 1922 LEA aperigis la 1-an numeron de la revuo *Litova Stelo* (Tiam litovlingve – *Lietuvių žvaigždė*, baldaŭ *Lietuvos žvaigždė*). La revuon redaktis A. Dambrauskas. La Redaktoran Komitaton eniris: A. Klimas, P. Medemas, S. Tijiunaitis, G. Ašmys (sekretario estis J. Mačernis).

Elokventa estis la enkonduka vorto, kiun por la 1a numero de *Litova Stelo* verkis P. Medemas:

„Ĉu multaj scias pri Litovujo? Ne, certe malmultaj, ĉar nur antaŭ kvar jaroj nia lando oficiale vekigis post kelkcentjara dormo. [...] Ĝi estas akceptita en la Ligon de Nacioj. [...] Tamen pri ĝia interna vivo sciigoj disvastiĝas malrapide, ĉar nia litova lingvo ne estas konata en aliaj ŝtatoj. La rolon de sciigilo–informilo ni donas al nia novaperinta gazeto. [...] Sed por atingi bonajn rezultojn de ni celatajn, ni nepre bezonas kunhelpon de ĉiulandaj samideanoj. Helpu al ni, tradukante artikolojn el *Litova Stelo* kaj presigante ilin en viaj naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Vi helpos al fratiĝo de nia popolo kun la tuta mondo. Tiel vi firmigos la internan ideon de esperantismo, vi ĝojigos la spiriton de nia mortinta Majstro, kiu al la sama celo dediĉis sian vivon. Atentu, ke D-ro Zamenhof mem estis litovano, li naskiĝis en historia Litovujo”. La prezento finiĝis per la vortoj: “Do, karaj samstelanoj,



promesu al ni vian bonvoleman helpon. Nur havante vian subtenon ni povos kuraĝe daŭrigi nian laboron; ni povos esperi, ke nia magranda „Litova Stelo“ modeste, sed kun digneco direktos siajn verdajn radiojn en la vastan mondon. P. Medem“.

La marta numero de la taggazeto *Lietuva* de 1922 prezentis la enhavon de la 1-a numero de la monatrevo *Litova Stelo* kaj notis, ke belga taggazeto *Gazette van Gent* n-ro 49 estis la unua eksterlanda eldonaĵo, kiu tradukis el *Litova Stelo*, publikigiginte materialon pri litova historio. La aprila *Lietuva* vaste prezentis ankaŭ la 2-an numeron de LS.

La eldonkvanto de la revuo en 1924 atingis 1500 ekzemplerojn kaj estis celata al eksterlando (nur 250 ekz. estis destinitaj por Litovio mem). LS estis sendata al 1106 adresoj en 42 landoj. Post la ĉeso de la ŝtata subvencio la revuo finis sian „vivon“ aŭtune 1926 per la n-ro 10 (43). La eldonado de *Litova Stelo* renoviĝis nur en la jaro 1935 kaj daŭris ĝis la tragika invado de Sovetunio en jaro 1940.

Dum la unua jardeko 1919-1929 la landa agado de LEA esprimiĝis per fondado de novaj Esperantaj grupoj: en Litovio formiĝis pli ol 20 E-grupoj, societoj, filioj de LEA. Laŭ la statistiko de Dietterle en 1928 esperantistoj troviĝis en 76 lokoj de litova ŝtato. Do, laŭjare en la litovaj Esperanto-organizaĵoj formiĝis: en 1919 – en Kaŭno; en 1921 – Šiauliai, Jurbarkas, Jonava, Dotnuva, Siesikai, Ukmergė, Gižai; en 1922 – Ramygal, Raseiniai; en 1923 – Panevėžys (filio de LEA), Kėdainiai-1923, Saločiai-1923 en 1924 – Biržai-1924, Marijampolė-1923/1924, Salamiestis-1924, Rokiškis-1924, en 1925 – Prienai-1925 en 1926 – Šiluva-1926, en 1927 – Panevėžys (Paneveja E-Asocio); en 1934 – Marijampolė (Filio de LEA), Telšiai (E-grupo en Pastra Seminario); en 1935 – Kuršėnai (Filio de LEA), Plungė, Žagarė.

Necesas noti, ke unu el la plej agemaj lokaj Esperanto-organizaĵoj estis tiu de la urbo Panevėžys (aktivuloj: J. Kanas, B. Portnaitė, B. Traubaitė k.a.)!

Ĉiujare okazis Ĝeneralaj Kunvenoj de LEA – de 1920 ĝis la 1940-a jaro. Ni revuu ankaŭ la elstarajojn en la funkciado de LEA inter tiuj jaroj. Jen kelkaj elstaraj faktoj:

La jaro 1920. Al la UK-12 en Hago (Nederlando) estis transdonita mesaĝo de LEA: „Litova ministro de Eksterlandaj Aferoj S-ro D-ro Purickis rajtigis nin sciigi, ke Litova Registaro tre simpatie rilatas al Esperanto-movado“.

La jaro 1921. Decembre LEA petis kaj ricevis de la Ministerio pri popolklerigo ĝeneralan permeson organizi en Litovio Esperanto-kursojn. P. Medem eldonis (presita en Dresden) *Tarptautinès kalbos vadovėlis* (Lernolibro de Esperanto por litovoj) de A. Klimas.

La jaro 1922. La januara *Lietuva* informis, ke laŭ permeso de Litova Kleriga ministerio ekde januaro 1922 en la sidejo de KES (Kaŭno, Smėlių str. 12) komenciĝas perfektiga Esperanto-kurso (sub la gvido de P. Mademas!). La finintoj ricevos legitimilon de Esperanto-instruisto. Oktobre LEA ricevis konsenton de dekano de Humanisma Fakultato de Litova Universitato pri enkonduko de Esperanto kiel nedeviga studobjekto kaj P. Medemas estis akceptita kiel lektoro pri Esperanto. La 11-an de julio LEA turnis sin al la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kun la peto devigi litovajn reprezentantojn ĉe la Societo de Nacioj subteni la demandon pri Esperanto. La peto estis plenumita.

La jaro 1923. La 4-an de junio la Kaŭna Konsilantaro laŭ la propono de A. Dambrauskas al la antaŭa Paĝia strato (*Pažų gatvė*), kie loĝis gebopatroj de d-ro Zamenhof gesinjoroj Silbernik, atribuis la nomon Zamenhof. Julie aperis grava 284-paĝa



Ĉe Zamenhof-strato en 1991. Boris Kolker montras la ŝildon al la veterano M. Robinsonas.

Litova Almanako kun litova historio, publika kaj literatura. Por ĝia presado P. Medemas akumulis subtenon eĉ de 26 litovaj bankoj kaj firmaoj (entreprenoj). Aŭguste al la 15-a UK de Esperanto en Nürnberg venis 34 litovaj esperantistoj (laŭ Esperanto-kronikisto A. Mekys 27 karavane kaj 7 memstare). Aprile la revuo *Esperanto Triumfonta* informis:

„La klopodoj de l' prezidanto de Kaŭna Esp. Societo (P. Medemas) kroniĝis per sukceso: Litova Ministraro favoris al kongresanoj de la XV senpagan eksterlandan pasporton kaj rabaton je 75 % por fervojaj biletprezoj.

La jaro 1925. La 1-an de januaro okazis granda perdo por la kreskanta litova Esperanto-movado – la novjaran nokton pro korhalto mortis Povilas Medemas (Paŭlo v. Medem). La amasan solenan adiaŭon en la Kaŭna Luterana Tombejo la 3-an de januaro partoprenis prezidanto de LEA A. Dambrauskas kaj Kaŭna urbestro J. Vileišis.

La jaro 1926. La 12-an de junio nova kaŭna radiostacio dissendis la vokon: „Parolas Kaunas, Litovio“ en la lingvoj litova, Esperanto, germana, angla, franca kaj rusa. La 9-an de oktobro komenciĝis regulaj dissendoj en Esperanto. Dum la periodo 1926 kaj 1937 okazis 273 radio-prelegoj en Esperanto sume 87-horaj (la elsendoj unu-dufojaj semajne).

La jaro 1928. La plej elstara litova esperantisto, prezidanto de LEA Aleksandras Dambrauskas estis honorita per ŝtata Ordeno

de la Litova Ĉefduko Gediminas. En Kaŭno estis eldonita *Esperanto kalbos vadovėlis* (Lernolibro de Esperanto por litovoj) de A. Klimas, 2-a eldono.


La jaro 1934 – En Kaŭno okazis la 1-a Litova Esperanto-Kongreso. Ĝi decidis renovigi eldonadon de *Litova Stelo* (ekde 1935).

La jaro 1936 – en Marijampolė estis eldonita 191-paĝa *Pilnas esperanto – lietuvių kalbų žodynas / Plena Esperanto – litova vortaro* de B. Giedra.

La jaro 1938 – La 19-an de februaro mortis honora prezidanto de LEA prelado Aleksandras Dambrauskas. Lin por la adiaŭo al Kaŭna Bazilika Arkikatedralo akompanis episkopoj (ankaŭ beatulo Jurgis Matulaitis), la ŝtata Prezidento Antanas Smetona, universitataj profesoroj, studentoj, armeanoj. Li estis entombigita ĉe la Kaŭna Bazilika Arkikatedralo.

La jaro 1939 – En Kaŭno 9-10-an de junio okazis Baltnacia Kunlabora Kongreso, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj. Esperantistoj proponis por interkompreniĝo de baltlandanoj anstataŭ la rusa aŭ aliaj grandnaciaj lingvoj ekuzi Esperanton. La propono estis arde aplaudita. La kongreso „rekomendis pristudi la eblecon de uzado de Esperanto kaj akceli la enkondukon de tiu lingvo kiel nedeviga instrufako en la mezlernejojn“. Pri la kongresa decido informis la ĉiutaga gazeto *Lietuvos žinios* (n-ro 138, p. 2, 5) kaj registara gazeto *Lietuvos aidas* (n-ro 289, p. 1). La 11-an






de junio okazis la Jubilea Kongreso de Litova Esperantistaro, dediĉita al la 20-jaroj de LEA kaj 30-jaroj de Kaŭna Esperanto-Societo. Estis elektita nova estraro de LEA, esperantistoj vizitis tombojn de du gravuloj de litova Esperanto-movado – tiun de A. Dambrauskas kaj P. Medemas.


La jaro 1940 – Vortaristo B. Giedra kune kun spertulo P. Lapienė pretigis por presado *Plenan vortaron de la lingvoj litova-Esperanta* (ĉirkaŭ 35 mil-vortan), sed pro soveta okupado ĝi estis pereigita. Pro la sama kaŭzo ne okazis ankaŭ por la somero planita Tutlitova Esperanto-Kongreso en reakirita litova ĉefurbo Vilno. Litova ŝtato la 14-an de junio estis impertinente aneksita de Soveta Unio. La marioneta ministro de internaj aferoj, komunisto M. Gedvilas, la 10-an de aŭgusto verdiktis fermi ĉiujn nekomunistajn organizaĵojn, ankaŭ tiun de Litova Esperanto-Asocio. Pasis eĉ ne jaro kaj la Moskva reĝimo entreprenis reprezaliojn (fakte litovan genocidon) – la 14-an de junio 1941

taĉmentoj de soveta Interna Armeo komencis la senjuĝan ekzilon de „kontraŭsoveta“ litova loĝantaro al nordo de Sovetunio kaj al Siberio. Inter nomitaj „popolmalamikoj“ estis ankaŭ esperantistoj. En la ekzilo pereis redaktoro de *Litova Stelo* vortaristo Balys Giedra. La veninta 2-a Mondmilito „savis“ multajn litovojn de antaŭplanita plua ekzilado. Baldaŭ post la milito, junio 1945, la lasta prezidanto de LEA Antanas Poška estis arestita kaj ekzilita al Vorkuta Koncentrejo...

Fine, per kurta prezento, mi vin memorigu pri la pioniroj kaj ĉefaj konstruantoj de tutlitova Esperanto-movado (laŭalfabete):

Liudas Alseika (25.04.1887– 19.05.1960). Geodezisto, pedagogo, vojaĝanto. Dumviva membro de LEA. Pro porlitovaj meritoj estis ordenita per Gediminas-ordeno. Esperantistiĝis en 1911. Fondinto de LEA. Dum 1916-1918 kelkan tempon li loĝis en





Liudas Alseika

Japanio. Somere 1919 li revenis al Litovio, al UK-oj de la jaroj 1923-1930 li veturis kun esperantistinoj edzino Maria aŭ filino Mirinda. En 1960 organizis biciklan veturadon Klaipėda–Vladivostok kaj dumvoje pereis.

Aleksandras Dambrauskas (08.09.1860 – 19.02.1938). Teologo, prelato, filozofo, kritikisto, poeto. Esperantistiĝis en 1887. Fondinto de LEA. La unua E-korespondanto de L. Zamenhof. Aŭtoro de la unua porlitova E-lernolibro, membro de Lingva Komitato de Esperanto. Redaktoro de „Litova Stelo“ (1922-1926). La prezidanto de LEA 20-08-1919 – 30-06-1934.

Balys Giedra (1897-1953, pereis en Krasnojarska Provinco), ĵurnalisto, vortaristo. Esperantistiĝis en ĉ. 1923. Dumviva membro de LEA. Revivigis litovan E-movadon el kelkjata stagnado. Fakta redaktoro (ne V. Butkus) de „Litova Stelo“ (1935-1937). La prezidanto ekde 30-06-1934 (ĝis la 28-04-1935).

Emilija Janickienė (1879-1941). Profesorino pri pianludo (muzikon studis en Kijevo kaj Peterburgo), koncertis kiel pianistino. Esperantistiĝis en 1909. Post la morto de P. Medem transprenis liajn taskojn pri disvastigo

de E-literaturo, propogandis Esperanton inter intelektularo, gvidis lerneajn E-kursojn. Estis iniciatema membro de LEA, en 1926-1927 ŝi estis vicprezidentino de LEA.

Adolfas Klimas (1889.06.16– 09.10.1985). Ĵurnalisto, pedagogo, publicisto, socia aganto. Esperantistiĝis en 1912. Korespondis kun L. Zamenhof. En 1921 aperigis porlitovan lernolibron de Esperanto (reeldonita en 1928). Partoprenis UK en Prago (1921). La 31.01.1922 kunfondis Litovan Ĵurnalistan Asocion. Postmilite elmigris al Usono (mortis en Klivlend).

Petras Lapienė (1904.10.18-1943). Pedagogo, literaturisto. La redaktoro de *Litova Stelo* (1937-1940). Prezidanto de LEA ekde 29-06.1936 (ĝis 11.04.1937). Kompilinto kaj ĉeftradukinto de du antologioj *Litova almanako* kaj *El litova poezio*.

Juozas Lazauskas (1904- post 1960), arbaristo. Esperantistiĝis en 1921. Aŭtoro de E-lernolibro. Dumviva membro de LEA. La prezidanto ekde 28.04.1935 (ĝis 29.06.1936). Por lia memoro en 2013 en la Universitata



Balys Giedra

botanika ĝardeno (Kairėnai) estas starigita memorbenko (nr. 58)

Juozas Mačernis (1891.01.09–1976.09.09).
Pedagogo, ĵurnalisto. Esperantistiĝis antaŭ la jaroj 1917–1918. Propogandis Esperanton en diversaj urboj de Litovio. Ĉefaŭtoro kaj redaktoro de *Litova Almanako* (1923). En 1927 finis Teologian-Filozofan Fakultaton de Kaŭna Universitato. Katolika aganto. En 1944 fuĝis okcidenten, en 1949 elmigris al Argentino.

Paŭlo v. Medem (08.12.1862– 01.01.1925).
Artileria vickolonelo, direktoro de Litova Komerca Banko, unu el gravaj akciuoj de la bombona fabriko „Tilka“ (fondita en 1921), konata kaŭna melomano, E-tradukisto, E-kursgvidanto, subtenanto en E-eldonado. Esperantistiĝis en 1909. Prezidanto de Kaŭna E-Societo ekde 1912, membro de E-Akademio. En litovlingvaj amaskomunikiloj li figuras kiel Povilas Medemas.

Apolinaras Opulskis (23.07.1884– 14.06.1948). Pedagogo en Kaŭno, Mažeikiai, Tauragė, Plungė. Esperantistiĝis en 1915. Faris multajn prelegojn pri Esperanto, gvidis multajn E-kursojn. Estis estrarano de LEA.

Antanas Poška-Paškevičius (1903–1992).
Vojaĝanto (okjara migrado tra Eŭropo kaj Azio 1929–1937), antropologo. Esperantistiĝis memstare en 1913. Dum 1926–1929 gvidis E-elsendojn de Kaŭna Radio (estis tiuj 65), poste ankaŭ en 1938). La prezidanto de LEA ekde 11.04.1937 (ĝis junio 1940).

Antanas Prapuolenis (1897.04.01– 1962.06.30). Pedagogo, ĝardenisto, direktoro de elementa lernejo. Esperantistiĝis en 1919. Dumviva membro de LEA. Fondis E-societon en Marikampolė, estis ĝia prezidanto 1922–1923, estrarano de LEA. Propogandis Esperanton per, artikoloj, kunlaboris en *Litova Stelo*.

Stasys Tijūnaitis (08.05.1888–22.07.1966).
Instruisto, ĵurnalisto, gazetredaktoro.



Antanas Prapuolenis

Esperantistiĝis en 1909. Estrarano de LEA. Aŭtoro de kelkaj lernejoj lernolibroj, deputito de la Fonda Sejmo de LR, 1920, deputito de la Unua kaj la Dua Litovaj Sejmoj. Abstinulo. En 1923–1933 li redaktis tre popularan porinfanan revueton *Žvaigždutė* (Steletoj), kiu enhavis E-anguleton.

Malgraŭ tio, ke la dudek-jara agado de litovaj esperantistoj kaj de LEA estis ĉesigitaj de la soveta invado kaj de la 2-a Mondmilito, iliaj faroj ne malaperis tute senspuro, sed post ruiniĝo de Soveta imperio (Sovet-Unio) servis por feniksa revivigo de ili ambaŭ.

Rimarko: la ĉefaj fontoj pri la du unuaj jardekoj de LEA estas la faktografio 6-volumeta eldonaĵo de Esperanto-kronikisto Antanas Mekys *Esperanto en Litovio*, lia artikolo „Litova Esperanto-Asocio 80-jara“ en la revuo *Litova Stelo* (N-ro 6, la jaro 1999), la porsocia politika litovlingva taggazeto *Lietuva* kaj apartaj numeroj de la antaŭmilita *Litova Stelo*. Estis uzitaj ankaŭ interretaj skanaĵoj de la revuo *Esperanto* kaj la gazeto *Esperanto Triumfonta*.

Vytautas Šilas
Vilno, aprilo 2019

Esperantisto Aleksandras Dambrauskas

Etstatura homo, kiu iĝis intelekta grandulo kaj estis erudiciulo, kies vivo ampleksis vastan skalon de okupoj: teologo apologisto, filozofo kaj poeto, historiisto kaj matematikisto, publicisto kaj redaktoro, literatura kritikisto, poligloto kaj terminologo, esperantisto-pioniro. Kiu povis esti tiom multflanka? Estis prelato Aleksandras Dambrauskas – Jakŝtas. Mi notu, ke en litovlingvaj publikaĵoj li ĉiam sin prezentis Aleksandras Dambrauskas (oficiale) aŭ Adomas Jakŝtas (la publicista pseŭdonomo), sed en E-medio nur Aleksandro Dombrovski (kun unuobla „v“). Mi sekvas litovajn E-veteranojn, kiuj en E-gazetaro nomis lin litovmaniere: Aleksandras Dambrauskas.

La naskoloko de A. Dambrauskas estas la centra regiono de nuna Litovio (la vilaĝo Kuronys, paroĥejo Pagiriai, distrikto Ukmergė). Li naskiĝis la 8-an de septembro 1860 en kampula familio. La gepatroj Andrius kaj Kotrina (Vaičiūnaitė) parolis nur litove.



Ankaŭ en la vilaĝo sonis nur la litova. Dum la diservaj tagomatenoj la tuta familio sidis ĉirkaŭtable, litove preĝis kaj preĝkantis. Estis do metita la fundamento kaj por litoveco kaj por katolikeco de Aleksandras.

Фамилия отчества и имени.	№.	Щесть родинских.		Числа		Когда, где, кто и как, одним ли водою, или со всеми обрядами таинства окрещен?	Каких родителей, когда и где, т. е. в каком приходе родился крещеный?	Кто был по имени и званию испреосвящен при Св. Крещении и его присутствовал?
		Мужского пола.	Женского пола.	Рождения.	Крещения.			
Дамбраускас	86.	27	—	18	20.	В Паланке в семье священника и его супруги в приходской церкви св. Космы и Дамиана в 1860 году в возрасте 18 дней таинство крещения совершил священник Петр Александрович.	Крестный отец Александр Дамбраускас, крестная мать Мария Дамбраускас.	Восприимцами были священник Александр Дамбраускас и его супруга.
Дамбраускас	87.	22	—	28	26.	В Паланке в семье священника и его супруги в приходской церкви св. Космы и Дамиана в 1860 году в возрасте 18 дней таинство крещения совершил священник Петр Александрович.	Крестный отец Александр Дамбраускас, крестная мать Мария Дамбраускас.	Восприимцами были священник Александр Дамбраускас и его супруга.
Дамбраускас	88.	23	—	19	26.	В Паланке в семье священника и его супруги в приходской церкви св. Космы и Дамиана в 1860 году в возрасте 18 дней таинство крещения совершил священник Петр Александрович.	Крестный отец Александр Дамбраускас, крестная мать Мария Дамбраускас.	Восприимцами были священник Александр Дамбраускас и его супруга.

Arkiva naskiĝregistro de A. Dambrauskas, F. 669, ap. 1, s.v. 1320, p. 255

Kiam Aleksandras estis dekjara, mortis la patrino. La patro edziĝis denove kaj la fileton sendis al la gepatra vilaĝo de la patrino. La avino kaj la onklorino komencis instrui la boinfanon – li ricevis pollingvan preĝlibreton (litovlingvaj libroj estis ja severe malpermesitaj de la cara administraro, la mesoj estis nur pollingvaj). Tiel Aleksandras konatiĝis kun la pola lingvo. Unu lia onklo instruis al li la rusan. Alia lia onklo (parohestro) lokis lin en elementan lernejon. Tie oni instruis nur ruse (litova interparolado en la lernejo estas malpermesita!). Post la duonjara lernado la knabo dum du monatoj estis trejnita de repetitoro por eniri gimnazion en la urbo Ŝiauliai. La instruado, kompreneble, estis en la rusa lingvo. Aleksandras estis tre kapabla kaj diligenta lernanto. Li tre multe legis. Liaj ŝatataj lernoobjektoj estis matematiko, poezio, lingvoj greka kaj franca, ankaŭ historio.




Sankt-Peterburga Universitato en 1900.

Preskaŭ 20-jara Aleksandro venis al Peterburgo por studi en fizik-matematika fakultato de Sankt-Peterburga Universitato. Tiam ŝajnis al li, ke matematikaj veroj posedas diecajn trajtojn ĉar: „ĉie ili – en Parizo, sur la Luno kaj sur la Marso restas eternaj kaj senŝanĝaj. Tiaj ili estis dekomence, tiaj ili restos por ĉiam“. Tiam A. Dambrauskas provis la religiajn verojn pruvi matematike kaj

devis seniluziigi pri tio. Li konkludis, ke inter religio kaj matematiko ekzistas analogeco: iliaj veroj estas eternaj. La matematikaj veroj estas racie pruveblaj, tamen la religiajn verojn oni devas kredi.

Dum la studado en la universitato A. Dambrauskas havis eblecon aŭskulti prelegojn de ortodoksa teologio kaj filozofio. Kun granda intereso li aŭskultis prelegojn de la rusa religia filozofo Vladimir Solovjov.



Filozofo V. Solovjov, 1890

Pli poste A. Dambrauskas memstare studis liajn verkojn, kiuj traktis la ĉefajn demandojn de religio kaj kristana vivo, malkovris homan diecon kaj Dian homecon, invitis ami ĉiujn popolojn samkiel la sian. La verkoj de V. Solovjov faris grandan influon al formiĝo de katolikaj konvinkoj de A. Dambrauskas. Indas rimarkigi, ke la sama filozofo V. Solovjov influis ankaŭ homamon de Lazaro Zamenhof. Memstare studinte teologion A. Dambrauskas konstatis, ke al li mankas profundaj teologiaj

konuoj. Tio instigis lin, la matematikan studenton, elekti por si la pastran destinon.


A. Dambrauskas reprenis siajn dokumentojn el la universitato, revenis Litovion kaj aŭtune de 1881 eniris la Pastran Seminarion en Kaŭno (lit. Kaunas). Post tri jaroj (en 1884), pro siaj eksterordinaraj kapabloj li estis sendita kun episkopa stipendio daŭrigi la studadon en Peterburgan Katolikan Eklezian Akademion. Fininte la III-an akademian kurson (en 1887) li estis ordinita diakono, kaj finstudinte en la IV-a kurso li estis ordinita pastro kaj akiris la rangon de teologia magistro (29.06.1888).



**Sankt-Peterburga
Katolika Eklezia Akademio**

Jam en 1884 la kleriko A. Dambrauskas debutis kiel litova poeto. Estis la revuo *Auŝra* (Aŭroro), eldonata en urbo Tilžė (tiam Prusa Reĝlando, germane *Tilsit*, nun ruse *Sovetsk*) kaj nelegale transportata al litovoj loĝantaj en Rusa Imperio. Tie li aperigis la versaĵon *Giesmė prasčiokėlio, nemokančio rašyti* (La kanto de plebaneto, ne scipovanta verki: Al neni mi envias riĉaĵon kaj famon, sed mi bedaŭras pri nescipovo skribi por priskribi potencon de Dio kaj belecon de Litovio). Siajn litovlingvajn verkojn A. Dambrauskas publikigis pseŭdonome: Adomas Jakŝtas.

Kiel kaj kiam A. Dambrauskas fariĝis esperantisto? Li estis ĵus studinta en la lasta kurso de la Eklezia Akademio, kiam la 7-an



La kleriko A. Dambrauskas

de aŭgusto 1887 aperis la unua gazeta artikolo pri Esperanto. Temas pri informativa kaj objektiva publikaĵo *Anti-Volapük* en varsovia gazeto *Kurjer codzienny*.

Baldaŭ al ĝi reeĥis, eble finaŭguste, *Gazeta Warszawska*. Tiu la internacian Lingvon de d-ro Esperanto traktis moke kaj asertis, ke: „la ŝtelistoj en tuta mondo povos ekuzi ĉi tiun novan rimedon de interkompreniĝo por siaj internaciaj celoj“.

La kleriko A. Dambrauskas al tiu absurdaĵo reagis tute sprite: „Ĉi tiu malbonintenca primoko influis al mi tute alie ol esperis la fiĵurnalisto, ĉar mi la saman tagon mendis el Varsovio la eldonon de Zamenhofa broŝuro“.

Post dutaga studado de la ricevita *“Unua Libro”* A. Dambrauskas iĝis esperantisto kaj skribis al Lazaro Zamenhof poŝtkarton en tute korekta (!) Esperanto. Estis do la unua korespondaĵo en Esperanto, kiun ricevis L. Zamenhof!

KURJER CODZIENNY

CENA KURJERA:
W Warszawie:
 Miesięcznie rs. — kop. 50
 Kwartalnie „ 1 „ 50
 Półrocznie „ 2 „ —
 Rocznie „ 3 „ —
 Za dostawę do domu dopłaca się kop. 5 miesięcznie.
W Prowincji i w Cesarstwie:
 Miesięcznie rs. — kop. 75
 Kwartalnie rs. 2 kop. 25
 Półrocznie „ 4 „ 50
 Rocznie „ 6 „ —
 Za graniacą dopłaca się k. 20.
 Za zmiana: Miesięc. rs. 1 kop. 25.
 Cena numeru kop. 5, dodatki po-
 tężnego kop. 3.

Wychodzi w dni powszednie wieczorem, w niedziele i święta rano, a nadto w dni powszednie, z wyjątkiem poświęconych, wychodzą dodatki poranne.

ROK D WUDZIĘSTY TRZECIOL

Redakcja i Administracja róg Krakowsk-Przedm. i Trębackiej (stara poczta)

Adres telegraficzny: „CODZIENNY“ — Telefons Nr 31. — Reklamsa bez zastrzeżenia nie zwracają się.

Ogłoszenia przyjmują Administracja oraz Biuro Reklam i Frencler, Senatorska Nr 26. — W Paryżu dom hand. p. f. C. Adam, rue des Saint-Pères 61 i Société Mutuelle de Publicité, rue Cassini 61.

Druk w: KAJETAŃ WYŻ. i DONATA B. Jutrzo: Fw. Cyrjanka i Łazna Niezaw.	Wschód słońca g. 4 m 30 Zachód słońca g. 7 m 30	Wschód księżycy g. 9 m 19 w Zachód księżycy g. 8 m 08 r.	Druk: Olszta Fw. Jutrzo: Niezaw.
--	--	---	-------------------------------------

CENA OGŁOSZEN.
 Nadpisane za każdy wiersz gar-
 nement lub jego miejsce kop. 75.
 Reklamy za każdy wiersz gar-
 nement lub jego miejsce kop. 20.

Ogłoszenia awyjązkie: za wiersz petizem lub jego miejsce 1 i pół kop., za każdy raz (przynaj-
 się tylko parzysta liczba słów).

Nakrośki: każdy wiersz po kop. 12.

Anti-Volapük.

Kilka lat temu, gdy pierwsze wieści dochodziły nas zaczęły o wymyślonym przez ks. Schleyera języku powszechnym, pisząc o tym pomysł w je-
 zycznym z piśm, powiadzieliliśmy, że nie ma on przy-
 szłości dla różnych przyczyn, a najgłówniej dla
 t.j. że jak tylko nabierze trochę rozgłosu, zarzą-
 zająca się pojawią nowe, lepsze języki po-
 wszeczne, tak, że w końcu powstanie nowa vola-
 pükistowska wieś Babel.

Parę lat ubiegło i oto już mamy nowy język
 powszechny.
 Co większe, język ten przyszedł na świat w
 Warszawie, a autor jego tak ma o sobie rości z
 tytuła wyniesienia go pretensji do sławy, że ukrył
 swoje nazwisko pod pseudonimem dra Esperanto.

Niedużo na tem... Język ten ma już swoją li-
 teraturę.
 Dr Esperanto przełożył nam „Oczę-
 rano“, pierwszy rozdział Genyzy, napisał origi-
 nalnie list brońcy tego języka i skrośił w nim
 kilka poezji, z których jedna tłumaczoną jest z
 Heinego.

Jeżeli się okaże, iż dziesięć milionów osób da pu-
 blicznie takie samo przyzreczenie.

Kartkę taką, zaopatrzoną nazwiskiem, adresem
 własnym i pieczęcią swoją lub cudzą, na dowód
 własności podpisu, przelać należy autorowi,
 adresując: „Al sinjoro, D-ro L. Zamenhof, por-
 to Esperanto en Varsovio,“ a gdy się zbierze
 10 milionów takich kartek, autor anti-volapüku
 wezwie wszystkich, żeby rozpoczęli naukę.

W tydzień później ludzkość będzie mówiła ję-
 zykami międzynarodowym.
 Dr Esperanto nie sądzi jednak, żeby dlatego za-
 rzuciła swoje narodowe języki, owszem pozytyw-
 niejszej ogranicza rolę.

Przybywają do kraju, którego język jest mi ob-
 cy i chcę się z kim rozmówić; biorę więc kartkę
 i piszę na niej naprzykład:

Me ne scias kie mi iras, io la lasteno, on; ni vi gi, ni ne

Następnie podaje tę kartkę cudzoziemcom, wraz
 ze słownikiem języka międzynarodowego, opro-
 szony dla tego narodu, do którego on należy.
 Sukajęto w słowniku wyrazów i ich cząstek

— Dowiadujemy się że w Itonie komisja wydele-
 gwanej do zrewidowania czynności kolei nadwiel-
 skiej, podniosła projekt zmiany godzin biuro-
 wych w niektórych wydziałach zarządu, a mianow-
 wiec zamiast od 9-ej rano do 4-ej po południu,
 godziny urzędowe będą trwały od 9-ej do 2-ej po
 południu i od 4-ej do 6-ej wieczorem. Zmiana ta
 ma być wprowadzoną w wydziale ruchu i kon-
 trolli.

— Budowa boznicz kolei dąbrowskiej od stacji
 Strzemieszyce do granic pruskiej i austriackiej,
 zwięzłą będzie w tych dniach przez specjalną
 komisję złożoną z członków inspekcji rządowej
 dróg żelaznych w Królestwie Polskiem. Boznicze
 przeł adużać ma również p. minister komunikacji
 przeł adużać się do Nowo-Aleksandri, a co ma
 nastąpić w przyszłym tygodniu.

— W osadzie rolniczo-rolniczej w Studzińcu
 nakryje obecnie 25 walców miedzi. W obec tego,
 byłoby rzecz pożądana, aby władze sądowe posta-
 rwały się, żeby miejsca te zajęte zostały w jak naj-
 krótszym czasie, czyli, aby tym sposobem 25 nie-
 letnich ochromców od zarazy życia więziennego i
 romieszczenia ich w warsztatach, w których mogą
 romieszczać się utrzymać członków społeczeń-

La unua gazeta publikajo pri Esperanto aperis en Varsovia gazeto

Tuj post studfino de la Eklezia Akademio, en 1888, la magistro A. Dambrauskas ĝis enoficigita kapelano de Reala Gimnazio en la litova urbo Panevėžys. Tiutempe, dum la festotagoj de caraj familianoj, la gimnazianoj devis trude partopreni la solenan meson en ortodoksa kirko. Tamen la juna kapelano, kiu strebis protekti litovajn gelernantojn kontraŭ rusigo, venigis la katolikajn gimnazianojn al katolika preĝejo por preĝi carhonore tie... Pro tia impertinenta peko (!) la pastro A. Dambrauskas estis eksoficigita kaj junio 1889, akompane eĉ de du ĝendarmoj (!), ekzilita al Novgoroda gubernio. Ties guberniestro direktis lin por loĝi en la urbeton Ustujna.

Ekloĝinte en Ustujna la pastro Dambrauskas ne havis eblon plenumi la pastran mision. Li komencis foreste kunlabori en malpermesata litova gazetaro, eldonata en Litovio Minora (Orientprusia nordo,


nun Kaliningrada regiono de Ruslando) kaj samtempe serioze okupiĝis pri Esperanto. Lian nomon ni trovas ankaŭ en la adresaro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon “ESPERANTO”, Serio I. № 1 ĝis 1000”,



Estinta Reala, nun Balčikonis-noma gimnazio en Panevėžys

eldonita en 1889: Dombrowski, Aleksandr, katolika pastro, Ustjujna, gub. Novgorod. R.”.

La ligoj de A. Dambrauskas kun eldonantoj de nelegalaj litovlingvaj eldonaĵoj en Tilžė servis ankaŭ por Esperanto. En Ustjujna A. Dambrauskas preparis lernolibron de Esperanto por litovoj *Mokintuve Terptautiszkos Kalbos*. Ĝi aperis en 1890, en la urbo Tilžė, presejo de Julius Schoenke.



E-lernolibro de A. Dambrauskas, 1890

En 1893 A. Dambrauskas la nelegalan lernolibron sendis al sia konato, la pastro Antanas Baranauskas (poste episkopo en Seinai-Seiny), la aŭtoro de elstara naturtema poemo *La arbaro de Anykščiai* (la tradukon en Esperanton plenumis Patras Čeliauskas.

Tiu al sia juna samfrato reeĥis tiel: „Mi perceptas la simplecon de tiu ĉi lingvo kaj facilecon por ties ellernado, precipe de homoj,

kiuj ricevis mezgradan instruitecon“.

Loĝante en Ustjujna A. Dambrauskas komencis versi en Esperanto. Novembre de 1893 li verkis versaĵon, aktualan ĝis nun: *“Estu! Estu!”*. Samjare ĝi eniris la preĝareton *Preĝareto por katolikoj* de Louis de Beaufront, eldonita en Francio.

Ekde tiam la teksto estas konata kiel poemo „Laŭdadu Dion“:

*Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj,
Ĉiuj popoloj laŭdu la Sinjoron!
Levu jam supren feran sian koron,
Kaj ekrekonu, ke vi fratoj veraj.*

*Unu vi havas civilizacion,
Teron, aeron havas ja komunan,
Super la kapoj unu globon sunan,
En la ĉielo – unu Patron – Dion.*

[...]

*Sed nune, kion faras, vi popoloj,
Vi Kristamemaj, tiel instruitaj?!
Anstataŭ paco – inter vi militoj,
Anstataŭ amo – belaj nur paroloj!*



**La preĝkanto „Laŭdadu Dion“
de A. Dambrauskas unue sonis
en Smolenska Katolika Kirko**

Pli ol antaŭ 120 jaroj, la 26-an de oktobro 1896, en la rusa urbo Smolensk okazis inaŭguro de ĵuskonstruita novgotika kirko de St. Senpeke Koncepiĝinta Virgulino Maria. Smolenskaj esperantistoj uzis la okazon por elmontri siajn religiajn sentojn. Preninte el la Preĝareto la poemon „Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj“, ili verkigis muzikon por ĝi kaj en la dirita solena tago dum la Meso kantis ĝin ĥore! Tio faris la feston pli solena. Pri la historia evento A. Dambrauskas eksciis *post factum*, jam loĝante en Kaŭno.

En Ustjuĝna A. Dambrauskas pasigis eĉ 5 jarojn.... Post la reveno al Litovio en majo 1984 la pastro longe ne rajtis okupi konstantajn oficialajn oficojn. Komence li estis kapelano de kaŭna malliberejo, poste li oficis en malgranda malnova preĝejo de St. Gertruda, laste – sekretariis ĉe episkopo M. Paliulonis. Nur en 1898 li estis ordinita profesoro de Kaŭna Pastra Seminario. Fine de 1901 li verkis la por-Esperantan versaĵon *Kanto* kaj sendis ĝin al L. Zamenhof por trarigardo. La 15-an de januaro 1902 venis la aproba respondo: „Via kanteto estas verkita tute bone kaj senerare, kaj mi trovas en ĝi nenion por korekti“.

*Ho eksonu nova Kanto,
Pri la lingvo Esperanto!
Pri ligil` internacia,
Revo nia, amo nia!*

*Dum venonta la centjaro,
Kredu, esperantistaro...
Ĝin parolos ĉiu homo,
Predikisto, profesoro,
Komercento kaj doktoro,
Kaj hebreo kaj kristano,
Kaj litovo kaj japano.*

*Por ke venu tiu horo -
Kune, fratoj, al laboro!
Jen per kanto, jen per vorto,
Jen agante ĝis la morto.*

*Iru kiel apostoloj
Ĝin anonci por popoloj,
Kaj eksonu nia voko,
Sur la ter` en ĉiu loko!*

En la jaro 1902 la rusa potenco iĝis iom pli indulgema al la pastro prof. A. Dambrauskas kaj konsentis pri lia eklaboro en la Peterburga Eklezia Akademio. En la Akademio A. Dambrauskas prelegis la Bibliion (la Testamentojn). Krome, li ekinstruis religion en du porvirinaj Sankt-Peterburgaj institutoj (en la Ksenia kaj la prestiĝa Elizabeta institutoj, ekde novembro 1902). Pro sia kleriga agado prof. A. Dambrauskas estis honorigita per ordeno de Sankta Anna (marte 1906). La Peterburga vivoperiodo de A. Dambrauskas manifestiĝis ankaŭ per lia aktiveco por Esperanto. Li membriĝis al la peterburga societo Espero. Fondita en 1891, la societo estis la unua oficiala Esperanto-organizaĵo en Ruslando (registrita de Ministerio pri Internaj Aferoj en la jaro 1892). Por la oficiala 10-jara societa jubileo A. Dambrauskas dediĉis la poemon *Nova Kanto* (Kanto). Por ĝi la muzikon verkis elstara komponisto de litova religia muziko, orgenisto de Kaŭna katedralo Juozas Naujalis.



La komponisto J. Naujalis

Litovoj memoras: estis li la komponisto de la tre populara preĝkanto *Pulkim ant keliu* (Surgenuiĝu). Tiun kanton bonege esperantigis eminenta litova esperantisto Petras Čeliaskas.

En la jaro 1903 la profesoro de la Eklezia Akademio A. Dambrauskas verkis en Esperanto la versan gratulon por novelektita Papo Pio X: *Al Lia plej sankta Moŝto*. La dediĉa gratulo aperis frontpaĝe de la unua numero de la revuo *Espero Katolika* (1903).

*Tial laboru sen tim' kristanaro,
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio,
Unu paŝanto kaj unu ŝafaro ...
Gvidu ĝin Pio!*

La saman jaron, en 1903, aperis la *Fundamenta Krestomatio* de L. Zamenhof (Parizo, 1903). Ĝin eniris la originala poemo *Nova Kanto* de prof. A. Dambrauskas kaj du unuaj esperantigitaj litovaj popolkantoj (en lia traduko). Estis *Mia Mizero* (Varge mano) kaj *La Malliberulo* (*Kalinyš, saulė leidžias man kalėjime tamsu*).

La jaron 1904 A. Dambrauskas komencis en bona humoro kaj verkis romantikan versaĵon *Dio*:

*La tuta mondo kun belaĵoj siaj:
Bruo arbara, dolĉaj birdaj kantoj,
Verdaj herbetoj, ludoj papiliaj,
Nuboj migruloj, tra ĉiel' flugantaj;
Kaj la taga lumo kaj la noktmistero,
Freŝa herbejo plena je odoro –
Ĉio murmuris al ni sur la tero:
Homo: memoru, estas Di' Sinjoro!*

La jaro 1905 estis eventoriĉa jaro. Aŭgure, la rusa regopotenco permesis enlandan eldonadon en la lingvoj litova kaj ukraina (tiu lingvo, eĉ pli frue ol la litova, spertis la rusan lingvocidon!). En januaro okazis la 1-a Revolucio, kiu skuis la rusan monarkan

reĝimon. Malsukcese por Rusia Imperio daŭris la rusa-japana milito (ĉesis finaŭguste). Estis la jaro ankaŭ de ekvigliganta internacia E-agado kaj la jaro de la okazonta la unua Esperanto-Kongreso. En marto 1905 A. Dambrauskas verkis kelkajn movadajn versaĵojn. En la versaĵo *Solvita demando* li konstatis:

*Dank' al Dio sonas mia kanto,
Dank' al voĉo mi ne estas muta,
Sed dank' al la bela Esperanto
Mi parolas kun la mondo tuta.*

Maje 1905, do antaŭ la unua Esperanto-kongreso, A. Dambrauskas verkis *Himnon*, „dediĉitan al la internacia esperantista kongresanaro en Boulogne-sur-Mer“:

*El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj,
Ni kunvenintaj Vin adoras Di'!
Al vi sin turnas niaj piaj sentoj,
Kaj nia kanto sonas nur al Vi!*

*Laŭ Via diro: ekposedu Teron!
Ni ĝin okupis kaj posedas nun;
Transnaĝas marojn, sondas atmosferon,
Kaj ĉie loĝas, kie brilas sun'.*

*Ho, venu tiu hor' de unueco!
Rompon, dividon amas nur satan' ...
Patro, ni preĝas Vin pri la frateco,
Nian laboron benu Via man'! ...*

Aŭguste 1905 en la nordfranca urbo Boulogne-sur-Mer (Bulonjo) okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto.

Dimanĉe la 6-an de aŭgusto, en la urba preĝejo de Sankta Nikolao, okazis la unua internacia katolika diservo en Esperanto. Al ĝi estis invititaj ĉiuj kongresanoj, sendepende de iliaj kredkonfesoj. Ankaŭ L. Zamenhof ĝin ĉeestis. Dum la solena diservo oni kantis diversajn komponaĵojn en Esperanto.

Ankaŭ la belan himnon pokaze verkitan de la pastro Dombrovski el Peterburgo *El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj Ni kunvenintaj Vin adoras, Di'*. La muzikon komponis s-ino Josée Guivy el Tours (la Himno estis publikigita de Presa Esperantista Societo en Parizo en 1907).



La preĝejo de Sankta Nikolao en Bulonjo

En la kongreso estis elektita Provizora Kongresa Komitato, „en kies anaron eniris prof. Dombrovski (ST.-Peterburgo)“ kaj formita (08.08.1905) la ĉefa internacia esperanta institucio Lingva Komitato (por kontroli lingvan evoluon). La komitato konsistis el 98 komitatanoj. Inter ili unu el Litovio (!) – Dambrauskas. Inter esperantistoj troviĝis ankaŭ tiuj, kiuj opiniis, ke la ĉefa kaŭzo de nesufiĉa disvastiĝo de Esperanto estas lingvaj mankoj, kaj proponadis diversajn ŝanĝojn en la lingvo. A. Dambrauskas defendis la pozicion de lingva stabileco.

Prof. de Peterburga Eklezia Akademio A. Dambrauskas estis aktiva membro en la Sankt-Peterburga societo Espero. Reveninta post la Bulonja kongreso li estis elektita prezidanto de la societo. Ni do kelkvorte tuŝu la ligan de A. Dambrauskas kun la organo de la societo *Ruslanda Esperantisto*. La 11-an de januaro 1904 la profesoro A. Dambrauskas gvidis ĝeneralan membrkunvenon de la societo, dum kiu estis decidite pledi antaŭ

certaj rego-instancoj pri permeso eldonadi periodaĵon en la lingvo Esperanto, kiu estu oficiala organo de la societo. La peno sukcesis kaj finrezulte en 1905 komencis aperadi la revuo *Ruslanda Esperantisto*.“ Ni scias ankaŭ pri letero de la prezidanto A. Dambrauskas al la Ĉefa Cenzura Administracio (GlavLit) pri pli ofta eldonado de la revuo *Ruslanda Esperantisto*, en kiu estas la vortoj: „Mi havas la honoron peti je la nomo de la societo Espero pri ĉiusemajna eldono de la revuo *Ruslanda Esperantisto*.

La peto estis kontentigita. La revuo, tamen, pro financaj kaŭzoj, restis monata.



La revuo Ruslanda Esperantisto

En la revuo *Ruslanda Esperantisto* Nr. 1 1906 L. Zamenhof kaŝnome publikigis longan artikolon Dogmoj de hilelismo, en kiu li prezentis sian religiecan filozofian doktrinion (instruon) nomitan Homaranismo. Li klarigis, ke homaranismo celas al pura

homeco: „instigante komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco“. La aŭtoro de Homaranismo L. Zamenhof estis konvinkita, ke ĉefaj kaŭzoj de ĉia malpaco inter la popoloj estas la etnaj, lingvaj kaj religiaj diferencoj, kaj por solvi la malpacon li proponis ideologion de hilela homaranismo. Krei la instruon Homaranismo al L. Zamenhof inspiris ne nur la verkoj de la hebrea fariseo kaj rabeno Hilel (samtempulo de Jezuo), sed ankaŭ studoj de la rusa religia filozofo V. Solovjov (alte taksata de A. Dambrauskas mem).

Al prof. A. Dambrauskas, la ekleziulo, tamen ekŝajnis, ke L. Zamenhof celas krei novan religion, kaj li aperigis malkontentan artikolon pri homaranismo „Kelkaj demandoj pri hilelismo“ en la N-ro 3 de *Ruslanda Esperantisto*. Li rimarkis, ke:

„Pozitiva valoro de hilelismo konsistas en tio, ke ĝi igas ĉiun homon pensantan difini siajn rilatojn: *al si mem, al Dio, kaj al siaj proksimuloj*.“ [...] „Sed la hilelismo, volante esti sistemo supernacia kaj superreligia, fariĝas bedaŭrinde kontraŭnacia kaj kontraŭreligia. [...] La iniciatoroj de hilelismo opinias, ke la kaŭzoj precipaj de nuntempa societa malbono en la tuta mondo estas la diverseco de lingvoj kaj religioj. Granda eraro. La multlingveco kaj divers-religieco estas ne kaŭzoj, sed nur pretekstoj de militoj kaj persekutadoj.“

L. Zamenhof espikis siajn dogmojn en la kvara numero de *Ruslanda Esperantisto* per la respondo *Pri la homaranismo. Respondo al P-ro Dombrovski, subskribinte ĝin kaŝnome Homarano*. Estus interese ĉi tiun dialogon iam pritrakti el la teologia vidpunkto.

En 1906 A. Dambrauskas forlasis la profesoran kaj prezidantan postenojn (en la Eklezia Akademio kaj en la societo Espero) kaj revenis Litovion. La revenon kaŭzis la deziro okupiĝi serioze pri demandoj de

renaskiĝanta litova nacia kulturo. Estis la jaroj, kiam la rusa reĝimo fine legaligis la litovan lingvon. A. Dambrauskas fondis kaj ĝismorte gvidis la porkristanan St. Kazimiran libroeldonan societeton (St-Kazimira Societo), Li estis unu el la fondintoj kaj postaj agantoj de la Asocio de Kristanoj Demokratoj (1905). En 1907 en Kaŭno li aperigis kaj redaktis la revuon *Draugija* (Kamaradeco). Estis la unua litovlingva revuo, celanta diskonigi sciencan, literaturon kaj politikon inter la litova popolo. Notinde – A. Dambrauskas estas verkinto de du litovaj lernejaj lernolibroj, tiu de geometrio (en 1918) kaj de trigonometrio (en 1920).

Post la reveno el Sankt-Perburgo al Litovio A. Dambrauskas ĝis la morto (en 1938) loĝis en la urbo Kaŭno, en la sama loĝejo Rotušės a. (urbodoma placo) n-ro 6 (nun n-ro 23), krom la unua militjaro. Septembre 1914 en la garnizona Kaŭno estis enkondukita milita stato kaj laŭ la ordono de urbestro N. Grjazev prelato A. Dambrauskas, kiel persono danĝera por la rusa reĝimo, estis devige translokigita al la urbo Vilno. Tie li restis ĝis oktobro 1915 (1915.X.10), kiam germanoj okupis tiun ĉi urbon. Loĝante en Kaŭno pastro A. Dambrauskas daŭre okupiĝis pri Esperanto. Kune kun estro de gubernia fisko Aleksandr Nedovišin li en 1909 fondis Kovnan E-societon (KES, enregistrita la 18-an de dec. 1909). La prezidanto iĝis A. Nedovišin, A. Dambrauskas (tiam oficiale A. Dombrovski) – vicprezidanto.

Dum la la 5-a UK en Barcelono (septembre 1909) okazis kelkaj kunvenoj de katolikaj kongresanoj. A. Dambrauskas, ne povinta veni Barcelonon, sendis al ili, „la honorindaj kongresanoj“, elokventan leteron pri kreo de tutmonda katolika Esperanto-organizaĵo.

La „epokfara propono“ estis voĉlegita: „Estimataj geanoj en Esperanto kaj karaj gefratoj en Kristo, [...] Ĉu ĝi nomiĝos Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo, ĉu alie, tio ĉi estas ne grave [...] ĝi devas plej

bone respondi al la nuntempaj bezonoj de la katolikaro [...] Mi sentas ĝian senprokrastan bezonon, kaj estus vere feliĉa, se vi, estimataj kongresanoj, ĝin pripensus, preparolus kaj fondus“.

La propono de A. Dambrauskas estis akceptita unuanime! Oni ellaboris projekton de regularo de Katolika Unuiĝo Esperantista (KUE), publikigis ĝin en la revuo *Espero Katolika*, kaj decidis pri la unua Katolika Esperanto-Kongreso. En 1910 en Parizo okazis la 1-a Esperantista Katolika Kongreso. Tiam Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) fondiĝis definitive; A. Dambrauskas tie forestis.

Venis la jaro 1912. Somere okazis du gravaj E-kongresoj. La 11-18-an de aŭgusto en tiam Aŭstria Krakovo okazis la 8-a UK, kaj sammonate la 17-23-an en Budapeŝto (Hungario) la 3-a Esperantista Katolika Kongreso. A. Dambrauskas iris al Budapeŝto. Laŭvoje al la Katolika Kongreso li faris viziton al L. Zamenhof en lia Varsovia hejmo (Dzika str. Nr. 9). Verŝajne tuj antaŭ la Krakova UK.

Dum pli ol hora interparolo pri E-aferoj, L. Zamenhof diris kelkajn frazojn en la litova lingvo. Pri tio A. Dambrauskas skribis subtitole „Miaj rilatoj kun D-ro L. Zamenhof“ (litove, la libro *Užgesę žiburiai. Biografijų ir nekrologų rinkinys*, 1930), ve, sen la enhavo de la interparolo. La renkontiĝo konfirmis la supozon, ke L. Zamenhof iom scipovis la litovan lingvon.

La katolika kongreso okazis en Kolegio de Sankta Emeriko (Imre). A. Dambrauskas tie estis tre honorata, tamen detaloj pri lia partopreno, ho ve, forestas. Pri la kongreso raportis la oktobra numero de *Espero Katolika* (1912), sed tiun numeron mi interrete ne trovis. Septembre (1912) A. Dambrauskas komunikis al Kovna Esperanto-Societo pri paso de la 3-a Esperantista Katolika Kongreso en Hungario, verŝajne ankaŭ pri la interparolo

kun L. Zamenhof. Denove, indikoj pri tio mankas.



Partoprenantoj de la 3-a Esperantista Katolika Kongreso en Budapeŝto.
Sidas centre – prelato kaj politikisto Sandor Giesswein (prez. de Hungarlanda E-Asocio); dekstre de li – paroĥestro Jakobo Bianchini (membro de Lingva Komitato) kaj maldekstre – abato Austin Richardson (prezidanto de IKUE) kaj Claudius Colas (organizinto de la 1-a Katolika Kongreso). Inter ili staras prof. Aleksandras Dambrauskas.

A. Dambrauskas ĉiam klopodis pri plua kresko de litova esperantistaro. Li restis vicprezidanto de la restarigita en 1919 Kaŭna E-Societo (post kelkaj jaroj – ties honora prezidanto). Samjare li iĝis prezidanto de fondita Litova Esperantista Asocio (ekde julio 1934 – ties honora prezidanto).

La 10-an de oktobro 1920 en Kaunas estis fondita Litova Esperantista Katolika Societo (litova sekcio de IKUE). La fondintoj estis A. Dambrauskas mem kaj la aŭtoroj de E-lernolibroj Juozas Maĉernis (instruisto kaj teologo) kaj Stasys Tijūnaitis (ĵurnalisto kaj instruisto).

S. Tijūnaitis skribis, ke kiam li loĝis en la urbo Seinai (nun Sejny, Pollando), kaj tie laboris en litova libroeldonejo, A. Dambrauskas sendis al li leteron (14.02. 1910) kun la instigo senprokraste verki novan

lernolibron de Esperanto, ĉar lia *Mokintuve terptautizkos kalbos Dro Esperanto* jam malnoviĝis. La St. Kazimira societo en la urbo Seinai eldonis la lernolibron de S.

Tijūnaitis en 1912 kun la noto litovlingva: „Redaktis kaj antaŭparolon aldonis la pastro A. Dambrauskas, vicprezidanto de Kaŭna Esperantista Societo“. Cetere, verkante la lernolibron S. Tijūnaitis konsultiĝis ankaŭ kun L. Zamenhof mem!

La teologon A. Dambrauskas ĉiam interesis la problemo de konveneco de evoluo kaj eklezio. Pri tio li en Esperanto publikigis filozofian 215-paĝan artikolaron *Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj* (Kaŭno, 1908). La temoj baziĝis je eternaj demandoj pri Dio, la homo, religio, homaro kaj speciale pri la lingvo internacia.

Li analizis rilaton inter aŭtoreco Dia kaj aŭtoreco homa. Li asertis, ke ĉio kio ekzistas en universo, krom Dio mem, estas nedefinitiva kaj ŝanĝiĝema. Tial konstante ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj devigas la homaron ĉiam kreadi kaj eltrovadi. La Di-kreinto destinis homojn al aktiva kreado.

Distinginte la rolon de la scienco A. Dambrauskas konstatis: „Vera scienco ĉiam gvidas al solidareco, amo kaj konkordo kaj kun Dio kaj kun homoj.“ Januare 1910 li en Kovna E-societo legis la raporton Esperanto kiel scienca helpilo.

En postmilitaj jaroj prelato A. Dambrauskas pluagis pri disvolvo de religia kulturo en Litovio ĝenerale, por fortigo de katolika mondkoncepto kaj samtempe restis aktiva esperantisto.

En 1922 A. Dambrauskas estis kunfondinto de Litova Katolika Scienca Akademio, ekde 1926 li estis elektita ties Prezidanto (ĝis 1938) kaj estis la unua ĝia akademiano!

Pro liaj porsciencaj meritoj li estis ĉiel honorigita. En 1922 – kiel honora prezidanto de Litova Universitato, en 1926 – kiel honora profesoro de Teologia-Filozofa Fakultato, en

1929 – kiel honora doktoro en Fakultato de Matematiko kaj Naturscienco, en 1932 – kiel honora doktoro pri filozofio de la Universitato de Vitoldo la Granda.

En 1935 li, prezidanto de litova komisiono por Tutmonda Ekspozicio de Katolika Gazetaro, okazonta (en 1935) en Vatikano, estis prezentita tiel: „Prezidanto: Mons. Aleksandras Dambrauskas-Jakŝtas, honora profesoro de la Universitato de Vitoldo la Granda, doktoro honora de matematiko kaj beletro, veterano de nacia Renaskiĝo kaj katolika gazetaro“.

En 1937 en Varsovio okazis UK-29, kun 1120 aliĝintoj. La kongreso estis dediĉita al 50-jariĝo de Esperanto. Partoprenis iu (aŭ iuj) el Latvio, sed neniu el Litovio. Pro la banala kaŭzo: Pollando rifuzis doni al litovaj esperantistoj vizojn..., A. Dambrauskas, kiel elstara pioniro de E-movado, tamen estis tie distingita per la Ora Jubilea Stelo (ve, foreste!).

Ankaŭ la urbo Kaŭno honorigis la elstarulon A. Dambrauskas, du-foje: ekde 19.04.1919 la angula *stratoi Reĉnaja* (Rivera) ricevis lian literaturan nomon A. Jakŝto. 06.05.1998 surfasade de lia domo (la angula domo *A. Jakŝto g. / Rotušės a. n-ro 23*) estis pendigita memortabulo (skulptisto Vladas Žuklys). En 1928 li estis honorigita per la ŝtata ordeno de Ĉefduko Gediminas.

Prelato A. Dambrauskas kunlaboris en litova kaj eksterlanda gazetaro. En siaj verkoj li traktis temojn historiajn, ekonomikajn, jurajn, moralajn kaj etikajn kaj verkis beletrajn, teologiajn, filozofiajn kaj sciencajn artikolojn, entute en kvin lingvoj: la litova, pola, rusa, latina kaj Esperanto (li scipovis pli multajn lingvojn – ankaŭ la lingvojn francan, germanan, hebrean, helenan (grekan) kaj hispanan).

Se ni staplus ĉion, kion publikigis A. Dambrauskas, konsistiĝus pli ol 9000-paĝa tekstaro! Li posedis tre bonordan bibliotekon

kun 12 mil libroj. Pruntedonadi librojn li ne ŝatis, sed preferis iam doni al tiu petanto kelkajn lidojn (litova mono): „iru kaj aĉetu mem“.



**Kaunas. La domo, kie loĝis
A. Dambrauskas**

Longjara kunlaboranto de la prelato la pastro Mykolas Vaitkus (iom lerninta Esperanton) substrekis, ke A. Dambrauskas estis tre laborema individuo. Lia tagordo komenciĝadis je la 5-a matene. Post lanta sinordigo kaj vestiĝo, li, kunpreninte brevieron, kun promenbastono trankvile paŝis al la Kaŭna Bazilika Katedralo por celebri meson (samtiel ĉiumatene!). Hejme lin atendis nedaŭra matenmanĝo (teo, pano, butero, fromaĝo).

Sekvis akurata laboro super vasta korespondado (ankaŭ kun eksterlando, ekzemple li korespondis kun rusa filozofo Nikolaj Berdjajev) kaj trarigardo de multaj gazetoj. Kelktage li iris labori en apuda episkopa kurio.

Multe da tempo okupis legado de libroj, korektado de malnetoj kaj presprovaĵoj, verkado de leteroj (ili ĉiam estis aferecaj).

Interese – A. Dambrauskas preferis legi promenade kaj skribi starante (ĉe pupitro). Post tagmanĝo je la 12-a li dum kelkaj horoj regule promenadis en ĝardeneto de apuda pastra seminario aŭ laŭ riverbordo.

Se mankis kunpromenanto aŭ kundiskutanto, li promenis ion legante. Legis A. Dambrauskas gazetojn, revuojn kaj librojn de teologia, filozofia, scienca kaj esperantista enhavo.

Tre atente li legis poeziajn verkarojn kaj poste publikigis sian senkompromisan opinion pri ili. Li tre ŝatis viziti ekspoziciojn de arto, kaj poste verkis kritikajn recenzojn pri ili. Post vespermanĝo sekvis plua laborado kaj plenkora preĝado.

Komence de 1938 A. Dambrauskas eksentis intensiĝantan malfortiĝon de la organismo. La 15-an de februaro li fordonis al presejo manuskriptojn de la revuo *Draugija*, kie estis du liaj artikoloj – pri la ŝtata konstitucio kaj pri la litova beletro de la lasta dudekjaro, kaj iris al malsanulejo.

La sanstato ĉiam malboniĝis. Malgraŭ tio li petis, ke oni venigu al li en malsanulejon la presprovaĵon por la tralego. Matene la 19-an de februaro 1938 Aleksandras Dambrauskas trankvile mortis. La lasta lia volo estis: la adiaŭo okazu sen florkronoj kaj sen paroladoj!

La forpasinto estis sepultita en lia gastoĉambro, kie antaŭtage surtable kuŝis verko de lia ŝatata filozofo Vladimir Solovjov... Ĉe superkapo de poreterne ripozanta A. Dambrauskas estis eksponitaj du liaj honorigaj ordenoj: La ŝtata ordeno de Ĉefduko Gediminas kaj la esperantista Ora Jubilea Stelo.

Por adiaŭi de la elstarulo, al lia hejmo venis Ŝtata Prezidento Antanas Smetona, prezidanto de litova Sejmo K. Ŝakenis, rektoro de Ŝtata Universitato M. Romeris, arkiepiskopo metropolito J. Skvireckas.

Al Kaŭna bazilika arkikatedralo akompanis la adiaŭon amaso da popolo: universitataj profesoroj, verkistoj, ĵurnalistoj, esperantistoj, simplaj kaŭnanoj.

Ankaŭ studentoj kaj armeanoj kun siaj flagoj, funebre zonitaj. Eksonis sonoriloj de



Kaŭna bazilika arkikatedralo




Tombo de A. Dambrasukas

ĉiuj kaŭnaj preĝejoj. Inter la akompanantoj estis lia bona kunulo monsinjoro arki-episkopo Jurgis Matulaitis (1871-1927, Giorgio Matulewicz), kiun papo Paŭlo II en 1987 proklamis beatulo.

A. Dambrasukas estis entombigita ĉe la norda muro de Kaŭna Bazilika Arkikatedralo. Por la epitafo estis prenitaj la sentenco de Li mem: *Ni ne per propra fajro glimas kaj ne por si ĉirkaŭe lumon verŝas...*

Baza Literatura Krestomatio



Tuta biblioteko en unu volumo

Nova eldono, korektita kaj ampleksigita

199 verkoj aŭ fragmentoj de 82 aŭtoroj

Eldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

368 paĝoj

Prezo: 27 eŭroj.


Speciala unuataga prezo: 13,50 eŭroj

Aĉetebla en la libroservo kaj ĉe Halina Gorecka

La plej nova periodo de Litova Esperanto-Asocio

Esperanto en Litovio ekĝermis tuj post 1887, kiam aperis la unua lernolibro de Esperanto en Varsovio. La unua litova esperantisto estis tre fama personeco de tiutempa Litovio – prelato, verkisto, literaturisto, poeto, publicisto, eĉ matematikisto, aktiva socia aganto Aleksandras Dambrauskas. En la unua Zamenhofa Adresaro li estis la 186-a. Jam en 1890 li verkis kaj eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj. Baldaŭ aperis la unuaj Esperanto-societoj. Post la unua mondmilito en la jaro 1918 litovoj rekreis sendependan ŝtaton kaj jam en 1919 estis fondita Litova Esperanto-Asocio, kies fondinto kaj multjara gvidanto estis la sama prof. Aleksandras Dambrauskas. En 1922 aperis monata Esperanto-revuo „Litova stelo“, ĝin ekredaktis denove Aleksandras Dambrauskas. En diversaj urboj de Litovio aperis multaj esperantistaj kluboj, societoj, la esperantista vivo estis tre vigla.

Tamen en la jaro 1940 Litovio estis okupaciita kaj aneksita, ĝi fariĝis parto de Sovetunio, kie Esperanto-movado estis malpermesita kaj persekutata. La movado kolapsis. Litova Esperanto-Asocio estis




perforte likvidita. Nur en la jaro 1956 la vorto Esperanto en Sovetunio ĉesis estis tabua. Kaj poiomete komencis reaperi malnovaj esperantistoj – en grandaj urboj kiel Vilnius, Kaunas, Klaipėda, Šiauliai, Panevėžys, – fondiĝis esperantistaj kluboj. Ekaktivis malnovaj esperantistoj Antanas Poška, Juozas Petrulis, Adomas Vaitilavičius, Albinas Vebeliūnas kaj multaj aliaj. Oni sukcesis en 1959 eldoni novan lernolibron de Esperanto kaj litovan-Esperantan vortareton. Tamen organizita Esperanto-movado ankoraŭ ne povis ekzisti, asocioj ne rajtis organiziĝi.

Esperantistoj estis eltrovemaj kaj en 1959 en Latvio estis organizita la unua Baltia Esperantista Tendaro (BET), kiu fariĝis ia konstanta organiza formo ne nur de esperantistoj el la tri baltiaj respublikoj (Estonio, Latvio, Litovio), ĉiujare organizataj laŭvice en tiuj tri respublikoj, sed baldaŭ fariĝis tre amasa tutsovetia esperantista aranĝo. Ĉar tiutempe ne eblis viziti Universalajn Kongresojn de Esperanto, BET fariĝis alternativo de UK, iaspeca minikongreso de Esperanto.



A. Dambrauskas en sia laborĉambro



Antanas Poška en sia junaĝo

Nova periodo de esperantista movado en Litovio komenciĝis en 1988, kiam sekve de gravaj politikaj ŝanĝoj en tuta Sovetio litovaj esperantistoj decidis restarigi dum 1919-1940 funkciintan Litovan Esperanto-Asocion. Ĝi tuj aliĝis al UEA. En 1990, kiam Litovio denove fariĝis sendependa ŝtato, en Litovio ekaperis

novaj pli vastaj horizontoj. Asocio en Kaunas ricevis de la registaro historian Zamenhofdomon, en 1991 estis renovigita eldonado de prestiĝa dumonata Esperanto-revuo „Litova stelo“, ku aperadis ĝis 2010.

Dum tri jardekoj post la restarigo Litova Esperanto-Asocio fariĝis unu el la plej aktivaj kaj rezultodonaj sociaj organizaĵoj en Litovio. Ĝiaj ĉefaj atingoj en tiu periodo estas jenaj:

1. Aliĝo al UEA kiel aliĝinta nacia landa asocio en 1989, kiam Litovio ankoraŭ ne estis sendependa ŝtato.

2. En 1991 – restarigo de la dumonata Esperanto-revuo „Litova stelo“, kiu estis disvastigata en pli ol 50 landoj kaj aperadis ĝis 2010 inkluzive.

3. Litova Esperanto-Asocio transprenis organizadon de Baltiaj Esperanto-Tagoj, organizataj ekde 1959 laŭvice en Estonio, Latvio kaj Litovio. En Litoviaj BET-oj nun kutime partoprenas pli ol 300 esperantistoj el pli ol 30 landoj. Ĝis nun en Litovio okazis 17 tiaspecaj aranĝoj.

4. En 1991 Litova Esperanto-Asocio de Litovia Registaro ricevis por senpaga uzo domon en Kaunas, str. L. Zamenhof 5, kiu siatempe apartenis al la bopatro de Ludoviko Zamenhof Aleksandro Zilbernik. En tiu domo estas kreita Litovia Esperantista Centro, kie estas sidejo de Litova Esperanto-Asocio, biblioteko de Esperanto-literaturo,



Domo de Zilbernik en Zamenhof-str. nun

REDAKTORA VORTO



„Esperantujo, amata tero, naive kredas mi, ke estas vi en vero“ – kantis esperantistino Dina. Ni provu ne konsenti kun ŝi. Ja PIV ekpilkas – Esperantujo estas la lando de esperantistoj, provizore ekzistanta en iliaj kongresoj. Ni aldonu ankau en E-renkontiĝoj, E-aranĝoj. Tio ja estas manifestiĝaj formoj de Esperantujo. Ne tiom gravas, ke la aranĝoj kutime okupas iun determinitan teritorion. Gravas la medio, la etoso kiu regas sur tiu ĉi areo. Se vi partoprenas E-aranĝon por komunkigiĝi kaj amikiĝi kun alinacianoj per Esperanto, vi malkovras Esperantujojn. Kaj se venis nur por aŭskulti ies prelegon – vi estas povra ĉesstanto de E-aranĝo sen sperti la anmon de Esperantujo. Esperanto fariĝis la lingvo de interkomunikado por multaj diverstradiciaj, diverskulturaĵaj homoj. Esperantujo servas tion! La fenomeno de Esperantujo estas universala, ĉiam pli disvastiĝanta, ne forpasanta. Bonvenon al Esperantujo!

★
Vytautas Šilas /Vytautas Šilas

LITOVA STELO Lietuvos zvaigždė

N-ro 4 (194)
julio - aŭgusto 2010, XX jaro

ENHAVO

- 2 Kio estis la aranĝo BET ?
- 9 Superba drameska soprano N. KAZLAUSKAITE - KAZLAUS
- 14 Ĵurnalista konkurso de LS
- 15 Jubileas brava muzikisto A. PIŠČIKAS
- 17 Elstara Esperantisto A. DAMBRAUKAS-DOMBROVSKI
- 18 pri li – B. GOLDEN
- 21 pri li – M. CASANOVES
- 25 Fortpasa ŝono V. BANIULAITIS
- 26 Dankon al “Gariūnai”
- 27 Eterne progresanta A. GRINCEVIČIUS
- 28 Ĵurnalistoj bierumas
- 29 MUZO-10 okazis
- 30 E-mozaiko
- 31 Ridetu kune
- 32 Abono al *Litova stelo*

La fotoj sur la kovrilaj paĝoj – sur la 1a – de Vaidotas GRIGAS sur la 2a – de Elena PIŠČIKIENE sur la 3a – de Gran teatre del Liceu, Barcelona sur la 4a – de Joanna FILIPOVICZ – CHOROSZUCHA



enhavanta pli ol 10.000 titolojn, arkivo de litova esperantista movado, instrua centro de Esperanto, eldona centro, redakcio de la revuo, turisma agentejo, gastejo. Estas kreata muzeo de L. Zamenhof kaj de la litova Esperanto-movado.

5. En 1998, laŭ zorgo de Litova Esperanto-Asocio en Veisiejai, en la urbeto, kie iam loĝis Ludoviko Zamenhof, estis starigita impona monumento por la aŭtoro de Esperanto. Laŭ multaj atestoj ĝi estas la plej bona monumento al Ludoviko Zamenhof en la tuta mondo. En 2005 en Vilnius, la ĉefurbo de Litovio, unu strato estas nomumita kiel strato de Ludoviko Zamenhof. En Litovio estas ankoraŭ kelkaj ZEOJ.

6. En 1999 en Vilnius estis fondita filio de Litova Esperanto-Asocio.

7. En 1996-2008, laŭ invito de Litova Esperanto-Asocio, en Litovio gastis

prezidantoj de UEA prof. Lee Chong-Yeong (Koreio) kaj prof. Renato Corsetti (Italio), kaj ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller (Finnlando), kiuj krom multaj aliaj oficialuloj de Litovio estis akceptitaj fare de tiutempaj prezidentoj de Litovio Algirdas Brazauskas kaj Valdas Adamkus, tiutempaj prezidentoj de Litovia parlamento Česlovas Juršėnas kaj Artūras Paulauskas, tiutempaj ministroj pri eksterlandaj aferoj, de kulturo, de edukado kaj scienco.

8. Per sia aktiva konsekvenca kaj rezultodona agado Litova Esperanto-Asocio atingis, ke en 2005 en la ĉefurbo de Litovio Vilnius estu organizita la 90-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto. Tiu-ĉi kongreso ĝis nun estas la plej granda internacia aranĝo en Litovio (2.344 personoj el 63 landoj)

9. En 2008 Litova Esperanto-Asocio organizis tre sukcesan, la unuan Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, kiun partoprenis pli ol 250 personoj el 40 landoj.

**90-a Universala Kongreso
de Esperanto**

Kongresa Libro

**Vilno
23-30 julio 2005**

Kongresa Temo:

**Universalaj Kongresoj: 100 jaroj
de interkultura komunikado**

10. Dum tiuj tri jardekoj Litova Esperanto-Asocio organizis multajn aliajn gravajn internaciajn esperantistajn aranĝojn, ekz. la 65-an kongreson de SAT, la 8-an Internacian Medicinan Esperanto-Konferencon, la 11-an Ekumenan Esperantistan Kongreson, la 57-an Internacian Katolikan Kongreson, la 38-an Konferencon de ILEI kaj multajn aliajn.

11. En 2005 Litova Esperanto-Asocio en palaco de Litovia parlamento en Vilnius organizis tre gravan la 4-an internacian NITOBESimpozion laŭ temo „Lingvo-plitikaj aspektoj de pliampleksigo de Eŭropa Unio“, en kiu partoprenis pli ol 100 politikistoj, lingvistoj, sociaj agantoj el pli ol 30 landoj.

12. Litova Esperanto-Asocio tre aktive laboras en eldona kampo. Laŭ ĝia koordinado kaj gvidado en diversaj prestiĝaj litovaj eldonejoj dum 2000-2010 estis eldonitaj pli ol 100 fundamentaj libroj en litova lingvo kaj en Esperanto pri instruado, historio de Esperanto, interlingvistiko kaj esperantologio,

problemoj de internacia lingvo, tradukoj de belarta literaturo, libroj pri Litovio k.s. En 2018 okaze de la proksimiĝanta 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio aperis kapitala, tre ampleksa libro „La granda litova-Esperanta vortaro“ (816 paĝoj).

13. Litova Esperanto-Asocio ankaŭ intense laboras en la kampo de instruado de Esperanto. En diversaj kursoj dum lastaj jardekoj Esperanto estis instruata al pli ol 5000 personoj, estis invitataj Esperanto-instruistoj el Aŭstralio, Brazilo, Bulgario, Slovakio kaj Pollando.

14. Litova Esperanto-Asocio pro sistema agado ricevis vastan internacian rekonon. En 1995 ĝi ricevis internacian premion „Cigno“, en 1997 ĝi estis premiita per la premio Grabovski. En 2003 Litova Esperanto-Asocio estis agnoskita kiel la plej bone funkcianta nacia Esperanto-Asocio en kadre de UEA kaj ricevis la Trofeon Fyne.

15. Litova Esperanto-Asocio multe laboras en kleriga kaj eduka terenoj, informante la socion pri problemoj de la internacia lingvo, pri esenco de esperantista movado k.s. Estas organizataj ekspozicioj, prelegoj, artikoloj kaj intervjuoj en la gazetaro, radioj kaj televido.

16. Gvidantoj de Litova Esperanto-Asocio (Povilas Jegorovas, Audrys Antanaitis, Vytautas Šilas kaj aliaj) estas konstante elektataj en gvidantaron de diversaj internaciaj esperantistaj organizaĵoj. Tri famaj





Petras Čeliasukas 90-jara

litovaj esperantistoj (Petras Čeliasukas, Telesforas Lukoševičius, Antanas Mekys) estas elektitaj Honoraj Membroj de UEA.

17. Litova Esperanto-Asocio konstante vastigas kaj flegas internaciajn esperantistajn kontaktojn kaj rilatojn. Multnombraj grupoj de litovaj esperantistoj ĉiujare partoprenas Universalajn Kongresojn de Esperanto en diversaj landoj kaj en diversaj eŭropaj kaj aliaj internaciaj esperantistaj aranĝoj.

18. Litova Esperanto-Asocio ĝuas subtenon (ankaŭ ofte financan) de Litovia Registaro, de urbaj municipoj de Vilnius, Kaunas kaj de aliaj urboj.

19. La plej altranga litova esperantisto estas membro de Eŭropa Komisiono Vytenis Povilas Andriukaitis, kiu en 2016



Domo Zamenhofo,
Zamenhofo 5, Kaunas,
sidejo de Litova
Esperanto-Asocio

partoprenis kaj faris ĉefan prelegon en Esperanto, dum la internacia konferenco en la slovaka urbo Nitra, laŭ la temo „Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio“. Li ankaŭ partoprenis la kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio en la germana urbo Freiburg en junio 2017, kaj ankaŭ faris ĉefan paroladon en Esperanto



Vytenis Povilas Andriukaitis



Povilas Jegorovas



okaze de la 100-jariĝo ekde la morto de Ludoviko Zamenhof.

Li estas elektita kiel honora membro de Eŭropa Esperanto-Unio. Dum la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en 2018, en Lisbono, Portugalio, li estis elektita membro de Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas la plej altranga politikisto en la mondo nuntempe, kiu mem estas esperantisto kaj ĉiuflanke subtenas nian movadon.

20. Nuntempe en Litovio estas ĉirkaŭ 6.000 esperantistoj. Multaj el ili estas membroj de Litova Esperanto-Asocio.

Litova Esperanto-Asocio nuntempe estas unu el la plej solidaj kaj aktivaj sociaj organizaĵoj de Litovio. Ĝi havas grandan landan kaj internacian rekonon.

Havante tian renomon ĝi kuraĝe eniras en la duan jarcenton de la agado.

Povilas Jegorovas
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Aliaj programeroj en BET-55

Kio? Kie? Kiam? (KKK)

Temas pri rusa televida kvizo, kiu naskis grandan ludan movadon. Kial? Ĉar ludante ordinarajn kvizojn ni devas precize koni la respondojn. Ĉefa distingo de KKK estas, ke ludante KKK vi eltrovas respondon, kiun vi povas ne koni anticipe. Kaj la plej granda plezuro estas trovi respondon dum diskutadoj kaj dividi ideojn kun la kunludantoj.

Por ludi KKK vi devos havi teamon de 4-8 ludantoj. Damir Kurbangaleev planas gvidi la kvizon, kun helpo de Dima kaj Anna.

Ekspozicioj

En BET-55 okazos **Fabela ekspozicio** de Anna Striganova, ekspozicio de Robert Kamiński pri ZEO-j kaj eventuale ankaŭ aliaj ekspozicioj (bonvolu proponi!).


Libroservo

Dum la tuta BET-55 funkcios libroservo, en kiu eblos aĉeti, sed ankaŭ vendi Esperantajn librojn, lernolibrojn, diskojn kaj aliajn esperantaĵojn. Pri la libroservo respondecas membro de la organiza komitato Irena Jagminaitė. – Ĉu vi volas proponi viajn?

Aliaj

Okazos ankaŭ diservo, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ripozado en la naturo, diskutoj, forumoj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, funkcios komputiloj kun libera reta aliro...

Nia Diligenta Kolegaro



Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj
Verkis Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov
Eldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio
320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj
Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj
Prezo: 30 eŭroj
Speciala prezo en BET-55: 19 eŭroj
Aĉetebla en la libroservo kaj ĉe Halina Gorecka

Laŭlanda statistiko de la aliĝintoj al BET-55

Litovio 141
Pollando 69
Koreio 39
Ruslando, Latvio 26
Francio 22
Germanio 16
Belgio 11
Hungario, Ukrainio 9
Estonio 9
Svedio 6
Ĉeĥio, Finnlando, Luksemburgio,
Hispanio, Nepalo 5
Belarusio, Ĉinio, Pakistano, Uzbekio,
Usono, Israelo 3



Aliĝis po du personoj el ses landoj: Aŭstrio, Bulgario, Danlando, Israelo, Japanio, Kanado, Norvegio, Svislando.

El ok landoj aliĝis po unu persono: Italio, Kazaĥstano, Kubo, Nederlando, Nigerio, Slovakio, Togo.

La granda nombro de la aliĝintoj estas atingita danke al la bona reputacio de Litova Esperanto-Asocio, riĉa instrua, kultura, kleriga kaj ekskursaj programoj, allogeco (ankaŭ financa) de la „kongreslando“ Litovio, oportuna proksimeco tempa kaj loka kun la 104-a UK en Lahtio, fine, ankaŭ pro la zorge planita kaj efike realigata informado reta kaj tradicia.

La aliĝado daŭras. La organizantoj realisme opinias, ke la definitiva nombro de la aliĝintoj povos proksimiĝi al 400.

Dum-BET-aj ekskursoj

Tuttaga ekskurso: Biržai – Pakruojis



Matene ni veturos per buso al Biržai, urbo en la nordo de Litovio, proksime al Latvio. Biržai estas fama pro la kastelo-fortikaĵo, konstruita en la 16-a jarcento. Nuntempe en la kastelo funkcias muzeo de la distrikto, en kiu ni konatiĝos kun iloj de tradicia bierfarado, ĝia teknologio kaj gastamaj tradicioj de aŭkštajtoj (la du ĉefaj triboj de la litovoj: aŭkštajtoj kaj ĵemajtoj, rim. de la red.). Sidiĝinte ĉe tablo, ni gustumos bieron, fromaĝon kaj panon de la distrikto Biržai.

Poste ni vizitos la regionan parkon, kie ni vidos ekspozicion pri karstaj procezoj. Ni piediros la 525-metran ponton super la lago Ŝirvena ĝis la bienpalaco de Astravas, promenos laŭ 700-metra geologia pado, grimpos al la ŝip-simila rigardoturo de Kirkilai. Poste ni veturos al la bienpalaco de la urbeto Pakruojis, kie en taverno nin atendos tagmanĝo. Post la tagmanĝo ni konatiĝos kun



la bienpalaco kaj ĝia interesa historio. Ĉi tiu palaco estas la plej granda konserviĝinta ĝis nun tuta komplekso de bienpalacaj konstruaĵoj en Litovio, okupanta 40-hektaran teronon.

La bienpalaco estas registrita en la listo de la Litovia Heredaĵo kaj en la libro de rekordoj de Litovio, kiel la plej granda palaca bieno. Fine de la ekskurso ni vizitos mistikan subtegmentejon de la palaco, kie ni gustumos eksterordinaran baronan trinkaĵon.

Duontaga ekskurso: Bieno de aromaj plantoj

Ni ekskursos al bieno de aromaj plantoj, kiu troviĝas proksime de Panevėžys. La titolo de la ekskurso – aromaj herbaĵoj – sugestas, ke ĉiujn plantojn de la bieno kunigas eksterordinaraj, specialaj odoroj. Ilia utiligo povas esti tre vasta. En la bieno ni ekscios pri kuraca valoro de la plantoj. Ni ankaŭ gustumos diversajn teojn el aromaj plantoj kaj plej bongustajn ni povos aĉeti por memoro kaj donacoj.

Antanas Visockas



Listo de la aliĝintoj al BET-55



1. Povilas Jegorovas, Litovio
2. Irena Alijošiūtė, Litovio
3. Mian Salam, Pakistano
4. Vida Kulikauskienė, Litovio
5. Danutė Kriščiūnienė, Litovio
6. Dima Ševčenko, Rusio
7. Anna Striganova, Rusio
8. Stano Marček, Slovakio
9. Halina Gorecka, Rusio
10. Aleksander Korĵenkov, Rusio
11. Gražina Opulskienė, Litovio
12. Asta Nastaravičiūtė, Litovio
13. Petras Čeliauskas, Litovio
14. Donata Manionienė, Litovio
15. Audronė Lėpeškienė, Litovio
16. Konstantin Olšin, Rusio
17. Tuomo Grundstrom, Finnlando
18. Gražina Narbutienė, Litovio
19. Jurijus Narbutas, Litovio
20. Liudmila Narbutienė, Litovio
21. Bronislovas Puzinas, Litovio
22. Genovaitė Puzinienė, Litovio
24. Eugenija Novikova, Litovio
25. Regina Januškevičienė, Litovio
26. Kristin Tytgat, Belgio
27. Gunnar Olsson, Svedio
28. Rasa Mišeikytė, Litovio
29. Laima Vilkelytė, Litovio
30. Vanda Rapševičienė, Litovio
31. Irena Jalovekytė, Litovio
32. Janis Karklinš, Latvio
33. Onni Kauppinen, Finnlando
34. Galina Hvedchenja, Belorusio
35. Galina Terentjeva, Rusio
36. Nina Pietuchowska, Pollando
37. Alfred Schubert, Germanio
38. Lee Jungkee, Korea Respubliko
39. Dalia Pileckienė, Litovio
40. Karsten Schnatehorst, Germanio
41. D-ro Gabor Markus, Hungario
42. Elizabet Hellenpach, Hungario
43. Svetlana Smetanina, Rusio
44. Andrej Obrezkov, Rusio
45. Valerij Vorobjov, Rusio
46. Evelina Sokolova, Rusio
47. Aleksandr Osokin, Rusio
48. Mikaelo Bronštejn, Rusio
49. Algimantas Piliponis, Litovio
50. Pilgeun Yu, Korea Respubliko
51. Mikaelo Lineckij, Ukrainio
52. Kyungok Chun, Korea Respubliko
53. Alfredas Maruška, Litovio
54. Ramon Garcia Tarrago, Kubo
55. Kim Okjeong, Koreio
56. Tatjana Kolomijec, Ukrainio
57. Peter Kuhnel, Germanio
58. Kari Tapio Pyykko, Finnlando
59. Mirosława Kubicka, Pollando
60. Krzysztof Śliwiński, Pollando
61. Barbara Pietrzak, Pollando
62. Teresa Pomorska, Pollando
63. Georgo Stefanski, Pollando

65. Danka Leyk, Pollando
66. Janusz Dyda, Pollando
67. Vladimír Dvořák, Čehio
68. Pavla Dvořáková, Čehio
69. Johano Pachter, Germanio
70. Dmytro Cibulevskij, Ukrainio
71. Shim Myungki, Koreio
72. Anne Jausions, Francio
73. Claude Jausions, Francio
74. Snaiguolė Malych, Litovio
75. Alma Šlamaitė, Litovio
76. Prof. Aleksandr Melnikov, Rusio
77. Olga Strojeva, Litovio
78. Palmira Lukoševičienė, Litovio
79. Inita Tamošiūnienė, Litovio
80. Paulo Meliz Irache, Hispanio
81. Biruta Rozenfelde, Latvio
82. Matiiss Vloeberghen, Ĉinio
83. Lydia Lindla, Estonio
84. Sung Minwoo, Koreio
85. Jogailė Čojūtė, Litovio
86. Vida Čojienė, Litovio
87. Choe Taesok, Litovio
88. Audronė Maksimaitienė, Litovio
89. Rita Valčiukaitė, Litovio
90. Jean-Claude Roy, Francio
91. Eugenija Kedienė, Litovio
92. Hildegard Stecay, Germanio
93. Natalija Ivanova, Ukrainio
94. Jeongsoon Ma, Koreio
95. Murad Mamedov, Ukrainio
96. D-ro Vilius Šidlauskas, Litovio
97. Matas Beresinevičius, Litovio
98. Eugenija Kaspiravičienė, Litovio
99. Eleonora Nakaitė, Litovio
100. Ona Šerėnienė, Litovio
101. Alina Plerpienė, Litovio
102. Povilas Šiaučiūnas, Litovio
103. Prof. Daiva Žostautienė, Litovio
104. Saulė Kairienė, Litovio
105. D-rino Sandra Jakštienė, Litovio
106. Dalia Gaspariūnienė, Litovio
107. Vilma Bačelienė, Litovio
108. Georg Hennemann, Germanio
109. Patricia Vera Camacho, Germanio
110. Vyačeslav Nasretdinov, Kazaĥio
111. Vanda Šimaitienė, Litovio
112. Ieva Švarcaitė, Litovio
113. Norbert Bludau, Germanio
114. Inge Ostra, Estonio
115. Arvi Kuuseok, Estonio
116. Kim Soo-yong, Koreio
117. Oh Soon-mo, Koreio
118. Shin Youngmuk, Koreio
119. Vanda Katinaitytė, Litovio
120. Nijolė Stakėnienė, Litovio
121. Elżbieta Krawiec, Pollando
122. Cho Man-jin, Koreio
123. Cho Moon-joo, Koreio
124. Francoise Noireau, Francio
125. Jan Borowiecki, Pollando
126. Janina Borowiecka, Pollando
127. Vita Petronytė, Litovio
128. Jadvyga Skripkauskaitė, Litovio
129. Alla Derekh, Belorusio
130. Byun Sunglye, Koreio
131. Maria Litwiniak, Pollando
132. Jaroslava Humpová, Čehio
133. Fabienne Berchtold, Francio
134. Mara Timermane, Estonio
136. Dmitrij Osipov, Rusio
137. Aleksander Zdechlik, Pollando

138. Sergeo Strašnenko, Latvio
139. Jadwiga Greger, Pollando
140. Jadwiga Wasiuk, Pollando
141. Janina Kozakiewicz, Pollando
142. Floreal Gabalda, Francio
143. Liba Gabalda, Francio
144. Chon Chang Song, Koreio
145. Rhee Kyungok, Koreio
146. Yauheniya Piachkova, Belorusio
147. Heidi Goes, Belgio
148. Natalia Grochocka, Pollando
149. Krystyna Grochocka, Pollando
150. Irena Cimnalonskienė, Litovio
151. Lina Jablonskienė, Litovio
152. Ona Striškienė, Litovio
153. Valdonė Skujienė, Litovio
154. Aldona Mieliauskaitė-Gvergždienė, Litovio.
155. Viktorija Smišlajeva, Latvio
156. Aleksandro Smišlajev, Latvio
157. Tatjana Auderskaja, Ukrainio
158. Angelė Straleckienė, Litovio
159. Paulina Danutė Vidrinskienė, Litovio
160. Danutė Statkuvienė, Litovio
161. Aldona Motekaitytė, Litovio
162. Janis Kalniņš, Latvio
163. D-ino Virginija Gurskienė, Litovio
164. Ramūnas Narbutas, Litovio
165. Nijolė Petraitytė, Litovio
166. Daiva Mažeikaitė, Litovio
167. Regina Buišienė, Litovio
168. Irena Butnorienė, Litovio
169. Regina Petraitytė, Litovio
170. Zenonas Sabalys, Litovio
171. Vera Valentaitė, Litovio
172. Nijolė Lukoševičiūtė, Litovio
173. Irena Jagminaitė, Litovio
174. Adelė Regina Rozentalienė, Litovio
175. Park Soo Hyeon, Koreio
176. Marc Giraud, Francio
177. Choe Jeongcheol, Koreio
178. Han Gyeosun, Koreio
179. Kim Songa, Koreio
180. Lee Namhaeng, Koreio
181. Jung Byoungmi, Koreio
182. Soon Senhye, Koreio
183. An Seonduk, Koreio
184. Kim Youngok, Koreio
185. Kim Mikyung, Koreio
186. Choi Sukhee, Koreio
187. Jo Byungin, Koreio
188. Park Yibok, Koreio
189. Yang Ilkyu, Koreio
190. Ginta Liatukaitė, Nederlando
191. Go Soo jin, Koreio
192. Flarida Perevertaylo, Rusio
193. Daria Perevertaylo, Rusio
194. Annette Chadelaud, Francio
195. Michel Chadelaud, Francio
196. Chang Youngeun, Koreio
197. Bogusława Bronowska, Pollando
198. Asztalosné Koltai Györgyi Maria, Hungario
199. Ildikő Pusztai, Hungario
200. Prof. Aloyzas Gudavičius, Litovio
201. Gerd Jacques, Belgio
202. Lydia Buyst, Belgio
203. Imre Keményfi, Hungario
204. Li Hyon-Suk, Koreio
205. Lee Inbok, Koreio
206. Stanisław Mandrak, Pollando
207. Klára Mária Szabó, Hungario

208. Valentina Zaharova, Rusio
 209. Ester Putsepp, Estonio
 210. Rimantas Endriulaitis, Litovio
 211. Prof. Amri Wandel, Israelo
 212. Yves Nevelsteen, Belgio
 213. D-ro Orlando E. Raola, Usono
 214. Prof. Walter Źelazny, Pollando
 215. D-ro Arimantas Račkauskas, Litovio
 216. Abdurahman Junusov, Rusio
 217. Inesa Čenienė, Litovio
 218. Vytautas Šilas, Litovio
 219. Vida Lašienė, Litovio
 220. Emilija Rapkevičiūtė, Litovio
 221. Margarita Źelve, Latvio
 222. Anita Źelve, Latvio
 223. Aldis Bušs, Latvio
 224. Aldis Cilinskis, Latvio
 225. Aina Januševska, Latvio
 226. Aivars Kalniņš, Latvio
 227. Genoefa Tamane, Latvio.
 228. Inese Baltina, Latvio
 229. Vija Jansone, Latvio
 230. Vera Sakaine, Latvio
 231. Zofia Śmistek, Pollando
 232. Nicolay Dimitrov, Francio
 233. Marie-Therese Dimitrov, Francio
 234. Alla Konoval, Ukrainio
 235. Ljubov Krasutska, Ukrainio
 236. Hristo Georgiev, Bulgario
 237. Elżbieta Karczevska, Pollando
 238. Raisa Bondar, Pollando
 239. Cecylia Hlebowicz, Pollando
 240. Barbara Podolska, Pollando
 241. Ewa Sak, Pollando
 242. Alicja Temler, Pollando
 243. Stefania Romanowicz, Pollando
 244. Elzbieta Maria Toepler, Pollando
 245. Henryk Jobs, Pollando
 246. Helena Biskup, Pollando
 247. Irena Natalia Tomaszewska, Pollando
 248. Jolanta Rojek, Pollando
 249. Jerzy Kilijański, Pollando
 250. Kazimierz Pietuchowski, Pollando
 251. Bruno Lehtinen, Finnlando
 252. Marijus Dilba, Litovio
 253. Zhang Hong, Ĉinio
 254. Guo Xinyi, Ĉinio
 255. Prof. Gong Xiaofeng, Ĉinio
 256. Aneta Moscinska, Pollando
 257. Vladimir Źuromskij, Litovio
 258. Bożena Kocyk, Pollando
 259. Marian Kocyk, Pollando
 260. Choi Leenah, Koreio
 261. Choi Kyina, Koreio
 262. Gim Inhong, Koreio
 263. Alberts Kalniņš, Latvio
 264. Irena Kalnina, Latvio
 265. Andreas Langholf, Germanio
 266. Esther Langholf, Germanio
 267. Birk Langholf, Germanio
 268. Ilan Langholf, Germanio
 269. Kalina Vasileva - Sofio, Bulgario
 270. Maria Bolek, Pollando
 271. Colette Real, Francio
 272. Marco Teani, Francio
 273. Prince Henry, Nigerio
 274. Suzanne Roy, Kanado
 275. Stasys Raulynaitis, Litovio
 276. Gražvydas Jurgelevičius, Litovio
 277. Liga Berce, Latvio
 278. Halina Kuropatnicka-Salamon, Pollando
 279. Pavel Polnický, Ĉeĥio

280. Enrique ElleMBERg, Usono
281. Gediminas Kazlauskas, Litovio
282. Reda Kazlauskienė, Litovio
283. Marie-Christine Bourgeois, Francio
284. Dieter Rooke, Svislando
285. Edvardas Piščikas, Litovio
286. Edgaras Piščikas, Litovio
287. Jelena Piščikienė, Litovio
288. Marija Lajevskaja, Belorusio
289. Eleonora Kononiuk, Germanio
290. Vladimir Kononiuk, Germanio
291. D-ro Manfred Westermayer, Germanio
292. Eva Školnykova, Germanio
293. Regina Kapłan-Waluto, Pollando
294. Stanisława Tobolewska, Pollando
295. Andrzej Jabłonski, Pollando
296. Signe Skriver, Danio
297. Peter Wraae, Danio
298. Antanas Visockas, Litovio
299. Elżbieta Pachura, Pollando
300. Anne Tilmont, Belgio
301. Ivo Durwael, Belgio
302. Halina Radola, Pollando
303. Katarzyna Koziół, Pollando
304. Gilbert Stambach, Francio
305. Zofia Kepka, Pollando
306. Prof. Iłona Koutny, Pollando
307. Milan Kolka, Ĉeĥio
308. Zuzanna Kornicka, Pollando
309. Gafurjan Mirzabaev, Uzbekio
310. Elona Antauskė, Litovio
311. Damir Kurbangaleev, Rusio
312. Hideko Huzimoto, Japanio
313. Linus Ganman, Estonio
314. Humiko Mizutani, Japanio
315. Sándor Szalai, Hungario
316. Júlia Szalainé Timár, Hungario
317. Françoise Mériaux, Francio
318. Hubert Meriaux, Francio
319. Alfred Heiligenbrunner, Aŭstrio
320. Ouassila Kharoune, Francio
321. Jocelyne Kharoune, Francio
322. D-ro Hans Michael Maitzen, Aŭstrio
323. Margaretha Symoens, Belgio
324. D-ino Ambreen Islam, Pakistano
325. Hamza Salam, Pakistano
326. Zofia Homoncik, Pollando
327. Maria Danuta Korzybska, Pollando
328. Teresa Wartak, Pollando
329. Jolanta Kieres, Pollando
330. Isabelle Saulnier, Francio
331. Denise Vernay, Francio
332. Bogdan Dembiec, Pollando
333. Ewa Tracz, Pollando
334. Halina Komar, Pollando
335. Krystyna Buczowska, Pollando
336. Natalia Bertse, Svedio
337. Georg Nordlist, Svedio
338. Christelle Bjork, Svedio
339. Hyoseong Lee, Koreio
340. Elena Šaravina, Rusio
341. Oksana Deriuševa, Rusio
342. Suzano Bolduc, Kanado
343. Józef Poraj-Różecki, Pollando
344. Irena Gowin-Różecka, Pollando
345. Sol Roca, Hispanio
346. Francesc Inglada, Katalunio
347. Aleksei Kozlov, Rusio
348. Andrzej Sochacki, Pollando
349. Valentina Kocina, Latvio
350. Janis Dzelme, Latvio
351. Magdalena Tatar, Pollando

352. Robert Kamiński, Pollando
 353. Ben Indestege, Belgio
 354. Eduard Kusters, Belgio
 355. Oscar Otero Fernandez, Usono
 356. Boris Arrate Veranes, Svedio
 358. Jelena Uspenskaja, Rusio
 359. Yulhee Kim, Koreio
 360. Abhinanyu Khadka, Nepalo
 361. Pabitra Mahat Khadka, Nepalo
 362. Apeksha Khadka, Nepalo
 363. Marina Moritz, Svedio
 364. Prof. Dolendra Basnet, Nepalo
 365. Sangam Basnet, Nepalo
 366. Daria Smetanina, Rusio
 367. Natalia Panchenko, Ukrainio
 368. Lusi Rimon, Israelo
 369. Marija Vaičikonytė, Litovio
 370. Laima Pangonytė, Litovio
 371. Tatjana Šilienė, Litovio
 372. Koffi Kouevigan, Togo
 373. Edda-Merike Pelt, Estonio
 374. Daniel Clemente, Latvio
 375. Makhichekhra Mirzabaeva, Uzbekio
 376. Elyor Yarov, Uzbekio
 377. Dovydas Munius, Litovio
 378. Liucija Čiuldytė, Litovio
 379. Gerda Šalengaitė, Litovio
 380. Laura Poškevičiūtė, Litovio
 381. Nijolė Žambaitė, Litovio
 382. Aleksejus Karpovas, Litovio
 383. Danutė Regina Genienė, Litovio
 384. Guillem Portell, Hispanio
 385. Vitalija Gelucevičienė, Litovio
 386. Aida Čižikaitė, Litovio
 387. Genė Čižikienė, Litovio
 388. Felice Sorosina, Italio
 389. Povilas Jasiūnas, Litovio
 390. Adomas Skiežgelas, Litovio
 391. Jean-Daniel Gubler, Svislando
 392. Iwona Kocieba, Belgio
 393. Anastazija Janušonienė, Litovio
 394. Eglė Vindašienė, Litovio
 395. Heli Tammik, Estonio
 396. Kjell Peder Hoff, Norvegio
 397. Viktorija Vičiulytė, Litovio
 398. Raimo Tuisku, Finnlando
 399. Robert Bogenschneider, Finnlando
 400. Ewa Caban, Pollando
 401. Dariusz Caban, Pollando
 402. Vilius Glušokas, Litovio
 403. Vytautas Drasuiis, Litovio
 404. Mikaelo Abramovich, Rusio
 405. Gila Wandel, Israelo
 406. Roman Dobrzynski, Pollando
 407. Andrzej Romuald Pacholski, Pollando
 408. Sigita Sičiūnienė, Litovio
 409. Algis Kaspiravičius, Litovio
 410. Rimas Šuopys, Litovio
 411. Daina Untuk, Latvio
 412. Inesa Balaikienė, Litovio
 413. Lee Hyosung, Koreio
 414. Jolanta Bulotė, Litovio
 415. Jolita Ružauskienė, Litovio
 416. Jurgita Narbutienė, Litovio
 417. Nida Narbutaitė, Litovio
 418. Milda Narbutaitė, Litovio
 419. Raimonda Gžimailė, Litovio
 420. Kazys Tamošėtis, Litovio
 421. Vilija Kailiūtė, Litovio
 422. Rasmina Uščiauskienė, Litovio
 423. Augustas Kazlauskas, Litovio
 424. Domas Gintautas, Litovio


425. Ina Butėnienė, Litovio
426. Valė Pizaravičienė, Litovio
427. Rein Zubsberg, Estonio
428. Audrys Antanaitis, Litovio
429. Aurelijus Rutkauskas, Litovio
430. Irina Romanova, Rusio
431. Esenija Teravainen, Latvio
432. Larisa Teravainen, Latvio
433. Andrei Teravainen, Latvio
434. Zdravka Boytcheva, Luksemburgio
435. Jimmy Stryhn Meyer, Luksemburgio
436. Minag Stryhn-Meyer, Luksemburgio
437. Ioannis Stryhn Meyer, Luksemburgio
438. Katerina Stryhn Meyer, Luksemburgio
439. Zbigniew Kowalski, Pollando
440. Virginijus Nutautas, Litovio
441. Herman Ranes, Norvegio
442. Marius Dyglys, Litovio
443. Igone Manciles. Hispanio
444. Kąstytis Aleknavičius, Litovio
445. Gabija Vileniškienė, Litovio
446. Drąsutis Vileniškis, Litovio
447. Zuzana Bliuvienė. Litovio
448. Laimutė Vaičiulienė, Litovio
449. Vida Beinortienė, Litovio
450. Genovaitė Olšauskienė, Litovio

55-ųjų Baltijos esperantininkų dienų dalyvio knyga

LIBRO POR BET-ano

Pentristo Vladimiras Beresniovas

2019 06 12. 9,75 sp. l. Tiražas 500 egz. Užsakymas 19-153.
Leidžia Lietuvos esperantininkų sąjunga, L. Zamenhofo 5, Kaunas.
Spaustuvė „Morkūnas ir Ko“, Draugystės 17, LT-51229 Kaunas



ISBN 9955-609-95087-8-8



9 786099 508788